Dezső Kosztolányi

ANNA ÉDES

Hungaria Esperanto-Asocio

e-libro HEA

Dezső Kosztolányi

Anna Édes

Dezső Kosztolányi

Anna Édes

Romano

Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2025

Originala titolo: Édes Anna
Eldonis: Genius Könyvkiadó, Budapest, 1929

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio, 2025

Titolpaĝo: Jozefo Horvath
(Kadro el la filmo *Édes Anna* de Zoltán Fábri)

ISBN 978-963-571-524-4

@Horváth József 2025

e-libro HEA

Oremus pro fidelibus defunctis. Requiem aeternam dona eis Domine et lux perpetua luceat eis.

Circumdederunt me gemitus mortis: Dolores inferni circumdederunt me.

Absolve Domine. Benedictus Dominus Deus Israel.

Et ne nos inducas in tentationem. Sed libera nos a malo.

A porta inferi. Erue Domine animam eius.

Ne tradas bestiis animas confidentes tibi. Et animas pauperum tuorum ne obliviscaris in finem.

Domine Jesu Christe miserere ei. Christe parce ei.

Domine exaudi orationem meam. Et clamor meus ad te veniat.

Miserere mei Deus. Non intres in judicium cum famula tua Domine.

In paradisum deducant te Angeli: et cum Lasaro quondam paupere vitam habeas sempiternam.

Oremus. Anima eius et animae omnium fidelium defunctorum per misericordiam Dei requiescant in pace.

(Rituale Romanum).

Ni preĝu por la fideluloj mortintaj. Ripozon eternan donu al ili, Sinjoro, kaj la Lumo senfina brilu al ili.

Ĝemoj de morto ĉirkaŭis min: doloroj de infero ĉirkaŭis min.

Absolvu min, ho Sinjoro! Benata estu la Sinjoro, Dio de Izrael!

Kaj ne konduku nin en tenton! Sed savu nin de malbono!

El la pordegoj de infero, savu, ho Sinjoro lian animon!

Ne transdonu la animojn, kiuj fidas vin, al la bestoj! Kaj ne forgesu la animojn de viaj malriĉuloj ĝis la fino!

Sinjoro Jesuo Kristo, kompatu lin! Kristo, ŝparu lin!

Sinjoro, aŭskultu mian preĝon! Kaj mia krio venu al vi.

Kompatu min, ho Dio! Ne eniru en juĝadon kun via servistino, ho Sinjoro!

La anĝeloj konduku vin en la paradizon: kaj kun Lazaro, iam malriĉa, vi havu eternan vivon!

Ni preĝu. Ripozu en paco lia animo kaj la animoj de ĉiuj fideluloj forpasintaj, per la kompato de Dio.

(Roma Rito)

Béla Kún forflugas

Béla Kún[1] fuĝis per aviadilo el la lando.

Posttagmeze, ĉ. la kvina horo, ĉe la soveta[2] rezidejo en la hotelo Hungária ekflugis aviadilo, ĝi traflugis super Danubo, la Kastel-monto[3], kaj kun aŭdaca turniĝo direktis sin al la kampo Vérmező.

La aviadilo estis pilotata de la popola komisaro mem.

Ĝi flugis terproksime, en alto de apenaŭ dudek metroj, tiel ke oni povis vidi lian vizaĝon.

Li estis pala, nerazita, kiel kutime. Li rikanis al la civitanoj, starantaj sube, kaj kun bubeca petolo, ironie eĉ manosvingis adiaŭon al kelkaj.

Li kunportis *ĵerbojn*[4], per kiuj li plenŝtopis siajn pufiĝantajn poŝojn, krome juvelojn, gemojn de grafinoj, baroninoj, favorkoraj, bonfaremaj damoj, preĝejajn kalikojn kaj multajn aliajn valoraĵojn.

De liaj brakoj pendis dikaj orĉenoj.

Dum li svingiĝis supren en la aviadilo, unu el la orĉenoj elflugis, malaperante en la foro de la ĉielo, kaj falis en la plejmezon de la kampo Vérmező, kaj estis trovita de maljuneca sinjoro, malnova civitano de la distrikto Krisztinaváros, imposteja oficisto Kastel-monta sur la placo Szentháromság, laŭnome iu Károly József Patz.

Almenaŭ en la distrikto Krisztinaváros tiel oni rakontis.

[1] Kun, Béla (1886-1938): ĵurnalisto, komunista politikisto, la fakta gvidanto de la soveto.

[2] Soveto: Soveta aŭ Konsilantara Respubliko en Hungario de 1919-03-21 ĝis 1919-08-01), sekvinta la burĝan revolucion de 1918-10-30 ĝis 1919-03-20.

[3] Monteto sur la dekstra bordo de Danubo en Buda kun la reĝa palaco kaj registaraj konstruaĵoj.

[4] Ĵerbo: tavolkuko, farĉita per marmelado, juglando ks., tegita per ĉokolado.

La altmoŝta sinjoro, la kamarado kaj la altmoŝta sinjorino

Kiam ties famo diskuris la 31an de julio 1919, ĉirkaŭ la sesa posttagmeze, Kornél Vizy elvokis:

– Katanjo!

En la kuirejo staris knabino, dika kiel farĉita kolombo.

Ŝajnis, ke ŝi preparas sin por forpermeso.

Ŝi staris jam tute vestita. Ŝi surhavis rozkoloran ĉemizbluzon, blankan jupon, vakstolan zonon, novajn lakŝuojn. Ŝi pririgardis sin en sia manspegulo, ŝutis rizpulvoron sur poŝtukon, traŝmiris per ĝi sian dike molan vizaĝon.

Ŝi aŭdis la vokon, tamen ne ekmovis sin.

La sonorilo jam antaŭ longe, en la Károlyi-reĝimo[5], paneis, de tiam oni nur simple, krie vokis la servistinon aŭ frapis el la laborĉambro, dividita per maldika rabicvando disde la kuirejo.

La voĉo kolere kriis.

Fine la knabino trairis la longan, mallarĝan antaŭĉambron, pririgardis sin en la spegulo de la hokarvando, reĝustigis siajn harojn kaj lulante sian rondan postaĵon, dancpaŝis en la manĝejon.

Sur la kanapo de la manĝejo kuŝis ĉirkaŭ kvardek-jara viro, malzorgata kiel trampo. Li surhavis ĉifitan, molan ĉemizon sen koltuko, genue trivitan vintran pantalonon, eluzitajn ŝuojn. Nur lia aglonazo kaj la nigra vangobarbo, kadranta lian vizaĝon, montis, ke li estas tamen iu.

En sia mano li tenis la lastan numeron de *Ruĝa Ĵurnalo*, for de siaj okuloj, tute ĉe la genuoj, ĉar li estis forte malmiopa. Li tiom profundiĝis en la legadon, ke li ne tuj rimarkis la servistinon. La artikoloj jam anoncis la atendeblan kraŝon kun la titolo: „La proleta patrujo en danĝero!”

Katanjo paŝis pli proksimen al la kanapo.

– Nu, kio trafis vin? – grumblis Vizy mishumore. – Kiomfoje mi kriegu? – kaj por mildigi sian severon, ankoraŭ kuŝante, li levis la ŝultrojn.

La knabino gapis indiferente al la nazoj de siaj lakŝuoj.

[5] Károlyi, Mihály (1875-1955): ĉefministro de 1918-11-16 ĝis 1919-03-21.

– Bone – diris Vizy, kvazaŭ diskutante kun si mem, pardoneme kaj tamen malafable. – Fermu ĉiujn fenestrojn!

Katanjo ekiris.

– Atendu! Ankaŭ la kurtenojn kaj la latŝutrojn. Ĉu vi komprenis?

Poste li aldonis:

– Oni krivekis min el la strato.

Li deĵetis la *Ruĝan Ĵurnalon*, la miskvalita pajlopapero krepitis, ĝi estis fumece bruneta, kvazaŭ bruletigita de granda incendio. Vizy leviĝis de la kanapo, kaj enpoŝiginte la manojn, elrigardis tra la malfermita fenestro de la manĝejo.

Sube promenis la ruĝarmeano, suprenkriinta pli frue, sed jam tiel solece kaj forlasite, ke li ne plu elvokis malamon. Li estis eta, magra proleto, similis eĉ ne homon sed feton, sur kies ŝultron oni metis bajonetan fusilon.

La krepusko ondis sur la sunsekigita, distretita gazono de la kampo Vérmező kiel kutime, orante la montojn Isten, János kaj fore multe briligante la krucon de preĝejturo.

Ĉe la Gránit-ŝtuparo staradis homoj po du-tri, alarmita homgrego, restinta subite sen paŝtisto; ili interflustradis, kiel nuntempe oni ellernis, per surdmutulaj signoj, legante la vortojn de la lipomovoj.

Nur tio indikis la ŝanĝon.

Nubo pasis nenie. Dormiga aero peziĝis sur ĉio kiel antaŭ la eksplodo de someraj ŝtormoj, kiam la vento retenas sian spiron, kaj la naturo ŝajnas giganta ĉambro, la arboj ludiloj kaj la homoj vaksopupoj.

En ĉi tiu paraliziĝo ne estis movoj, nek voĉoj, nur unu bildo moviĝis kaj kriegis: la afiŝo, krianta „Al armiloj!”, tiu sovaĝa, freneza maristo, kiu skuegis flagon kun nekredebla svingo, tute kunfandiĝinte kun ĝi, kaj malfermegante sian ostecan buŝon, kvazaŭ ĝi volus gluti la mondon.

Vizy ofte preteriris ĉi tiun afiŝon, sed vere li neniam kuraĝis rigardi ĝin. Propre nun li rigardis ĝin unuafoje trankvile, sen blindiĝo, kiel ni rigardas la sinkantan sunon, kiu jam ne ĝenas niajn okulojn.

Fore, en la bulvardo Krisztina ŝarĝaŭto galopis urbocentren, kun la rapideco de fajrobrigada veturilo, plena de bunta ŝarĝo de infanoj, kiuj

revenis de ekskurso en Zugliget kaj skuadis frondojn, manosvingadis.

De la monto aŭdiĝis tonoj de kanto, maldika, fadenvoĉa unusono:

Leviĝu, proletar' de l' tero,
Leviĝu sklavoj de malsat'...

Junlaboristoj, metilernantoj dek- ĝis dek-kvinope, kun vera malegoisma neinformiteco kantis nun entuziasme, kion oni instruis al ili: la *Internacion*.

Katanjo jam finis en la ceteraj ĉambroj, ankaŭ en la manĝejo ŝi fermis la fenestron.

Kiam ĉiuj fenestroj de la apartamento estis fermitaj, Vizy paŝis al Katanjo kaj kun speco de febra, dolĉaĉa rideto flustris:

– Ili falis.

La afero ne interesis la servistinon aŭ ne montris tion. Sed ŝia mastro stariĝis antaŭ ŝi. Ĉar ŝia edzino ankoraŭ ne venis hejmen, li serĉis iun, al kiu malŝarĝi sian koron.

– Katanjo – li ripetis –, la ruĝuloj[6] falis.

La servistino respondis nur per miranta rigardo pro tio, ke la sinjoro meritigas ŝin je tiela konfidenco.

– La kanajloj! – aldonis Vizy kun vastiĝantaj nazaloj, en la dolĉa ebrio de venĝo.

Apenaŭ li eldiris tion, oni frapegis sur la ekstera pordo.

Vizy paliĝis. Li rigardis en la aeron, kvazaŭ serĉante la vortojn, kiujn li pli frue eldiris, kaj por malaperigi ties spurojn, li postetendis la manon, simile kiam ni forpelas cigaredan fumon.

– Mi mem – li diris kaj kun subita decido li ekiris en la antaŭĉambron malfermi la pordon, kvazaŭ rapidante renkonte al danĝero.

Li paŝadis preta je ĉio.

En lia kapo kirliĝis: preno de ostaĝoj, domtraserĉo, krizostata tribunalo! Kaj kion li prezentos por sia defendo: dudek-jara publika servo, sociala konscienco, marksismo, kiun principe li aprobas, nur sen ĝiaj troaj miskreskoj.

Li jam estis alia homo. Li ne sentis sin martiro de bolŝevikismo, eble plie viktimo de la malnova reĝimo, kiu ja ofte sendanke ignoris lin. En

[6] Ruĝuloj: komunistoj.

sia jakopoŝo li palpis sian sindikatan membrokarton. Bonŝance li ankoraŭ ne disŝiris ĝin, kiel posttagmeze li intencis.

Hometo staris antaŭ li en la koridoro en poŝtista palto kun ruĝaj roversoj kaj kolumo hejmece malbutonita.

– Altmoŝta sinjoro – la hometo muĝis, laŭtege, por ke la loĝantoj de la tuta domo povis aŭdi lin –, altmoŝta sinjoro!

– Kamarado – salutis lin Vizy –, ĉu do vi, kamarado?

– Via humila servisto, altmoŝta sinjoro.

– Envenu, k-do Ficsor!

Tiel ili konversaciis kun vera mondhistoria ĝentileco, ambaŭ malcerte, donante reciproke avantaĝon al la alia.

Kornél Vizy, ministra konsilisto nun aŭdis unuafoje post kvar monatoj sian malnovan alparolon. Li sentis iom da ĝojo, sed ankaŭ etan trompiĝon pro tio, ke ne tiuj alvenis, por kies veno li jam estis preparita. Kaj Ficsor, la pedelo de la domo n-ro 238 de la strato Attila estis brogita, ke la domposedanto ĉiam plu alparolas lin per „kamarado”.

La dompedelo enpaŝis la antaŭĉambron, etendis sian manon al la altmoŝta sinjoro. Vizy premis al li la manon.

La manpremadon iniciatis Vizy dum la proleta diktaturo, poste ĉiufoje Ficsor proponis ĝin pro ĝentileco.

– Ili falis – entuziasmis Ficsor, ĉiam plu laŭtege. – Falis la friponoj. Ili jam prenas siajn sakon kaj pakon.

– Hm – murmuris Vizy, kvazaŭ li aŭdus novaĵon.

– Jes, altmoŝta sinjoro, sur la Kastel-monto jam flirtas la nacikolora flago. Mia bofrato hisis ĝin.

– Gravas – respondis Vizy evite –, ke fine estu paco kaj kvieto.

– La bela ruĝa-blanka-verda – kapbalancis Ficsor, daŭrigante sian patriotan revadon, kaj flanke kaŝesploris la senmovan vizaĝon de Vizy. – Oni dancigos kelkajn, altmoŝta sinjoro, ja dancigos!

Vizy observis la baraktadon de ĉi tiu malfeliĉulo, sed li forfermis sin, ne respondante.

Ficsor perpleksiĝis.

– Temas propre pri la sonorilo. Nun mi havus iom da tempo. Mi pensis, mi riparos ĝin ĉe la altmoŝta sinjoro.

– Tie estas la baterio – montris Vizy al la kuirejo.

– Mi scias, altmoŝta sinjoro – ridetis Ficsor, kiu trovis dolora ofendo eĉ la supozon, ke li kiel dompedelo ne scius, kie estas la baterio de la dommastro. – Mi nur petus eskalon.

Katanjo en sia bela festa vesto incitite alportis la eskalon. Peneklopode ili lokis ĝin en la malvasta, deprima kuirejo, kiu ricevis helon nur de la lumkorto, kaj ankaŭ tage estis malhele en ĝi. Ficsor volis ŝalti la lumon. Sed la ampolo estis jam delonge rompita. Li petis kandelon.

Kun la kandelo en la mano li grimpis al la baterio, de la eskala supro li klarigis al la dommastro, kiun difekton la sonorilo havas. Li parolis gravmiene, troigis la meriton kaj valoron de sia laboro, sed kun humila respekto, per kiu li klopodis evidente mildigi tiun misan situacion, ke li staras momente tiel alte super la altmoŝta sinjoro.

Sur la supro de la ŝanceliĝanta eskalo, apogata de Katanjo, avide li metis sin al laboro. Kion li foje preterlasis, nun tuj li volis plenumi. Li umadis ĉirkaŭ la piloj, po unu li delevis kaj metis ilin sur la kuirejan tablon. Li skrapadis per sia poŝtranĉilo la rustiĝintajn dratojn. En la elektrolitujojn li ŝutis kuirsalon, verŝis akvon.

Tiam oni denove frapis sur la pordon.

En violkolora negliĝo enpaŝis svelta, elegante alta damo sen kapvesto.

– Mi kisas vian manon, altmoŝta sinjorino! – riverencis Ficsor el la kuirejo, kaj ĉar li ne ricevis respondon, li ripetis: – Mi kisas vian manon!

La virino ankaŭ ĉi-foje ne reciprokis lian saluton, ŝi forturnis sian kapon, eniris la manĝejon.

Vizy post ŝi.

Tie li brakumis sian edzinon, eksplodis lia nebridebla feliĉo. Li distiris la buŝon de ĝojo.

– Ĉu vi scias?

– Ĉion. Oni babilas, ke ankoraŭ hodiaŭ ni estos okupaciitaj. De la rumanoj.

– Ba, neniel! La grandpotencoj ne permesos tion. Estos internacia okupacio: italoj, francoj, angloj. Gábor Tatár diris al mi.

Ŝi traglatumis sian belan, sukcenflavan hararon, kaj falis en la lulseĝon.

Kun malplenaj okuloj ŝi rigardis antaŭ sin, kiel ŝi kutimis, tra objektoj, tra homoj, kvazaŭ ŝi vidus, ne kio estas antaŭ ŝi, sed ion alian.

– Kie vi forrestis? Mi jam zorgis pro vi.

– Mi kuradis. Jen por ĝi – diris s-ino Vizy, kaj dum ŝi malrapide balancis sin en la lulseĝo, ŝi malfermis sian katungantitan manon, el kiu ŝi ĵetis sur la tablon malgrandan, gazetpapere envolvitan paketon.

– Kio estas tio?

– Butero – diris la edzino kun pripaŭta rideto. – Por tri poŝtukoj.

Ficsor bruis en la kuirejo: grimpis sur la eskalo, por remeti la pilojn.

S-ino Vizy atentis eksteren. Per kapgesto ŝi demandis:

– Kion tiu volas ĉi tie?

– Li riparas la sonorilon.

– Ĉu nun tio enkapiĝis al li. Kvar tutajn monatojn ni petegis lin.

– Li mem proponis sin.

– Kial vi ne elĵetis lin?

– Ba!

– Jes ja. Tiajn oni devas piedpuŝe trapordigi.

– Pli silente: li povus aŭdi vin.

– Nu kaj? Ĉu li eble ne estas ruĝulo? Fripono. Bolŝeviko. Nu, atendu...

Vizy ankoraŭ ne trovis la tempon matura por tio.

Sed la edzino saltleviĝis rezolute, ne atendeble de ŝi, rapidis en la antaŭĉambron, por trapordigi la dompedelon.

En la dezerteca, tre longe morta loĝejo travibris ĉi-momente la sono de la elektra sonorilo. Triumfe kaj solene, forte kaj akre ĝi stridis, vekante vivemon, esperon. Ĉi tiu freŝa, gaja ŝtaltrilo donis al ĝi animon, trapenetris ĉiujn ĝiajn murojn, vekante ĉion al konscio.

Vizy aŭskultis ĝin plezure en la manĝejo. Lia edzino serĉis Katanjon, sed vidis, ke refoje ŝi eskapis en la nokton sen peto de permeso.

– Ĝi pretas – novaĵumis Ficsor kaj klinis sin, kaptis ŝian manon kaj ĉi-foje li sukcesis kisi ĝin.

Li reportis la eskalon. Kaj konjektante, ke la sonorilo kaj la mankiso

ankoraŭ ne sufiĉas, kun aŭdaca konfidenco, kiel iu, komunikanta sekreton, paŝis proksime al ŝi kaj flustris preskaŭ en ŝian orelon:

– Altmoŝta sinjorino – li mallevis la okulojn –, mi povus proponi knabinon.

– Kio?

– Servistinon.

S-ino Vizy kredis, ke ŝiaj oreloj misaŭdas, ne bone ŝi komprenis lin. Ŝi rigardis al la dompedelo kun profunda, nesekretebla intereso. Ŝiaj okuloj ekbrilis. Pli grandan ĝojon ŝi ne povus senti, eĉ se oni promesus al ŝi diamantan koljuvelon.

– Ĉu el Budapeŝto? – ŝi demandis.

– Ne ja! De Balatono. Kamparanino. Mia parencino.

Ŝi ekscitiĝis. Ŝi ĉiam revis pri servistinoj, senpere rekomendataj de konatoj, sed tiajn ankoraŭ neniu rekomendis al ŝi.

Ŝi trovus peko diskuti pretere la gravan demandon, tial ŝi mandirektis la pedelon en la kuirejon, sidigis al la tablo kaj konfesigis lin ĉe la flirtanta kandellumo. Longe ŝi traktis kun li, tute forgesinte pri sia edzo.

Ŝi mem elakompanis Ficsor.

Ŝi revenis en la kuirejon. Per du fingropintoj ŝi levis la poŝtukon de Katanjo, kaj flarinte ĝin, kun naŭzo ŝi ĵetis ĝin planken, flankenŝovis ŝian manspegulon, fermis la fenestron al la lumkorto kaj metis ŝin por prepari la vespermanĝon: ŝi rostis panon, boligis akvon por la teo.

Acidamara vespermanĝo

Vidante, ke neniu atendas ĉe la ekstera pordo, s-ino Vizy eniris la manĝejon.

– Kion vi volas?

– Mi nur elprovas ĝin – diris Vizy. – Ĝi sonas.

- Mi aŭdas.

– Ĉu li riparis ĝin?

– Vi aŭdas.

– Mi esperas, ke vi diris nenion al li.

– Ne. Jam ĉesu! – ŝi alkriis lin, ĉar Vizy ĉiam plu premadis la butonon de la sonorilo. – Kial vi ludas? Vi estas kiel infano.

– Mi estas malsata. Volus vespermanĝi.

– Sed al kiu vi sonorigas?

– Al Katanjo.

– Ŝia servistina moŝto jam antaŭ longege foriris.

– Kien?

– Kien? Nu, tien, kien kutime. Ŝi pasumas.

– Ĉu nun?

– Jes ja, nun!

– Sed hodiaŭ estas malpermesite trafiki surstrate.

– Tio eĉ iom ne interesas ŝin. Alvenis Lajos.

– Ĉu Hack?

– Jes, Hack. Per la barĝo.

– Kaj kiam li hejmenvenos?

– Li ne skribis al mi sur la nazon. Iam meznokte – eksplodis s-ino Vizy, kaj por eksciti sin, ŝi aldonis –, iam frumatene.

– Ĉu ŝi kunprenis ŝlosilon?

– Mi kredas.

– Mi povas diri, estas agrable – malkontentis Vizy. – Tre agrable. Dormi ĉe neŝlosita pordo. Ŝi povus kunpreni kiun ajn en la loĝejon.

– Vi estas stranga. Vi ŝajnigas, kvazaŭ tio okazus la unuan fojon. Vi estas ridinda – kaj incitite ŝi returnis sin, frapfermante post si la pordon, kiel Katanjo kutimis fari.

En la kuirejo ŝi ĵetadis la vazojn, farante bruon.

Fojfoje ŝi bezonis tiajn emociajn erupciojn. Lacigite diskuti kun sia edzo kiel aliancano la grandan, neniam solvitan zorgon de ilia vivo, ŝi donis esprimon al sia ĉagreno per tiaspecaj ribeletoj, ŝajnigante la aferon por kelkaj minutoj, almenaŭ al si, ke ŝia edzo estas la kaŭzo de la ĉio.

Sur ligna pleto ŝi enportis la vespermanĝon: kruĉon da teo, kelkajn toastojn kaj la buteron, kiun posttagmeze ŝi akiris.

Vizy, kiu tagmeze manĝis nur kukurbaĵon kun peceto da bovina hepato, ĵetis rigardon al la herboverda teo, al la suspektinda nigraflava maizpano, kiun eĉ la rostado ne faris pli dezirinda. Mishumore li interesiĝis.

– Ĉu nenio alia?

– Kio estus?

– Ĉu vi eĉ ne kovras la tablon?

– Ja vespere ni ne kutimas.

– Estas egale – aprobis Vizy. – Estas bone ankaŭ tiel.

Li kaŝis la kapon en la manoj, kiel tiufoje, se io misas en la dommastrumo. Longe li ne ekparolis. Pense li jam deziris la blankan tablotukon, la rozkolorajn porcelantelerojn, la arĝentajn tranĉilojn, la ĉizitajn vinbotelojn, kiuj iam briladis sur ĉi tiu tablo, kiam li donis vespermanĝojn al siaj ministeriaj amikoj.

– Ĉu vi ne manĝas? – li demandis sian edzinon.

S-ino Vizy nur malofte vespermanĝis. De jaroj ŝi suferis je nervoza stomakalgio. Pro la multaj ekscitoj dum la bolŝevika reĝimo ŝia malsano plu malboniĝis. Ŝi sentis acidecon en sia stomako.

Ŝi prenis paperskatolon, elŝovis sian anemian langon, surmetis tri malhelverdajn pilolojn, lavglutis ilin per glaso da akvo kaj skuiĝis pro naŭzo.

Ŝia edzo des pli dezire ekmanĝis. Kun la avideco de sana viro li krakigis sub siaj dentoj la sekiĝintajn, amare dolĉajn maizpanajn pecojn, sur kiujn li baldaŭ ŝmiris tiujn kvin dekagramojn da butero. Sed baldaŭ ĉio konsumiĝis. Lia stomako ribelis por iom pli. Li kirladis sian teon, enĵetis surogatan dolĉigilon. Manke de sukero li ŝatis ankaŭ

surogaton. Ĝi estis almenaŭ dolĉa.

Dum li sorbadis sian teon kun laŭta ŝmacado, li rakontis sian renkontiĝon kun sia kolego Gábor Tatár, de kiu li eksciis en la strato Úri, ke ĉio finiĝis, finfine ĉio finiĝis. Finiĝis la sociala produktado, la revolucia memkonscio, oni ne plu ĝenas la honestan, laborantan burĝaron.

Vizy senlime malamis la ruĝulojn, por kio li havis sufiĉan kaŭzon. Dum la bolŝevikismo li malsatis. Apenaŭ la soveta reĝimo establiĝis, li estis metita en malaktivan staton. Kvankam oni forgesis malpermesi la plupagadon de lia salajro dum la tiama konfuza situacio, sed apenaŭ ion li povis aĉeti por ĝi. Dum la milito li bankrotis. Tuj ĉe la komenco li investis sian tutan havaĵon, ducent kvindek mil orkronojn en militajn obligaciojn, ĉar li nepre fidis la triumfon de la germanaj armiloj. Nur lia duetaĝa domo restis, sed ĝi ne donis enspezojn. Ĝian unuan etaĝon, kvar ĉambrojn ili mem loĝis, la du loĝejojn en la dua etaĝo lia familia kuracisto Miklós Moviszter kaj juna advokato Szilárd Druma. Lian domon la ruĝuloj komunigis. Ĉi tiu domo en la tuja najbareco de la strato Mozdony ankaŭ sen tio pikis la okulojn de la Lenin-knaboj[7]. Oni kunprenis Szilárd Druma kiel ostaĝon, li sidis du monatojn en aresta prizono, al la maljuna Moviszter, la klerikala kuracisto ili daŭre faris ĝenojn, ĉe la familio Vizy ili faris viziton, kiam ili arestis lian edzinon. Lia edzino senpolvigis tablotukon sur la balkono, oni akuzis ŝin, ke ŝi donis signojn al kontraŭrevoluciuloj. Oni ankaŭ kunprenis ŝin en la parlamentejon, nur noktomeze lasis ŝin hejmen, rompitan korpe kaj anime. Sekvatage suprenvenis al ili juna politika komisiito, kiu eltirinte rotangon el sia leda krurŝirmilo, kun superema orgojlo frapadis en la loĝejo, rekviziciis du iliajn ĉambrojn, la manĝejon, en kiu ili nun sidis, kaj la apudan salonon. bonŝance, ili pli frue falis, ol ili povus alsendi loĝantojn.

Sed pli ol ĉio doloris lin, ke oni trudis lin al senfarado en la ministerio. Senbrida politika ambicio loĝis en li, kaj manke de nutro ĝi klakadis kiel malplena muelilo. Dum ĉi tiuj malfeliĉaj monatoj li nenifaradis, ŝimadis. Li iĝis malafabla, malfidema oficisto. Antaŭe li inicis en nenion sian edzinon, nun lia lango liberiĝis. Dum iliaj longaj promenoj en la montaro de Buda aŭ ĉi tie, dum ili atendis la terurajn vizitantojn, li te-

[7] Lenin-knaboj: armitaj sekurecfortoj de la soveta reĝimo.

nis al ŝi prelegojn pri siaj politikaj „platformoj” kaj pri tiuj flavbekuloj, kiuj degenerigis la ministerion.

Tiujn sombrajn pensojn ne estis facile ignori. Apenaŭ li trinkis sian teon, li iradis tien-reen, parolis pri la kontraŭrevoluciaj eventoj, kiuj subite ricevis retrankviligan, historian aspekton.

– Ĉu vi memoras – li daŭre demandis –, ĉu vi memoras?

Li menciadis siajn konatojn, kiuj estis pendumitaj, la oficistojn, kiuj disdonadis flugfoliojn en preĝejoj, kaj tial estis ekzekutitaj sur la placo antaŭ la parlamentejo, *ludovikanojn*[8], la heroajn *ludovikanojn*, kiujn ĉi tiuj senpatrujaj nululoj mokis kontraŭrevoluciulaj „laktosuĉuloj”.

– Kaj la monitoroj. Kiam ili impetis supren sur Danubo kun malhela lumbukedo. Mi ĝuste tiam razis min. Ni kredis, ke komunistoj pafadas. Ni suprenkuris al ges-roj Tatár, el la subtegmenta luko ni rigardis ilin. Sur la bordoj de Danubo la homoj svarmis kiel formikoj. Tiam oni mortigis la kompatindan Berend, la faman infankuraciston.

Post mallonga paŭzo li daŭrigis:

– La procesio en la Kristkorpa Tago okazis alie. Iu okulvitrita soveta figuro kontraŭveturis per sia biciklo la eŭkaristion, blasfemis ĝin, onidire li ankaŭ kraĉis sur ĝin. Dum minuto oni puŝis lin teren, trenis en pordan volbon kaj tiel longe batis lin per pugnoj, bastonoj, ĝis li ellasis sian animon. Onidire kelnero mortbatis lin.

Sed la plej ekscita evento, ekmovinta ĉion, tamen estis la revolucio en la distrikto Krisztinaváros. Ĝin ili povis vidi propraokule.

– Vi alvenis, nur kiam la nigre vestitaj, krispaharaj teroristoj desaltis de la ŝarĝaŭto kaj alsalvis la preĝejon. La amaso ŝrikante fuĝis en la elementan lernejon, kie oni rekrutigis ruĝarmeanojn. Sed vi ne vidis la komencon. Mi ĉeestis. Ĝi komenciĝis tiel, ke oni svingadis poŝtukojn. La tuta placo Krisztina blankis. La tramoj haltis, ĉiuj demetis la ĉapelon, kantis la Himnon. Neniam mi forgesos tion. Oni deŝiris, forbruligis la ruĝan flagon. Iu blonda aktorino ekbruligis ĝin antaŭ la apoteko Mária. Poste kune ni kuregis hejmen. Estis griza, venta somertago. Antaŭ ni kuris knabino kun eburkovrila preĝlibro en la mano. La kompatinda

[8] Ludovikanoj: studentoj de la Milita Akademio Maria Ludovika, partoprenintaj la 24an de junio en kontraŭrevolucia puĉo per siaj monitoroj sur Danubo.

falsterniĝis antaŭ nia domo. Ŝi ne plu povis elteni la ekscitojn. Longe ŝi kuŝis kiel lignopeco sur nia trotuaro. Ŝi perdis la konscion. Vi portis al ŝi glason da akvo. Ĉu vi memoras?

Jam ankaŭ tio estis plezuro, ke oni povis paroli prie tiel aperte, tiel laŭte. Sed Vizy ne ricevis respondon. Lia edzino nur gapis en la aeron per siaj larĝe malfermitaj, interese grizaj okuloj.

Post longa paŭzo ŝi ekparolis:

– Morgaŭ ŝi estos ree dormema.

– Kiu?

– Katanjo. Denove ŝi kuŝaĉos enlite ĝis la naŭa.

– Aĥ, do tiel – diris Vizy, ĉar li daŭre plu kuniris kun la amaso, kie la historio fermentas kaj la ferkuboj de la sorto falegas. – Kial vi forpermesis ŝin? Kial vi ne estas iom pli rezoluta al ŝi.

– Ĉu mi aŭdacus? Ŝi forlasus nin – ŝi prenis avide la fadenon. – Vi devus vidi, kiel murdajn rigardojn ŝi pafis al ni pasintfoje, kiam mi aludis, ke eble ŝi ne devus foriri ĉiuvespere.

S-ino Vizy neatendite saltleviĝis, kaj imitante la voĉon de Katanjo, ŝi lamentis:

– „Se tiel plaĉas al vi, mi povus ankaŭ ne reveni.” Tion ŝi diris, la impertinenta. Poste, lulante la postaĵon, ŝi eliris tra la pordo – kaj ŝi montris –, jen tiel – kaj ŝi imitis la irmanieron de Katanjo.

Vizy rigardis dum minuto konsternite sian edzinon, kiu tradancis la ĉambron kaj ludis en sia kolero kiel stranga aktorino sur stranga scenejo.

Li ekkompatis ŝin, kaj por diri ion, li demandis:

– Kaj vi, kion vi faris?

– Kion? Tion, kion ĉiufoje. Mi faris gluton. Mi ŝatus piedpuŝi tiun grasan…

– Nu, jes, ili estas tiaj.

– Ili nur voras – ŝi lamentis. – Kun plenŝtopitaj vangoj. Kaj flirtas ĉirkaŭ soldatoj. Sed ĉi tiu – ŝi klinis sin al sia edzo kaj flustris –, ĉi tiu estas, kredu min, malsana.

– Kio trafis ŝin?

– Tio – diris la sinjorino signifoplene. – Tio certa – kaj alrigardis lin

terurite.

– Ne videblas je ŝi.

– Mi vidis tion je ŝia tolaĵo.

– Ŝi estas ja dika.

– Pro tio ŝi dikas. Kaj ŝiaj piedoj, tiuj pufiĝintaj suroj. Naŭze. Krome ŝia frato vizitadas ŝin, ŝia sovaĝa frato, la lokomotivestro. Timiga. Nia domo iĝis vera drinkejo. Oni timas en la propra hejmo. Pagata malamiko. Ve, se mi ne plu vidus ŝian aĉan, blondan kapon! Estus saviĝo.

– Kaj la aliaj? – demandis Vizy distrite. – Lasu, ankaŭ la aliaj ne estas pli bonaj.

S-ino Vizy prenis profundan spiron, volis protesti, sed portempe ŝi sufokis en si la indignon.

Neniam, de kiam ŝi konsciis sin, ŝi vidis tiel malican ulinaĉon. Tiu movis sin kiel limako kaj estis impertinenta kaj sen moralo kaj indiferenta, ĉefe indiferenta. Ŝi iradis-venadis en la loĝejo, kvazaŭ ĝi estus la ŝia, kaj havus nenion komunan kun tiuj, kiuj ĉi tie vivas. Se matene ŝi demandis ŝin, kion ŝi kuiros, impertinente ŝi paŭtis kaj respondis nur tiom: „ba, al mi estas tutegale”. Kiu aŭdis ion tian? Vicostari ŝi neniam emis. Ĉe la spicisto Viatorisz ŝi mem devis stariĝi en la vico kun aliaj servistinaĉoj, dum horoj staradi por dek kvin dekagramoj da graso, ĝis ŝiaj piedoj cedis pro laceco. Dume tiu forestis por amuziĝi kun sia koko, kun tiu abomena ŝipisto kun tatuitaj brakoj, tiu Lajos Hack, kiu elspezis por ŝi amason da mono, ne scieblas, de kie li prenis ĝin. Kvankam ŝi parolis kun ŝi bele prudente, skoldetis, avertetis ŝin, donis instrukciojn al ŝi. Ĉio vanis. La vortoj eniris tra unu orelo kaj eliris tra la alia. Ĉu ŝin zorgigis, ke ŝi estas tiel malforta, ke ŝi maldikiĝis dek kilogramojn, kiam ŝi portis ŝanĝvarojn el la provinco, tiu hontinda lasis ŝin labori, kuradi, vaksi la pargeton!

Kaj la aliaj?

Faliginte la manojn en la sinon, ŝi meditis kun martira mieno, kiel dum soleco ŝi kutime konsumiĝis. Ŝi pensis pri tio, ĉu aliaj estas vere pli bonaj?

Tiu, kiu servis antaŭ Katanjo, ja neniel. Lujzika Héring ŝteladis kiel pigo. Ĉion ŝi ŝtelis, sed ŝi ŝatis pleje poŝtukojn. Ŝi tuj eksigis ŝin, poste

ŝi prefere dungis neniun knabinon – dum du monatoj. La metiistaj filinoj budapeŝtaj kutime ŝtelas. Unu forproprigis ŝian oran horloĝon, kiun ŝi heredis de sia karmemora patrino, iu alia malfermis ŝiajn plumonojn, alsiigis el ili tri kilogramojn da anserplumoj. Kamparaninoj, kiel Örzsi Varga, laboris, sed sendadis hejmen konfitaĵojn, spicojn. Krome ili manĝegis, Dio mia, kiel ili manĝegis. Ili vorus la tutan domon. Eĉ dum purigado ili ne demetis la panon el la mano. Prave, fojfoje troviĝis ankaŭ tolereblaj. Sed tiujn la patrinoj ne permesis servi aŭ la onklinoj malprudentigis kaj forlogis post kelkaj tagoj. Kaj la ŝvabaj? Ja puraj sed nefideblaj. Kaj la slovakaj? Diligentaj sed voluptamaj. Karolin tenis samtempe du amatojn, unu infanterian kaporalon kaj unu jam ne junan, konatan noveliston, kiun, reveninte el somerumado, ili trovis sur la divano de sia salono.

Kiu scias, kio loĝas en ili. Ekzemple Lidi, tiu turpa Lidi, tiu eta infanistino kun tiu kuspita, stupeca harnodo sur la verto. Neniu kredus. Ŝi estis malbela kiel la plej malluma nokto. Iun matenon ŝi tamen kuŝis sur la sangomakulita kuireja matraco duonsvene pro sangoperdo, kun cindrogriza vizaĝo, ŝi jam ruktis, kiam la ambulancanoj lastminute forliveris ŝin. Ŝi farigis je si malpermesitan operacion. Ŝi gekuniĝis kun ajnuloj. Se oni sendis ŝin por vino, biero, sub la pordovolbo ŝi interbrakumadis. Ŝi estis demono por la komizoj de la distrikto Krisztinaváros.

Kiu ne putinaĉis, tiu kaŭzis multegan damaĝon, rompis la lavpelvon, dum gladado bruligis makulojn sur ĉemizoj, de mateno ĝis vespero kantaĉis, pasumis en la Horváth-parko, legis teatrajn revuojn, revadis, bruliĝis je platona amo al tenoristo de la teatra trupo de Buda. Ĉi tiu klaĉis, tiu elektemis, ne manĝis legomaĵojn, volis kukojn, rostaĵojn kiel la gesinjoroj, Daŭre ŝi babilis pri sia malnova servejo, kie por matenmanĝo ŝi ricevis ŝinkolardon. Jes, ankaŭ Margit Mennyei estis tiel puca pavo. Ŝi tuŝis la objektojn nur fingropinte, malgraŭ tio „la fraŭlino" estis malpura, ŝatis malpuraĵon, la meblojn daŭre tegis fingrodika polvo, la glasoj estis gluaĉaj, la tranĉilojn, forkojn ŝi ĵetis grasaj en la tirkeston. Bonŝance ne longe ŝi feliĉigis la mastrinon. Tamen ankaŭ aliaj post nelonge foriris, ili eĉ ne ennestiĝis, pli longe ol duonjaro neniu restis. La edzino de Mihály Ökrös nur du horojn

Prefere ŝi redonis duoble la kaŭcion. Kvankam s-ino Vizy faris provojn kun ĉiuspecaj servistinoj. Ŝi elprenis knabinon el orfejo, por plenkreskigi ŝin. Sed tiu impertinentis pli ol ĉiuj. Ŝi ne eltenis kun la orfino pli ol tri monatojn. Ŝi diris dankon al Dio, kiam post skandalaj scenoj ŝi liberiĝis de ŝi. Nu kaj Mari kaj Viktor kaj Ilona, Ilona Tulipán kaj Emma, Emma Zakariás kaj Böske, Böske Rózsás?

Ŝi cerbumis, kiu estas Böske Rózsás inter la multaj. Ŝi vidis image virinojn, blondajn kaj brunajn, magrajn kaj dikajn, kiuj dum ŝia edzineco de dudek jaroj servis en ŝia domo. Ŝi jam fojfoje konfuzis unujn kun aliaj. Ŝi trovis kapon kaj serĉis por ĝi la trunkon, kaj al trunko mankis la kapo. Ŝi fosserĉis en ĉi tiu stranga fatrasejo. Poste ŝi frapfermis la pordon de la fatrasejo. Vane ŝi revuis, ŝi trovis ne multon konsolan, ŝi ne memoris eĉ nur unusolan, nur iom bravan servistinon. Ĉiu trompis ŝin, misuzis ŝian konfidon, kaj ŝi devis rekomenci la serĉadon, la sinpeladon por nova servistino, kvazaŭ dia malbeno peziĝus sur ŝi. Ŝi devas pli-malpli pravigi sian edzon, ĉiuj estas floroj de samaj valoroj.

Fine ŝi restis tamen ĉe la lasta. Ĉe Katanjo. Ĉi tiun ŝi plej abomenis, ja ĉiufoje ŝi plej malŝatis la aktualan, kiu per sia ĉeesto senĉese sentigis ŝian mizeron.

Ŝia edzo daŭre plu promenis en la ĉambro, li esprimis siajn pensojn pri la morgaŭa ĝenerala kunveno de la ŝtatoficistoj, kiuj akceptos starpunkton kun rigardo al la nova politika situacio.

S-ino Vizy kaŭris, foresteme de ĉio.

Ŝia vizaĝo sombriĝis. Sed ŝiaj trajtoj subite glatiĝis. Ia lumo radiis de ŝia vizaĝo, kvazaŭ ĝi estus tralumata per elektra laringologia lampeto.

Ŝi ekparolis:

– Ni povus havi novan servistinon.

– Bonege – aljetis Vizy.

– Bonege – ŝi ironiis. – Vi eĉ ne atentas.

– Jes ja. Kiu rekomendis ŝin?

– Ficsor.

– Kaj kiam ŝi komencos?

– Portempe ŝi restadas en la urbo.

– Kie?

– Ĉi tie, ne tre for. en la strato Árok.

– Ĉe kiu?

– Ĉe iuj ges-roj Bartos.

– Kiu estas tiu Bartos? – cerbumis Vizy. – Bartos, Bartos, atendu momenton! – Kaj mirante li konstatis – Mi ne konas lin.

– Kiel vi ja povus koni lin?! – erupciis el s-ino Vizy, kiu hodiaŭ ne eltenis la Katanjo-manierojn de sia edzo. – Kial vi pretendas koni ĉiujn? Stranga vi estas.

– Kiun profesion praktikas ĉi tiu Bartek?

– Antaŭ ĉio: Bartos – ŝi korektis lin. – Bartos estas akcizisto. Cetere eĉ ombron da ideo mi ne havas, kio estas akcizisto.

– Financa inspektisto, speco de financa superrigardanto. Kiu estras financan grupon. Ofte sendata provincen.

– Jes, ankaŭ tiu senĉese estas vojaĝanta. Vidvo kun du infanoj.

– Kaj la knabino? Ĉu brava, honesta, diligenta knabino?

– Kiel mi scius? Mi scias tiom, kiom vi. Ficsor asertas, ke bonega.

– Tiam maldungu Katanjon!

– Ĉu por ree resti mi sola? Dankon!

– Do ne eksigu Katanjon!

– Ficsor – ŝi daŭrigis malmole – sciigis portempe nur tiom, ke eventuale oni povus akiri ŝin. Eventuale – ŝi emfazis. – Oni bezonas allogi ŝin. Tio nuntempe ne tiel facile fareblas. Tamen, kiu scias, eble mi havos pli malbonan negocon.

La diskuto tedis Vizy, ĝi ja turniĝis ronde-cirkle, sed ankaŭ li ne povis eltiri sin.

– Kial vi ne dungos iun alian? Jam pluraj rekomendis al vi servistinon.

– Kiu?

– S-ino Moviszter.

– S-ino Moviszter, ŝi pli bone, silentu. Ŝi povas nur lamenti. „Ve, kiom mi bedaŭras vin, karulinjo, ke vi turmentiĝas kun tiaj knabinoj, atendu, mi sendos al vi unu.” De du jaroj ŝi esperigas min tiel. Ŝiaj pensoj turniĝadas nur pri teatroj. Pri ĉefprovoj. Kaj pri Ady-matineoj.

– Kaj s-ino Druma?

– Tiu, vi ja scias, estas enviema. Ŝi estas feliĉa, ke mi troviĝas en tia kaĉo. Ŝi venas malsupren, por plezuriĝi pri Katanjo. Ŝi ja parolas facile. Ŝia Stefi, eĉ se frenezeta, faras ĉion. Eĉ la infanon ŝi lulas. Etel de gesroj Moviszter servas de dudek jaroj ĉe la doktoro, tiu malsana homo, ankaŭ en lia konsultejo ŝi asistas. Lia edzino neniam estas hejme. Ŝi donas duonon da salajro ol ni al Katanjo. Ankaŭ la manĝo ne pli bonas ol ĉe ni. Tamen ŝi restas. Dio scias, kial. Oni bezonas havi bonŝancon. Ankaŭ por tio oni bezonas havi bonŝancon. Kiel por ĉio alia. Kelkaj homoj havas bonŝancon. Ni ne. Mi ne scias, kion ni misfaris. Ha! – ŝi suspiris, kaj malrapide elprenadis la krispigilojn el sia hararo. – Oni estas konsumata de kolero, pagas tiun stakon da salajro, daŭre turmentiĝas. Ne valoras vivi.

Vizy malsereniĝis. Li proponis enlitiĝi.

Tempis proksime al la deka. La elektra lumo elfiltriĝis tra la mallevitaj rulŝutroj de la manĝejo, necesis malŝalti ĝin, la ruĝarmeano povus vidi ĝin. En julio li foje suprenpafis al la fenestro.

– Kial vi ne venas? – instigis ŝin la edzo, kiu jam malvestis sin en la dormoĉambro.

Sed ŝi nur staris rigide sur la sojlo de la dormoĉambro.

– Nu – li invitis ŝin. – Kio trafis vin? Vi estas iom nervoza.

Kaj li miris.

– Vi estas infano. Ĉiufoje ĉi tiuj servistinoj. Ade ree la servistinoj. Kia bagatelemo! Diru, ĉu indas? Pro servistino? Ĉu vi ne hontas?

S-ino Vizy enpaŝis la dormoĉambron, preparis la litojn. Ŝia edzo nur tiam rimarkis, ke ŝi ploras.

– Angéla – li mildigis ŝin, kaj sidiĝinte sur seĝo, rigardis, kiel ŝi dismetas la kusenojn kun grandaj, brilantaj larmoj sur la vizaĝo kiel Asta Nielsen en la kinejo. – Ĉi tiu terura epoko konsumis ankaŭ viajn nervojn.

S-ino Vizy fiksis siajn harojn per vualo por la nokto.

Ili ambaŭ kuŝiĝis en la larĝajn geedzajn litojn, kiuj jam delonge servis nur por dormado.

Vizy klakpremis la ŝaltilon de la lampo.

Mallumo falis sur ilin, ombroj ondis, la konturoj de la mebloj mal-

rapide kunfandiĝis kun la muroj.

Vizy sidiĝis alarmite en la lito.

– Oni kanonas – li flustris.

– Ne – diris s-ino Vizy, kiu same sidiĝis.

– Jes ja, el la flanko de Vérmező.

Jam nur la silento tremetis.

Aŭtomobiloj bruis sur la vojo al la Kastel-monto, mezurante kiel arterio la nervozecon de la urbo kaj lando dum politikaj ŝanĝoj.

– Eble pneŭo de aŭtomobilo – klarigis s-ino Vizy. – Dormu!

En la lastaj monatoj ili aŭdis nokte sufiĉe da kanonpafoj, ili povis dormi ĉe ili kiel frontaj soldatoj.

Post kelkaj minutoj la edzino ekparolis:

– Mi kredas, ni tamen devas fari provon kun tiu knabino.

– Ni devas provi – li oscedis. – Vi faros, kiel al vi plaĉas. Faru provon! Bonan nokton! Dormu!

Dum tempo ili kuŝis horizontale, malvestitaj unu apud la alia sub la maldikaj someraj peplomoj.

Baldaŭ ekbrulis stranga lumo malantaŭ iliaj fermitaj palpebroj, subite ili stariĝis, apartiĝis unu de la alia, trapasante murojn de ĉambroj, longon de jaroj, vagante en diversaj direktoj sur nekonataj padoj, nun jam tute vestitaj en ĉiuspecaj fantastaj teatraj kostumoj.

Okazis la ĉiutaga miraklo: ili sonĝis.

Diversaj ekscitaĵoj

Kornél Vizy dormis singarde.

Li buligis sin kiel erinaco, por okupi laŭeble malgrandan spacon. Kaŝita malantaŭ la blanka ŝirmo de siaj kusenoj, li faris ambiguajn deklarojn, ridetis al siaj mortintaj malamikoj, la revoluciuloj. Eĉ en sia sonĝo li sekvis taktikon.

Kiam matene li malfermis la okulojn, kiel homoj, kies malbonan kaj senperspektivan vivon ĝojiga turno ŝanĝis antaŭtage, li maŝinece cerbumis pri la pasinta zorgo, ĉar dum li dormis, li forgesis, kio okazis hieraŭ.

Sub sia peplomo li malkaŝis la realon, jam rekonis la malnovan ĝojon, kiu firmiĝinte intertempe, ŝajnis al li pli nova, pli interesa.

Li disstreĉis sin laŭ sia tuta longo kaj saltleviĝis. Sur lia noktoŝrankeeto brilis glaso da akvo kiel flua arĝento. Sen matenmanĝi li eliris sur la straton. Kiuj vidis lin antaŭ kelkaj tagoj, turnis sin post li. Malnova modrevua figuro reviviĝis. Li surhavis kolombogrizan veston, freŝblankan ĉemizon, senmankan koltukon. De dekstre, maldekstre konatoj, nekonatoj salutadis lin.

Ĉirkaŭ liaj butonŝuoj fajreris la rekta sunlumo kiel mangrenado, ĵetita antaŭ lin, kiu eksplodinte, priŝprucis lian tutan figuron per gaja orfajro.

Ŝia edzino ankoraŭ dormis, sen aŭdigi spiron, kun vaksopala vizaĝo. Ŝi ne tiel vekiĝis. Ŝin atendis terura surprizo.

Kion ŝi hieraŭ diris, ke Katanjo hejmenvenos frumatene, ŝi mem ne kredis serioze. Sed kiam je la naŭa ŝi vekiĝis, ŝi vidis, ke la tablo ne estas aranĝita, samloke estas la hieraŭa kruĉo kun la malpura telero. Ŝi kuris en la kuirejon. Ŝi trovis tie la kampadan liton kunfaldita en la angulo, kovrita per ĉevalhara plejdo.

Ŝi vagadis de ĉambro al ĉambro, ne trovante por si lokon. Ŝia gorĝo kunpremiĝis pro amareco. Ŝi rigardis sian salonon. La piano estis ŝovita en la angulon, speguloj kuŝis sur ĝi, kovritaj per tukoj kiel ĉe mortokazo. Sube vestokorboj. En la manĝejo la lavotaĵkesto, ĉe iu pordo la kaduka antaŭĉambra ŝranko, por ŝtopi la aliron al proletoj. Pro ili ŝi

renversis sian tutan hejmon. Nun, en la matena prilumo ĉi tiu pulbazareca apartamento sentigis ĉiujn teruraĵojn de la krizostato.

Nenie almenaŭ unu kurteno, pentraĵo. Sur la dezertaj muroj pendis nur krucifikso, kiun malgraŭ la protesto de sia edzo ŝi ne permesis depreni, kaj apud la vazoŝranko la fotografaĵo de Piroska, ŝia unusola, sesjara filino, kuŝanta inter kandeloj kaj floroj sur la katafalko.

Piroska jam vizitis la unuan klason de la elementa lernejo. Unu aprilan antaŭtagmezon ŝi venis hejmen el la lernejo, plendis pri kapdoloro, ŝi metis ŝin en liton, kaj kiam krepuskiĝis, ŝi jam estis sternita. Infekta skarlatino pereigis ŝin – dum ses horoj.

Ŝia edzo eliris. Denove li iras-venas en la mondo por siaj aferoj, por siaj aventuroj. Ŝi sciis pri li, ke li kokras ŝin. Post la morto de sia filino s-ino Vizy estis liverita en sanatorion, kie ŝi vivis dum jaroj, tiam ŝia edzo fremdiĝis al ŝi, kaj de tiam li trompis ŝin, ja ĝentile kaj delikate, tamen daŭre kokris ŝin.

Krome tiu servistinaĉo ĉiam plu ne venis hejmen. Ĉiun sian malĝojon ŝi koncentris sur tion. Ŝi kaptis plumbalailon en la manon, balaadis, por forgesi sian ĉagrenon en la febro de la laboro. Dume ŝi pensis pri tio, kiel ŝi akceptos ŝin.

Katanjo amuziĝis ĉi-nokte en „Triesta virino” kun sia marista amiko. Nur ĉirkaŭ la deka ŝi revenis kun taŭzita hararo, dormema, kun disŝmirita ruĵo sur la buŝo. Ŝi disvastigis malfortan vinodoron.

S-ino Vizy bremsis sin, sed tremante pro nervozeco ŝi sciigis al ŝi, ke ŝi maldungas ŝin, la dek-kvinan ŝi povos foriri.

La knabino, kiel impertinentuloj, kiuj neatendite estas sonore vangofrapitaj, ĉi-foje ne replikis, senvorte akceptis la eksigon, elprenis la plumbalailon el la mano de sia mastrino, daŭrigis la purigadon. La ofendon kontraŭ sia memkonscio ŝi volis reĝustigi per tio, ke ŝi almenaŭ laboris.

La mastrino nur nun alarmiĝis vere, ke ĉe plena malcerteco ŝi forsendis la servistinon. La kuboj estis tamen ĵetitaj. Ŝi sentis, ke malpleno ŝin ĉirkaŭas.

Ŝi rapidis malsupren al Ficsor.

Ficsor ĝuste tiam forprenis la ruĝan flagon de la fasado de la domo,

li estis okupata per tio, ke li volvis la malbonan paperŝtofon sur la flagbastonon. S-ino Vizy kondukis lin brak-en-brake supren.

La dompedelo, kvankam la altmoŝta sinjorino apudis lin, frapis sur la pordon, plurfoje purigis la ŝuojn sur la sojlomato, antaŭ ol enpaŝi. Li, kiu antaŭ nelonge ankoraŭ tagmanĝadis en la sociala kuirejo, instalita en la Nacia Kazino, ĝenate pasis tie, kie pli frue li moviĝis tiel senĝene.

En lia kulpolisto estis multaj notoj, kaj li sciis tion. Li apartenis al tiuj, kiuj en tiu tempo nomis sin ”maljunaj marksistoj”. Li fanfaronis, ke li jam de dudek jaroj pagas partian kotizon, kalkulis sin al la ruĝula aristokrataro kaj fieris pri tio pli ol grafoj pri siaj jarcentojn retroaj genealogiaj arboj. Kompreneble, li fariĝis la domkomisiito. Li kolektis la luprezojn, plenumis la disponojn de la soveta registaro, ade-ree avertis la „fiburĝojn” kontraŭ konspiro, frapadis sian bruston, montradis siajn kadukiĝintajn piedojn, kiuj eluziĝis pro la etaĝumado. Oni flustradis, ke li igis asigni al si du parojn da flavaj ŝuoj, unuaklasan nutradon, dum al la dommastro kiel intelekta laboristo ŝuldiĝis nur duaklasa nutrado. Sed oni konsideris lia plej granda kulpo, ke en tiu memorinda tago, kiam oni forkondukis s-inon Vizy en la parlamentejon, dole kaj vole li formalaperis el la domo, nur malfruan vesperon li returnis sin; Vizy, kiu volis peti lian intervenon, vane atendis lin en la kuirejo de la dompedela loĝejo. Ges-roj Vizy ne faris sekreton el tio, ke ĉe favora okazo ili rompos lian nukon.

Nun li palpadis la nukon kaj la kapon, sian temp-eroditan kapon, kiu similis pomon, kiajn post tempestoj oni kutimas forĉipumi po korboj, preskaŭ senpage en la bazaro, ja amasoj da ili produktiĝis.

S-ino Vizy afable sidigis lin kaj metis sian manon sur lian brakon.

– Aŭdu, Ficsor, nun vi povus helpi min. Nepre alkonduku tiun knabinon. Mi jam maldungis la mian. Mi estos dankema por tio.

La dompedelo saltleviĝis, por kapti la klinkon, kondukantan al la liberiĝo. S-ino Vizy retenis lin:

– Do ŝi servas jam de tri jaroj en Budapeŝto, ĉu? Sed kiel eblas, ke mi ankoraŭ neniam vidis ŝin ĉe vi?

– Ĉar ŝi estas tia, mi kisas vian manon. Nenien ŝi iras. Oni povas ŝin nek vidi, nek aŭdi. Tre silentema.

– Sed mi esperas, forta. Ĉu ŝi povos purteni la kvar ĉambrojn?

– Ĉu tiu? Eĉ ok. Vilaĝa knabino.

– Kaj ĉu fidebla?

– Vi vidos. Mi ne kutimas multe paroli. Mi diras nur tiom al la altmoŝta sinjorino – kaj Ficsor mutiĝis.

– Kion?

– Ke vi estos kontenta.

La dompedelo revenis tagmeze. Bona informo ridetis el sub liaj lipharoj: li parolis kun la knabino, ŝi emas dungiĝi, morgaŭ ŝi ankaŭ venos ĉi tien, por interkonsenti.

Sed sekvatage ŝi ne venis.

Okazis eventoj, kiuj ĉion renversis. Budapeŝto estis okupaciita. Ne tiel, kiel Gábor Tatár kaj Vizy antaŭdiris, sed rumanoj enmarŝis; transpasinte Tison, spitante la malpermeson de la grandpotencoj, ili mem prenis la urbon en posedon. Ili streĉis sin en freŝnovaj uniformoj inter la malsataj, ĉifoniĝintaj budapeŝtanoj, kvazaŭ dandigitaj por ĉi tiu historia gastrolado. Trumpetoj knaradis kun orelŝira ŝrikado. Ili ne faris eĉ unusolan paŝon sen ĉi tiuj alĉiele turnitaj muzikiloj, per kiuj ili volis evidente revoki en la memoron de la konsternita, humiligita lando imperiestron Traianus, la romiajn kohortojn, la mondovenkajn legiojn.

Ion tian povis neniam imagi kaj la hungaroj kaj la rumanoj, nek en siaj plej sovaĝaj premsonĝoj. Surprizitaj ili rigardis unuj la aliajn, mirante pri tio, kio efektive okazas. Estis nekredelbe.

Hungaroj vidis el siaj fenestroj, ke jam rumanaj aŭtomobiloj zigzagas sur la stratoj, tamen ili ne kredis tion. Komence eĉ la rumanoj mem ne kredis tion.

Ĉefkelneroj saltis humile antaŭ ilin, grumoj kondukis ilin al la liftoj, ili iris, kien al ili plaĉis. Ili iom perpleksiĝis.

Kiel homo sonĝanta, ke li trafis subite en fabellandon kaj sentas, ke antaŭ liaj deziroj staras neniaj baroj, ili ne sciis komence, kion ili deziru kaj en sia infaneca avido ili elektis senvalorajn, vidindajn aĵojn anstataŭ valoraj.

Antaŭ ĉio ili malmuntigis la telefonojn de privataj loĝejoj. Du militaj ŝarĝaŭtoj, plenigitaj ĝiselfale de telefonaparatoj, ŝiritaj dratoj, traklak-

adis la bulvardon Krisztina.

Poste neatendite ili aperis en vestomagazenoj, fabrikoj, hospitaloj, kie rompita, maljuna hungaro akceptis ilin, la direktoro en eksmoda salonpalto kaj en rompata franca lingvo, preskaŭ plorante, balbutis sian antaŭlernitan ĝentilan protestadon, referencante al la Granda Entento, sed la oficiro forgestis, la pordoj malfermiĝis, kaj oni jam forportis la vestojn, maŝinojn, kitelojn, littukojn de malsanuloj kiel reparaciaĵon, militpredon.

Aliflanke ili gardis la sekurecon de la civitanoj, venĝante ĉiujn provojn, kiuj direktiĝis kontraŭ privata proprieto aŭ kontraŭ la publika sekureco. Ili trairadis laŭvice la domojn, eskortis katenitajn, palajn teroristojn, kiuj lasis pendi profunde sian kapon. Komenciĝis la „dancigo", la granda dancigo, pri kiu Ficsor parolis.

Transpreninte la nervozecon de ĉi tiuj historiaj tagoj, la domo de Kornél Vizy zumegis kiel abelujo. Nun Druma, la beltalia advokato suprenkuris kaj svingante sian aktujon novaĵumis, ke la socialdemokrata registaro estas forpelita, civila registaro transprenis la regadon. Nun s-ino Druma enportis ŝrikante sian braksidantan fileton el la strato, ĉar tie estiĝis interbatiĝo. Nun Etel rakontis, ke oni denove malŝpare tradraŝis komuniston. Nun politikis kor- kaj pulmomalsanuloj, venantaj el la konsultejo de d-ro Moviszter. Nun retorikis Stefi, la kontraŭrevolucia servistino de ges-roj Druma, kiu post vazlavado vizitadis popolkunvenojn, kaj veninte hejmen, ŝi rakontis kun febra vizaĝo, kion ŝi aŭdis, kaj klininte sin sur la apogrelo de la dua-etaĝa koridoro ŝi kriis, ke oni devas ŝnurpendigi ĉiujn socialistojn.

S-ino Vizy nur malofte elpaŝis en ĉi tiun svarmomuĝan ŝtuparejon, por trovi Ficsor.

– Diru, de kiu konfesio estas la knabino?

– Katolika, altmoŝta sinjorino, ŝi estas katolika.

Tion ŝi trovis ĝusta.

La katolikaj knabinoj estas pli afablaj, pli modestaj, ne tiel rigidnukaj kaj postulemaj kiel la kalvinanaj. Prave, la katolikaj estas facilanimaj, daŭre ili kantas, rapide malvirtiĝas. Se foje ili ekruliĝas malsupren sur la deklivo, ne eblas haltigi ilin, el la ĉielregno ili falegas rekte en la

inferon.

Foje ŝi kaptis la dompedelon sur la placo Krisztina:

– Kaj kie ŝi naskiĝis?

– En Kajár. Ŝi estas filino de mia bofratino. Mi diris, de Balatono.

Sur ŝin ankaŭ tio efikis agrable. Antaŭ longe, kiam ŝia filino ankoraŭ vivis, ili somerumis en Balatonfüred. Ŝi feliĉe rememoris ĉi tiun someron, kiu estis plena de infanridoj, ondozumoj kaj cigana muziko. Krome ŝajnis al ŝi memori, ke ŝi aŭdis iun laŭdi la „balatonajn knabinojn".

En la semajna foiro ŝi haltigis s-inon Ficsor:

– Mi forgesis, kiel ŝi nomiĝas?

– Ho – miris la vaststatura virino –, ĉu vi ne bonvolas scii? Anna.

– Anna – ripetis s-ino Vizy kaj trovis la molan, karan virinan nomon simpatia, ĉar ĝis nun neniam ŝi havis servistinon kun la nomo Anna, nek parencinon, kio nepre ĝenus ŝin. – Anna – ŝi refoje eldiris, kaj la vorto trankviligis ŝin, ĝi falis sur ŝin kiel io blanka, kiel manao.

Ficsor faris ĉion eblan, por delogi sian parencinon. Li tuj ekagis, alterne kun sia edzino li kuradis al la strato Árok. Li sciis, kio staras sur la karto. Dum antaŭtagmezoj li vidis komunistojn, kiujn oni elĵetis kiel rubon el la oficejoj. Iu junulo preterpasis la dompordon. De liaj tempioj likis sango kiel maldika, viva rubando, per sia poŝtuko li viŝadis ĝin. Tiafoje la dompedelo duobligis sian fervoron. Sed tio ne multe valoris. Portempe li povis paroli nur kun s-ino Cifka, bofratino de Bartos, kiu loĝis ĉe la ges-roj financa inspektisto. La inspektisto ne emis lasi foriri la knabinon, nur se Ficsor akiros novan por ŝi, kiu ĝuste tiom konvenas. Ankaŭ al Anna li vane gurdis en la orelon. Tiu hezitis-evitis, ne tute komprenis, pri kio temas, krome bedaŭris la infanojn Bandika kaj Pistike, kiujn ŝi tre ekamis. Malgraŭ tio ŝi promesis viziti ges-rojn Vizy. Sed ŝi ne tenis sin al sia promeso. Pli malfrue ŝi diris, ke ŝi alipensis.

S-ino Vizy faris riproĉojn al li:

– Kial vi jam ne alkondukis ŝin? Almenaŭ mi volus vidi ŝin.

– Hodiaŭ estas lavado.

– Ĉu do ŝi entreprenas ankaŭ lavadon?

– Kompreneble. Ŝi lavas, gladas, kaj ho, kiel bone!

Alifoje jenis senkulpigo:

– Ŝi promenigas la infanojn.

- Ĉu Bandika? – ŝi demandis, konante jam iom la familiajn rilatojn.

– Tiun, la kvar-jaran.

– Vidu, ne regalu min per promesoj! Parolu sincere! Mi bezonas certe scii, ĉu mi povas kalkuli kun ŝi.

– Vi povas kalkuli kun ŝi, altmoŝta sinjorino. Mi parolas sincere.

Poste la dompedelo malaperis el ŝia vido. Li kromlaboris en la poŝtoficejo, hejme li aperis nur por kelkaj minutoj, inkognite, li kaŝiradis. S-ino Ficsor diris ĉiufoje, ke li estas ĝuste ĉe sia filino.

La mezo de la monato proksimiĝis kun danĝera rapideco. S-inon Vizy jam okupis la ideo, restigi Katanjon, kiu post la eksigo – post kiam s-ino Vizy sciis, ke tiu ne estas definitive ligita al ŝi – jam ne ŝajnis tiom malsimpatia. Katanjo dungiĝis ĉe posedanto de kosmetikaĵbutiko, la dek-kvinan ŝi devis preni la laboron. Estis evidente, ke ŝi restos sen servistino, nun, antaŭ vintro, en ĉi tiu freneziĝinta mondo. Ŝia edzo fariĝos eĉ pli mishumora, ree ili ne povos akcepti gastojn, nenie ili povos fari vizitojn, kiel post Lujzika Héring, en tiuj du turmentaj monatoj, kies memoro premis ŝin kiel inkubo.

Ŝajnis, ke ŝi devas rezigni Anna. Sed ŝi decidis, ke spite kaj malgraŭe ŝi ne kapitulacos. Ne vane estis ŝia forpasinta patro husara kolonelo, kaj ambaŭ ŝiaj avoj soldatoj, soldata energio loĝis en ŝia tenaca korpo, kies prauloj nun, eĉ el la malproksimo de jarcentoj, donis forton por ĉi tiu sieĝo. Ŝi ekcelis la tutan urbon. Dum la tuta tago ŝi trivis siajn ŝuojn. Ŝi interesiĝis ĉe siaj neglektataj konatoj, ĉu ili scipovus iun rekomendi. Plej ofte ŝi ricevis responde kompateman rideton. Ŝi trairis la tutan kalvarion, kies ĉiun stacion ŝi jam ĝistede konis.

Unue ŝi kuris al la policejo. La kapon de la policejo doloris aliaj aferoj. La aresta aŭtomobilo iradis-venadis, alportante riĉan homŝarĝon. Ekstere sur la korto la suspektatoj sidis dense sur lignobenkoj, infanoj kaj kadukaj komunistoj, virinoj en ĉifonoj kaj silko, atendante sian sorton kun plorrruĝaj okuloj. S-ino Vizy sendis sian nomkarton al la kapitano, respondeca pri servistinoj.

Tiu sciis, kion ŝi deziras, kaj akceptis ŝin ekstervice. Kun certa lace indiferenta kompato li rigardis ŝin kiel neŭrologo sian nekuraceblan

malsanulon. Iom li konsolis, poste sendis ŝin al la servistinperisto.

Kun nemulta espero ŝi entreprenis ankaŭ tiun vojon. Plie nur por informiĝi. La ladaj reklamiloj anoncis en bluaj, ruĝaj, verdaj kvadratoj kuiristinojn, ĉambristinojn, nutristinojn de ĉiuj specoj kaj klasoj, fanfaronante per pasinta kanaana abundo, simile al malplenaj gastejoj, kiuj vekante la atenton de la publiko sur orliteraj vitrotabuloj, ke „en ĉiu horo de la tago kaj nokto riceveblas freŝaj manĝaĵoj", aŭ al tabakvendejoj, kiuj fieris per „en- kaj eksterlandaj tabakvaroj", sed vendis nur cigaredingojn kaj fajroŝtonojn por fajriloj.

En Buda[9] tute ne estis liberaj servistinoj. Ŝi iradis de distrikto al distrikto, ĝis en Ferencváros ŝi trovis kelkajn.

La peristo venis renkonte al ŝi riverencante, ŝi jam delonge konis lin kiel ĉiun periston. Li estis pala, ruzeta figuro de fripono kun arĝenta horloĝĉeno sur sia veŝto. Li flatis ĉiun sinjorinon, nomis ĉiun servistinon „damo" por la intereso de sia negoco. Flustrante li rekomendis siajn varojn.

La liberaj servistinoj babilis sur pajloseĝoj laŭ la muroj kiel fraŭlinoj, proponantaj sin por dancado en iu terura balo. Kiam ŝi enpaŝis, ili mutiĝis. Provis altrudi naturecon kaj indiferentecon sur siaj vizaĝoj, pensante pri tio, ke por marĉando necesas du homoj, tamen ili ne povis forturni siajn okulojn de ĉi tiu nekonata virino, kiu eble iĝos ilia sorto, kaj samtempe algapis kaj pripaŭtis ŝin.

Ŝi ĵetis nur pasan rigardon al ili. Ŝi konstatis, ke ĉi tiu estas jam la foruzita resto, posta al elvendado en la dezertiĝinta butiko, kiun neniu plu bezonas. Kiu nun sendas sian filinon elprovince por servado, kiam la mono havas nenian valoron, kiam kamparanoj havas tiom da graso, ke ili dronas en ĝi, kaj iliaj infanoj lernas piani?

Pro scivolo ŝi tamen faris provon. Unu, kiun ŝi alparolis, respondadis sidante kun krucitaj gamboj. Iu alia stariĝis, sed sur sian humiligitan vizaĝon ŝi tuj metis la maskon de ironio, kaj ŝi mem repetis sian laborlibreton dum la maldeca rikanado de la aliaj, kiuj puŝadis siajn najbarinojn kaj instinkte retiriĝis de s-ino Vizy.

Unusola havis emon dungiĝi, iu blankhara, sesdek-jara, diktalia

[9] Budapeŝto unuiĝis el Buda dekstraborde de Danubo kaj Peŝto aliborde de Danubo.

kuiristino kun vizaĝo de venenistino, kiu laŭ la peristo kuiris en plej bonaj provincaj gastejoj, ŝi entreprenus ankaŭ plankovaksadon, sed ŝi estis jam malforta, vivlaca, forlasinta sian energion jam delonge en la lavakvaĉujoj de gastejoj de Kecskemét kaj Cegléd.

Kial dungi tian? Seniluziigite ŝi gapis al la tablo, sur kiu buntis muŝmakulitaj paperrozoj en pulbazara kruĉo. La aeron de la ejo pezigis la virina haladzo de la servistinoj.

Vespere ŝia kapo ekdoloris.

Intensa migreno trafis ŝin, kiu jam delonge ne turmentis ŝin. Ŝi ĉirkaŭvolvis sian kapon per viŝtuko ĉe la frunto kaj en la malluma ĉambro provis eltrovi, kial ŝi tiom ekscitis sin.

Ne la fiasko deprimis ŝin, ŝi ja preparis sin por ĝi.

Speco de memakuzo mordis ŝin pro tio, ke ŝi malfideliĝis al Anna, volis perfidi ŝin, volis forlasi ŝin pro aliaj, kaj nun ŝi decidiĝis, tamen akiri ŝin – por ajna prezo.

Ministerio kaj mistero

Ĉi tiun heroan lukton ŝi sola elbatalis. Al sia edzo ŝi eĉ la maldungon de Katanjo ne sciigis.

Sekrete ŝi vizitis Druma, kies advokata konsultejo jam popoliĝis de parencoj de missortiĝintaj komunistoj, ĉar disvastiĝis la famo, kiel granda kontraŭrevoluciulo li estas, kaj ĉiu volis konfidi al li la defendon.

La ankaŭ cetere ruĝa vizaĝo de la juna advokato flamis pro la febro de la historio. Li plej volonte metigus Ficsor sub seruron, antaŭvidante por li almenaŭ kvin jarojn da mallibereco, sed la aferon pri la servistino li opiniis sufiĉe neklara. Ĉiuokaze li tajpis leteron, kiun li sendis registritan al Bartos, alvokante lin senprokraste lasi libera la knabinon laŭ la leĝaj preskriboj.

Vizy venadis hejmen, nur por ĵeti en sin la tagmanĝon, vespermanĝon. Mishumore li manĝis, nervozis, eĉ vorton li ne eldiris. Ŝi ankaŭ sen tio ne aŭdacus ĝeni lin per tiaj bagateloj. Se ŝi demandis lin, kien li iros, de kie li venas, li murmuris nur: ministerio. Tiel enigme, kvazaŭ li dirus: mistero.

Efektive, por ŝia edzo ĉi tiu mistero estis la granda perspektivo de la publika vivo, politiko, kaj kio restis ekstere, estis tia sensencaĵo, ke eĉ okupiĝi pri tio ne valoris.

La antikva, flava konstruaĵo de la ministerio zumis kun intima rumoro. Ĉiufoje, kiam li transpaŝis ĝian sojlon, dolĉa formikado tiklis lin, kaj jam sur la ŝtuparo aperis sur lia vizaĝo tiu devota, memfiera rideto, kiu signifis, ke kvankam ĉi tie ĉio apartenas al la publiko, sed propre estas nur la lia, kaj li estas ĉi tie hejme, multe pli ol en sia loĝejo. La pordisto ree salutis lin. Lia zorge kombita sekretario akceptis lin en la antaŭĉambro, tiu jam estis klasinta, kribrinta liajn vizitantojn, kiujn li lasis veni antaŭ sin post rea zorga forselektado. Ĉi tiujn Vizy sidigis kaj kutime petis ilian pardonon, ke li ne povis tuj stari je ilia dispono. Li plendis pro la amaso da aranĝendoj. Lia ŝatata parolturno estis, ke eĉ morti li ne havas tempon. Li premadis la tintilan klavaron sur sia skribotablo kiel pianartisto. Oficiale li parolis kun la provinco, vokigis al si

la respondecan oficiston, petis akton de li, kaj skuante la kapon, li legis ĝin, diskutis kun li, amike sed supereme, por sentigi sian potencon ankaŭ antaŭ fremduloj. Poste turninte sin al siaj gastoj, li demandis, ĉu ili bonvolas fumi cigaron. Post jesa respondo, li elfosis el sia malantaŭa poŝo sian ŝlosilfaskon, malfermis tirkeston de la tablo, ne rapidante, por prokrasti la momenton de la plenumiĝo, kaj flankenŝovinte la oritan kovrilon de la skatolo, prezentis al ili la rubanditajn cigarojn, kiuj, apartenante al la reprezentado, servis antaŭenigi lian karieron. Dum li servis per fajro, en sia animo li aranĝis, ke li havas je unu cigaro malpli, kaj ferminte la oritan kovrilon, li reŝlosis la skatolon en la tirkesto.

Li ŝatis ĉi tiun ceremoniecon kaj ŝatis ankaŭ la spiriton de la oficejo. Ĉirkaŭ tagmezo eksonis la sonorilo, anoncante la alvenon de la Ministro. La konstruaĵo ŝanĝiĝis kvazaŭ en preĝejon. Eĉ la seriozaj ŝtataj arboj staris pli solene sur la korto en siaj plaĉaj ferkradoj. Kara kolego, ĉu vi vidis lian Ekscelencon? Ĉu li havas hodiaŭ bonan humoron? Saluton, ekscelenca moŝto, saluton, altmoŝta sinjoro, mi estas via plej humila servisto. Ĉirkaŭis lin la amikoj, kiuj elŝoviĝis el nestoj de vienaj kontraŭrevoluciuloj, el siaj provincaj bienoj, ĉiuj anime kaj korpe ĝentlemanoj, ĉiuj purlavitaj kaj parfumitaj, eligante odoron de *eu de Cologne* kaj de fajna, bonodora tabako. Ili brakumadis, frapadis lian ŝultron, festadis lin, ĉar ion ili aŭdis pri tio, ke li estis eskortita en la parlamentejon. Ankaŭ ili plendis, kiel multe ili suferis, kion forrabis de ili tiuj krimuloj. Tamen ili vivis kaj estis kune, la junuloj ciumis la maljunulojn, la dua salajrokategorio la okan, kvazaŭ infanoj de granda familio. Ĉiuj fandiĝis en agrabla, familiara etoso, daŭre pretaj por servado en la oficejo kaj eksteroficeje, donante la titolon kaj respekton al ĉiu, kun armea disciplino kaj ankaŭ kun certa memdisciplino, konsciante, ke ĉio okazas prunte, kaj pli malfrue kiu ajn povos paŝi sur la plejsupron de la rangoŝtuparo. Ĉi tio estis la mondo de Vizy, pli ol lia hejmo – lia ĉio.

Li estis eminenta oficisto, diligenta, ankaŭ konscienca. Tion agnoskis egale liaj superuloj kaj subalternuloj. Se homoj turnis sin al li kun siaj aferoj atendaj kaj solvendaj, li tuj skribis asignon al la koncerna

organo. Kelkfoje ankaŭ li oferis iom – laŭ sia kapablo – por la establo de orfejoj, sanatorioj. Sed li ne toleris, ke oni individue ĝenu lin, ja por kio servas la oficialaj establoj. Oni ne povis akuzi lin per tio, ke li farus misuzojn. Da komuna mono eĉ filero ne fluis en lian manon. Sed estante malsaĝa kaj dupa por komplezoj en la espero, ke ili estos reciprokataj, li intervenis por mendoj kaj permesoj favore al siaj malnovaj konatoj, metiistoj, komercistoj, kiuj dankis lin per tio, ke ili ne lasis lin pagi, kiam li aĉetis en ilia vendejo. Tio ĉiufoje mirfrapis lin, trovis tion malĝusta, sed dolorus lin, se la atendita surprizo ne okazus. En liaj nomtagoj la diversaj metiobranĉoj, komercaj firmaoj komplezis lin per pli-malpli grandaj donacoj. Ili sendis viandon, torton, likvoron, tiel la gastiga tablo ne suferis mankon. Li ricevis ankaŭ ringojn, arĝentajn horloĝojn, kiujn kun rigardo al sia puritaneco li ne uzis, nur fermis en vitroŝranko kaj rigardadis ilin en siaj melankoliaj momentoj. Ĉi tiuj donacoj neniel egalis la komplezojn, faritajn al la donacintoj, tamen varmigis lian koron, kreskigis lian memamon, radiis certan palan poezion sur lian vivon.

Ankaŭ nun li flegadis ĉi tiujn amikecojn, plektadis ĉi tiujn interesfadenojn en la Civila Kazino, en komisiaj kunsidoj, partiaj vespermanĝoj – tage kaj nokte. En ĉi tiuj movoplenaj tempoj li volis salti pli supren sur la rangoŝtuparo, sur kies aktuala ŝtupo li jam antaŭ dek jaroj haltis.

Iun vesperon li estis invitita al sia ŝtatsekretario. En tiaj okazoj Vizy transformiĝis en afablan salonhomon. Eĉ kun sia edzino li babilis. Ĉi tiun okazon profitis s-ino Vizy, por inici lin. Antaŭ ol ili ekveturis, ŝi logis lin en la dompedelan loĝejon.

Vizy traktis alimaniere.

Ne konante la plurajn disbranĉiĝojn de la afero, li povis elpaŝi tiel supereme, kvazaŭ li urĝus en la ministerio nearanĝitan akton ĉe sia neglektema skribisto. Lia edzino fiere rigardis lin. Estas ja tamen alia afero, se viro parolas.

La tuto estis nur tiom:

– Kio okazas kun tiu servistino?

– Ŝi donis al mi promeson, altmoŝta sinjoro.

– Se ŝi promesis, ŝi do venu kaj plenumu sian devon.

– Ŝi venus, sed ĝis nun la mastro ne volis lasi ŝin foriri.

– Kiel tio eblas? Ĉu lia servistino maldungis sin? Kaj ĉu li akceptis tion? Tiam por tio li ne havas rajton. La leĝo klare difinas la jurrilaton inter mastroj kaj servistinoj. Tion li devas nepre respekti.

– Jes – diris Ficsor devote, aŭdinte la juran terminon.

– Do, ŝi ne ludu ŝercon kun ni. Se ŝi ne okupos sian lokon, mi alvenigos ŝin per policanoj. Vi povas diri al ŝi. Per policanoj.

Al Ficsor kaj lia edzino mankis nur tio. Ili staris kiel fulmofrapitoj, gapante unu al la alia: la ombro de prizono glitis tra ilia loĝejo, ili disetendis la manojn, kvazaŭ ili protestus kontraŭ la akuzo, ke ili ion estus preterlasintaj, sed ankaŭ tiel, kvazaŭ ili defendus sin kontraŭ falonta frapo.

Vizy finis sian direndon. Li hontis, ke en ĉi tiu kokinproceso li tiom uzis sian aŭtoritaton. Li promenigis sian rigardon tra la keletaĝa loĝejo.

En la kuirejo la grundoŝimo rampis supren unu kaj duonon da metroj, buntigante la muron per manplate grandaj nigraj rozoj. Humida ŝimodoro kirliĝis, fetoris, miksiĝis kun la misodoro de ruĝaj cepoj, rostataj super la fajro. La fenestro estis tiel malalta, ke oni povis vidi la preterpasantojn en la strato nur ĝis iliaj genuoj. Ĉi tie li estis atendanta, kiam ŝian edzinon oni eskortis en la parlamentejon, kaj li volis kapti Ficsor, tra longaj, longaj horoj sur tiu malalta knedujseĝo, kiu estis nun purblovita, por ke li sidiĝu nur por momenteto, „por ne forpreni ilian noktan kvieton”. Sed li ne sidiĝis. Li trovis ĝin malpura. Li timis, ke li makulos sian redingoton.

Cetere li memoris tiel, ke la instalaĵo de la kuirejo estis iom pli plaĉa. Kaj tiam li preskaŭ ekdeziris tiun silenton, tiun biblian senpretendecon. Tiam staris tie divano, sur kiu li volis sterniĝi. Ĉu ĝi estus la sama, kiel ĉi tiu kaviĝinta, eluzita, el kiu la fuko elpendas en faskетoj? Emajlita trinkvazo pompaĉis sur unu ĝia angulo kaj bazara aĉetosako, farita el tiu malvokolora veluro, kiu iam tegis la sidilojn de la unuaklasaj kupeoj de la Hungaraj Fervojoj, sed post la revolucio ĝi aperadis diversloke, proletaj patrinoj kudris el ĝi eĉ kalsonetojn por siaj kreskantaj infanoj. Li ekmiris, vidante ĉi tiun dezertecon. Li tenis

sian poŝtukon al la nazo. Kun nervoza rigardo li urĝis sian edzinon.

Tiu ankoraŭ plu traktis, sen gvida fadeno, kun virina senplaneco:

– Do parolu kun ŝi, kara Ficsor, kaj diru al ŝi, ke ŝi fine decidiĝu. Vidu, eble promesu al ŝi pli da salajro!

– Ŝia kapo ne doloras pro la salajro. Ŝin ne movas la mono.

– Ĉu ne? – ekbrilis la okuloj de s-ino Vizy. – Kio ŝin do movas? Ĉu eble ŝi tenas amantojn?

– Ĉu tiu? – kaj forgesinte la ŝuldatan respekton, Ficsor puŝis per la kubuto sian dikan edzinon kaj rikanis. – Ĉu vi aŭdas? Anna tenas amantojn!

S-ino Ficsor suprentiris la lipon, elvidigis siajn flavajn ĉevaldentojn, tiel ŝi ridaĉis pri la ridinda supozo, ke Anna, jes ja Anna „tenas amantojn".

S-ino Vizy iĝis scivola:

– Ĉu ŝi eble ŝatas sian stomakon?

– Ŝi manĝas tiom, kiom birdo.

– Sed kion do ŝi ŝatas?

– Labori, altmoŝta edzino – diris Ficsor – labori.

– Ŝi estas tia knabino – diris la dompedela edzino –, ke oni devus ori ŝiajn manojn – kaj ŝi ridetis kiel homo, kiu perfekte konas iun.

S-ino Vizy mem ne sciis, kiu el la du asertoj efikis pli sur ŝin: la kerna priskribo sen ĉiaj frazaĵoj de la dompedelo aŭ la preskaŭ poezie simpla konstato de la dompedela edzino. Ambaŭ estis ĝeneralaĵoj. Sed kelkfoje en ĝeneralaĵoj troviĝas plej multa enhavo, ĉar ne ligas nian imagon, lasas ĝin libere flirti.

Katanjo ankoraŭ laboris ĉe ŝi sed jam nur duone. Ŝi lasis ŝin fari, kion ŝi volas. Ŝi ne ordonis al ŝi reordigi la loĝejon. Preskaŭ kun ĝojo ŝi observis, kiom polvo kaj malpuraĵoj akumuliĝas de tago al tago. Kiam Katanjo oscedante kaj dormeme lokis sin oportuneme en la kuirejo, ŝi vidis anstataŭ ŝi, apud kaj malantaŭ ŝi la alian, kiu ĉion reĝustigos, kaj vigle, mirinde moviĝos kiel feino. Jes ŝi, kiu ŝatas nur labori, labori. Kaj ŝi rekte flankenmetis por ŝi kelkajn pli malfacilajn laborojn kiel specon de valora donaco ni konservas por iu kara al ni, kiun ni volas aparte distingi. Ŝi atendis ĉion de ŝi. Kiam ŝi fermis la okulojn, aperis tiu, pri

kiu ŝi sciis nur, ke “oni devus ori ŝiajn manojn”, la ormana servistino, kaj ĉi tiuj oraj manoj, konsistantaj el masiva, flava oro, ekbriladis en la duonhelo, kondukis ŝin plu kaj plu.

Tamen okazis io.

Rumanoj transloĝiĝis en ilian senperan proksimecon en la distrikto Krisztina. Ŝi rigardis ilin en la unuaj semajnoj kun sveniga surprizo, ili pasadis preter ŝia domo, kvazaŭ tie naskitaj. Ŝi tiom kutimiĝis al ili, ke ŝi ne plu atentis ilin. Dimanĉe la sveltaj, nigraharaj oficiroj en korseto, odorante de parfumo promenadis sur la Bástya-esplanado en societo de varieteaj steloj, ekskursis al la Isten-monto, kolazionis sur herbo kun siaj okazaj karulinoj, per siaj kodakoj fotografadis ilin. En la kafejo Philadelphia ili muzikigis hungarajn kanzonojn en la orelojn, kiujn iam, dum sia studenteco en Transilvanio, kiam ili estis enamiĝintaj, ankaŭ ili kantis sopirante.

La soldataro faris ĉaregotendaron sur la kampo Vérmező. Vespere ili kuiris vespermanĝon en pendpotoj, tendarfajroj ekbruliĝadis, kaj servistinoj de Buda, kiuj jam delonge ne vidis verajn soldatojn, nur specojn de dezertintoj kaj ftizajn ruĝarmeanojn, ĉirkaŭstaris ilin. Lajos, amanton de Katanjo la polico kaptis kiel enrompinton kun krimaj antecedentoj. La knabino pinĉis al si rumanon, iun apenaŭ dudek-jaran valaĥian paŝtiston. La ferkaska soldato en sia vivo ankoraŭ neniam vidis tiel belan virinon. Li brakumis ŝian talion, kaj man-en-mane promenadis kun ŝi ĉirkaŭ Vérmező, prigapis ŝian ruĝfarbitan buŝon, anĝelblondan hararon. Per mangestoj li ĵuris, ke li edzinigos ŝin, nur ŝi venu kun li en Rumanion. Ĉiutage li atendis ŝin kun bukedo antaŭ la dompordo. Ofte li eniris ankaŭ la ŝtuparejon.

Pro tio ĉiuj skandaliĝis. Etel ne plu parolis kun Katanjo, kun ĉi tiu patrujperfidulo, Stefi disvastigis la famon, ke Katanjo estas rumana spiono.

S-ino Vizy kunfrapis la manojn: kia skandalo, kia honto por ŝia domo, sed ŝi ne kuraĝis fari disponojn. Ŝi timis venĝon de la okupacia armeo. Ankaŭ al la registrita letero de Druma ne venis respondo. La situacio fariĝis netolerebla.

Ŝi prenis sian sunombrelon kaj sola ekiris.

Estis polva, griza krepusko, kiu memorigis meze de la somero pri aŭtuno, kiam pli frue malheliĝas, kaj tra la kamentuboj tempestoj sible enblovas. Ŝi stumbladis sur la onda-kava deklivo de la distrikto Tabán. La konata Krisztina ŝajnis al ŝi pro la rondirantaj patroloj fremda, stranga kolonio.

Ŝi sciis, kie la domo devas esti proksimume. Dum siaj babiloj la dompedelo plurfoje klarigis, ke akuŝistino loĝas tie. Erzsébet Karvaly, ŝia ŝildo kun infano, banata en kuvo, pendas sur la muro, kaj oni povas eniri la domon tra traba pordokoridoro, la vitropordo de ges-roj Bartos malfermiĝas al la korto, sur la muro videblas la bildo de Sankta Floriano kun ruĝa meĉujo sub ĝi.

En la strato Árok viciĝas nuraj mizeraj, kadukaj domaĉoj, unuj similaj al aliaj. Inter ili ŝi vojperdis. Antaŭ ruiniĝanta kabanaĉo sidis duonstulta avineto, kiu malfacile komprenis, kion ŝi serĉas kaj informis ŝin, ke ŝi iom troiris supren, ŝi bezonas returni sin. Ŝi rapidis, kiel iu faranta malpermesaĵon. La homoj rigardis ŝin malfideme. Ŝi komencis timi. Atinginte herbokovritan altaĵeton, ŝi ekvidis la ŝildon de Erzsébet Karvaly kun la banata bebo kaj ŝi ŝteliris en la domkoridoron. La bildo de Sankta Floriano, la flirtetanta ruĝa meĉujo sur la muro esperige montris sin al ŝi.

Ŝia intenco estis, igi elvoki ŝin, paroli kun ŝi, forlogi ŝin, se eblas, tuj, sed ĉiuokaze ŝi volis konvinkiĝi, kia ŝi estas.

En sia mansaketo ŝi fosserĉis, elprenis monon, por ensendi mesaĝon per iu. Sed en la strato Árok eĉ ombro ne moviĝis. La malvasta, malpura korto kun la stankolora ĉielvolbo supre ŝajnis forlasita.

De interne ŝi aŭdis svagajn voĉojn, virinajn kaj infanajn. La vento frapfermis fenestron. Alpremiĝinte al muro, ŝi atendis.

Tiu certa vitropordo subite malfermiĝis, kaj nudpieda infaneto, certe Bandika, elkuris sur la korton, kun virino post li.

La koro de s-ino Vizy ekbatis pli verve.

La virino estis proksimume tiel alta kiel ŝi sed muskola kun fortika staturo, flave bruna vizaĝkoloro, longa, taŭzita hararo kaj karbonigraj brovoj. Palkolore vinruĝa robo pendis sur ŝi. Ŝi kuris post la infaneto, kiu petolis ĉirkaŭ la rando de la rada puto. Ŝi kaptis lian manon, fingro-

minacis lin, poste prenis lin amoplene en la brakojn, plurfoje kisis lin. Tiel li portis lin en la domon.

Post kelkaj minutoj ŝi ree elvenis kun lada lavujo. Ŝi tiris akvon el la puto, plenverŝis la lavujon, kaj dum ŝi ekiris reen, ŝi alĵetis flankan rigardon.

Iliaj okuloj renkontiĝis.

Levinte iom sian sunombrelon, s-ino Vizy vokis ŝin. Poste ankaŭ per la maldekstra mano ŝi gestis voke al ŝi. La virino ne rimarkis tion, eble ankaŭ ne komprenis, ree ŝi rapidis internen. Ŝi ne plu montris sin.

Jam krepuskis. Pli malfrue viro enpaŝis tra la dompordo, evidente la inspektisto, kiu mire gapis, kian farendon havas tie damo.

Ŝi vidis laŭcela forlepori.

La afero sukcesis ne tute tiel, kiel ŝi antaŭvidis. Tamen ŝi ne pentis la aventuron, ĉar nun ŝi vidis propraokule, ke tiu estas forta, klopodema, brava knabino. Al ŝi plaĉis precipe, ke ŝi tiel afable rilatis al la infano. Krome almenaŭ firman ŝtofon ŝi havis por sia imagado.

Hejme ŝi fanfaronis al Ficsor:

– Mi vidis ŝin.

– Kiel vi bonvolas kompreni tion, altmoŝta sinjorino?

– Nu, ne misaspekta ŝi estas.

– Benita persono ŝi estas. Vi ja konvinkiĝos.

– Sed kiam?

– En la sekvaj tagoj. Nun ni jam trovis knabinon por ŝia loko. Hodiaŭ oni diris, ke ŝi iĝos libera. Bonvolu ne maltrankvili!

Etel kaj Stefi, sidante en la kontraŭaj pordoj de la dua-etaĝa koridoro kirladis sukeritan ovokaĉon por la torto, babilis pri ŝi:

– Ŝi nomiĝas Anna.

– Ĉu vere?

La novaĵon disvastigis s-ino Druma, kiu ekflaris ĉiun klaĉon.

Ĉi tiu senspica-sensprita, mirige malklera virineto servis dum la milito kiel ordinara flegistino, ŝi igis edzinigi sin per sia nuna, belega edzo, kiam tiu kuŝis kun kapopafo en la milita hospitalo en Marosvásárhely. Katopaŝe ŝi molpaŝetis en la ŝtuparejo kiel museto. Ŝi parolis pepante.

Foje ŝi trafis post la dorson de s-ino Vizy kaj atakis ŝin kun siaj sentakte intimaĉaj manieroj.

– Ni jam aŭdis, jam aŭdis. Kiom vi pagos al ŝi?

Ankaŭ s-ino Moviszter eksciis de ŝi la novaĵon.

La bela s-ino doktoro iris en sia rozornamita ĉapelo al ĉefprovo, por kiu ŝi ricevis senkostan bileton de iu konato aktoro. Refoje nova literatura flavbekulo akompanis ŝin. S-inon Vizy ŝi ekvidis sur la placo Kígyó, haltigis ŝin kaj direktis la temon al la nova knabino.

– Ĉu do tiel, kara? Ĉu ŝi ankoraŭ ne okupis sian lokon? Oni diris, ke jam hieraŭ ŝi dungiĝis.

S-ino Vizy skuis la kapon.

Kaj dum la tagoj pasis, la bonema figuro de Anna ŝvebis al ŝi kvazaŭ nebulvidaĵo, ĉiam pli foren, pli foren. Ofte ŝi jam kredis, ke la tuto estas nura revo, kaj tiu, kiun ŝi vidis, efektive ne ekzistas.

Anna

Tempis la 14a de Aŭgusto: mirinda somera tago. Varmega kaj brila.

Vizy jam transiris en la Civilan Kazinon por kafumi. Lia edzino sola meditis antaŭ la ruinoj de riza sufleo.

Kiam ŝi flankenŝovis sian teleron, surprizite ŝi rimarkis, ke sub la telero kaŝiĝis kelkaj rizograjnoj.

Per la pinto de sia forko ŝi nombris ilin. Estis sep grajnoj. Plurfoje ŝi renombris ilin. Ĉiufoje rezultis sep.

Kiel ili trafis tien? Ŝi ne komprenis. Ŝi decide memoris, ke ne ŝi lasis ilin fali, ŝi ja dum la tuta tagmanĝo ne formovis sian teleron.

La nombro igis ŝin enpensiĝi. Kial ĝuste sep?

Tio signifas ion. Eĉ per la plej etaj signoj oni mesaĝas al ni, de tie transe, per etaj signoj grandajn aferojn. Ŝi, kiu dum spiritistaj seancoj ofte vidis la spiriton de sia filineto kaj aŭdis ŝian voĉon, ho, kiomfoje kaj tute klare, ne dubis pri tio.

Li metis tri grajnojn sur sian langon, glutis ilin per glaso da tre akva vino, kaj meditis, kio devas esti tiu bona novaĵo, kiun signas la sep rizograjnoj, kiam mallaŭte ekfrapiĝis la pordo, kaj antaŭ ol ŝi povus respondi per „Envenu!”, tra la pordoaperturo enŝoviĝis la kapo de Ficsor.

– Ĉu vi permesas? Ni alvenis, altmoŝta sinjorino.

– Kiuj vi?

– Anna. Ĉu ni povas enveni?

– Tuj. Atendu!

La kapo retiriĝis, la pordo fermiĝis

S-ino Vizy kroĉis sin al angulo de la tablo, ŝi preskaŭ kapturniĝis pro la hazarde rapida densiĝo de la eventoj.

Ĉi-tage ŝi ne surhavis ŝuojn, nur pantoflojn kaj tiun malnovan, lilan negliĝon, en kiu dum la soveta tempo ŝi kutimis eliri surstraten, por esti rigardata proleta virino.

Antaŭ sia ŝranko ŝi ĵetis sur sin siajn blankan hejmrobon, ĉampankolorajn ŝtrumpojn, brunajn duonŝuojn. El sia vestaro ŝi rapide elprenis ĉi tiujn pecojn kiel aktorino, kiu baldaŭ havos surscenigon. Ŝia vizaĝo estis laca, turmentita. Ŝi ridetis al sia spegulbildo, trovis sian rid-

eton trudita, iom ŝi serioziĝis, serĉis la mezan vojon inter la du esprimoj. Sian haŭton ŝi leĝere dabis per rizpulvora pudrilo. Lastminute ŝi kroĉis sian oran brakĉenon.

Piedpinte ŝi reglitis en la manĝejon.

Sur la divano kuŝis la negliĝo de ŝia edzo kun elturnita maniko.

Ŝi faldis ĝin. Krome ĝenis ŝin io kaj tio: ke la tuko kovris nur tri-kvarone la tablon, ke la grasaj teleroj restis meze apud la riza sufleo, krome sur la pulvorsukerujo festenis muŝoj. Ŝi volis fari iom da ordo. Sed por tio ne restis tempo. Ŝi timis, ke se ŝi longe malfruos, Katanjo forkonsilos ŝin.

Ŝi tiris nur la tukangulon iom pli suben, nur ŝtopis la vinbotelon per la aluminie tegita korko kaj sidiĝis sur la antaŭa loko kontraŭ la pordo, kubutante sur la tablo, kvazaŭ ŝi jam delonge sidus tie kaj pensus pri tio, pri kio sinjorinoj post tagmanĝo kutimas pensi.

Per sufokita voĉo ŝi vokis:

– Envenu!

Ficsor enpaŝis.

Post li dum du sekundoj, tri sekundoj, kvar sekundoj – neniu.

– Nu? – ŝi demandis kaj jam kredis, ke denove ŝi estas trompita.

– Jen ŝi estas – trankviligis ŝin la dompedelo –, ŝi alvenis.

Kaj tiam enpaŝis ankaŭ la knabino.

Tiu rekte rapidis al ŝi, klinis sin, kisis ŝian manon kun tia natureco kaj praktiko, kvazaŭ ŝi konus la sinjorinon jam de pluraj jaroj.

S-ino Vizy ne tuj retiris sian manon; ĝenerale ŝi ŝatis, se oni mankisas al ŝi, ĝuis sur sia haŭto la humidajn homajn buŝojn.

Ficsor donis instrukcion al la knabino, sed kion, s-ino Vizy jam ne aŭdis.

Ŝi ne aŭdis, ne povis aŭdi ĝin, ĉar la sango salte inundis ŝian kapon, zumis ĉirkaŭ ŝiaj oreloj, kaj ŝi observis kun sia tuta animo la knabinon, kiu dume reiris apud la pordon kaj haltis kun la servolibreto, volvita en pura poŝtuko, nudkapa, kun okuloj mallevitaj.

S-ino Vizy alcelis ŝin per sia tigokulvitro: sur ŝia vizaĝo speguliĝis seniluziiĝo, miro, gapo.

– Ĉu ĉi tiu? – ŝi demandis almontrante.

– Ĉi tiu, altmoŝta sinjorino – konfirmis Ficsor, ne komprenante la demandon. – Ŝi estas Anna. Ĉu eble ne konvena? – kaj klinante flanken sian kapon, li alokulis la sinjorinon.

– Jes ja – respondis s-ino Vizy ankoraŭ hezite, ĉiam plu mirante. – Do ĉi tiu…

Ne, tamen ne tiu ŝi estis.

Almenaŭ ŝi vidis iun alian ĉirkaŭ vespero en la strato Árok. La virino, kiu postkuris la infaneton, estis pli alta, multe pli alta, pli muskola, ŝia vizaĝo estis flave bruna kaj ŝia hararo nigra, ankaŭ ŝiaj brovoj estis nigraj, karbonigraj. Tion ŝi firme memoris.

Devis temi pri simpla miskompreno. Ŝi certe konfuzis ŝin kun iu, eble kun la bofratino de Bartos, pri kiu fojfoje ŝi jam aŭdis de Ficsor.

Kvankam ŝi tuj klarigis tion en si, daŭris sekundojn, ĝis tiun virinon en vinruĝa robo, kiun image ŝi jam dungis, enloĝigis, kuŝigis en la liton de Katanjo, per kiu image ŝi jam igis purigi ĉiujn siajn ĉambrojn, kiun ŝi jam sciis la sia, ŝi senigis je tiuj virtoj, per kiuj ŝi estis ŝin ornaminta: nun ŝi do devis deŝiri ties distingilojn, transdoni al ĉi tiu, al kiu ili apartenas, al ĉi tiu ankoraŭ tute fremda, ĝeniĝema knabino, kiu tremetis antaŭ ŝi pro fremdultimo.

De sur la vizaĝo de s-ino Vizy jam malaperis la seniluziiĝo kaj miro. Ĉio ĉi mildiĝis al agrabla observado. Ŝi ĉiam plu okulmezuradis ŝin. Ŝi ne ŝajnis kamparana knabino. Ŝi ne estis tiel plumpa, ruĝvanga kiel Örzsi Varga. Prefere svelteta kaj gracila kun ovala vizaĝo, delikataj ostoj, proporcia. Ŝi surhavis freŝefikan kvadratitan robon, sub kiu mole, senkonscie dormis ŝiaj infanmamoj, ludeme kiel du kaŭĉukaj pilketoj. En ŝia tuta estaĵo estis io, kion ŝi ne scipovis esprimi, io, kio altiris, kio iom ankaŭ repuŝetis sed nekutime interesis ŝin.

Ŝi demetis sian tigokulvitron.

Kaj kiam ŝi ne plu ekzamenis ŝin, nur lasis efiki sur sin, kion ŝi spertis, subite ŝi eksentis, ke ĉi tiu estas, kiun ŝi tra jaroj serĉis tute vane. Ŝi aŭdis internan inspiron, kiel ĉe decidaj turnoj de sia vivo, tiun subtenan, instigan voĉon, kiu tiomfoje ekparolis en ŝi, specon de ordono, ke ŝi ne multe rezonu sed dungu ŝin, retenu ŝin kaj ŝi deziris kapti ŝin, ke ŝi tuj restigu ŝin ĉe si, por posedi ŝin, kaj ŝi jam etendis sian brakon al

ŝi, kvazaŭ ŝi volus kapti, por neniam plu ellasi ŝin.

– Ĉu vi bonvolas la libreton? – demandis Ficsor.

– Jes – diris s-ino Vizy, kiu ekreginte sin, bonŝance transludis sian miskomprenitan geston en pli malaltan nivelon. – Ni rigardu ŝian libreton.

Ŝi levis alten siajn brovojn.

– Ĉu Édes? – ŝi demandis. – Édes?

– Tiel ŝi nomiĝas. Anna Édes.

S-ino Vizy duonlaŭte legis el la servolibreto.

Anna Édes, naskita en vilaĝo Balatonfőkajár, subprefektujo Enyig, prefektujo Veszprém, Hungario.

Priskribo

Naskiĝjaro: 1900

Religio: romkatolika

Staturo: mezgranda

Vizaĝo: ronda

Okuloj: bluaj

Brovoj: blondaj

Nazo: normala

Buŝo: normala

Haroj: blondaj

Dentoj: kompletaj

Barbo: sen

Vakcinita: jes

Specifa trajto: sen

Propramana subskribo: *Anna Édes.*

– Jes – ŝi diris kaj mistere ridetis, eble pro la nomo Édes[10], kaj ke ŝi ne havas barbon.

Ĵetante rigardon jen al la libreto jen al la knabino, ŝi kontrolis la oficialajn konstatojn de la servolibreto, kiuj ja eĉ proksime ne koincidis kun la nepriskribebla realo. Ŝiaj haroj, ŝiaj neabundaj haroj, kiujn sen ŝmiraĵo, sekajn ŝi reglatigis de sia volba frunto, ne estis blondaj sed kun nuanco inter kaŝtankolora kaj blonda, dikaj, rektaj haroj. Ankaŭ

[10] Édes (hungare): dolĉa, tre kara.

ŝia nazo ne estis „normala” sed nepre interesa kun la spirantaj aloj, preskaŭ kurioza, sense defia. Ŝia staturo estis iom pli alta ol meza, sed malforta, ne ĝiskreskinta, eble iom ankoraŭ knabeca. Ŝia buŝo estis anemia kaj seka, ŝiaj manoj normalaj servistinaj manoj: krudaj. Ŝiaj ungoj mallongaj kaj brilaj.

– Kiomjara vi estas?

– Dek naŭ – respondis ĉiam plu Ficsor. – Vi tiom aĝas, ĉu, Anna?

– Kial vi ne parolas, knabino? – turnis sin al ŝi s-ino Vizy.

– Ŝi hontas. Ŝi estas tre hontema.

S-ino Vizy ankoraŭ ne vidis ŝiajn okulojn, tial ŝi demandis:

– Kaj kial vi ne rigardas en miajn okulojn?

– Ŝi timas.

– Kiun ŝi timas? Ĉu min? Min vi vere ne bezonas timi.

La knabino ekvibrigis siajn abundajn palpebroharojn, sed antaŭ ol la sinjorino povus ekvidi ŝiajn okulojn, ŝi refermis ilin.

S-ino Vizy ekzamenis ŝian subskribon, ŝiajn pintajn sagoliterojn – kiujn ŝi devis longe kaj zorgeme surdesegni, klinita super tablo de policeja kontoro – kaj la kvalifikojn de ŝiaj pli fruaj mastroj.

Ĝis nun ŝi servis nur en du lokoj: en 1916, kiam ŝi venis al Budapeŝto, ĉe magazinisto Wild, poste ĉe inspektoro Bartos. En ambaŭ lokoj preskaŭ unu kaj duonon da jaroj.

– Kio vi estis?

– Nutristino – ripete respondis Ficsor.

– Do infanistino – korektis s-ino Vizy.

La kvalifikoj estis en ordo.

Ŝiaj mastroj agnoskis, ke ŝi estas „fidela”, ŝia morala sinteno estas „neriproĉebla” kaj „ŝi foriris sana”. Sed s-ino Wild konscience enskribis, por la informado de aliaj civitanoj, ke „en sia laboro ŝi estas ne ĉiam fidebla”, kaj ankaŭ tion, ke „ankoraŭ ne sufiĉe lerta”.

– Ankoraŭ ne sufiĉe lerta – legis s-ino Vizy. – Nu jes, nu jes.

– Ŝi enlerniĝos.

– Tio ja ne estas tiom grava. Gravas, ke ŝi klopodu.

– Diligenta, jes, ŝi estas diligenta.

– Ĉu vi scipovas kuiri?

– Iom – modestis Ficsor anstataŭ ŝi.

– Iom. Mi preferus aŭdi, ke neniom. Mi konas tion. Ĉiuj tiel parolas, kiam ili dungiĝas. Kaj kiam ili prenas kuleron en la manon, evidentiĝas, ke eĉ ideon ili ne havas prie. Vi memoras, Ficsor, Margit Mennyei, ĉu? Ankaŭ ŝi diris, ke ŝi scipovas kuiri. Kaj ankaŭ Lidi.

Ficsor memoris ambaŭ kaj prijuĝe kapjesis.

– Nu, mi inicos ŝin. Sed ĉu vi purigas? Lavas? Vaksas plankon?

– Kompreneble – manjesis la pedelo.

– Sekve – kaj ŝi diris tion jam tre rapide – vi plenumos ĉion, kio doniĝas en la domo: vi aĉetos en la bazaro, portos karbon el la kelo, en via malplena tempo vi ŝtopos ŝtrumpojn, flikos vestaĵojn kaj tiel plu kaj tiel plu.

– Ŝi ne estas elektema. Ĉu vere, Anna?

– Tre ĝuste. Ĉe mi oni devas labori. Mi ne bezonas fraŭlinojn. Mia loĝejo devas brili.

Anna ne vidis la parolanton, ĉar ŝi daŭre okulfiksis la plankon, ŝi aŭdis nur la voĉon senkorpan, kvazaŭ elĉielan anoncon. Embarasite ŝi stariĝis de unu piedo sur la alian.

Kiam ŝi enpaŝis ĉi tien, ŝia stomako subite transturniĝis, tia misfarto kaptis ŝin, ke ŝi kredis tuj falsterniĝi. Ŝi sentis ian neeldireblan malbonodoron, kvazaŭ en apoteko, akran, malvarman odoron, kiu ĉiam pli pikis ŝian nazon, tordis ŝiajn intestojn. S-ino Vizy tenis en sia piano kamforon, por ke tineoj ne ronĝu la vatitajn tonmarteletojn. Anna ne sciis, de kie venas ĉi tiu medikamenta odoro, nur sciis, ke ŝi ne eltenos ĝin, ŝi sciis nur, ke jam en la unua minuto ŝi volis forkuri, kaj se ŝi aŭskultus sian sanan instinkton, sen saluto kaj adiaŭo ŝi forkurus, fuĝus malsupren sur la ŝtupoj, tra la stratoj, kurus sen halti nur hejme, ĉe la stoplokampoj en Kajár.

Sed lia onklo apudis ŝin, kaj ŝi eĉ ekmovi sin ne kuraĝis.

Sian rigardon ŝi tamen levis tiom, ke ŝi vidis la ŝuojn, ŝtrumpojn de s-ino Vizy, la surmuran pendolhorloĝon, kiu iris en sia ebona ŝranko, kribrante per sia monotona tiktakado sensensigan, sinjorecan silenton en la manĝejo. Kelkfoje ŝi ĵetis rigardon jam ankaŭ en la salonon. Tie en la spegulo kalejdoskopis kirlo de koloroj. Longa, malalta ripozlito

etendiĝis tie, kovrita per ruĝa tapiŝo el Torontál, sur kiu la posttagmezo ekbruligis flagrantan fajron. Ion tian ŝi vidis nek ĉe ges-roj Wild, nek ĉe ges-roj Bartos. Blindigita, kapturnita, ŝi gapis tien, kiam de tempo al tempo ŝi levis siajn okulojn. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi trafis en ensorĉitan kastelon.

– La demando estas – ekparolis s-ino Vizy –, ĉu ŝi havas emon al la loko. Nu? – ŝi konfesigis ŝin, kiam tiu ree ne respondis.

Tiam Anna apenaŭ videble, leĝere kaj malgaje levis la ŝultrojn.

Al s-ino Vizy mallumiĝis la mondo. Ĉi tiu muta servistina gesto de ribelo, kiun ŝi tiel multe konis, dum minuto ruinigis ŝian esperon, ĉion, kion ĝis nun ŝi tiel pene konstruis. Ŝi decidis, ke nun ŝi estos severa kaj strecos la aferon ĝis rompo.

– Pardonon? – ŝi demandis ironie. – Ĉe mi oni ne kutimas tiel respondi. Se vi ne havas emon al la loko, tiam jen estas via libreto – kaj ŝi lasis fali la servolibreton sur la tablon tiel, ke ĝi klakis. – Vi povas foriri kun dia beno.

– Anna ne tiel komprenis – senkulpigis ŝin Ficsor. – Ne tiel vi komprenis tion, ĉu, Anna?

– Kiel do ŝi komprenis?

Restis silento.

S-ino Vizy kaj Ficsor atendis la respondon.

– Mi havas – balbutetis Anna preskaŭ senvoĉe, komprenante la aferon tiel, ke al ŝi estas egale, ŝi ja devas ĉie labori.

– Tio estas alia. Parolu kompreneble kaj honeste! Kiel estas kutime en sinjoraj domoj. Se vi laboros senriproĉe, ĉi tie vi havos bonan sorton.

– Ĉi tie vi havos bonan sorton – rapidis Ficsor helpi al la altmoŝta sinjorino, por movi la knabinon kun komuna forto al decido.

– Ni estas nur du. Mi kaj mia edzo. Infano ne estas, kaj senvole ŝi ĵetis rigardon al la fotografaĵo sur la muro, kaj per sia kutima frenezeta movo glatigis sian sukcenflavan hararon, kvazaŭ ŝia harnodo estus peza, kvazaŭ ŝia kranio fendiĝus sub ĝi. – Krome ĉe mi estas ne tiel, kiel ĉe aliuloj. La pano estas libera. Vi povas manĝi, kiom vi volas. Mi aŭdis, ke en via malnova loko vi matenmanĝis nur fritfarunan supon.

Ĉi tie vi ricevos ĉiutage kafon. Varman kafon. Dimanĉe kukon, dufoje en la semajno viandon. Kaj se vi bone kondutos, fojfoje mi donacos al vi ankaŭ paron da ŝuoj. Aŭ robon.

– Robon, Anna, robon – instigis ŝin la dompedelo ridetante.

– Kaj pli malfrue, ni vidos. Eventuale – ĉiufoje tio estis la atuto – mi instruigos vin krome ankaŭ kudri.

– Ĉu vi aŭdas, Anna? Ĉu vi aŭdas? Kudri! La altmoŝta sinjorino instruigos vin ankaŭ kudri. Estu do diligenta! Vi venos al sinjoraj personoj. Ĉar ĉi tiu estas ne tia domo. Ĝi ne havas kompareblan – li volis diri ion grandan – en la tuta Krisztina.

– Kiam vi eklaboros?

– Tuj – diris Ficsor.

S-ino Vizy ne kalkulis je tio, ŝi atendis tion morgaŭ.

– Mi aranĝos la aferon kun ili – fanfaronis la dompedelo –, ĉar kion mi foje promesas, altmoŝta sinjorino…

– Kie estas ŝia pakaĵo?

– Malsupre, ĉe mi.

– Suprenportu ĝin! – ŝi instrukciis Ficsor.

Ŝi atendis, ĝis la dompedelo eliras. Tiam ŝi paŝis al la servistino, tiel proksime, ke ŝi preskaŭ tuŝis ŝian vizaĝon.

Anna ektime malfermis siajn grandajn, velkajn okulojn.

Ŝiaj okuloj estis bluaj sed ne brilaj, plie laktobluaj, violbluaj kiel la akvo de Balatono en humida, somera frumateno.

Nun ŝi vidis unuafoje s-inon Vizy: pala, tre alta, glacimalvarma virino leviĝis antaŭ ŝi, kiu – ŝi ne sciis, kial – similis nekonatan birdon kun distaŭzitaj, brilaj, buntaj plumoj. Ŝi retretis al la pordo.

S-ino Vizy, por forglatigi la antaŭan disputeton, kaj ĉefe por fine aŭdi ŝian voĉon – ĉar la knabino eldiris ĝis nun nur du vortojn: „mi havas” – demandis kun homa tono:

– Kio estas via patro?

– Servisto.

– Kie li estas servisto?

– Ĉe la sinjoro. Bienservisto.

– Terkulturisto. Kaj ĉu li posedas ion? Domon, teron, porkojn?

– Nenion.

– Sed tritikon ŝi tamen ricevas, ĉu? Aĥ, vi pli bone vivas ol ni. Kaj via patrino?

– Panjo – kaj ŝia voĉo rompiĝis.

– Kio?

– Mortis. Mi havas vicpatrinon – ŝi flustris kun sufokita voĉo.

– Gefratoj?

– Unu frato.

– Ĉu ankaŭ tiu estas terkulturisto?

– Nun li revenis hejmen.

– Ĉu el la milito?

– Ne. El franca militkaptiteco – kaj ŝi levadis la ŝultrojn.

– Jam refoje. Tio ne decas. Ni respondas per jes kaj ne. Nu, vi ellernos tion.

Por tio ŝi ankoraŭ havis tempon. S-ino Vizy ne plu dresis ŝin, sed transiris al la kerno.

Konfidence, iom malpli laŭte ŝi demandis kiel virino al virino:

– Ĉu vi havas amanton?

Anna gestis, ke ne.

Ŝi ne ruĝiĝis, sed ŝian frunton, ŝian belan volban frunton subite invadis ia rozkolora nebulo.

– Ĉu sincere? Ne neu, ĉar mi ĉiel divenos tion. Ĉi tiu domo estas bonmora. Ĉi tie neniu rajtas fari vizitojn, nek tage, nek nokte. La ŝlosiloj estas cetere ĉe mi. Ĉu ankaŭ konatojn vi ne havas?

– Ne.

– Iujn vi tamen konas.

– Ges-rojn Ficsor... – Kaj post paŭzo – ...kaj la sinjorinan moŝton Wild... – Post refoja paŭzo – ...kaj s-inon Cifka, bofilinon de s-ro Bartos.

– Ĉu lian bofilinon? Ĉu tiun fortan, altan virinon, kiu loĝas ĉe ili?

– Tiun.

– Ĉu krome neniun?

– Neniun.

– Pli bone tiel. Vi estus nur koruptita. Kompreneble, se iu via venos

al vi vizite…. Via patro aŭ via frato. Tiam vi petos permeson por renkontiĝi kun ili. Cetere ĉiu via dua dimanĉo estas libera. Posttagmeze de la tria ĝis la sepa. Sed je la sepa vi jam devos esti hejme.

Ficsor suprenportis magran pakaĵeton, volvitan en kvadratdesegna tuko.

S-ino Vizy, uzante sian rajton de dommastrino, malnodis ĝin. Ĉiufoje okaze de pakaĵekzamenado ŝi konvinkiĝis la unuan fojon, ĉu la nova servistino ŝtelas.

Ŝi trovis malmultajn aĵojn.

Kelkajn ĉifonajn poŝtukojn el kotono, sur kiuj ne videblis monogramo, do verŝajne ŝi ne ŝtelis ilin, unu jam tre multe uzita, blua katuna robo, kelkaj kaptukoj, unu paro da viraj ŝuoj, fordonacita verŝajne de iu mastro, ronda reklamspeguleto kun la marko de la firmao, unu fera kombilo, ankoraŭ plena de ŝiaj implikitaj haroj.

Krome premkava, flavlada infantrumpeto, de kiu pendis ruĝa kvasto.

Ŝi prenis en la manojn, rigardadis ĝin. Ŝi ne scipovis imagi, por kio la servistino povas uzi ĝin.

Katanjo enpaŝis, kun kapo alten levita, kun superema rideto de ofendita princino, por rearanĝi la tagmanĝan tablon. S-ino Vizy jam ne permesis tuŝi ĝin. Ŝi elsendis kaj ankaŭ mem postiris ŝin.

Ŝian foreston Ficsor uzis, por konfesigi sian nepinon.

– Nu?

Anna silentis.

– Bona loko – diris la dompedelo. – Unuaklasa loko. Ili estas riĉaj. Ilia estas la tuta domo. La sinjoro estas ministeria konsilisto. Altmoŝtaj.

Pli multe ili ne parolis.

La neafabla parenceco de malriĉaj homoj interligis ilin, por kiuj la sanga interrilato signifas tre malmulte, ĉar ili ne havas karajn, komunajn memorojn, ili nur vivas unuj apud la aliaj, senĉese laborante, fermitaj en si mem, por la aliaj nepenetreble, en granda distanco.

S-ino Vizy volis elŝteli Katanjon de ĉi tie, kiel el publikaj hospitaloj Ĥolerajn mortintojn, por ke ŝi ne povu infekti la sanan.

Ŝi ĵetis antaŭ ŝin la salajron, kaj diris, ke ŝi tuj prenu siajn sakon kaj

pakon.

Dum Katanjo pakis, ŝi okulsekvis, ĉu ŝi ne kunprenos ion ŝian.

Ankaŭ Katanjo ne havis pli dikan pakaĵon ol Anna, sed memfieron des pli. Antaŭ ol ekiri, kun kavalira gesto ŝi redonis la trikitan veŝton, ricevitan donace.

Ankaŭ ŝi sentis infektita ĉion, kio memorigus al ŝi ĉi tiun domon, kie tiel multe ŝi estis ofendita.

La sinjorino akceptis la veŝton, poste frapfermis la pordon al ŝiaj kalkanoj.

Reveninte ŝi jam parolis tute alitone kun Anna, en la tono, en kiu ŝi de nun ĉiam parolos kun ŝi:

– Venu, Anna, mi transdonos la loĝejon.

Ŝi kondukis Anna de ĉambro al ĉambro.

– Jen la laborĉambro. Vi purviŝos ĉiutage la librojn, sed sur la skribotablo vi nenion formovos, la sinjoro estas tro sentema pro siaj aĵoj. Ĉu vi komprenas? Ilin tre atentu!

Remburita strigo gapis al la knabino per siaj vitrookuloj.

Anna sekvis s-inon Vizy kaj Ficsor en distanco de kelkaj paŝoj, balancante sian pakaĵeton.

– La manĝejon vi jam vidis. Tio estas la lavotaĵujo. Tiu ŝranko, kompreneble, estos forigita de ĉi tie.

En la salono ŝi klarigis:

– Nu, ankaŭ ĝi tre bezonas purigon. Ni malplenigos ĝin. La pianon ni tiros iom antaŭen. Da laboroj haviĝos, estas ja certe.

Anna staris apud la ripozlito, kovrita per ruĝa tapiŝo, ĉar tiom atakis ŝin la kamforodoro, haladzanta el la piano, ke ŝi fariĝis morte pala. S-ino Vizy kaj Ficsor iris jam en la dormoĉambron. Ŝi aŭdis nur, ke la sinjorino urĝas ŝin:

– Kial vi ne venas? Stranga knabino – ŝi alĵetis al Ficsor. – Komence estos kun ŝi certe malfacile.

El la dormejo flava tapetita pordo kun grimporozoj malfermiĝis en la malluman, humidan banoĉambron, kie malgaje gutetis malboniĝintaj kranoj.

– Malŝaltu la lumon! – ŝi ordonis al Anna. – Saltu, knabino! Unu,

du! Se vi eliras de ie, ĉiufoje vi estingu la lampon. Oni ne malŝparu en ĉi tiu multekosta mondo. Ankaŭ ĉi tiun pordon fermu post vi! Unupene. Estas ja trablovo.

Ili venis en la kuirejon.

Ĝi estis jam tiel malplena, tiel soleca, kvazaŭ tiu certa Katanjo neniam estus en ĝi loĝinta.

– Ĉi tio estas via... – komencis s-ino Vizy, sed ŝi ne trovis la taŭgan vorton. – Ne granda. Sed ĉiuj trovis ĝin kontentiga. Ne tien! – ŝi ekkriis, kiam Anna metis sian pakaĵeton sur la tablon. – Sur la plankon. Ne plenigu per cimoj mian loĝejon! Ĉu via kapo estas pura? Morgaŭ vi baniĝos.

Ŝi montris la kameron.

– Ĝi estas ŝlosita. Ĉiumatene mi eldonos la farunon, grason, sukeron. Nenio devas manki – ŝi atentigis.

Ficsor adiaŭis. Al s-ino Vizy enkapiĝis nur ĉe la pordo:

– Nun mi ekmemoras, ŝia salajro.

– Ba, altmoŝta sinjorino – protestis la dompedelo preskaŭ indignigite. – Vi donos al ŝi, kiom ŝi meritos. Unue vi vidos.

– Bone. Mi vidos.

Unue ŝi vokis ŝin en la manĝejon. Sub ŝia superrigardo ŝi igis ŝin aranĝi la tagmanĝan tablon. Ŝi instruis, edukis ŝin, ke ŝi elportu la telerojn, lavu la vazojn, remetu la tranĉilojn, forkojn en la kuirŝrankon.

Vespere ili primetis la tablon por la vespermanĝo. Ili remetis sur la tablon la telerojn, tranĉilojn, forkojn, kiujn posttagmeze ili formetis; surtabligis blankan panon, ili jam manĝis nome blankan panon.

Post kiam ili kune preparis la litojn en la dormoĉambro, s-ino Vizy transdonis al ŝi netranĉitan maizpanon.

– Jen via pano, kaj ĉi tio estas via vespermanĝo – ĝi estis peco da fromaĝo. – Kaj jen tegaĵo – ŝi enmanigis ruĝstriitan kusentegon al ŝi. – Kovru vian kusenon! Vespermanĝu, poste vi povos enlitiĝi.

Ŝi liberlasis ŝin.

– Mankison.

– Lasu tion – diris s-ino Vizy, sed la knabino ree kisis ŝian manon.

Nova balailo bone balaas

Anna disrigardis en la fremda kuirejo.

Ŝi devis vespermanĝi, poste enlitiĝi.

Ŝi detrancis pecon da pano. Sed ŝi ne povis eĉ mordi ĝin. Kaj la pano, kaj la fromaĝo havis tian odoron kiel la loĝejo.

Pene ŝi disfaldis la kampadan liton, kies meĥanismon ŝi ankoraŭ ne konis, tegis sian unusolan kusenon, envolvis sin en tiu netegita peplomo, per kiu hieraŭ ankoraŭ Katanjo kovris sin, kaj post kiam ŝi blovestingis la kandelon, ŝi kuŝiĝis.

– „Diomia... diobona... jamfermiĝas... okul'miaj... sedlaviaj... patromia... restasvidaj..."

Ankaŭ Bandika preĝis tion, kiel Pistike, krome ankaŭ la filo Gyuri de la magazinisto Wild. Ĉiujn ŝi instruis preĝi.

– „Dummidormos... Limingardos... gardosmiajn... bongepatrojn... gardosmiajn... bonfarantojn..."

Al Bandika, kiu dormis sur divano apud ŝia lito, ŝi devis poste rakonti ankaŭ pri la birdohava poŝtranĉilo.

Ĉi tiu poŝtranĉilo estis tia ilo, ke apenaŭ oni malfermis ĝian klingon, birdetoj flugis el ĝi, multaj-multaj buntaj birdetoj. Kun tio la infano dormis, kaj vekiĝinte matene, li ridante novaĵumis, ke li sonĝis pri birdohava poŝtranĉilo.

Anna diris la infanpreĝon. Ĉi tiuj rimitaj vortoj, kiujn eĉ nun ŝi ne tute komprenis, vekis en ŝi mildan sensensiĝon. Sed ŝi ne dormemiĝis. Kvankam hieraŭ ŝi longe maldormis ĉe ges-roj Bartos.

Kioma horo jam devas esti?

Ĉi tie ŝi kuŝis ĝuste inverse, ĉe la muro, kontraŭ la fenestro, alte. En etaĝo ŝi ankoraŭ neniam dormis.

Ŝi vidis altegan fajromuron de ludomego.

Fajraj kvadratoj ekbruliĝadis, estingiĝadis. La loĝantoj, kiam ili eniris la kompletigajn ejojn – kamerojn, necesejojn – de la kontraŭa domo, ŝaltis kaj malŝaltis la lampojn.

Ie oni pianis.

Virino belege kunkantis. Plurfoje ŝi rekomencis. La fenestroj sono-

ris, la muroj, la tuta domo ŝvebis, ruliĝis sur la ondoj de la muziko. Plurfoje ŝajnis al ŝi, ke sube, senpere sub ŝia lito io sonas. Pli malfrue ŝi divenis, ke supre, super ŝia kapo oni pianas.

Poste la kanto, pianado mutiĝis.

Mallumo ĉirkaŭis ŝin, nigraĵo. Jam ankaŭ sur la fajromuro ne ardis la lumaj kvadratoj de la fenestroj. Kiam ŝi iom torporiĝis, ŝi perdis la kapablon orientiĝi. Ŝi serĉis la malnovan divanon, sed trovis nur la muron ĉirkaŭ si, ŝi palpis nur la malplenan nokton kaj kredis, ke la kuirejo returniĝis, kaj baldaŭ falegos en abismon.

Alte, supre de la fajrmuro ankoraŭ brulis flameto. Tiu ne forflagris, kune kun ŝi ĝi vigilis.

Komence ŝi kredis ĝin stelo. Ĝi estis nur lampo, ordinara olelampo. Tamen pli luma ol stelo.

Ĉiu lampo estas pli luma ol stelo.

Post noktomezo ŝlosilo grincis en la seruro de la antaŭĉambro. Vizy venis hejmen, kiu ricevis de la rumanoj jam ankaŭ noktan elirpermeson. Flustre li interparolis kun sia edzino.

Iom post tio iu enpaŝis la kuirejon. Nudpiede, en longa blanka ĉemizo kiel fantomo alpaŝis la mastrino ŝian liton, ŝi rigardis, ĉu Anna dormas. Post horo kaj kvarono la sama figuro ree aperis. Anna tiam jam ne vidis ŝin, ĉar borinte la kapon en sian kusenon, ŝi jam dormis.

Por s-ino Vizy tio estis ne malgrava afero.

Denove fremda spiro trafiltris la loĝejan aeron, kiun ankaŭ ili ensuĉas, fremda koro batadis ĉi tie, iu fremda vivis kun ili sub unu tegmento, alvenis la plej proksima kaj plej malproksima, amiko kaj malamiko en unu persono: mistera gasto, mistera gasto de ĉiu domo.

Katanjon, kiom ajn ŝi estis malsimpatia, ŝi almenaŭ konis. Ĉi tiun tute ne.

Kion ĝis nun ŝi neniam faris, ŝi fermis per ŝlosilo la pordojn al la salono kaj banoĉambro.

– Ĉu vi timas? – demandis Vizy.

– Ne. Tamen. Estas la unua nokto.

Apenaŭ krepuskis, puŝata de scivolo ŝi ellitiĝis.

Ŝi vidis ion tian, pro kio ŝiaj okuloj rondiĝis kaj ŝia buŝo restis mal-

fermita.

La servistino jam aerumis, senpolvigis la ĉambrojn.

Ŝi ne komprenis, kiel tio eblas. Almenaŭ je la kvara frumatene ŝi devis ellitiĝi. Ŝi laboris tiel malbrue, ke ŝi aŭdis nenion.

Nun ŝi kaŭris en la laborĉambro malantaŭ la skribotablo en sia blua katuna robo, en tiuj viraj ŝuoj, kiujn ŝi jam konis el ŝia pakaĵeto.

S-ino Vizy nur kapjesis. Ŝi sciis, ke oni ne devas tuj laŭdi servistinojn, ĉar ili fariĝos mallaboremaj.

Ŝi ordonis al ŝi mueli grajnokafon, boligi lakton, kuri al la bakisto, primeti por la matenmanĝo, poste ŝi sendis ŝin en la banoĉambron, por voki la altmoŝtan sinjoron.

Tiu razis sin antaŭ la spegulo, ŝmirita per sapŝaŭmo, blanka kiel neĝohomo. Anna senbrue ŝteliris al li kaj volis kapti ŝian manon.

– Atentu – kriis la severa sinjoro –, mi tranĉos vin – kaj li tenis la brilantan klingon supren. – Ĉu vi estas la nova knabino? Kiel vi nomiĝas? Kaj via familia nomo? La nomo de via patro. Hungara – ŝi konstatis, ĉar li ĉiam ŝatis la grandajn, politikajn perspektivojn. – Terkulturistoj. Bone. Etbienuloj.

La matenmanĝo estis agrabla.

Ne konante la lokajn kutimojn, la nova knabino sternis puran, flavan tablotukon, uzatan nur dum festotagoj. La kuleroj tintadis kun malnova, idilia arĝenta sono.

Kiam Anna elportis la laktokruĉon, s-ino Vizy atente okulsekvis ŝin kaj diris:

– Ŝi ŝajnas brava knabino.

Vizy kuntiris la brovojn.

Li malaprobis ĉi tiun facilanime anticipitan fidon, kiu vekos poste des pli amaran seniluziiĝon. Ja la afero ĉiam tiel komenciĝis. Ŝia edzino, kiu opiniis sin bona homkonanto kaj tiris el la plej etaj momentoj plej definitivajn konkludojn, en la unuaj dudek kvar horoj nomis ĉiun sian servistinon „brava knabino”, ŝi diris, ke „ĉi tiu ne estas tia kiel la aliaj”, kaj malŝparis pri ili tiajn epitetojn, kiuj povas koncipiĝi nur en la imago de poetoj. Poste okazis fatale la trompiĝoj. Sekvatage ŝi kutime silentis pri la „brava knabino”. La trian tagon ŝi rimarkis paŭte, ke ŝi es-

tas „iom malrapida” aŭ „oportunema”. La kvaran tagon ŝi riprocîs ŝiajn manierojn. Poste subite venis kun drameca rapido la elnodiĝo, nome semajnofine per signifa gesto ŝi flankenvokis lin, rondigis sian buŝon al malgranda „o”, kaj preskaŭ senvoĉe flustris, ke „tiu ŝtelas”, imagu, „ŝi ŝtelas”, kaj fine eldiris la definitivan juĝon, ke „ankaŭ ĉi tiu estas tiel same putinaĉo kiel la ceteraj”.

Kial ni trompas nin? Ni konsultu la kapkusenon. Nova balailo bone balaas.

Jes, sed la nova balailo bone balais.

Ŝi simple prenis sian pajlosaketon kaj rapidis en siaj senlaĉaj virŝuoj al la bazaro. Eĉ atendi ŝin oni ne bezonis, ŝi ne babilaĉis, senplie ŝi revenis. La tablo prileviĝis neprilevite, primetiĝis neprimetite, kiel la fabela „tableto, tableto, regalu min”. Fariĝis ordo, ordo kaj silento.

Ŝi konis Viatorisz, la vendejojn, la bazarajn budojn. Eĉ en la interna urbo ŝi ne perdis la vojon. Kiam ŝi sendis ŝin pli malproksimen, ŝi retrovis la vojon el la bulvardo Vámház, eĉ de la placo Boráros. Ŝi ne estis tiu vilaĝa anserino, kio ŝi komence kredis ŝin. Tiuj tri jaroj, kiujn ŝi pasigis en Budapeŝto, forfaligis de ŝi la krudajn kutimojn. Ŝi paŝis mallaŭte, senmukigis la nazon silente, ankaŭ ne parolis kamparanece, nur anstataŭ botelo ŝi diris transdanubiece „butelo” kaj kelkfoje – pardonebla eraro – alparolis ŝin per sinjorina moŝto anstataŭ altmoŝta sinjorino.

Unu strangaĵon ŝi tamen havis: ŝi ne manĝis.

La maizpanon kaj la fromaĝon, kiun ŝi lasis nemanĝita, ankaŭ sekvatage ŝi ricevis por vespermanĝo. Ankaŭ tiam ŝi ne tuŝis ilin. Ŝi kirladis sian matenan kafon kaj flankenŝovis ilin. Eĉ buŝpleno ne glitis tra ŝia gorĝo. Ŝi manĝis sole unu pomon ĉe Ficsor la trian tagon. Ĝi ne havis tian odoron.

Kion ajn ŝi faris, ŝi ne povis kutimiĝi al ĉi tiu loko. Ŝia flarsenso, kiu estis akra kiel de hundo, protestis kontraŭ ĝi.

Se de malproksime ŝi ekvidis la domon n-ro 238 de la strato Attila ŝi ektremis. Kvankam la domo de Kornél Vizy estis tre bela domo. Plaĉaspekta kiel kasteleto. Ĝian fasadon ornamis grizaj gipsorozoj, balkonoj pendis sur ĝi, leĝere algluitaj kiel hirundonestoj. Supre du malfermitaj, de ges-roj Moviszter kaj Druma, sed ilia estis vitrita,

verandeca, eĉ vespermanĝi oni povis tie, kaj de la plafono pendis ombrela lampo. Nur ĉi tiuj tri sinjoraj familioj loĝis tie. Ekstere, sur la muro de la domo estis fiksitaj du tabuloj: *D-ro Szilárd Druma*, *ordinara kaj kambia advokato*. *D-ro Miklós Moviszter*, *kuracisto*, *med. univ*. *Konsultaj horoj at. 11-12, pt. 3-7*.

Ŝi estis sendita supren al ges-roj Moviszter por ovoj. Tiam ŝi eksciis, de kie venas tiu belega pianmuziko.

La bela kuracista edzino sidis en dekoltita negliĝo antaŭ la piano, promenigis siajn ringitajn liliofingrojn sur la klavoj kaj kantis, kantis, tre forte.

Pli malfrue ŝi konatiĝis ankaŭ kun la servistinoj.

Etel tronis, kiel patronino de la familio, en granda, hela kuirejo en larĝa rotangoseĝo kun ŝlosilfaskoj sur la talia orlo de sia antaŭtuko. Ĉi tie aranĝis ĉion ŝi, ŝi difinis, kion kuiri, kio surtabliĝos por tagmanĝo, ŝi tiranis, kelkfoje eĉ skoldis siajn gemastrojn, kaj tiuj timis lin kiel fajron. Posttagmeze de la tria ĝis la kvina ŝi dormis. Tiatempe ges-roj Moviszter iradis piedpinte, por ne veki ŝin, la doktoro mem malfermis la pordon al siaj pacientoj. Por tagmanĝo kaj vespermanĝo ŝi trinkis botelon da bruna biero. Malfacile ŝi moviĝis, lastatempe jam grasiĝis, daŭre ŝi manĝis vualkukojn. Ankaŭ Anna ŝi regaladis.

La servistino de ges-roj Druma ne volis tuj desupriĝi al ŝi. Stefi venis de grafa familio al la ges-roj advokato el la Kastel-monto. Post kiam ŝi tediĝis de la tiea grandstila vivo, ŝi deziris iom da kvieto, iom da memstara agosfero, kiun ŝi ankaŭ trovis. Pri ges-roj Druma ŝi parolis kun bonvola desupremo, ĉar ili estis junaj kaj ankoraŭ tiel malriĉaj, ke eĉ instaliĝi ili ne povis normale. Ŝi instruis al ili kelkajn elitanajn kutimojn. Iliajn gastojn ŝi anoncis ceremonie, la buteron ŝi surtabligis en formo de ripaj globetoj. Ankaŭ ĉe ili ŝi portis blankan antaŭtukon, nigran jupon. Ŝi nomis sin „personarano”. Ŝi legis kristanajn ĵurnalojn, amikis kun filinoj de oficistoj, aparte kun la tajpista fraŭlino de Druma, kun kiu ŝi kelkfoje promenis elmontreme brak-en-brake, por ke oni kredu ŝin fraŭlino tajpistino.

Ĉi du knabinoj akceptis ŝin en sian fidon. Ili demandadis, kion ŝi kuiras, sobiris al ŝi por telefoni, kiam ĉe ili mankis kurento. Posttagmeze

ili vokis ŝin ankaŭ por kartludi, mariaĝi por juglandoj, fazeoloj.

Pri s-ino Vizy ŝi aŭdis ne multon bonan. Oni diris ŝin avara, duonfreneza, kiu parolas kun la animoj de mortintoj. Ili konfesigis ŝin, ĉu ŝi estas kontenta pri sia loko. Ŝi respondis, ke ŝi estas kontenta.

Kion ŝi povus diri al ili? Ja eĉ al si mem ŝi ne povis doni konton, pro kio ŝi havas fobion kun ĉiu tago ĉiam pli forte.

Simple ŝi ne povis alkutimiĝi.

Al la elektro ŝi baldaŭ kutimiĝis. Oni montris al ŝi, kiel manipuli ĝin. Kaj ŝi manipulis ĝin, kiel ili, same ne sciante, kio ĝi estas. Nur ŝi returnis sin ĉiufoje, post kiam ŝi forturnis la ŝaltilon, ĉar vane ŝi vidis, ke la ĉambro heliĝas, ŝi volis konvinkiĝi ankaŭ pri tio, ĉu la lampo efektive brulas. Same ŝi rilatis al la telefono. Dum kelkaj tagoj ŝi parolis per tomba voĉo en la voĉfunelon, ŝi konfuzis ĝin kun la aŭdilo, sed pli malfrue ŝi amikiĝis ankaŭ kun la telefono. Hejme, sur la stepo ŝi vidis pli grandajn miraklojn.

Aliaj aferoj ĝenis ŝin, kiuj, ju pli longe ŝi restadis tie, des pli ili fariĝis fremdaj. Tute sensignifaj aferoj.

Kiam ekzemple iun matenon ŝi hazarde aŭdis, ke la sinjoro nomiĝas Kornél, ŝi sentis, ke en ĉi tiu loko ŝi ne eltenos longe.

Ankaŭ la mebloj mem efikis sur ŝin per teruro.

Kion ŝi imagis verda, la forno, estis blanka, sed la muro de la salono estis male verda kaj ne blanka, la tablo estis ne ronda sed sesangula kaj malalta, unu pordo malfermiĝis internen, la alia eksteren. Ĉi tiuj etaj, daŭre ripetiĝantaj surprizoj konfuzis ŝian tutan estaĵon. Pro Macquart-bukedo, el kiu disetendiĝis pavaj plumoj, ŝi rekte teruriĝis. Ŝi kredis, ke la pavokuloj rigardas ŝin, kaj kiam ŝi preterpasis ĝin, ŝi forturnis la rigardon.

Krome, apenaŭ ŝi malfermis la okulojn, la sinjorino enpaŝis kun taŭzita hararo, kvazaŭ pro furiozo hirtiĝus ŝiaj haroj, kaj ŝi kolerus ŝin. Ŝi aŭdis ĉion, ĉar la pargeto jam de malproksime kraketis. S-ino Vizy igis fermi zorgoplene la loĝejon, timante trablovon, ĉar ĝi kaŭzas dentodoloron, orelinflamon, kaj pro la lumo, kiu nervozigis ŝin. Daŭre ŝi ĝendarmadis post ŝiaj kalkanoj. Kun incitiĝema bonvolo ŝi donis al ŝi lecionojn: „Jen tiel, knabino... jen ĉi tiel, knabino... metu ĝin sur la ta-

blon... sed pro Dio, ne sur la randon, ĉar ĝi tuj falos...” Post tio Anna metis ĉion sur la tablomezon. Tiam ŝi iom reĝustigis la objektojn, aŭ tien aŭ ĉi tien, nur por ke ŝi pravu. Por ŝi nenio estis bona. Se Anna ne parolis, ŝi demandis, kial ŝi silentas. Se ŝi rakontis, ke ĉe ges-roj Bartos faras ion aŭ tion alie, ŝi krude-trude silentigis ŝin dirante, ke ĉe ŝi tio estas farata alimaniere, kaj ŝi ne agu ĉiufoje laŭ sia kapo, aŭskultu tiujn, kiuj estas pli saĝaj ol ŝi.

Pleje mankis eble tamen la infanoj, kiuj estis ŝiaj vivantaj ludiloj, karaj kunuletoj. Ĝis nun ŝi ja perlaboris sian panon per tio, ke ŝi ludadis kun ili. Ankaŭ ĉi tie ŝi volus dorloti iun, diri fabelojn, versaĵetojn. Sed kion ŝi povus fari kun ĉi tiuj seriozaj plenkreskuloj, kiuj iradis-venadis ĉirkaŭ ŝi en sia aparta, fermita vivo.

Eĉ semajno ne pasis post sia dungiĝo, estiĝis granda buŝbatalo.

Ŝi purigis la dormoĉambron kaj aŭskultis la pianadon de s-ino Moviszter supre, super sia kapo.

En la ŝranko estis eta beboĉambro: profilsegile formitaj, blanklakitaj mebloj, or-ornamita spegulo, eta lavujo kun miniatura kruĉeto sur ĝia vitroplato, liteto, sub kies silka peplomo dormis pupeto kun hararo.

Stariĝinte sur seĝo, ŝi viŝis la or-ornamitan speguleton. Neatendite ŝi lasis ĝin fali. Kaj ĝi dissaltis en mil pecojn.

S-ino Vizy, kiel fulmo, neatendite aperis.

– Kion vi rompis? Ho ve – ŝi stridis – vi mallertaĉa!

Anna desaltis de sur la seĝo, kolektis la romperojn, provis kunmeti ilin.

La sinjorino elbatis ilin el ŝiaj manoj.

– Lasu ĝin! Fino al ĝi! – ŝi kriis kaj laŭte ekploris.

– Mi pagos ĝin – diris Anna mallaŭte.

– Vi pagos ĝin. Ĉu oni povas pagi ion tian. Ĝi estis memoraĵo. De mia filineto. Alportu tuj balailon!

Dum Anna balais, ŝi ŝutis siajn riproĉojn malantaŭ ŝia dorso.

– Malfeliĉa! Katanjo neniam rompis ion ajn. Jes ja, mi subtrahos ĝin el via salajro. Por ke vi lernu el tio.

S-ino Vizy timtremis en ĉi tiu tago demandante, kion signifas la

spegulrompo. Kaj kion signifas la sep rizograjnoj? Ŝi ne scipovis akordigi la du kazojn. Ŝi ekmemoris s-inon Wild, kiu skribis, ke „en sia laboro ŝi ne ĉiam estas fidebla” kaj „ankoraŭ ne sufiĉe lerta”.

– Ŝi rompadas – ŝi pensis. – Ĉi tiu, ŝajnas tiel, rompadas.

Ĉirkaŭ vespero Anna sobkuris al Ficsor; anoncis, ke ŝi ne plu restos. La unuan de la monato ŝi maldungos sin.

La familio de la dompedelo ĉirkaŭprenis, demandis ŝin, kial. Reage ŝi nur maleme levadis la ŝultrojn. Ŝi ne kapablas kutimiĝi.

Ficsor, kiu fumadis sur la divano, elprenis la pipon el inter siaj dentaĉoj kaj algrumblis lin. Li minacis ŝin per ŝia vicpatrino, ke li sendos ŝin hejmen, tiu ankaŭ sen tio „tre amas ŝin”, senpacience atendas ŝin. Li senplie repelis ŝin.

Anna ne plu pensis pri io ajn.

Nur nokte ŝia koro kunpremiĝis, kiam ŝi ekvidis la solecan flameton sur la fajromuro. Ŝi sentis tiel, ke al ĉi tiu loko vere ŝi neniam povos kutimiĝi.

La fenomeno

Poste tamen ŝi kutimiĝis.

Alvenis la granda lavado. Kiel grizaj, blankaj montetoj altiĝis antaŭ ŝi la malpuraj littukoj, ĉemizoj, kalsonoj, al kiuj ankoraŭ gluiĝis la malpuraĵoj, mortaj ŝvitaĵoj de la revolucio. La vaporo agrable sensensigis ŝin.

Ŝi boligis akvon en kaldrono, apud la lavtrogo ŝi batlavadis kun manikoj refalditaj ĝiskubute. Kun sonĝeca umado, plezura senpenseco ŝi plaŭdadis en la varmetaj ŝaŭmoj de la sapakvo. En korboj ŝi alportis la tolaĵon, streĉadis, gladruladis la pecojn. La tablotukoj fariĝis puraj kiel freŝa neĝo, la kolumoj brilaj kiel vitro.

La granda purigado daŭris tri tagojn.

Unue oni malplenigis la tirkestojn. Objektoj, kvazaŭ ili kaŝludus, aperadis en neatenditaj lokoj. El metalujeto skuita elruliĝis naŭ ormoneroj el Körmöc kun petolaj ridoj. Kvazaŭ ludante oni devis postkuri ilin. Sed ili trovis ankaŭ aliajn aĵojn. Du klinkojn funde de kesto, svisajn frankojn en libro, kiuj estis flankenmetitaj por ebla okazo de fuĝo, koljuvelon, orelpendaĵojn, volvitajn en gazetpapero en kazeujo, kvaronkilogramon da rusa teo, kilogramon da lentoj en papersaketo, du belgajn sardinojn en la skribotablo de la sinjoro.

S-ino Vizy, kiun konstante turmentadis la fiksa ideo sinki en almozulan mizeron kaj malsatmorti, vidis, ke ŝi estas pli riĉa, ol ŝi kredis. Ŝin atendis ankaŭ ceteraj surprizoj. El la fundo de ŝranko Anna eltiris ŝian grizbluan jupon, kiun ŝi kredis antaŭ longe perdita, unu ŝian bluzon, la salmokoloran silkobluzon, kiun laŭ sia memoro ŝi vendis dum varinterŝanĝo al ŝvaba virino el Soroksár. Ili trovis krome tvirnobobenojn, butonojn, pli-malpli grandajn ledopecojn, ĉar ŝi manie konservadis ĉiajn detranĉaĵojn, defalaĵojn. Ja ne mirinde. Dum ĉi du amaraj jaroj ŝi iom post iom ellernis, ke la vivo estas nenio, kaj la materialo ĉio. En la ĵurnaloj ja ankaŭ ŝi legis, ke la aŭstra armeo taksas unusolan homan vivon kune kun la koro kaj cerbo nur je tridek ses orkronoj, multe malpli ol jungitan ĉevalon, kial do ĝuste ŝi perdus sian okulmezuron pri tio, kio valoras kaj kio ne? Ebrie ŝi gapis al la ĉiopova materialo. Ŝi faris an-

kaŭ ĵurpromeson, ke de nun ŝi multe pli ŝparos.

En la ĝardeno de la korto ŝi igis elfosi la kupran pistujon, kiun ŝi estis kaŝinta ĉe la bazo de sambuko kontraŭ diversaj rekvizicioj. Ĉi tiu kupra pistujo, iama fieraĵo de la kuirejo, el kiu preskaŭ fariĝis kanonkuglo, savita de la tumultoj de la tempesta jarcento, kun algluiĝintaj terbuloj kaj senkoloriĝinta, reviviĝis el sia provizora tombo.

La loĝejo devis esti restarigita, kia ĝi estis. Ili flankenŝovis la ŝrankojn, kiuj estis deŝovitaj pro la teruraj „asignitoj". Estiĝis pli granda malordo ol estis. La mebloj vagadis. Unu brakseĝo, kvazaŭ vojperdinte, restis en la koridoro, kaj strabis suben al la ŝtuparo, kvazaŭ ĝi ne povus sed ŝatus sobiri. La pendolhorloĝo kun sia paralizita balancilo kuŝis kiel pseŭdomortinto sur la planko, kun ŝaŭmbatilo en sia lignokesto. Malsupre en la korto la tabloj faris ekskursojn, rotangaj seĝoj kaj divanoj sunumis sin, ankaŭ la ripozlito, senigita je ĝia ruĝa kovrilo.

Anna staris de mateno ĝis vespero en la glorlumo de polvo kaj ruboj. Ŝi sputis nigre, ternis grize. Ŝi frapis la matracojn, kvazaŭ kolerante ilin. Ŝi anhelis supren en la loĝejon kaj malsupren sur la korton, eĉ centfoje. La fenestrovitroj ŝvitis gutojn, la akvaĉo plaŭdis en la kuvo, la ĉifono plonĝadis. Kroĉiĝante al la kruclignoj, ŝi viŝis la fenestrovitrojn. Baldaŭ ŝi jam purviŝis la plankon, enkaŭstikis per pala vakso, ŝi jam dancis sur brosoj, ligitaj sur ŝiaj piedoj, jam briligis la pargeton, glitante, kurbiĝante, genuante kvazaŭ en preĝejo dum tagnokta preĝado antaŭ hostimontrilo. Ŝriketis la frotpapero sur rustaj seruroj. Taskoj abundis: sobporti la kaŝitajn tapiŝojn el la subtegmento, malvolvi el ilia naftalena kuŝejo, senpolvigi ilin sur la stablo. Rapide ĉi tiun seĝon ĉi tien, rapide tiun tablon tien, la pianon ankoraŭ iom pli antaŭen. Restis nur pendigi la lustrojn, sed atente, ili ne rompiĝu, nur enŝraŭbi ankoraŭ kelkajn novajn ampolojn, nur pendigi la kremkolorajn kurtenojn sur orfoliajn stangojn, kudrante ilin sur kuprajn ringojn, kaj ni estas pretaj.

Vespere ili pretiĝis. La antaŭĉambro, kiu fariĝis deponejo por la akumuliĝintaj malpuraĵoj, post horo same brilis pro puro.

S-ino Vizy kroĉis la brakon al sia edzo. Solene ŝi enkondukis lin.

– Rigardu!

– Ho ha!

– Kiel vi opinias?

– Nu jes, nu jes.

– Ĉu?

– Agrable. Multe pli agrable.

Sendube, ĉio iĝis ja alia.

Ĉi tiu pala, malsana loĝejo, sur kiu la multjara polvo sedimentis kiel historia patino, subite resaniĝis.

Vizy tretadis en la laborĉambro sur persa tapiŝo. Scivole li observis ĝiajn desegnojn, figurantajn griokolorajn birdetojn sur etaj branĉetoj.

– Kiu ĝi estas?

– Vidu, vi eĉ ne rekonas ĝin. Tiu, kiu kuŝis antaŭ via lito. Ŝi purigis ĝin per acidbrasiko.

Ĉio ŝajnis nova, kvazaŭ ricevita donace. En la salono, en ĉi tiu plenŝtopita bazaro, nun brilis la tasoj kaj kruĉoj, la ĉefurbaj fabrikaĵoj kaj elprovincaj artefaktoj, kiujn la pietato konservis de generacio al generacio. Brilis la cigarpinĉilo sur la ŝakluda tablo. Iris ĉiuj horloĝoj. En la kapo de porcelanaj kunikletoj, en la brusto de bronzaj ĉevaloj mallaŭte tiktakis po unu kaŝita meĥanismo. Ankaŭ la prauloj mem aperis, reveninte el sia ekzilo. Sur la muro pendis la karmemora patro de Vizy en nigra ŝnurgalona redingoto, arĝentfranĝa koltuko, la episkopa parenco de lia edzino, Camillo Patikárius kun violkolora zono kaj flava rideto sur liaj pastre devotaj lipoj, krome onklino de la edzino, Terézia Patikárius kun bala ventumilo el cignoplumo.

Vizy reĝustigis bildon. Li kunfrotis la manojn. Li ne foriris elhejme en ĉi tiu vespero.

S-ino Vizy levis alten la montrofingron:

– Ĉi tiu knabino estas purama. Mi ŝatas en ŝi, ke ŝi estas tre purama kaj ankaŭ lerta.

Estis sendube, ke la mastrino nun estis pli multe mallibera ol apud ĉiu alia servistino. Porteme ŝi ne povis formovi sin de ŝi. Tamen certis, ke tiu knabino alkalkuleblas al neniu kategorio, ŝi estis tiel interesa materialo, pri kiu valoras okupiĝi, nur oni bezonas eduki ŝin, nur poluri

ŝin perfekta. Ŝi jam komencis ankaŭ manĝi. Malrapide ŝi konsumis la militajn surogatojn, armean kafon, dolĉigajn anstataŭaĵojn kaj margarinon, ĉar tiu ne voris, ne glutegis la panon, ne estis grandapetita. Ŝi ellitiĝis je la kvara kaj duono frumatene kaj ne enlitiĝis, dum ŝi ne finis ĉiun sian farendon. Ŝi ne replikaĉis, ne faris mienojn. Nur sian laboron ŝi postlasis kiel nevidebla bona spirito. Kion pli la sinjorino povis deziri?

Kaj ĉiutage ŝi faris novajn malkovrojn, pri kiuj ŝi, kiel kuriero, alportanta ĝojigan sciigon, informis sian edzon.

– Bonvolu veni por momento! Elvenu kun mi! Mi volas montri ion al vi.

En la kuirejo la kupra pistujo okupis sian indan lokon sur ŝtipo. Haketiloj, tortoformujoj, ŝaŭmbatujoj, bakpletoj, patoj, kuketŝtanciloj brilegis sur la muroj. Sur la bretojn, sen ricevi ordonon, ŝi sternis bluan paperon, kiun ŝi ornamis per tondilo.

S-ino Vizy portis po unu „trofeon” en la laborĉambron kaj mute metis ilin sur la skribotablon:

– Ruĝaj prunoj. Ŝi mem konfitis ilin. Rigardu ĉi tiun belegan sukersukon! Kiel rubeno. Ŝi havas emon al tio. Kaj ankaŭ kapablon.

Ili manĝis vualkukojn el gistinta pasto.

– Nu, kia? Kiel belege dismoliĝa estas ĉi tiu buterpasto. Oni povus malvolvi ĝin. Ŝi estas preta kuiristino. Ĉi tiu knabino pruviĝis konvena.

Vizy moliĝis, sed ne cedis. Estas strange, ke pli frue li eĉ la malbonajn servistinojn senkulpigis, por mildigi sian edzinon. Sed ĉi-foje li transprenis la rolon de la opozicio, kiu praktikas bonvolan kontrolon super la reganta registaro. Li lasis la laŭdojn preter la oreloj.

Li vortigis etajn, sensignifajn objĵetojn. Ke ŝi estas acida, neniam ŝi havas bonan humoron, kvazaŭ ŝi estus ankaŭ malafabla.

S-ino Vizy eksplikis, kiom li eraras. Kelkfoje, jes ja, ŝi ekridetas. Krome kion ŝi faru? Kial ŝi havu bonan humoron? Servistino, kiu daŭre laboras, ne estas senhumora. Ĉi tiu estas nur hontema. Aŭ ĉu ni volas, ke ankaŭ ŝi estu tiel impertinenta kiel la aliaj? Dio gardu nin!

Ĉio jam klariĝis, nur unu punkto estis iom ne unusenca, la plej grava, la plej tikla punkto: ŝtelado.

Ĉu ĉi tiu brava knabino ŝtelas?

Tion estis plej malfacile kontroli.

Ŝtelo okazas neatendite, fikaŝe kiel cerbofrapo nokte. Subite io malestas, iu tute bagatela aĵo. Ni kredas, ke ĝi mistrafis ien aŭ ni flankenmetis ĝin, ni kredas, ke ni ne bone memoras, aŭ eble ni perdis ĝin, sed la vero estas ne ĉi tio, sed tio, ke ĝi ne troveblas, malestas. Kiel paraliza teruro estas rekonsciiĝi pri tio. Ankaŭ tiuj objektoj estas suspektindaj, kiuj ankoraŭ estas posedataj. Ĉiu arĝenta kulero, ĉiu sukerkubo, ĉiu poŝtuko estas suspektindaj. Kiom da ili estas? Kie ili troviĝas? Ĉu vi forfermis ilin? S-ino Vizy forfermas ĉion. Ŝi ne kapitulacis tiel facile. Ŝi sisteme eksperimentadis.

Vespere ŝi lasis sur meblo sovetan dudek-kvinkronon. Matene la monero kuŝis samloke.

Ŝi lasis fali – kvazaŭ hazarde – ankaŭ bluan centkronon. Sekvatage ankaŭ tiu reflugis sur ŝian noktoŝranketon. Ŝi forgesis ringon sur divano. Anna trovis ĝin dum purigado, kaj ĝin jam persone transdonis.

Tiam ŝi lasis malfermita kiel logilon sian ŝrankon, en kiu kuŝis bele ordigitaj kaj kalkulitaj ŝiaj poŝtukoj. Eĉ unu ne kreskigis flugilojn. Poste sekvis nutraĵoj, kafo, sukero, kiujn servistinoj aparte ŝatas predi. Ŝi ne ŝlosis la kameron. Dum semajno ŝi eĉ ne aliris. Sed kiam ŝi eniris kun kandelo en la mano kaj preciza listo, por fari inventaron, ŝi vidis, ke ĉiu kafograjno, ĉiu sukerpeco restis sialoke.

Ĉi tiu knabino do ne ŝtelas. Ŝi diris, sed ankoraŭ ne kredis. Poste ŝi ne plu diris sed kredis, kaj ŝi, kaj ŝia edzo. Tiu knabino bezonis nek monon, nek juvelojn, nek spicojn.

– Ĉu vi scias, kion ĉi tiu bezonas? – ŝi demandis sian edzon kaj respondis per iama deklaro de Ficsor. – Labori, labori. Tian ankoraŭ ni ne vidis.

– Vi pravas – aprobis Vizy –, tian ni ankoraŭ ne vidis.

Ili ambaŭ plifaciliĝis. Vizy vivis sian ministerian vivon kaj hejme li almenaŭ ne havis ĝenojn. S-ino Vizy jam povis eliri elhejme. Matene ŝi ofte elpromenis al la kuracakva puto en Buda, al la kapo de la ponto Erzsébet, por trinki glason da tepida, sulfura akvo; tio – ŝi spertis tiel – plibonigis ŝian stomakon. Per sia dentokuracisto ŝi igis reordigi siajn

dentojn. Ŝi agadis en la bonfara societo en Krisztinaváros, disdonadis vestaĵojn al infanoj de malriĉaj oficistoj de la distrikto.

Ŝi eĉ havis tempon por io kaj alio. Ŝi faris viziton al ges-roj Tatár en la strato Úri, kie gajaj, plaĉaj junuloj ĉirkaŭflirtis la du belajn Tatár-filinojn. Ŝi povis akcepti ankaŭ kelkajn siajn amikinojn. Sed verajn amikinojn ŝi ne havis, ĉar ŝi kuniĝis nur kun la edzinoj de la interesamikoj de sia edzo. Ŝiaj parencoj, ŝia vasta granda parencaro, la Patikárius'oj loĝis en Eger. Nur unusola parencino de ŝia edzo vivis ĉi tie, iu divorcinta virino, la malfeliĉa Etelka, kiu irante de domo al domo kolportis falsitajn egiptajn cigaredojn, kaj almozpetadis, ankaŭ ilin ŝi ĝenadis, ŝi tute sinkis en mizeron. De jaroj ili ne kontaktis ŝin. Vizy eĉ surstrate preteratentis ŝin.

Nun evidentiĝis, kiom mankas al s-ino Vizy iu intimulino, kaj kiel longa estas unu tago. La tombon de Piroska en la tombejo de Farkasrét ŝi igis reordigi. Ĉiusemajne ŝi portis al ŝi krizanteman bukedon. Kaj ĉiumerkrede ŝi vizitis sian malnovan spiritistan societon, kiu tenis siajn seancojn en vilao sur la monteto Rózsadomb en la strato Áldás.

Ĝi estis pompa, malserena vilao kun ŝovopordoj, silkaj murtapiŝoj, klasikaj bildoj kaj statuoj. La dommastro, superriĉa rentulo akceptis siajn gastojn kun kunsenta manpremo. Ĉiu sciis, ke la filo de la dommastro jam antaŭ dek ses jaroj mutiĝis kaj restadas en fora, malgaja ĉambro de la vilao.

Infanteria generalo estis la „spirita rondestro". Ili alvokis la spiritojn de soldatoj, mortintaj per heroa morto. Patrinoj kaj patroj atendis iliajn sciigojn. Apud s-ino Vizy sidis malsana juĝisto de la supera kortumo kaj katolika pastro en civila vesto. La mediumo, knabino, reĵetinte sian kapon en ekzaltiĝo, parolis germane. Nevideblaj spiritaj fadenoj, traretantaj la universon, disetendiĝis de tie. La spirito de Piroska anoncis sin el Jupitero. Ŝi plenskribis per la mano de la mediumo tutan paperfolion per siaj mallertaj literoj: „patrino, patrino". Foje ŝi ankaŭ substanciĝis sur la brusto de la mediumo en svaga vaporlumo, en formo de lakteca nebulo.

Irante hejmen de ĉi tie ĉirkaŭ vespero, s-ino Vizy ne plu sentis la malnovan korbatadon, ŝiaj terurbildoj ne plu persekutis ŝin, nome ke

ŝi trovos hejme prirabitan loĝejon kun rompitaj pordoj, ŝirmalfermitaj, malplenigitaj ŝrankoj. Hejme ĉio estis en ordo. Nekalkulitaj ŝi lasis ekstere ankaŭ sian monon. Pasis tiuj tempoj, kiam ŝi iradis en siaj ĉambroj kun dorskrucitaj manoj, kvazaŭ en malliberigaj ĉenoj, cerbumante, kion la servistino kovas en sia kapo.

Anna paŝadis silente ĉirkaŭ ili. Kaj apenaŭ ŝi eliris, la temo revenadis al ŝi. Ili jam akordis pri ŝia taksado, en agrabla, komuna sento. Tio estis nepra miro, admiro, senkritika diigo, ke la akirita varo estas tiel utila, kaj ankaŭ iom da fiero, ke ŝi estas ilia, nur ilia. Retiriĝinte en sian dormoĉambron, flustrante ili rakontis la eventojn de la tago, kiuj senescepte pruvis ŝian devoscion, oferemon, nelaciĝemon. Apogante kaj kompletigante unu la alian, plifortigante kaj superante la vortojn de la alia, ili karakterizis kaj imitis ŝin, kelkfoje kun pardonema rideto ankaŭ mokis ŝin, kvazaŭ estus amuze, ke iu estas tiel bonema kaj simplanima, tiel ekzemplodone brava, tiel senprecedence nepretendema, kaj ili ridis prie, komence timide, poste kun sufokigaj haha-oj. Tiam komenciĝis por ili la idilio, kies guston ili daŭre sentis en sia buŝo. Ne miraĝo ludis kun ili. Superinte ilian imagon, la neeblo realiĝis: ili trovis la veran, pri kiu ili tiom sonĝis.

Kaj kelkfoje petolis kun ili ankaŭ ironia, jukanta sento, ke ili klinu sin sur ŝian bruston, danku ŝin por ĉi tiu bonfaro aŭ ili iru kune al fotografisto, sed sekrete kaj nokte, kaj igu fotografi sin triope kiel familion, sed de ĉi tiu petola, eksterordinare stranga ideo – kiu povis ekfulmi en ilia menso nur por milono da sekundo kiel ŝerco, malaperante, antaŭ ol ili povus efektive trapensi kaj sufiĉe priridi ĝin – do de ĉi tiu ideo retenis ilin ilia burĝa sobreco kaj la konscio, ke finsume temas ja nur pri dommastruma dungito.

Diskuto pri biskvito, indulgo kaj egaleco

La cirkonstancoj pliboniĝis.

Prave, ankoraŭ restis multaj problemoj.

De tago al tago falis la valoro de la krono. La homoj observis kun premita humoro, saltoprete siajn najbarojn. Ili skribadis anonimajn leterojn unuj pri aliaj. Tiuj, kiuj pli frue ne emis agnoski pri siaj amikoj, ke ili estas „bonaj komunistoj", nun, antaŭ la aŭtoritatoj ili rapide kaj kompleze transdonis al ili la de longe negitan, oficialan rekonon.

La urbo, kvazaŭ post invado de akridoj, kuŝis pripredita, plenpaŝtite sur rubamaso. En la montra fenestro de la barokstila sukeraĵejo solecis sur multekosta porcelanaĵo unusola elsekiĝinta kuketo. Ankoraŭ videblis rugfarbitaj tramoj, kiuj kuregis kun ribeligaj sloganoj kiel liberiĝintaj suicidaj frenezuloj.

Sed pluraj signoj esperigis. Tiel en la tramoj la pasaĝeroj jam kuraĝis admoni moŝtumantan konduktorinon, kiu krude traktis la sinjoran publikon, ĵeti al ŝi riproĉe en la vizaĝon, ke bolŝevikismo jam ĉesis. Kaj viroj, kiel iam, transdonis siajn sidlokojn al damoj. Disfloris la bela rozo de la mezepoko: la kavalireco.

Viatorisz staris ekstere, en la pordo de sia vendejo kaj denove li salutis. Li ĉiam precize indikis, en kiu direkto la vento blovas. Kiam eksplodis la milito, li jam salutis nur per kapklineto, kaj pli malfrue liaj aĉetantoj komencis saluti lin. Unue li akceptis la salutojn, poste ĉirkaŭ la tempo de bolŝevikismo eĉ ne rimarkis ilin pro sia multflanka okupiteco. Nun li proponis al ges-roj Vizy, ke li povas ankaŭ sendigi hejmen ion kaj tion per la komizo, ili nur mendu per telefono.

Ĉe ges-roj Vizy kunvenadis okazaj societoj. Iun posttagmezon faris viziton ges-roj Tatár. Ankaŭ Druma desupris kun sia edzino kaj s-ino Moviszter.

La burĝa vivo ekbruligis siajn malriĉecajn lustrojn. Ili prilumis ankoraŭ multajn mankojn, trivaĵojn, tamen estis agrable kunesti post tiom da suferoj en la malnova lumo de gastadoj.

La kolaziono estis sufiĉe senhumora.

S-ino Tatár prezidis ĉe la tablokapo kun sia elpufiĝinta, korsetita

brusto. Ŝi provis lanĉi humidajn raketojn de kelkaj kontraŭrevoluciaj spritaĵoj, sed ili jam ne eksplodis. Druma elpoŝigis oranĝon, kiun unu el liaj klientoj kontrabandis tra la itala landlimo. La delonge neviditan frukton ili transdonis de mano al mano. Ili konversaciis pri nutraĵoj, pri diversaj akirfontoj, kie aĉeteblas malpli koste faruno, terpomoj. Konsilisto Tatár, kiu estis fama kuiristo, memoris paprikan fiŝsupon, kiun en sia fraŭlaĝo li mem kuiris el siluro, sterledo, karpo sur la bordo de Tiso super aperta fajro. Li kapablis rakonti tiel detale kaj apetitige, ke la salivglandoj komencis funkcii. Poste ankaŭ li silentiĝis, nur manĝis, ronĝis, lia bela, ruĝa buŝo moviĝis, kiun grizaj liparoj kaj barbo ĉirkaŭpeltis simile al longhara peltaĵo.

La konversacio faris stumblon, interrompiĝis.

– Ho jes, bonvolu diri – reprenis s-ino Druma la fadenon en la ĝenerala silento –, Anna; kie estas Anna? Hodiaŭ mi ankoraŭ ne vidis ŝin.

– Ekstere, en la kuirejo. Ŝi preparas la kolazionon.

– Ĉu la nova servistino? – demandis s-ino Tatár. – Ĉu vi havas bonan knabinon? Ĉu ŝi estas lerta? Via loĝejo brilas. Ĉu ankaŭ fidebla? Diru, karulinjo, ĉu ŝi ne ŝtelas?

S-ino Vizy eĉ ne indis ŝin je respondo, nur okulmezuris ŝin.

– Ĉu vi ne konas Anna? – miris la virinoj en ĥoro.

– Ne, ne. Mi ankoraŭ ne havis la bonŝancon. Mi ne estas al ŝi prezentita – ŝi ŝercis kun la neŝancelebla certeco de matrono.

Pri tio ĉiuj ridis.

S-ino Vizy ĵetis rigardon al sia edzo kaj sonorigis.

Anna enportis sur vitra pleto migdalan biskviton en sia blua katunrobo. Ŝi ankoraŭ ne povis transvesti sin. Ŝiaj ŝuoj klakadis.

Embarasite ŝi avancis ĝis la tablo, tie ŝi haltis, demetis la pleton. Ŝi volis mankisi aparte ĉiujn, sed ili estis tiel multaj, ke fine ŝi mankisis al neniu.

Ĉirkaŭ si ŝi vidis la ridetantajn kapojn de la gastoj. Ankaŭ Tatár ĉesis manĝi, turnis al ŝi sian masivan kolon.

S-ino Vizy dum tempeto plezuriĝis pri la muta sceno, poste manvokis ŝin al si kaj kun humura sed fiera rondmovo montris al ŝi:

– Jes. Ŝi estas Anna. Mia Anna.

Apenaŭ la pordo fermiĝis post ŝi, tia rido eksplodis, kvazaŭ fama komikistino forlasus la scenejon. Ili mem ne sciis, pri kio ili ridas, sed ili ridis. La tuta sceno estis amuza: ĉi tiu ĝeniĝo, la klakantaj ŝuoj kaj la prezenta sceno. La humoro plivigliĝis.

Cigaroj, cigaredoj ekbruliĝis. Vizy prezentis ian historion pri Anna, kiun sekvis haha-ado.

En ĉi tiun haha-adon enpaŝis Moviszter, la maljuna doktoro, kiu, fininte la konsultiĝon, kaj adiaŭinte sian lastan malsanulon, venis por sia edzino.

Moviszter devis fari amaslaboron. Iam, en sia junaĝo li estis asistanto en berlina kliniko, kardiologia fakkuracisto. Reveninte en Hungarion, li konkuris por privata profesoreco, sed en la universitato li ne estis habilitita. Tiam li vivis tiel, kiel eblis. Ĉiutage li akceptis malsanulojn dum dek horoj, okupiĝis pri tiu hommaterialo, kiun li trovis en publikaj hospitaloj, ĉe la laborista asekuro, maŝinece li sanigis la homaron.

Apogita sur sia bastono, li trenis sian lacigitan korpon. Dum li ridetis, videbliĝis liaj kadukaj dentoj, inflaminta gingivo. Sur lia verto flirtetis kelkaj algecaj haroj.

La doktoro estis pli malsana ol kiu ajn lia paciento. Li havis diabeton en fina stadio. Ĉiu lia kolego, ĉiu kliniko rezignis pri li.

Vizy rapidis renkonte al li, kuraĝigis lin, ke li havis pli bonan haŭtkoloron ol pasintfoje. Por tio li dankis lin ironie.

Li palpebrumis, malcerte rigardadis en la fumo de cigaredoj, cigaroj.

Li sentis sin ĉi tie, kiel vojperdinto postkulise, kiu misiras hazarde sur la scenejon, en bruan scenon de nekonata teatraĵo. Li ne komprenis, kion signifas ĉi tiu brua ĝojeksplodo.

Oni devis klarigi al li, ke temas pri Anna, pri la fama Anna. Vizy, laŭ ĝenerala deziro, ree prezentis la historieton, pri kiu ili tiel bone amuziĝis.

Moviszter manĝis nenion. Li eniris kun la sinjoroj la laborĉambron. Li ankaŭ ne trinkis. Li nur intertintigis sian glason kun la aliaj tiel afable, kvazaŭ li kuntrinkus.

Pli malfrue la sinjoroj kun cigaredo kaj cigaro en la buŝo, vizaĝo roz-

kolorita de la vino unu post aliaj revenis en la manĝejon al la virinoj. Tatár, apogita al la pordofosto, aŭskultis, pri kio ili babilas.

– Ĉu ĉiam plu servistinaj aferoj? – li teruriĝis, elstarigante sian mildan pufventron, sur kiu bele streĉiĝis la blanka silka veŝto. – Nu ja, virinoj, ili povas paroli pri nenio alia.

Tamen ankaŭ la virojn interesis la temo kaj unuorele ili atentis. Vizy reportis la vinon en la manĝejon. Moviszter sidiĝis en la lulseĝo, kun fermitaj okuloj li lulis sin.

La diskuto temis pri Anna.

– Ĉu vi rimarkis – diris s-ino Druma –, ke ŝi estas ankaŭ plaĉaspekta? Ŝi havas tute karan vizaĝeton. Kaj ankaŭ ŝia staturo, svelta, vere agrabla.

– Jes – filozofis s-ino Tatár. – Ĉi tiuj kamparanaj knabinoj baldaŭ fajnigas siajn manierojn ĉi tie, en Budapeŝto. Ankaŭ la mia, mia Bözsi. Pasintjare mi kunprenis ŝin el vilaĝo. Ŝi estis maldiketa, ĉifoneta kiel birdotimigilo. Mi, kompreneble, bele grasigis, ankaŭ vestis ŝin. Aĉetis al ŝi blankan stebkatunan robon – kaj ŝi raspis la gorĝon, preparante sin rakonti ion sukan. – Dimanĉe miaj filinoj havis tekunvenon. Bözsi malfermis la pordon al la gastoj. Venis Ervin, Ervin Gallovszky, kiu antaŭ nelonge revenis el la rusa kaptiteco. Bonvolu imagi, tiu knabo – ŝi anticipe ridetis pri tio dirota –, en la antaŭĉambro mankisis al mi, poste stariĝis antaŭ Bözsi, formale prezentis sin kaj jam etendis sian manon.

– Ĉu al la servistino? – demandis s-ino Vizy.

– Al tiu ja. Se mi ne forgestus, li manpremus kun ŝi – kaj ŝi ekridegis, ŝia astma brusto skuiĝis de la tusado. – Li kredis – ŝi diris sufokiĝe –, ke ŝi estas amikino de Ilonka aŭ Margitka.

– Kaj kion faris via servistino?

– Ŝi iĝis flamruĝa. Dorsenmetis la manojn, enkuris la kuirejon, kaj imagu, ŝi ploris. Eĉ por la trezoro de la mondo ŝi ne volis priservi. Kaj la knabinoj mokpikadis la malfeliĉan Ervin.

Tatár gestis al sia edzino:

– La katon.

– Ho jes – daŭrigis s-ino Tatár –, la kato. Kiam ŝi dungiĝis, ni havis

dumonatan katidon, tiun de Ilonka, nomatan Cirmos. Ĝi estis tiel eta kiel mia pugno. Matene mi aŭdas, ke Bözsi donas al ĝi lakton kaj vokas ĝin jene: „Bonvolu veni, s-ido Cirmos, ĉi tie estas via matenmanĝo.” Ŝi alparolis la katon per sinjorido. Longe ŝi ankaŭ ne kuraĝis simple alparoli ĝin. Nu jes, tiaj ili estas. Bedaŭrinde, sufiĉe frue malfermiĝas iliaj okuloj kaj insolentiĝas. Pli frue ol necese. Ŝi jam daŭre farus vizitojn hejmen. Foje pro kermeso, foje pro vinrikolto, foje pro nuptofesteno. Kaj daŭre invadas min ŝia tuta familianaro.

– La mia – diris s-ino Druma –, mia Stefi kinejumas kaj politikas. Ŝi estas granda kristano.

– Kaj la mia – aldonis s-ino Moviszter –, Etel, ordonas. Se ni obeas, ŝi ne maldungas nin.

– La mia – rimarkigis s-ino Vizy dum granda atento, post kiam kun malica ĝojo ŝi aŭskultis ĉiujn plendojn – iras nek en kinejon, nek en teatron. Ŝi eĉ ne kantas. Amanton ŝi ne havas. Mi eĉ ne vidis ŝian familion. Orfino. Daŭre ŝi sidas hejme. Ĝis nun eĉ dimanĉe posttagmeze ŝi ne eliris.

– Nu jes, Anna, Anna estas speco diferenca.

Tia rekona murmuro aŭdiĝis, ke ŝi preskaŭ trovis troa la sukceson, kaj nun, ke ŝi trafis en la mezon de la interesiĝo, modeste ŝi forigis ĝin de si:

– Tamen ankaŭ vi ne povas plendi. Krome tio venis ne senkoste. Mi multe penis kun ŝi. Kaj ankaŭ ĉi tiu havas sian mankon.

– Kian? – akris Vizy ofendite, levinte la kapon el sia vinvapora stato. – Diru, mi petas vin, kian mankon ŝi havas?

S-ino Vizy serĉis mankojn, sed ne trovis. Kion oni ja povus trovi tie, kie nenio estas? Ŝi ne sciis respondi.

Aproba rumoro ekmurmuris.

Sed la rumoro subite silentiĝis, ĉar envenis, pri kiu ili parolis.

Anna rearanĝis la tablon. Nun oni eĉ pli atente observis ŝin, pesante ĉiun ŝian movon. Ŝi kuradis al la tablo, servicoŝranko kun feina rapideco. Moviĝis tien-reen kiel senbrua aŭtomato. Kiel maŝino, oni pensis, kiel maŝino.

Kiam ŝi metis la biskvitojn sur la servicoŝrankon, s-ino Vizy, ekhav-

inte karan ideon, diris al ŝi:

– Anna, alportu ilin!

La gastoj stariĝis, formis rondon ĉirkaŭ s-ino Vizy, tiel ke la societo por momento senmoviĝis kun la servistino meze de la rondo kiel ĉefa figuro de la statuaro. Moviszter haltigis la lulseĝon, iom klinis sin antaŭen.

S-ino Vizy elprenis du biskvitojn kaj transdonis ilin al Anna:

– Ĉi tiuj estas la viaj.

La vizaĝoj sereniĝis. Almozdonemaj, pietataj sentoj leviĝis en la brustoj pro tio, ke ĉi tiu brava knabino estas premiita.

Sed ŝi apenaŭ transprenis la biskvitojn sur la telero, ŝi jam reŝovis ilin:

– Dankon, prefere ne.

– Kial? Ĉu vi ne ŝatas ĝin?

– Ne. Dankon. mi ne ŝatas ĝin.

Estiĝis ĝena silento. La decida voĉo de s-ino Vizy rompis la silenton:

– Tiam remetu ilin bele! Eĉ pro la mondo mi ne altrudas ilin. Vi povas eliri.

La gastoj ĉiam plu staris en la rondo kun tiu sereno sur la vizaĝoj, kiu transmiriĝis en embarason. La abomena senkonsileco de brogiteco ŝvebis inter ili.

– Ŝi fordankis ilin? – miris s-ino Tatár.

– Ba, tute ne – klarigis s-ino Vizy –, ŝi estas tia. Ŝi ne manĝas fajnaĵojn. Eĉ abrikotan marmeladon ŝi ne tuŝas. Kiel vi pensas, kion ŝi vespermanĝas? Vi ne divenos? Nenion. Matene kafon. Por tagmezo nur iom da legomaĵo. Ceteron ŝi ne bezonas. Kaj biskviton, ŝajne, ŝi tute ne ŝatas.

– Aŭ male, ŝi tre ŝatas ĝin – diris Moviszter, kiu estis ankoraŭ antaŭklinita en la lulseĝo.

– Kiel vi komprenas tion, s-ro doktoro?

– Mi asertas, ke ŝi ja tre ŝatas biskviton.

– Sed ŝi ja diris, ke ŝi ne ŝatas ĝin.

– Ĝuste pro tio.

– Pardonu min, sed mi ne komprenas vin.

– Servistinoj, bonvolu kredi, eĉ ne kuraĝas ŝati, kion ili ŝatas. Do ili kredigas al si, ke ne estas bona, kio estas bona. Tiel ili defendas sin. Eble kontraŭ tio, ke ili tro multe suferu. Kial deziri ion tian, kio ne povas estis la ilia? Ili pravas. Cetere ili ne povus vivi.

– Sed kion mi faru al ŝi?

– Bonvolu foje provi! Donu al ŝi ĉiutage biskvitojn!

– Ĉu biskvitojn?

– Certe. Multajn, multajn biskvitojn, tiom, ke ŝi ne povu manĝi ĉiujn. Vi bonvolos vidi, ke ŝi ŝatas ĝin. Ke ŝi ŝatas nur biskviton.

– Sed kial? Ŝi ja ne malsanas. Ĉu dieta manĝo por servistino?

– Ĉu ĝi konvenas por ilia stomako? – murmuris s-ino Tatár. – Ĝuste tio mankas! Biskvito.

– Tio estas via multe tordita teorio, kara Miklós – transdiris Druma al la doktoro, kiu jam ree lulis sin, ferminte la okulojn.

S-ino Moviszter ekfumis cigaredon, transiris en la salonon, komencis piani fokstroton. La virinoj forlasis la virojn.

Vizy plenigis la glasojn. La sinjoroj residiĝis. Per vino ili forlavis la amarecajn gustojn.

Viŝinte per sia poŝtuko siajn vingutajn lipharojn, Tatár revenis al la biskvita afero, kiu ne lasis trankviliĝi lian menson. Li turnis sin al Moviszter:

– Malgraŭ tio, kara s-ro doktoro, ĉi tiuj estas tamen aliaj homoj ol ni. Ankaŭ ilia stomako estas alia, ankaŭ ilia animo estas alia. Ili estas servistinoj. Kaj ili volas ankaŭ resti tio. Rekte ili postulas, ke ni rigardu ilin servistinoj. Pasintfoje ekzemple mi telefonis al la loĝejo de iu mia amiko. Fremda voĉo anoncis sin. „Ĉu dungito?” mi demandis. „Ne”, respondis la voĉo tute impertinente, „la servistino”. Vi devus tion aŭdi. Mi tiom ekmiris, ke mi ne sciis, kiel klarigi la aferon. Mi nur tenis la aŭdilon en la mano, en kiu ankoraŭ knaris tiu voĉo, kolere, kun spitema orgojlo. Tiuj preskaŭ ŝatas eldiri tion, bonvolu kredi min! Nur por inciti nin, por ofendi nin!

Li sorbetis el la topazflava vino kaj daŭrigis:

– Oni jam eksperimentis per multaj solvoj, kredu min, karulo. Mi havis amikon, la karmemoran Karcsi Zeléndy, Dio ripozigu lin en paco.

Li estis brava homo, nur iom freneza. Tiuj multaj teorioj ebriigis lian kapon. Li manĝis vegetaĵojn, iradis en ledsandaloj. Ankaŭ Tolstoj li vizitis tiutempe en Jasnaja Poljana. Kiam li revenis, li decidis solvi radikale la aferon. Li dungis servistinon, kvindek-jaran vidvinon kaj sciigis al ŝi, ke ili estas tute egalaj, ĉe li ekzistas nek sinjoro, nek servistino, estas nura hazardo, kiu priservas la alian. Kaj tuj ĉe la unua tagmanĝo li sidigis ŝin al la tablo. Li mem rakontis al mi, kiel la tagmanĝo okazis. Nu, ĝi sukcesis plorinde. Tiu malfeliĉa servistino sentis sin terure maloportunege pro tiu terure granda honorigo. Ŝi nur ĝeniĝadis en sia malpura, kuirodora jupo, daŭre kaŝis siajn manojn sub la tablo, palpadis siajn vangojn, kaj dum la tuta tagmanĝo ŝi eĉ silabon ne eldiris. Ŝi ja estis laca, la kompatinda. De frumateno ŝi bakis, kuiris. Sufiĉas diri, ke post la fino de la tagmanĝo, sen perdigi vorton por klarigo, ŝi vestis sin kaj deklaris, ke eĉ minuton ŝi ne restos en tia loko. Tuj ŝi ankaŭ foriris.

Diskutante kun si, li ĉiam plu diskutis kun la doktoro, pafante al li siajn akrajn argumentojn:

– Sekve nun mi demandas, kial ŝi foriris? – kaj li premis sian montran fingron sur sian karnoriĉan nazon tiel, ke ĝi tute platiĝis. – Ĉar kiom ajn li konfesigis ŝin, ŝi ne malkovris la kaŭzon. Ŝi foriris, ĉar ŝi havis pli da menso ol ŝia mastro. Tial ŝi foriris, ĉar ŝi sentis, ke tio estas kontraŭnatura, ne estas sincera. Estus sincere, se mia sinofera, grandanima amiko *stante pede*[11] proponus al ŝi siajn domon, bienon ĝis la lasta bruto, lasta najlo. Ĉi tiuj simplaj homoj, kiuj staras sur la plej malalta ŝtupo de la socio, vivas en ekstremoj. Ili havas multe pli grandan imagopovon ol ni konjektas. Ili ne akceptas duonrezulton. Ili volas esti aŭ sinjoroj, sed tute sinjoroj, aŭ resti servistinoj, sed tute servistinoj. Aŭ-aŭ. La cetero estas komedio. Kiel ĉe la romianoj. Ili same ludis similajn komediojn. Sed – kaj ĉe tio li haltis – ĉiujare nur unu solan fojon. Mi ne scias, en kiu ilia festo la patricioj vestis sin kiel sklavoj, kaj la sklavojn ili sidigis al siaj tabloj, kaj ili mem priservis ilin per mielvino kaj rostita kaponaĵo. Ili diris, por memorigi la oran epokon, kiam la homoj estis ĉiuj egalaj. Sed kiam tio estis? Mitologio. Jam ankaŭ ili mem ne memoris tion. Kaj ni eĉ malpli. Ankaŭ niaj manoj ne estas samformaj –

[11] Stante pede (latine): starante, do tuj.

kaj li montre levis sian kusenitan, molan manon, kiu vere similis al nenies tie. – Ne ekzistas homa egaleco. Nur homa diverseco, s-ro doktoro. Sed tondro kaj fulmo! – li incitis sin vole en la maniero de pasiaj diskutantoj –, ĉiam ekzistis sinjoroj kaj ĉiam estis servistoj. Ĉiam estis tiel, kaj ĉiam estos tiel. Punkto kaj fino. Tion ni ne povas ŝanĝi. Do ili restu nur servistinoj.

Li ĉirkaŭrigardis. Li havis grandan sukceson. La societo, kies pravon li defendis, dankeme ĉirkaŭis lin. Tatár jam ankaŭ metis la punkton, sed turninte sin al la doktoro, li ankoraŭ tiris la finan konkludon:

– Alia solvo ne ekzistas.

– Tamen ekzistas – diris Moviszter, kiu distrite umadis en sia lulseĝo per la Maria-medalo, pendanta de lia horloĝa ĉeno.

– Mi scivolas prie. Kia speco de solvo? – demandis Tatár levinte sian grasan, saĝan kapon.

– Indulgo.

– Ĉu indulgo? – ripetis Tatár kaj ĝojis, ke la diskuto ricevis novan nutron.

– Ekzistas lando, kie ĉiuj estas samtempe servistoj kaj sinjoroj. Kaj egalaj. Ĉiam, en ĉiu tago de la jaro.

– Kiu lando estas tiu?

– Tiu de Kristo.

– Ĝi estas supre, en la nuboj.

– Ĝi estas en la animo.

– Sed bonvolu realigi ĝin ĉi tie! Kun la bolŝevikoj, kamaradoj.

– Oni propre ne bezonas realigi ĝin – rebatis Moviszter incitite, ĉar pro sia malsano li estis nervoza. – Oni ne bezonas. Ankaŭ la komunistoj havis la eraron, ke ili volis realigi idealon. Eĉ unu idealon oni ne devas realigi. Tiam ĝi havos sian finon. Ĝi nur restu supre, inter la nuboj. Tiel ĝi efikas, tiel ĝi vivas.

– Pardonu, s-ro doktoro, ĉu vi sidigus vian servistinon al via tablo?

– Ne.

– Kial ne?

– Eble tial – li enpensiĝis –, ĉar ŝi ne deziras tion. Tio estus efektive nur komedio. Almenaŭ portempe. Ĉi tie, sur la tero.

– Tiam ni parolas la saman lingvon.

– Ne tute, s-ro konsilisto. Ĉar anime mia servistino ĉiam sidas ĉe mia tablo.

– Tiel jes – diris Tatár, faltante sian volban frunton. – Kial ne? Tamen mi volas diri ion al vi. Vin, kara s-ro doktoro, via servistino apenaŭ sidigus al sia tablo, se ŝia monsaketo tiom dikiĝus. Tiuj iĝas veraj tiranoj, apenaŭ ili skrapas al si iom da havaĵo. Mi jam vidis tiajn. Ili tuj dungas servistinon, kaj ho, kiel kruele, kiel senkore ili rilatas al ŝi. Dio savu nin de ĝendarmoj, faritaj el rabistoj. Ne estas pli terure ol esti servistino de servistino. En ili vere ne troviĝas indulgo.

– Kun tio mi havas nenion komunan.

– Pardonu, pardonu! – rekomencis Tatár, kiu nun jam volis direkti la diskuton al alia nivelo. – Vi, ĉu ne, amas la homaron?

– Ĉu mi? Mi ne.

– Pardonon?

– Mi ne amas ĝin, ĉar mi ankoraŭ neniam vidis ĝin, mi ne konas ĝin. La homaro estas morta nocio. Kaj rekonu, s-ro konsilisto, ke ĉiu ĉarlatano amas la homaron. Kiu estas egoisto, kiu eĉ al sia frato ne donas pecon da pano, kiu estas insida, ties idealo estas la homaro. Ili pendumas kaj murdas homojn, sed amas la homaron. Ili malpurigas siajn familiajn sanktejojn, elĵetas siajn edzinojn, ne zorgas pri siaj patroj, patrinoj, infanoj, sed amas la homaron. Ne estas io pli oportuna ol tio. Finsume tio devigas al nenio. Neniam iu venis renkonte, kiu prezentus sin tiel, ke mi estas la homaro. La homaro ne petas manĝi, ankaŭ veston ne petas, sed restas en sekura distanco, en la fono, kun glorlumo ĉirkaŭ la frunto. Ekzistas nur Petro kaj Paŭlo. Estas nur homoj. Homaro ne ekzistas.

– Kaj la patrujo?

– Same – diris Moviszter kaj atendis serĉante bonan esprimon. – Vi bonvolas scii, ke ankaŭ tiu estas tre bela kaj tre vasta nocio. Tro vasta. Ho, kiom da krimoj oni faras en ĝia nomo!

- Sed se tiel, kiun vi do amas?

– La pastrojn – petolis Druma –, Miklós amas la pastrojn. Aŭ ĉu la ruĝulojn? Nun mi jam mem ne vidas klare. Ej – li minacis la doktoron

–, sub via haŭto vi estas ruĝulo. Ne provu nei, kara mia Miklós – kaj brakumis lin tiel, ke la maldikaj skapoloj de Moviszter ekkrakis. – Nu, Dio longe vivigu vin! Trinku, maljuna bolŝeviko!

Druma pripentris per flamantaj koloroj, kion la ruĝuloj fifaris al sesdek-jara sinjorino, kiu kune kun li estis fermita en la arestejo. Ĉiun malbenitan nokton, precize je meznokto ili elkondukis ŝin sur la korton kun tio, ke ili ekzekutos ŝin; ili genuigis, preĝigis ŝin, alcelis siajn armilojn, kaj dum minutoj ili celis al ŝia frunto. Vizy montris pruve siajn manĝejon kaj salonon, kiujn ili *de facto*[12] rekviziciis for de li.

– Kompreneble, ili volas tion – grumblis Tatár –, mondhistorian rolŝanĝon. Vin desuprigi en la kelloĝejon kaj la dompedelanojn alsuprigi ĉi tien. Ronde-ĉirkaŭe. Kiel la du siteloj de puto. Mi ne dubas, ke ankaŭ la dompedelo fariĝus eminenta ĝentlemano. Sed por tio bezonatus almenaŭ tri jarcentoj. Unue li bezonus satigi sin ĝisgorĝe, dikiĝi, poste tediĝi de la bona vivo, liaj filoj devus rajdi, skermi kiel niaj filoj, ili devus iom rektigi la spinojn, plilongigi la manojn kaj piedojn. Dume ankaŭ ni kutimiĝus al la kelloĝejo kaj fazeoloj kaj ni degenerus. Sed tio daŭrus tro longe. Kaj kian sencon ĉio ĉi havus? Nenian, tute nenian.

Ĉe iliaj piedoj kuŝis la rato de la revolucio. Ĝi estis jam mortinta. Tamen ankoraŭfoje ili mortbatis ĝin.

Ili transiris al demandoj de la aktuala politiko.

Vizy ĝis tiam silentis, ĉar li ne volis enfokusigi sin, krome li trovis ĉiun principan diskuton senfrukta. Foje li tamen transprenis la vorton. Li parolis pri departementoj, komisionoj, reorganizado.

Nun devus vidi lin ĉiuj. „Nun venos ni”, li diris kaj metis sian manon sur la ŝultron de Gábor Tatár, por fari la komunecon eĉ pli korpa, kvazaŭ serĉante kunbatalanton por la granda lukto. Kaj el liaj okuloj, kiel ĉiufoje en tiaj okazoj, li elpafis strangan flankorigardon, kaŝruzan rigardeton, kiu atestis pretecon, predemon, kaj entuziasmiĝis de la plej malpura penso de egoismo, sed li, pere de sia memdisciplino, en la sama momento scipovis ankaŭ vuali, transformi en klopodemon por la publika bono.

Kio estis por li la celo de la politiko, kiun de sia junaĝo li servis sub

[12] De facto: fakte (latine).

diversaj registaroj kun la sama fervoro, tion mallonge kaj koncize li jene vortumis: „ĉesigo de *coruption*”. Li detenis sin traduki ĉi tiun latinan vorton timante, ke tiam ĝi klariĝos kaj perdos sian Cato'an[13] severon. Li lasis ĝin tiel en ĝia vualita, pasia ĝeneraleco kaj ne klarigis eĉ al si mem, ke politiko egalas ĉiutempe nur tumultadon de malsataj homoj, kaj ĝi laŭnecese havas sur si la markon de la malperfekteco de la vivo, kaj ĉiu reĝimo strebas al potenco, nur por sidigi siajn fidelulojn en poziciojn, por malfortigi, distreti siajn malamikojn. Koruptado estis por li ĉiam tio, kion aliuloj reprezentas, kiuj veturigas sin en ŝtataj aŭtomobiloj al siaj amikinoj, kaj li kondamnis tion des pli, ĉar li memoris, kiel dolĉe estis iun nokton impetadi sub la arboj de parko kun operetaktorino en tiu ŝtata aŭtomobilo, kiun iu lia amiko pruntedonis al li por ĉi tiu okazo, kaj kiel agrabla ebrio plenigis lin, kiam fine de la vojo la kepita ŝoforo ĝentile honorsalutis lin multe pli fervore, ol se li ricevus abundan trinkmonon.

Moviszter tediĝis, iom li ankoraŭ balancis sin en la lulseĝo, poste transleporis en la salonon, kie la virinoj sidiĝis ĉirkaŭ la ŝakluda tablo, kunmetinte la kapojn. Ili ankoraŭ ne povis fini la temaron, kiu elvokis la diskuton de la viroj.

S-ino Vizy lamentis plende:

– Prave, ŝi sufiĉe laboras. Sed bonvolu diri, kion ŝi faru? – ŝi demandis incitite. – Ĉi tie ŝi havas siajn manĝon, loĝeblon. Ankaŭ veston ŝi ricevos. Ŝi povas flankenmeti sian salajron. Kion ŝi volus pli en ĉi tiu malfacila tempo? Kiujn malfacilaĵojn ŝi havas? Ŝi ne bezonas zorgi pri ĉi tiu granda loĝejo, ĉiutage rompi la kapon, kion kuiri, de kie akiri la monon, ŝi nur vivas, vivadas sen zorgoj, libere. Ofte mi diras, ke nuntempe nur la servistinoj havas bonan sorton.

La virinoj suspiris kiel kariererarintoj, bedaŭrantaj, ke en ĉi tiu kruela mondo ili en neniuj cirkonstancoj povas esti servistinoj.

La doktoro fingrovokis sian edzinon. Li plendis pri laceco. Li kutimis enlitiĝi ĉiam antaŭ la deka, ĉar je la sepa matene li jam ĉiufoje kroĉpendis sur tramoj, por ĝustatempe alveni en la hospitalo. S-ino

[13] Marcus Porcius Cato Minor (-95 ĝis -46): romia politikisto, verkisto, oratoro, fama pro sia severa honesteco.

Moviszter forĵetis sian cigaredon. Ankaŭ ges-roj Tatár forpretigis sin. Ili volis hejmeniĝi antaŭ pordoŝloso.

En la antaŭĉambro s-ino Druma gluis sian orelon al la pordo de la kuirejo:

– Kion ŝi faras?

– Certe ŝi laboras – diris s-ino Vizy. – Lasu ŝin!

Sed s-ino Druma jam malfermis la pordon.

En la malluma kuirejo, apud la rubaĵkesto staris figuro kun vira ŝuo sur la mano. Ŝi ciris ĝin.

– Bonan nokton, Anna! Adiaŭ, nu Dio benu vin! – murmuris la diversaj voĉoj.

Anna ion murmuris.

– Kion ŝi diras?

– Ŝi petas pardonon – interpretis s-ino Vizy ŝiajn vortojn –, ke ŝi ne povas veni malfermi la pordon. Ŝiaj manoj ŝmiriĝis de la *boksz*[14].

– Kio estas *boksz*? – interesiĝis Druma.

– La budapeŝtaj servistinoj nomas ciron *boksz*.

– *Boksz* – ripetis Druma. – Nu jen, ankaŭ tion mi ne sciis. *Boksz* – kaj eĉ en la ŝtuparejo, irante supren al sia loĝejo, li amuziĝis pri tio, ke ŝia mano ŝmiriĝis de *boksz*.

[14] Boksz [boks]: en la hungara bokso kaj ciro.

Legendo

Ges-roj Vizy longe remaĉadis la memoron de ĉi tiu tekunveno.

– Ĉu vi aŭdis? Mi donu biskviton al mia servistino. Biskviton!

– Sensencaĵo, vere sensencaĵo.

– Kaj ke ŝi ŝatas nur ĝin. Kia malsaĝaĵo!

– Sed poste li elcerbigis ankaŭ aliajn misideojn. Li prezentis siajn torditajn principojn, vi ja konas ilin. Sed Tatár bone rearanĝis lian kapon.

– Kaj mi neniel edukos el ŝi primadonon. Nenio pli ja mankas.

– Ŝajnas tiel, ke li perdis la saĝon. Li estas malsana homo. Mi ne antaŭdiras al li eĉ du monatojn da vivo. Li havas tiom da sukero en la sango, ke li ne plu mezurigas ĝin. Ĉu vi vidis lin? Ankaŭ ĉi tie amase flugis sur lin muŝoj, li devis daŭre forpeli ilin. Malfeliĉa. Baldaŭ ni enterigos lin. Kio okazos al lia edzino?

– Sed ankaŭ vi kulpas. Diru, kial vi bezonis distrumpeti al la societo, ke tiu havas neniun mankon. Oni povus forlogi ŝin.

La doktoro kolerigis s-inon Vizy. Ŝi spite butonumis Anna pli malvaste. Dompurigistinon ŝi neniam havis. Nun ŝi entiris Anna ankaŭ en ĉi tiun laboron. Unufoje semajne ŝi igis Anna frotpurigi la ŝtuparejon, purigi la subtegmenton, preteratentis, ke ges-roj Ficsor igas ŝin kurigi por diversaj aferoj, kiam ŝi ne havis ceteran farendon. Anna elportis la rubujojn. Kiam eksonis la delonge ne aŭdita, frumatena tintilo de la ruboĉarego, videblis, ke ŝi penkuras eksteren kun la rubaĵkestoj de la tri loĝantoj al la strato Attila, kaj ĵetas ties nigran enhavon, polviĝantan en la sunlumo, en la ruboĉaregon. Ŝi ricevis ankaŭ korbon da ŝtrumpoj por fliki, por ne enui en sia libera tempo.

S-ino Vizy esprimis sian kontenton per neŭtralaj vortoj. Ŝi diris al ges-roj Ficsor nur tiom, ke Anna taŭgas. Tio preskaŭ iĝis al ŝi malfacile, ĉar la feliĉo emis manifestiĝi en ŝi. Sed ŝi akceptis tion por la intereso de la edukado. Ŝi montris sin pli malmola ol fakte.

La dek-kvinan de septembro pasis la monato de Anna. Tiam ŝi pagis ŝian salajron. Ne tiom, kiel al Katanjo, kiu estis superpagita, sed ŝi antaŭvidis, ke kun la paso de la tempo ŝi altigos ĝin. La prezon de la

spegulo ŝi subtrahis ne tute. Nur duone.

Anna ne bezonis monon, ŝi petis ŝin deponi ĝin en banko aŭ aĉeti ion al ŝi. S-ino Vizy aĉetis al ŝi kaptukon en la semajna foiro en la strato Roham.

La kvinan dimanĉon ŝi mem sendis Anna eliri por tempo, por ĉirkaŭrigardi en la urbo.

Anna vestis sin en la kvadratita robo, en kiu ŝi alvenis. Sur la granitaj pavimeroj de la stratoj la lumo de la festotago vibris senkonsole. Ĉi tiu senlabora, senfina libera tempo ŝajnis al ŝi sensenca. Ŝi staradis antaŭ dompordoj, poste pasumante sen celo kaj plano en la strato Logodi, ŝi elvenis sur placon, kie staris preĝejo kaj granda hospitalo, kaj aŭdiĝis tia bruo, kiel fine de aŭtuno, kiam korvoj grakas en la aero. Servistinoj promenadis ĉi tie, ŝvabaj servistinoj ridaĉadis, flustradis, babiladis en sia nekonata lingvo, interbrakumante kiel en siaj vilaĝoj, kune, ĉiam kune. Ili formis ĉenon ĉirkaŭ la gaslanternoj sur la trotuarinsuloj, malhelpis la preterpasantojn, haltigadis la trafikon. La tramoj devis pli laŭte tintigi, por povi avanci plu. Ŝi sola ambladis inter ili.

Revenante al Vérmező, rumana soldato pinĉetis ŝian mamon. Ŝi retiris sin en dompordon, atendis, ĝis la soldato malaperos. Ĉirkaŭ la sidejo de la kompanio Délivasút ŝi aĉetis saketon da terpomaj bombonoj ĉe strata dolĉaĵvendisto kaj portis ĝin al Bandika en la strato Árok.

Servistinoj, kiuj vizitas siajn iamajn mastrojn, salutas kutime jene: „mi alvenis, se vi ne bonvolas koleri”. La mastroj ne koleras, ke ili revenas. En la kutima fluo de ilia vivo tio signifas variecon, kaj kiam post iom da hezito ili rekonas la malnovan servistinon, kiu estas eĉ iom ne pli dika, plie malpli dika kaj ĉiuokaze pli maljuna; ankaŭ ili rememoras la tempon, kiu pasis de tiam. Ili vidas antaŭ si gaston, kiun ili traktas kiel gaston. Ili provas regali ŝin per io kaj tio. Sed la vizitantoj estas eĉ pli ĝenataj, ili staras sub la efiko de eĉ pli pezaj rememoroj en la ĉambro, kies ĉiun objekton ili pli bone konas ol iliaj mastroj. Iliaj brakoj, kiuj ĉi tie tiel multe laboris, nun senfare, senutile pendas; ili ne plu havas rajton konduti hejmece, kiel iam, kiam ili estis vole-nevole honoroficaj familianoj, krome paralize efikas sur ilin ankaŭ la konscio, ke en ilia foresto la vivo de la familio fluis tiel kiel antaŭe; kaj kiom ajn

ili estas afable akceptataj, ili sentas, ke ili ne estas neanstataŭigeblaj. Ĉiu sentas tion fojfoje. Ili sentas tion tute kaj skue kaj kun senkonscia melankolio, kiam ili faras ĉi tiujn bonvolajn vizitojn kun dolore gapa mieno. Nur hantantaj mortintoj povus senti tion tiel funde.

Anna transdonis la terpomajn bombonojn al Bandika, de kiu ŝi estis iam ricevinta la ludtrumpeton. Bandika enpensiĝe rigardis ŝin. Konfuzajn memorojn li fosadis el sia kapeto. La terpomaj bombonoj faris efikon. Li sidiĝis en la sinon de tiu, kiun li iam pli amis ol ĉiujn, kaj en sia aĝo de tri kaj duona jaroj li nomis ŝin ne Anna sed *anya*, patrino. Sed kiam ŝi komencis paroli pri la birda poŝtranĉilo, el kiu tiom da birdoj elflugis, li jam ne atentis. Li forgesis la birdan poŝtranĉilon. Anna adiaŭis, kaj kiam ŝi revenis en la domon n-ro 238 de la strato Attila, ankoraŭ ne pasis la sesa horo.

Tamen estis pli bone hejme.

S-ino Vizy sidis antaŭtagmeze en la kuirejo. Ŝi ne plu bezonis kontroli sian servistinon, sed ĉu troviĝas io pli interesa ol kuirejo, ĉi tiu ĥemia laboratorio de la vivo? Ĉi tie aŭdeblis, kio okazis en la bazaro, en la urbo, kio kuiriĝas ĉe ges-roj Moviszter kaj Druma, kaj ŝi povas observi la ĉiam distran umadon de Anna.

La pladoj, kiuj ĉe tagmezo, post sorĉa metamorfozo venas sur la tablon, ankoraŭ diskuŝas en kruda stato. Akvo susuras en la ferpoto, la akvo por la buljono; kuiriĝas la karotoj, la poreoj, la tigobrasiko, la celerio, la nigraj piproj en la salita, perlanta suko, kiun trafiltras la malplenaj ovoŝeloj. Ankaŭ en la pli malgrandaj bovloj la suko bolas kaj superrandiĝas. La knabino prenas safranon, zingibron de la bretoj, distranĉas cepojn en maldikajn pecojn, larmas pro la spico, pikanta ŝian nazon, muelas juglandojn, bulkon, pecetigas petroselon, rompas ovojn, disigas ovoflavon de ĝia blanko, purskrapas karotojn, distranĉas kuniklon, ĵetas farunitan viandon en la kaserolon, en kiu jam susuras varmega graso.

Nur unu aferon ŝi ne entreprenis, buĉi kokinojn. Tiafoje ŝi suprenkuras al Etel, vokas ŝin malsupren, por ke ŝi plenumu ĉi tiun ĉiutagan, ekscitan murdon kuirejan. La maljuna servistino serene prenas la elektitan viktimon, portas ĝin al la defluejo sub la krano kaj per lerta movo

eltordas aŭ tratranĉas ĝian kolon per la granda kuireja tranĉilo, tiel ke la sango ŝprucas ĝis ŝiaj kubutoj, kaj ofte makulas ankaŭ ŝian vizaĝon. Anna forturnas sin. Ankaŭ s-ino Vizy ne povas ĝisrigardi la buĉon. Ŝi agnoskas, ke tio necesas, sed ĉiufoje ŝi demandas Etel, kiel ŝi kapablas fari ion tian. Tiu ridante respondas, ke kio devas okazi, tio devas ja okazi.

S-ino Vizy komprenigis al Anna, ke ŝi ne ŝatas, se tiel multe ŝi kunestas kun ĉi tiuj servistinoj. Etel ne konvenas al ŝi, tiu estas maljuna virinaĉo, impertinenta, replikema, kaj Stefi cetere rigardas ŝin desupre, ŝi eĉ ne trairus kun ŝi la straton. Kion ŝi do volas de ili? Postdorse ili priridas ŝin. Kelkfoje ŝi forneis Anna, ne enlasis ilin al ŝi, ŝi mensogis, ke ŝi ne troviĝas hejme. Anna rekonis, ke ŝia mastrino pravas. Ŝi ne tro serĉis la societon de la servistinoj. Kial postkuri iun, kiu ne haltas?

Prefere ŝi flikadis en la kuirejo. Kokido pepadis ĉirkaŭ ŝi. Ŝi kunprenis ĝin el la kokinejo por plenkreskigi ĝin. Ŝi rekonis ĉiun kokinon laŭ plumoj, voĉo. Kiel vilaĝa knabino ŝi prenis la kokidon birdo. Ŝi trinkigis ĝin el bovleto, manĝigis ĝin per defalaĵoj, dorlotis ĝin. Nokte la kokido flugis en ŝian liton, dormis ĉe ŝiaj piedoj.

La mastrino rakontis dum tiaj kuirejaj kunestadoj pri Piroska, kaj ŝi pri sia vicpatrino, pri tiu seka, juna kamparanino, kiu en vintra nokto forpelis ŝin elhejme. Ficsor skribis al ŝia patro István Édes, ke ŝia filino dungiĝis en nova loko, sed tiu ne respondis. Tio ne interesis ŝin. Kaj ŝi iom post iom fandiĝis en ĉi tiu medio. Ŝi jam ne rakontis pri ges-roj Bartos, sia iama mastro, kaj ankaŭ pri Katanjo, la iama servistino ŝi aŭdis nenion de sia mastrino. Ĉio forpasis. Ŝi komencis fieri, ke ŝiaj gemastroj estas multe pli bonhavaj ol ges-roj Moviszter kaj Druma. Ŝi ĝojis, se ŝi ricevis novan pastorulon. La kribrilon ŝi nomis „nia kribrilo”, la korkotirilon „nia korkotirilo”, kiuj estis ĉiufoje pli belaj ol tiuj de la supreloĝantoj. Ŝi admiris ankaŭ la robojn de s-ino Vizy. Aparte tiun nigran silkaĵon, en kiu merkrede posttagmeze ŝi iradis en la straton Áldás. S-ino Vizy ŝercis tiafoje: „Vidu, mi surmetis ĝin por via kontento”.

Por la mastrino propre ne estis malagrabla ĉi tiu servistino. Se ŝi mansilentigis ŝin, ŝi retiris sin en la fonon. La societo de servistinoj es-

tas por sinjorinoj tiel oportuna, kiel por viroj la amo de stratulinoj. Apenaŭ ili ne bezonatas, ili povas forsendi ilin.

Post la grandaj politikaj perturboj, estingiĝo de la ardaj ekscitoj, Vizy pasigis ĉirkaŭ vespero la tempon hejme, atendis la vespermanĝon. Ĉirkaŭ li oni iradis senbrue, ĉar oni sciis, ke li laboras. Silento okupis lian bele purigitan laborĉambron, sur la skribotablo laŭorde viciĝis la plumujo, sigelvakso, tondileto, remburita strigo. Li skribis leteron al Eger al sia bofrato Ferenc Patikárius, kiu administris ilian vinberĝardenon de kvin akreoj, situantan tie. La leterskribado progresis malfacile. Kiel glate li diktadis la dokumentojn de sia ministerio al sia tajpistino, tiel malfacile li vortumis, kiam temis pri privataĵoj. Li haltadis ĉe kelkaj frazoj, relegis la leteron, ŝutis pulvoron sur ĝin, refoje trarigardis ĝin, salivis koverton, ekbruligis kandelon, surpremis sigelon per sia blazonringo. Poste li oscedis. Liaj koro, pulmoj, hepato bone funkciis. Lia stomako digestis, kion li manĝis, tamen – ŝajnis tiel – li suferis. Kaptis lin la enuo de oficistaj animoj, kiuj solaj ĉiam tediĝas. Li eliris en la kuirejon, urĝis la vespermanĝon. Lia edzino distriĝis kun Anna, kun ĉi tiu alplantita, freŝa vivo. Ankaŭ Vizy ŝatus resti tie, sed la mastrino igis lin eliri el la kuirejo. Ŝi diris, ke li ne ĝenu Anna. Kaj cetere servistino ne estas vidindaĵo.

Sed kiom ajn ŝi sekretumis, tute ŝi ne povis kaŝi Anna sub kloŝo.

Ĉe ges-roj Viatorisz la knabino ĉiutage aperis. Jam kun joviala okulumo la spicisto gratulis pro la fenomena servistino. Kaj el ĉi tiu butiko, klaĉocentro de la virinoj de Krisztinaváros, poste ĉiuj sciiĝis pri ŝi. Oni menciadis ŝin ĉe la panisto, buĉisto, en la lavejo, eĉ la ĉerkisto sciis, kiu estas Anna. Tiu dika, potence granda policano, kiu postenadis en la strato Attila kaj kutimis soldatece honorsaluti ges-rojn Vizy, same konis ŝin.

La famo diskuris kun surpriza rapideco. Unue ĝi konkeris nur la pli proksiman Krisztinaváros, la straton Attila, la placon Krisztina, kelkajn punktojn de la bulvardoj Krisztina kaj Attila, poste la stratojn Pauler, Mikó, Logodi kaj ankaŭ Tábor. Sed ne pasis semajno, ĝi suprenflugis al la Kastel-monto en la straton Úri, kie ges-roj Tatár loĝis, al la promenejo Bástya, placoj Ferdinánd, Bécsi-pordego, kaj nestis sin en la cerbo

de virinoj kaj viroj, ĝi kreskis, kreskadis.

Oni parolis pri ekzemplodona servistino. Multaj ankoraŭ ne vidis ŝin. Ili konis nur ŝian baptonomon. Ŝi ankoraŭ ne alprenis decidan formon. Tiu, al kiu venis ŝia famo, sentis proksimume tion, kion superstiĉa amaso, aŭdante pri miraklofara fonto, kuraca sanktulbildo, kies supernaturan efikecon la cerboj ne kapablas kompreni, malgraŭ tio ĝi ekzistas.

Post kiam la famo trakuris sian rondon, ĝi revenis al ili.

Ĉe Vizy en la ministerio interesiĝis unu el liaj amikoj per telefono, ĉu Anna havas eventuale pli junan aŭ pli maljunan fratinon, ĉar li bezonus fideblan servistinon.

S-ino Vizy igis pretigi en la apoteko Mária siajn stomakajn pilolojn. La apoteka komizo, dum li lasis fali la granatgrajnojn sur la pesiltason, laŭ sia kutimo konversaciis kun ŝi, kaj subite ankaŭ li menciis Anna kun ĉioscia rideto.

Kiam Anna aperis kun pajlosaketo sur la brako, la legomistinoj interlfustris:

– Vizy. Ĉu vi ne konas lin? Konsilisto en la ministerio.

Kaj se oni vidis Vizy, oni diris:

– Jen tie li iras, pri kiu mi pasintfoje parolis. La mastro de Anna.

Vespere la civitanoj de Krisztinaváros kutimis promeni kun siaj edzinoj brak-en-brake.

Unu edzino subite haltis kvazaŭ enradikiĝinta. Ŝi ne plu atentis pri tio, kion ŝia edzo klarigas, sed kiel iu vidanta vizion, gapis al certa punkto.

– Rigardu! – ŝi flustris. – Estas tiu…

– Kiu tiu?

– Tiu Anna. Kiu servas ĉe ges-roj Vizy. Anna de ges-roj Vizy.

La viro strecîs la okulojn tien-reen en la gasluma duonhelo, sed vidis nenion. Ĉar la tuto estis nur fenomeno de momento.

Tiu ombro, kiu en sia blua katunrobo, irante strikte laŭ la muro, portis freŝbakitan panon de la panisto, jam englitis tra la dompordo en la kafkoloran domon, kaj kuris supren sur la ŝtupoj. Ŝi malaperis de antaŭ iliaj okuloj.

Tiafoje oni dum tempeto ankoraŭ atendis, poste senvorte, kiu scias, pri kio enpensiĝinte, promenis plu.

Sinjorido Johaĉjo

Iun septembran matenon ministeria pedelo portis telegramon al s-ino Vizy, kiun lia edzo jam malfermis. En ĝi staris nur tio: *hodiaŭ vespere mi alvenos johaĉjo.*

Pri ĉi tiu Johaĉjo, dudek-unujara filo de Ferenc Patikárius, kiu ankoraŭ en Eger senfaradis, temis ofte en tiuj leteroj, kiujn Kornél Vizy ricevis de sia bofrato.

Johaĉjo lernis ĝis sia aĝo de dek kvar jaroj en la milita reallernejo de Sankt-Pölten. Kiam lia frato Sándor falis en la bataloj en Karpatoj, lia patro elprenis Johaĉjon de tie, enskribigis lin en la gimnazion de Eger. Li volis eduki sian sol-restintan filon por civila kariero.

Ĉi tiuj kvar jaroj, kun siaj instrupaŭzoj pro karbomanko, malstreĉa disciplino forflugis kun sonĝeca rapido super la knabo. Li vidis, kiel mortfaladas el sia medio liaj instruistoj, pli aĝaj samlernejanoj, fariĝante de unu tago al alia „heroaj mortintoj". Ankaŭ li baldaŭ „maljunigis" al la milito. En sia oka-klasa aĝo li estis rekrutigita, ekzercata; li vizitis la lecionojn en soldata uniformo, atendis ĉiutage esti komandita en marŝkolonon, sed tio jam ne okazis. Dume eksplodis la revolucio[15]. Tiam li elŝvitis la milittempan abiturientan ekzamenon.

Poste, kun la fera disciplino en la malsupra-aŭstria milita instituto malantaŭ si, kun la libermoreco de por ĉiuj nekonata epoko antaŭ si li nur pasumis, nenifaradis. Li fariĝis societa junulo. Li tradancis dombalojn, amindumis al knabinoj de Eger, rolis kiel okaza humuristo. Li revis fariĝi kinoaktoro. Por io alia li ne havis inklinon. Du jarojn li ne povis fari ion utilan. Plulerni li ne emis.

Al lia patro fine iĝis troa lia senfaremo, li turnis sin al sia bofrato, ke li formu homon el ĉi tiu sentaŭgulo, kies vivon la milito interrompis. Vizy konsilis al li, neniuokaze doni lin por prefektuja aŭ ŝtata ofico por iĝi sinjora almozulo, la kristana mezklaso bezonas adaptiĝi al la spirito de la novaj tempoj, plej ĝuste estus do trovi por li ian praktikan, monakiran karieron. Ankaŭ Ferenc Patikárius estis de la sama opinio.

[15] Revolucio (1918-10-30 ĝis 1919-03-21): burĝa revolucio, kiam la Hungario transformiĝis en respublikon.

Vizy telefonis al sia konato bankdirektoro, tiu promesis dungi la junulon kiel salajratan staĝanton. Restis nur solvi la demandon de loĝado. En Budapeŝto tiutempe ne eblis trovi loĝejon. S-ino Vizy zorgis pro siaj ĉambroj, kaj post ne mallonga hezitado ŝi cedis kun tio, ke ŝia nevo loĝu ĉe ili, ĝis ili igos rekvizicii por li konvenan loĝejon. Tion ŝi devis fari por sia frato.

Vespere ŝi igis primeti la tablon por tri personoj. Sed Johaĉjo ne alvenis. Pri tio ŝi ne multe miris. Ne ekzistis pli malfidebla ulo ol li en la tuta planedo Tero.

La trian tagon post la ricevo de la telegramo, kiam ŝi jam forgesis, ke ŝi ricevos tranoktantan gaston, je la dek-unua horo antaŭtagmeze la pordo malfermiĝis kun terura bruo.

Johaĉjo enkuris kiel tempesto.

– Onjo Angéla!

– Johaĉjo, Johaĉjo!

– Mi kisas vian manon.

– Saluton, saluton! Ĉu nun vi devas veni? Ej nu, kia maniero? Kiam vi alvenis?

– En ĉi tiu minuto per la rapidtrajno, ĝi malfruis tri horojn.

– Ba, lasu min, vi fola!

Ili parolis, ŝriketis en paspluvego de parencaj kisoj. La revida sceno estis multe pli vigla ol se ĝi okazus sur scenejo.

Malvolvinte sin el liaj brakoj, s-ino Vizy reĝustigis siajn harojn, kiujn la ventkapa bubo ne malmulte taŭzis. Iom ŝi deŝovis lin.

– Atendu, lasu min pririgardi vin!

Kaj ŝi rigardis sian nevon.

Johaĉjo estis blanka, de la plandoj ĝis la verto kiel vicadmiralo. Li surhavis blankan delikatŝtofan pantalonon, blankan jakon, blankajn sportŝuojn. Li vestis sin tiel brile, kvazaŭ la obskuraj tempoj postlasus sur li neniun spuron.

– Ho, kiel multe vi kreskis – diris s-ino Vizy per nekredema voĉo.

Li ĉiam plu volis retrovi tiun tromaturan vicsoldaton, kiu dum la festoj, kiam li estis forpermesita por kelkaj tagoj el la kadeta lernejo, modestis afekte tablofine kun morna bajoneto sur la flanko.

Post la paso de jaroj tiaj renkontiĝoj estas iom mirfrapaj.

Ni ŝatas fiksi niajn forestantajn konatojn en punkto, en difinita situo, kiel mortinton, haltigante por ili la tempon, kun senkulpa memtrompo ni kredigas al ni, ke la arbitro de nia imago, kiu rigidigis ilin fotografaĵoj, estas reala, kaj depost tiam ankaŭ ni mem ne avancis sur la vojo al la neniiĝo. Tiafoje tamen ni konsciiĝas, ke ni trompis nin kaj en nia embaraso ni ridetas, kvazaŭ ni vidus ion agrablan, kaj ne ion plej malagrablan.

Tial parolis s-ino Vizy sen senco kaj konsekvenco. Ŝi retrorigardis en la foron. Kaj ridetis, ĉar ŝi rememoris.

– Nu venu, mi montros vian ĉambron. Tie vi tranoktos ĝis tiam. Sur ĉi tiu ripozlito.

– Pompe – diris Johaĉjo, kaj jam sternis sin sur ĝi.

Poste li deruliĝis de la divano kaj manstariĝis. Ekvilibrante sin sur la manoj, li trairis la salonon. Lian blankan vizaĝon kolorigis la inundinta sango, lia jako refaldiĝis, lasis vidi lian delikatan zefirĉemizon, la tukon en lia supra poŝo, kunfalditan kolomboforme.

S-ino Vizy kriis:

– Frenezulo! Ne renversu mian domon! Diru, ĉu vi ĉiam plu estas tiel freneza?

– Jes, onjo Angéla – li diris, post kiam li saltis surplanden kaj ŝerce riverencis al ŝi.

Li komencis fajfeti.

S-ino Vizy observis ĉi tiun ventkapulon, memoroj de liaj iamaj bubaĵoj atakis ŝin kun la eĥoj de antaŭ longe aŭditaj familiaj hahaha-oj kiel mito, kiun povis koni nur la parencoj.

Sed aliulo, iu fremdulo, kiu vidas unuafoje ĉi tiun maldikan junulon, apenaŭ trovas lin tiel gajhumora.

En Johaĉjo estis, malgraŭ lia moviĝemo, io malvarma, kiu sentigis la distancon inter li kaj tiuj, kiujn li kontaktis. Ankaŭ lia senriproĉa, ĉiam zorgeme eleganta vesto emfazis ĉi tiun fermitecon. Li estis forta, muskola, sed lia brusto mallarĝa. Liaj malgrandaj manoj sekaj. Lia haŭto neniam, eĉ en plej granda varmego, ne ŝvitis. Kurte tondita, raspa bronzhararo gluiĝis sur lia regula sed surprize malgranda kranio, sur

kiu ŝvebis senborderaj oreloj tiel loze, kvazaŭ tonditaj el papero kaj nur provkudritaj. Liaj maldikaj lipoj montris lin tenaca, kruela. Kaj lia vizaĝo estis kvazaŭ el ligno, senviva kaj neregula, nuraj kapricaj ebenoj, ĵetitaj unuj sur aliajn, nuraj strangaj kvinanguloj, kvazaŭ kubista lignostatuto.

Subite li ĉesis fajfi, ĉar oni alportis liajn valizojn, du pompajn pecojn el angla porkoledo.

Serioziĝinte, nun jam kun plena sindediĉo kaj devoto malfermadis la ĉarnirfermilojn.

Kiom da ĉiuspecaĵoj ili entenis!

Dek kvar kompletoj da vestoj, frako, smokingo, vintra surtuto kun oposuma pelto, mirindaj ĉemizoj, silkaj kalsonetoj, bonkvalitaj ŝtrumpetoj, lakŝuoj, bohemianaj duonŝuoj, kies ledklapoj frapiĝas sur la ŝukapon, krome saketo por kosmetikaĵoj, plurspecaj parfumŝpruciloj, glicerinsapoj en blankaj ebonitaj ujetoj, ĉar li povis lavi sin nur per glicerinsapoj.

Funde kuŝis ankaŭ du libroj: unu ĉifonlegita broŝuro, verko de Frigyes Karinthy *Tiel vi verkas* kaj unu gramatiko en nuksoŝelo *Angle dum horo*.

Onjo Angéla volis helpi al li ĉe la elpakado, sed li permesis al neniu en la mondo tuŝi liajn vestojn. Li bezonis nenion. Li kunportis ankaŭ brosojn. Li brosadis siajn jakojn po unu, per la fingro depuŝis kelkajn polverojn, strečglatigis la pantalonojn, pinĉis ilin en pendigiloj, ordigis ĉion en la ŝranko, kiun lia onklino disponigis al li.

Siajn kosmetikaĵojn li portis en la banoĉambron kaj almetis sin purigi sin. Longe li lavis sin. Sapis, duŝis sin, kaj kvankam matene li jam razis sin, per sia pompa amerika memrazilo li traglitis siajn vangojn, el ŝprucilo aspergis kolonjakvan nubetojn sub la akselojn, ŝanĝis subveston, surmetis sian malhelan kompleton kun rustokolora koltuko, kaj refreŝigita, renaskita, li elpaŝis en la manĝejon, kie onklo Kornél jam atendis lin.

– Salu' – salutis lin Johaĉjo –, salu', onklo Kornél. *How do you do?*[16]

– Saluton, azeneto. Kaj vi, kiel vi fartas?

[16] Kiel vi fartas? (angle)

Onklo Kornél puŝis lin en la dorson kaj laŭ familia kutimo li kisis liajn dekstran kaj maldekstran vangojn.

– *Thank you, very well*[17].

– Kiel vi opinias – diris s-ino Vizy –, li tute ellernis la anglan. Li volas veturi al Ameriko, al Hollywood kiel kinoaktoro.

– Sed unue li ĉi-lande perlaboros sian panon.

– Via onklo Kornél akiris por vi postenon en banko.

– *Yes, yes* – kapbalancis Johaĉjo.

– Atentu por momento, vi ventokapa! Morgaŭ matene ni kune vizitos la direktoron, vi devas prezenti vin.

Li klarigis pri bankaj aferoj, sed Johaĉjo ne povis atenti.

Sur la maldekstra vizaĝo de onklo Kornél, tuj apud lia nazo troviĝis ĉokoladbruna veruko, kiun li plej akre rememoris el la tuta onklo Kornél. Dum li parolis, ĝi moviĝis supren, malsupren. Johaĉjon hantis la ideo, kiel en lia infanaĝo, pinĉi ĝin per du fingroj, levi kaj tiri ĝin, ĝis ĝi deŝiriĝos, kaj onklo Kornél ekmuĝos.

Onklino Angéla donis instrukcion al la servistino pri primeto de la tablo. En sia blanka robo kun sia flava hararo ŝi kvazaŭ lumis en la ĉambro kiel longa kandelo, radiante supraĵan lumon.

Johaĉjo observis ĉi du homojn, kiuj estis por li nenio pli ol rolantoj, kiuj hazarde elektis al si ĝuste ĉi tiun maskon, kaj portas ĝin nur pro tio, ke ili aparte ŝatas ĝin. En li mankis kunsento, kiu ankaŭ fremdan vivon sentas samtiel fatale necesa kiel la sian. En li loĝis la senindulga nihilismo de la junularo.

Tiaj impresoj perpleksis lin, kaj li klopodis forpeli ilin. Li eligis kelkajn tusojn, babilis pri tio, ke ili estas atendataj en Eger, ili do alveturu, kaj li umadis per la manĝiloj sur la tablo.

Ili sidiĝis por tagmanĝi.

Johaĉjo okupis lokon kontraŭ onklo Kornél. Mallevinte siajn okulojn al la tablotuko, li ruzokulis al sia onklo, kiu kuleris la bovosupon.

Sed ne longe.

Subite li ekkriis:

– Kio estas tio? – kaj terurite li levis sian kuleron.

[17] Dankon, tre bone. (angle)

S-ino Vizy rigardis per rondigitaj okuloj kiel iu, vidanta omenan miraklon.

Okazis nome, ke dum li mergadis la kuleron en la supon, ĝi ĉiam pli konsumiĝis, ĝia ĉerpilo tute fandiĝis. Restis nur la stumpa tenilo en lia mano.

– Tion faris vi, bubo – li montris al la rikananta Johaĉjo.

– Estas ŝerce, ĉu?

– Malsaĝaĵo. Kie vi akiris ĝin?

– En Vieno. En la pasinta monato, kiam mi ekskursis tien. En memoraĵbutiko. Rigardu – kaj Johaĉjo elprenis el sia poŝo alian mirkuleron.

Onklo Kornél ne koleris. S-ino Vizy skoldetis Johaĉjon:

– Diru, kara, kiam vi havos prudenton, kiam vi serioziĝos?

Johaĉjo montris sian humuran provizon, kiun aŭstria fabriko produktas por la pliigo de la ĝenerala bonhumoro kaj la pligajigo de la deprimiĝema homaro.

Li havis cigaredujon, el kiu se oni elprenas unu cigaredon, ĉiuj aŭtomate elsaltas, kaj ankaŭ tian cigaredon, kiu ŝprucigas fajrerojn kaj misodoras, alumetskatolon, kies eĉ unu alumeto ne ekbruliĝas, brandglaseton, plenan de flava pirlikvoro, kiun oni ne povas eltrinki, ĉar supre ĝi estas fermita per vitro, krome miaŭantan revolveron kaj unu presitan, senpagan trambileton, kiu rajtigas sian posedanton, kuŝigi sin senkoste sub kiun ajn tramon.

Onklino Angéla plendis, ke ĉi tiu knabo ne ŝanĝiĝas. En sia infanaĝo li estis ĝuste tia. En Eger li eltiris la seĝon el sub kantora kanoniko kaj farbis ilian blankan hundon, dum hejme la barilo estis farbata, per verda olefarbo, kaj la kompatinda restis ankaŭ verda, ĝis ĝi pereis.

Onklo Kornél provis trinki el la pirlikvoro, pafis per la miaŭanta revolvero, poste atentigis lin, ke nun jam estu sufiĉe, fino al la ŝercoj, morgaŭ komenciĝos la serioza laboro.

Sekvatage li veturigis lin per aŭtomobilo al la banko.

Ili serĉis la ĝenralan direktoron, sed unue oni direktis ilin al alia direktoro, kaj nur malfacile ili venis en lian antaŭĉambron, kiu plenplenis de atendantoj.

Vizy eniris al li, la ĝenerala direktoro elmesaĝis, ke li petas pardonon, bulgara ministro restadas ĉe li, sed tuj poste li staros je lia dispono. Per sia okulvitrita sekretariino li transkondukigis ilin en ĉambreton, ŝajnantan tute senpretenda, kie oni kutimis kaŝi la protektohavajn gastojn.

Post kelkaj minutoj tra krompordeto aperis la ĝenerala direktoro, masiva, malalta, tre fortika judo. Li surhavis ĉifitan kostumon kaj fumis sian cigaron el cigaringo.

Brakuminte Vizy kaj Johaĉjon, li petis ilin eniri en malplenan kunsidejon, ĉar – kiel li diris – li devas efektive fuĝi, por havi spiron. Dum Vizy ceremonie prezentis sian peton, aludante al la bonvola promeso de la ĝenerala direktoro, kiun tiu jam ne memoris, la ĝenerala direktoro elpoŝigis paperblokon, petis skribilon de Johaĉjo – interese, li ne havis skribilon! –, kaj notis ion sur ĝi, daŭre konversaciante kaj ĉiam pli forte fumante sian cigaron. Dume cindro falis sur lian veŝton, kiun li ne forpurigis. Poste li manpremis kun ili, ekiris al la krompordeto, kie jam atendis lin komisiono.

En la kunsidejon paŝis senriproĉe vestita sinjoro, kiu jam informiĝis pri la dispono, feliĉe manpremis kun Vizy kaj Johaĉjo, sur kiuj li evidente ankoraŭ sentis la ne malvarmiĝintan, sorĉan manpremon de la ĝenerala direktoro, kaj per lifto li veturigis ilin en la teretaĝon, poste tra fera ŝtuparo ili venis sub la ternivelon, en keletaĝan sekurĉambron.

Ĉi tie Johaĉjo ricevis skribotablon, prezentis sin al siaj kolegoj kaj komencis sian laboradon.

Ĝi estis mirinda mondo. Johaĉjo de tago al tago pli miris ĝin.

La grandega konstruaĵo solene kaj dignoplene leviĝis alĉiele kiel katedralo meze de placo. Eĉ la orgojlaj, ĉiam hastemaj aŭtomobiloj pacience atendadis laŭlonge de la trotuaro, kaj la pasantoj, kiuj preteriris la pordegon, enrigardis kun respektoplena scivolo, mallaŭtigis sian voĉon, eĉ, preskaŭ deprenis sian ĉapelon. Tiuj, kiuj ekstere, en la urbo kredis je nenio en la vivo, ĉi tie ili kredis je io, ili sentis, ke ĉi tie efektive estas io.

Ankaŭ la pordisto mem gardostaris memkonscie en sia pasamentita kepo sur la sojlo, ankoraŭ duone surstrate, sed jam duone en la

sanktejo, ĉirkaŭita de suspekta amaso da neinformitaj petantoj, kiuj senrajte volis eniri. Li decidis kiel unua pri tio, kiu indas enmeti sian piedon, kaj mallaŭte, taktoplene forigis la histeriajn malriĉulojn, ĉar same kiel Jesuo elpelis el sia templo la impostistojn kaj komercistojn, ĉi tiu sankta konstruaĵo ne toleris nekredantojn, kiuj ne tute servis al la mono.

Johaĉjo ŝatis restadi pli longe en la antaŭhalo, en la orita koridoro, inkrustita per verda marmoro, kie vitropentraĵoj filtris la lumradiojn. Pli fore, en krepuska lumo li vidis disduiĝantajn ŝtuparojn, lignotegitajn ĉambregojn, akceptejojn, komfortajn fotelojn kaj sofojn. Ĉie disetendiĝis abundo kaj nepra bonfarto. Rondiraj liftoj zumadis. En la kasĉambrego tridek tajpiloj klakadis, ĉirkaŭ cento da oficistoj kurbiĝadis en sia vitrokaĝo.

Kie li laboris, en la sekurĉambro la flamoj brulis tagnokte, simile al eterna fajro honore al diaĵo. Ĉi tiun sekcion, kiu loĝigis akciojn kaj valoraĵojn, oni aparte gardis. Duonmetre dikaj pordoj apartigis la ĉambregojn, alarmsonoriloj eksonis pro plej eta movo, kaj kiam krepuskis, en la koridoro aperis la banka patrolo kun elektraj torĉoj. La klientoj, kiuj venis ĉi tien, alportis en valizo valutojn, oraĵojn kaj juvelojn, retiris sin en niĉon, memorigantan pri konfesejo, enmemiĝinte, kvazaŭ esplorante sian konsciencon, tie ili aranĝadis siajn trezorojn, kiujn ili estis ŝlosontaj en ŝtalŝranketoj, propramane metante ilin en la *safe*. Longaj sonorigoj de nekonata origino aŭdiĝis, je kiu ĉarmaj grumetoj elsaltis tra iu pordo.

Kaj super li, ĉie ĉeestante, regis en unu alo de la unua-etaĝa koridoro tiu, kiun li jam konis persone, sed nur unufoje vidis, la ĝenerala direktoro, kiu ĉiam estis ĉi tie, kaj ĉiam ne estis ĉi tie, li aperis nur por momento, ankaŭ en sia aŭtomobilo li traktis kun amerikaj financgrupoj, nevideble flugis en la lifto, nevideble glitis en sian ĉambron, kaj ĉirkaŭ li sonoradis telefonoj, zumadis tubopoŝtaĵoj, flugadis telegramoj, fervoradis lia brila akompano, sekretarioj kiel sacerdotoj, prokuristoj kiel prepostoj, la direktoroj kiel dikaj, maljunaj episkopoj, dum li, retirinte sin en la plejsanktejon, persone venis antaŭ la altaron, kaj en unu minuto li eble povis observi vidalvide tion, je kio la dudeka jar-

cento ankoraŭ kredis, je la unusola idolo, je la Or-dio.

Kiel interesa estis ĉio ĉi kaj kiel sekura. Johaĉjo sentis tiel, ke li trafis sur firman punkton de la ŝancelita mondo, kaj ankaŭ li mem estas membro de ĉi tiu eklezia ordino, kvazaŭ seminariano de la nova religio. Subite li imagis sin plenkreskulo, memstarulo.

Pli malfrue li eksciis, ke ankaŭ Joĉjo Elekes laboras ĉi tie, supre en la dua etaĝo en la valuta sekcio. Ridaĉante ili interbrakumis en la koridoro kiel bonaj provincaj kompanoj. Jam samtage ili priparolis rendevuon en varietea kafejo. Ĝis malfrua nokto ili ne povis disiĝi. Johaĉjo akompanis lin ĝis la placo Bécsi-pordego sur la Kastel-monto, kie la familio Elekes loĝis, Elekes reakompanis lin en la straton Attila, kaj ili ripetis tion, ĝis konsumiĝis ilia unusola temo, delogo de virinoj.

Elekes vizitis la gimnazion de Eger du klasojn pli supre, jam de unu jaro li staĝis en la banko, konsideriĝis budapeŝtano. Li konis societojn. Dum antaŭtagmezoj ili priparolis per la interna telefono de la banko la tiutagajn farendojn.

La unua farendo de Johaĉjo estis, elekti „idealon” ankaŭ en Budapeŝto. Sen ĝi li ne povis vivi. Al li ŝajnis, ke li ne laŭorde instaliĝis, dum ne estas knabino, al kiu li amindumas, kiu estas la plej grava inter ĉiuj, kaj pri kiu li povas pensi vespere antaŭ enlitiĝo tiel kiel pri unusolulino. Li hezitis inter du knabinoj, fratino de Elekes kaj Ilonka Tatár. Lia elekto falis sur ĉi lastan.

Ĉe la familio Tatár dum unu posttagmezo kunariĝis dek, eĉ dek kvin junuloj.

Elekes flirtis ĉirkaŭ Margitka, tial Johaĉjo transpartianiĝis al Ilonka.

Ilonka estis gaja, kara knabino, plaĉa, nur iom diketa. Videblis je ŝi, ke iam ŝi grasiĝos tiel same kiel ŝiaj patro kaj patrino.

Ĉi tiu amo konsistis nur en tio, ke enpaŝinte en ilian salonon, Johaĉjo rigardis unue ŝin, iom pli longe li manpremis kun ŝi, kaj kubutante sur la piano, li petis ŝin ludi hungaran kanzonon. Li sendis buketetojn al ŝi. Matene, antaŭ ol iri en la bankon, li estis plurfoje vidata en florvendejo de la distrikto Krisztinaváros. Li flaradis inter floroj, klinis sian vizaĝon al blanka violo, almontris ĝin, por ke oni sendu ĝin al la familio Tatár kune kun lia vizitkarto.

Al s-ino Vizy la gasto ne estis tiel malagrabla kiel ŝi kredis. La banko seriozigis Johaĉjon. Je la naŭa li jam foriris, je la dua kaj duono li revenis por tagmanĝi. Post la tagmanĝo, dum li ŝtopis cigaredon kaj flegis siajn ungojn, li babilis kun sia onklino.

Onklino Angéla mokpiketis lin:

– Kompatinda Ilonka.

– Kial, onklino Angéla?

– Tial, karulo, ĉar vi, viroj ne kapablas vere ami. Ekplaĉas al vi vizaĝo, poste vi forgesas ĝin. *Andere Städtchen*, *andere Mädchen*, aliaj urbetoj, aliaj knabinetoj. Mi konas vin, bela masko. Ne turnu la kapon de tiu knabino!

Johaĉjo ruĝiĝis, malforte protestis, flatis lin, ke li estas kredata tiel leĝermora. Li faris malŝatajn deklarojn pri virinoj. S-ino Vizy faris al li riproĉojn, sed plezuriĝis pri sia vira parenco. Ŝi legis sekretajn kulpojn elde lia vizaĝo.

Ĉirkaŭ la kvara horo la junulo jam vestis sin. Per bonodora akvo li gargaris sian buŝon, atendis Elekes, kiu dande vestita kun monoklo sur la okulo venis supren por li. Ili foriris, por vivi ĝue sian vivon.

Hejme, krom siaj vestoj, nenio lin interesis. Li vidis nenion, li aŭdis nenion. Li serĉis eĉ tion, kion li tenis en la mano. Li jam loĝis la trian semajnon ĉe ili, sed la servistinon li ĉiam plu nomis Katanjo, konfuzis ŝin kun ilia servistino en Eger. Li probable ne rekonus ŝin surstrate.

Kaj Anna havis kun li sufiĉe da penoj. Ĉiumatene je la oka ŝi frapis sur lia pordo, demetis lian kakaon en orborderita taso sur la seĝo apud la ripozlito kun kornobulko kaj glaso da akvo.

La sinjorido pene vekiĝis. Oni devis vekadi lin dum duonhoro. Haste li vestis sin, por ne malfrui en la banko, renversis la akvoglason sur la seĝo, la noktovazon sur la planko, blovante lavis sin, lasis flui la akvon el la kranoj, faris inundon, kun malsekaj piedoj plaŭdis sur la purbriligita pargeto.

Aparte oni bezonis purigi post li.

Kiam la fajfado mutiĝis, ĉar la sinjorido senĉese triladis kiel birdeto, Anna eniris la banoĉambron, kie ankoraŭ ŝvebis lia parfumo. Stuporita ŝi haltis en la narkota vaporaĵo. Ŝi rearanĝis liajn ungoraspiletojn, ton-

diletojn. Foje li premis lian parfumŝprucilon. Malvarma parfumo elpafiĝis tiel rapide, ke ektime ŝi remetis ĝin.

Johaĉjo kontaktis ŝin, por tiel diri, nur oficiale. Kiam li estis foriranta kun Elekes, de sur la kuireja sojlo li alĵetis, ŝi diru al la altmoŝta sinjorino, je kioma horo li revenos por vespermanĝi.

Iun malfruan posttagmezon Anna sola gladis en la antaŭĉambro.

Sur gladtabulo, metita sur du seĝoj, li vaporumis pantalonon per humida tuko.

Johaĉjo enpaŝis vente-haste. Vidante, ke la eniro estas blokita, la knabino volis fari al li vojon, sed la sinjorido gestis, ke ŝi restu, rerapidis al la pordo, kaj preninte elanon, li transsaltis la gladtabulon.

Ĉe la pordo de la manĝejo li returnis sin, por vidi la efikon. Anna plu gladis indiferente, kun iom dismetitaj gamboj. Ŝia kvadratita robo iom gluiĝis al ŝia korpo. Sur ŝiaj piedoj ne estis ŝuoj.

Komence de oktobro Ferenc Patikárius invitis ges-rojn Vizy por la vinrikolto en Eger. Ili decidis ekskursi por kvar tagoj.

Vizy petis forpermeson en la ministerio. Komence ili decidis, ke ankaŭ Johaĉjo kunveturos, sed li ne volis foresti jam komence en la banko, krome lin pli interesis Budapeŝto, la kinejoj kaj ges-roj Tatár. S-ino Vizy instrukciis Anna, kion ŝi kuiru dum tiuj kvar tagoj por la sinjorido.

Iun merkredan tagon ili forveturis per la tagmeza trajno.

Johaĉjo akompanis ilin al la stacidomo, ĉar kvankam ges-roj Vizy jam loĝis dudek kvin jarojn en Budapeŝto, ili alte taksis tiajn parencajn ceremoniojn: anime ili restis provincanoj.

Ili eniris unuaklasan duonkupeon.

Vizy prišutis sian edzinon per komplezetoj, sidigis ŝin apud la fenestro, elkuris por minerala akvo kaj ĵurnalo, daŭre demandis, ĉu ŝi havas bonan lokon. Onklino Angéla kapjesadis.

Kiam la trajno ekskuiĝis, ŝi turnis sin al sia nevo, ankoraŭfoje petis lin atenti ĉion, gardi la domon. Onklo Kornél svingis sian poŝtukon.

Johaĉjo levis sian pajloĉapelon kaj postkriis ilin:

– Hur-hur-hura!

Sovaĝa nokto

La trajno ankoraŭ malrapide ruliĝis, li ankoraŭ vidis la vizaĝon de onklino Angéla kaj la poŝtukon de onklo Kornél, kiam subite, ankaŭ por si nekompreneble, li decidis ne returniĝi en la bankon, kiel li intencis, sed iri hejmen kaj renversi Anna sur la dorson.

La ideo estis tiel ĝua kaj ekscita, ke lia gorĝo sekiĝis de ĝi. Li kroĉis sin al fera kolono, rigardis la horloĝon de la stacidomo, kiu montris ĝuste la ciferojn XII. Li profunde enspiris la acidecan odoron de la malbona karbofumo.

Ekstere, antaŭ la stacidomo li ekhavis la senton, ke li nun alvenis en fremda urbo kaj atendas lin mil kaj aliaj mil aferoj. Li eĉ ne vidis la sunlume brilan placon kun ties koloraj figuroj kaj la statuon de la malserena Baross[18], nur Anna, kiu gladas sur tabulo, metita sur du seĝoj en sia kvadratita robo, nudpieda, kun iom disigitaj gamboj, kaj kaptis lin sopiro, ke li jam estu hejme kaj brakumu ŝin de malantaŭe, kaj poste sen ajnaj hezitoj kaj evitoj, kiel oni kutimas ĉe servistinoj, li renversu ŝin kiel farunsakon.

Li komencis kuri. La varma oktobra tagmezo bruligis lian veston. Li saltis en preterpasantan tramon, sed elsaltis ĉe la sekva haltejo. Li alfajfis droŝkon, promesis trinkmonon al la koĉero, por ke li pelu la ĉevalon laŭeble plej rapide.

Kiel malrapide li veturigis! Ĉiu radoturno egalis senfinecon. Kaj la bildo, kiu tiel neatendite aperis antaŭ li, ne lasis lin, daŭre petolis kun li, ĝi jam moviĝis, jam reviviĝis kiel filmo. Anna demetis la gladilon, dubeme ekridetis kaj sidiĝis en lia sino.

Sed en la antaŭĉambro estis nek ŝi, nek la gladtabulo. Kie ŝi estas? Johaĉjo embarasite rigardis en la kuirejon:

– Ĉu ni tagmanĝos?

– Ĉu jam? – demandis Anna ĉe la forno. – Mi kredis...

– Kion vi kredis?

– Ke ankaŭ hodiaŭ nur je la dua kaj duono.

[18] Baross, Gábor (1848-1892): hungara politikisto, kreinto de la modernaj komerco kaj trafiko.

– Ĉu? Ne.

– Malgraŭ tio mi povos esti baldaŭ preta.

– Diru al mi, diru al mi…

– Bonvolu!

– Kion vi kuiras.

– Ĉifonsupon[19].

– Kaj?

– Rostitan bovidaĵon.

– Kaj?

– Papavajn nudelojn.

– Papavaj nudeloj – ripetis Johaĉjo, sulkante la frunton –, papavaj nudeloj.

– Ĉu la sinjorido eble ne bonvolas ŝati ilin?

– Jes ja. Mi tre ŝatas papavajn nudelojn. Ankaŭ papavajn nudelojn mi ŝatas.

Li ne sciis propre, kion li diras, nur plimultigis la vortojn. Lia cerbo dume faris grandan laboron. Li komparis la knabinon, kiu nun staris antaŭ li en tute alia situacio, en tute alia humoro, en tute alia vesto ol tiu alia knabino, kiu tiun posttagmezon gladis en la antaŭĉambro. Li klopodis identigi la antaŭan kun ĉi lasta, adapti ŝin al sia deziro. Anna ne estis nun nudpieda, surhavis ŝuojn, kaj tio ĝenis lin.

En la manĝejo ŝi primetis la tablon jam nur por li en la loko de onklo Kornél.

Li disrigardis, kaj denove invadis lin varmego kiel en la stacidomo. Dum minutoj li ne povis movi sin. Li estis sola, tute sola kun ŝi.

Piedpinte kaj tre rapide li kuris en la dormoĉambron. Li serĉis la ŝlosilon en la tapetita pordo, transmetis ĝin el la ekstera en la internan seruron kaj plufoje ŝlosis kaj malŝlosis la pordon. Kaj el la manĝejo oni povis ŝlosi la tutan loĝejon. La pordon de la antaŭĉambro kovris laktovitro, el la koridoro oni ne povis envidi eĉ ĉe taghela lumo.

Li cerbumis pri io. Li tuŝis kusenon kaj ektremis. Li haltis antaŭ la granda spegulo, rigardadis ĝin, pensis pri tio, ke ĉi tiu spegulo reflektas eĉ la figurojn de du homoj, kiuj nudaj interkisas interbrakume antaŭ

[19] Ĉifonsupo: supo kun diskuiritaj kaj tutaj ovoj.

ĝi. Li karesis kovrilon. Ĉio, kio troviĝis tie, ĉiu meblo kaj ĉiu eta objekto estis inicitaj en lian planon, ties elektrecon ili radiis. La forlasita loĝejo jam ne ŝajnis familia sanktejo sed kulponesto kiel komplico, kiu per si mem, mute konsentis pri ĉio.

Senrespekte li levis dosieron de sur la skribotablo, malfermis, fosserĉadis en la ŝrankoj, provis eltiri la ŝlositajn tirkestojn, sidiĝis sur la seĝoj, sternis sin sur la divanoj, ankaŭ sur tiu de onklino Angéla, sur kiu li ankoraŭ ne kuŝis. Li ĉirkaŭapogis sin per kusenoj, la ŝuojn li metis sur la blankan silkokovrilon. Lin ne interesis, ĉu li malpurigas ĝin. Li preferis ĝui la penson, ke ĉi tie ĉio apartenas al aliuloj, kaj nun li povas fari al ĉio, kion li volas, kaj ia ebrieco instigadis lin, ia junula, vandala instinkto, ke li puŝadu per la piedoj, ke li strečmalfermu la serurojn, ke li ĉion malfermu, ĉion kotmakulu, malbonigu, disfendu kaj frakasu.

Li planis komenci ĉe la tagmanĝo. Anna enportis la supon, sed ŝi ne alrigardis lin. El tio li konkludis, ke ŝi jam konjektas ion. Ĉe la rostaĵo li rimarkis, kvazaŭ iom da ironia rideto aperus sur ŝiaj lipoj, kaj apenaŭ li alparolus ŝin, ŝi ekridus kaj farus ĉion neebla. Tial li prokrastis ĝis la nudelaĵo. Malgraŭ tio li diris ankaŭ tiam nur: „Dankon!”

Post la tagmanĝo li kuŝiĝis malesperigite, kun senpova kolero sur la ripozlito, kovris ambaŭmane sian vizaĝon, malbenis sian mallerton. Li ne scipovis paroli kun virinoj, aparte kiam li volis. Tiafoje li estis tiom mistera, ke ili tute ne komprenis lin aŭ tiel kruda, ke ili ofendiĝis, kaj li ruĝiĝis ĝisverte pro sia mallerto. Plej ofte li nur ŝercis kun ili. Kun Ilonka Tatár kaj la aliaj tio iel sukcesis, sed kun Anna li ne povis komenci.

Kaj cetere li perceptis tiel multajn detaletojn je ŝi, kiuj forfremdigis lin. Ŝiaj haroj estis maldensaj kiel tiuj de kamparaninoj, finiĝis en maldiketa harnodo, ja la belaj haroj, kapornamo de riĉuloj kaj privilegiitoj baldaŭ triviĝas sur la kapo de servistinoj. Sur ŝia supra lipo li malkovris lanugan liphareton, sur kiu precipitiĝis roso el la kuireja vaporo. Ĉirkaŭ ŝia nazo sidis eta akno. Ankaŭ ŝia staturo estas tro maldika. Nur ŝiaj okuloj kaj dentoj estas belaj.

Por konsoli sin kaj definitive ĉesigi sian emon al la knabino, Johaĉjo ade-ree riproĉis ĉi tiujn mankojn. Ŝi estas dikosta kiel knabo, ŝi havas lipharojn, ŝvitas, somera akno makulas ŝian subnazon, kaj tiu mizera

hararstumpo sur ŝia kapo... Sed ju pli multe li cerbumis, des pli li vidis, ke ĉio estas vana. Lia febro ne malvarmiĝis, prefere pliiĝis. Tiuj etaj mankoj, kiuj komence faris ŝin tiel fremdeca, preskaŭ repuŝa, nur proksimigis lin al ŝi, ĉiam pli ŝi fariĝis taŭga por tiu celo, por kiu li destinis ŝin. Ĝemante li konvulsiis, kaj turnis sin sur sian alian flankon.

Ĉi tiu estis la unua tago de Anna, kiam sen siaj gemastroj, memstare ŝi povis fari disponojn. Feliĉe ŝi fervoradis, kvazaŭ mastrumistino. Apenaŭ li lavis la vazojn, el la dormoĉambra ŝranko elprenadis la paltojn, pantalonojn de la altmoŝta sinjoro, por purigi ilin per benzino. Kiam ŝi brakumis al si la grandan amason da vestoj kaj ekiris eksteren, sur la ripozlito ŝi ekvidis la sinjoridon. Tiu kuŝis rigide kun ia vitrotubo en la buŝo, pri kiu ŝi ne sciis, kio ĝi estas. Ŝi do alparolis lin:

– Ĉu vi bonvolas malsani?

– Eĉ iom ne – alarmiĝis Johaĉjo kaj elbuŝigis la febrometron kaj sen rigardi ĝin, li nulskuis ĝin. – Mi kredis, ke mi havas febron, mi mezuris min. Iomete – kaj li emfazis aparte, sen ĉiu kialo, ĉi tiun vorton – mi malvarmumis.

Lia cerbo ne ĉeestis, vagis for: „Jen la okazo. Mi diru ŝercon, tute vulgaran ŝercon, ian murtremigan, dikan porkaĵon, kaj ŝi ekridaĉos, kapturniĝos kaj tuj falos sur la dorson. Servistinojn oni kaptas kutime tiel. Ek, knabinjo, sur la dorson... Sursalti, levi ŝian jupon. Kio povus okazi? Maksimume ŝi frapos sur mian manon. Granda malfeliĉo. Kaj cetere ŝi ne plu estas virga. Videblas je ŝi. Ŝiaj mamoj estas malgrandaj kaj pendas. Tiaj estas de bona speco. Kiel Elekes diras. Tamen ŝi devas esti bongusta ulinjo. Dolĉa ĉiesulineto. Speco de kamparana putinaĉo.

Per tiaj pensoj li esperigis sin kaj per eĉ pli vulgaraĉaj vortoj, kies dolĉeco skrapis lian gorĝon, kvazaŭ li lekus mielon el kruĉo. Li tusadis proe.

Anna diris:

– Ĉar mi vokos s-ron d-ro Moviszter. Tiatempe li estas hejme. Li ankoraŭ ne havas konsulton.

– Ba! – ridis Johaĉjo, sed tre trudmiene, kaj levis sin sur la kubutojn, tiel ŝi rigardis la knabinon.

Kaj dume li pensis:

– Jen, nun ŝi rigardas en miajn okulojn. Do ĉe la tagmanĝo mi eraris. Ŝi konjektas nenion. Sed de kio ŝi konjektus? Tiuj ne komprenas aludojn, estas malkleraj. Oni bezonas paroli. Ne tiel sed iom pli delikate. Domaĝe pro ĉiu minuto. Se mi longe hezitos kaj evitos, nenio okazos. La hodiaŭa tago jam perdiĝis. Restis ankoraŭ tri tagoj: ĵaŭdo, vendredo, sabato. En dimanĉo – fino. Ek do!

Li malfermis la buŝon, li kredis diri ion. Nenio venis en lian kapon. Nur tiom:

– Anna.

– Bonvolu!

– Anna, atentu! Mi estas hejme la tutan posttagmezon, hodiaŭ mi iros nenien. Sed se mi sonorigos, tuj envenu! Atendu, Anna – li aldonis, kvankam la knabino tute ne ekiris. – Jes, nur tion mi volis diri.

Nun ŝi foriris. Johaĉjo saltleviĝis kaj kuris ĝis la pordo de la manĝejo, sed subite haltis ĉe la klinko. Estus ridinde, se tuj post ŝia foriro li kurus en la kuirejon. Ankaŭ la sonorigo. Li alipensis, refaligis sin sur sian kuŝejon, kiu traardiĝis de lia malbenita varmego.

Kio estis tio? Li ne komprenis.

Ion tian, kiel nun, li ankoraŭ neniam sentis, nur unufoje, nur unu solan fojon.

Jes, tiam, kiam post la abiturienta ekzameno li ekskursis al Vieno, kaj sola veturis returne en malbone prilumita kupeo de la posttagmeza trajno.

Li kunpremis la palpebrojn kaj provis rememori.

Okazis tiam, ke iom antaŭ la hungara landlimo li rimarkis virinon, kun enpremita frunto, kiu tenis en sia sino grandan ĉapelujon, por kiu supre, inter la pakaĵoj ŝi jam ne trovis lokon. Ŝi aspektis deprimita, forlasita kaj ankaŭ malsaneca. Ŝi surhavis dikan, grizan drapveston. La kalkanumoj de ŝiaj ŝuoj estis mistretitaj. Li ne sciis, kiu ŝi estas, kiomjara, ĉu edzino aŭ knabino, ĉu ŝi parolas hungare aŭ germane, sed apenaŭ li ekvidis ŝin, li ne povis forturni de ŝi la okulojn. Ilia trajno kuris sub malalta, ladkolora ĉielo. La pluvo malrapide gutadis, saturante la aeron kiel en vaporbanejo. Dum la konduktoroj kriadis la nomojn de la stacioj, ilia voĉo formortis en la vatmola vaporo. La virino eliris ĉe la

limstacio Bruck, antaŭ ol li povis alparoli ŝin. Li penportis sian ĉapelujon, plaŭdis laŭ la kotaj reloj, estis frapata de la pluvo, ĉar ŝi ne kunhavis ombrelon, poste ŝi malaperis en la griza pejzaĝo, perpiede. Johaĉjo longe rigardis post ŝi el la fenestro. Li donus sian vivon, se li povus sekvi ŝin, se li povus prenis ŝian manon, se li povus kisi ŝian velkan vizaĝon, poste povus vespermanĝi kun ŝi en la ĉambro de ĉelima hotelo, kie troviĝas nur unu tablo, unu noktoŝranketo kaj unu lito. Sed sekvatage li forgesis la tuton.

Elekes evidente mensogis, kiam li diris, ke kun servistinoj estas plej facile. Kun ili estas eble plej komplike.

Kolere li transvestis sin kaj eliris.

Li ekiris al ges-roj Tatár, sed ĉe la Zerge-ŝtuparo li returnis sin, tra la Tunelo li transpromenis al Peŝto. Li sidiĝis en kinejo, rigardis sepaktan, italan amfilmon. Li aĉetis bileton ankaŭ por gramofona prezentado, li aŭskultis *La fluganta holandano* de Wagner.

Ekstere krepuskis. La duonmalhelo faris lin pli kuraĝa. Li imagis, ke li simple atakos la knabinon kun sovaĝa krio. Li suprengalopis sur la ŝtuparo.

Sed la kuirejo estis malplena.

Kiel murdisto, kiu kun tranĉilo en la mano enpaŝas la ĉambron, kie li ne trovas la jam delonge celatan viktimon, seniluziigite li ĵetis sin sur la knedujseĝon, lasis fali la kapon sur la tablon. Estis al li agrabla ankaŭ tio, ke li povis esti en ĉi tiu malbelaĉa kuirejo, kie ankoraŭ ŝvebadis la odoraĉo de benzino. Anna, kiam ŝi trovis lin tie, ektimis.

– Kie vi estis? – volis scii Johaĉjo.

– Ĉe la buĉisto, mi aĉetis dorsaĵon por la vespermanĝo – kaj ellevinte el la aĉetsako, ŝi montris la gazetpapere envolvitan viandon.

– Mi ne bezonas ĝin – forgestis Johaĉjo. – Hodiaŭ mi ne vespermanĝos. Nur nigran kafon.

Li kafumis. Poste stariĝinte antaŭ la fenestro, li rigardis la nokton.

Je la deka Ficsor ŝlosis la dompordon, s-ino Moviszter ĉesis piani, la domo silentiĝis. En la servistina ĉambro estis malhele.

Ankaŭ li malvestis sin. Estingis la lumon.

Dum tempo li staradis en noktoĉemizo en la malhelo. Ne eblis scii,

kion li faras.

Li faris paŝon. La kvadrataj pargeteroj tiel knaris, ke ĉiu povis aŭdi en la domo, kaj certe ankaŭ suspektis, kion li celas. Li repaŝis sur la malnovan lokon.

Ree li hezitis, poste de metro al metro, palpe provante li avancis tiel singarde, kvazaŭ li irus sur kvadratoj de ŝaktabulo en la decida ludo de ŝakkonkurso. La pargeto knaradis kiel maŝinpafilo.

Tiam kunpreminte la dentojn, li ekkuris, ne plu zorgante, kion oni pensas pri la nokta ekskurso. La klinkoj ŝrikis, la pordoj veis.

Li jam atingis la nokton de la kuirejo. Etendante antaŭ sin la brakojn, li stumbladis al la muro. Li eĉ ideon ne havis, kie situas la lito. Ĝin li serĉis.

– Ĉu vi dormas? – li demandis per mallaŭte, malcerta voĉo.

– Ne – respondis tuj la maldorma voĉo de Anna.

– Mi pensis – balbutis Johaĉjo. – Mi pensis nome, ke vi jam dormas.

Nun li trovis la liton.

Kun kuraĝo, de kiu ankaŭ li mem teruriĝis, li sidiĝis sur la litrando.

Aŭdiĝis ia brueto, facila vestosusurado, hezita moviĝado.

La knabino sidiĝis en la lito. Nur tiam ŝi eksciis, ke ŝi ne trompiĝis, kaj tio, kio ŝajnis al ŝi tiel nekredebla, kiam la voĉo en la mallumo demandis, „Ĉu vi dormas?”, estas efektive realo.

– Se vi ne koleras – diris Johaĉjo kun sufokata spiro.

Anna nur sidis en la lito, simple kaj honeste kiel malsanulo, kiu sidiĝas ĉe la alveno de la kuracisto kaj atendas, ke li ekzamenu lin.

Ŝi ne tute komprenis la situacion.

Ŝi jam aŭdis, ke sinjoroj vizitadas siajn servistinojn, kaj ke servistino povas esti ankaŭ amatino de sia mastro, kaj al kelkaj ankaŭ naskiĝis infano de sia mastro. En Kajár loĝis knabino, kiu falis en honton pro advokato de Peŝto. Ŝi sciis tion kaj multon alian, kion la knabinoj rakontadis. Sed ke io tia povas okazi nur tiel, kiel nun, tio plenigis ŝin per ia simplamensa miro.

– Ĉu vi timas? – demandis Johaĉjo, ĉiam plu sidante sur la litrando. – Ĉar se vi timas, tiam mi reiros.

Anna iom timis, sed ĉar ŝi sentis pli granda honoro la proksimiĝon

de la sinjorido kaj pli timis, ke li reiros, ol kion ŝi propre timis, ŝi respondis:

– Ne.

Johaĉjo kuŝiĝis sur la ferliton. Nur sur ĝian randon, preskaŭ sur la randostango. La knabino tiris sin sur la alian flankon de la lito.

Inter ili restis tiel granda malplena spaco, ke iu povus loki sin tie.

Sed ili jam kovris sin per komuna peplomo, per tiu netegita, vinruĝa lanpeplomo, kiun Johaĉjo, kvankam ĝi estis posedaĵo de onklino Angéla, sentis tiel fremda kaj malpura kiel peplomon de variolulo.

Li tiris ĝin ĝis sia buŝo.

Estis mirakla ĉi tiu malpermesita varmego. Li kredis, ke tuj kaptos lin febro kaj li forflamiĝos en ĝi kvazaŭ en fajro. Li premŝovis antaŭen siajn piedojn kun lasciva malrapido, ien en la malhelon, en la nekonatan profundon de la servistina lito, en kiu li konjektis ion malpuran kaj sangon, ion terure naŭzan, eble cimon kaj ranon. Liaj tremantaj fingroj glatumis la ŝiretitan kotonan littukon.

Li turniĝis, ruliĝis kelkfoje kvazaŭ sur rubamaso, por iĝi des pli malpura. Li jam fandiĝis en ĝi, estis unu kun ĝi.

Ĉe liaj piedoj moviĝis io: nigra makulo.

Alarmite li demandis:

– Kio estas tio?

– La kokido. Huŝ vi! – aplaŭdis Anna kaj forpelis la kokidon, kaj tiu forflugis de la lito en angulon de la kuirejo, kaj tie baldaŭ starante dormiĝis.

Johaĉjo proksimiĝis, ne rapidante li glitis po fingrolarĝoj al ŝi, li ja apenaŭ povis jam elteni ĉi tiun plezuregon. Li ne bezonis pliigon.

Li metis sian maldekstran brakon sur la bruston de la knabino.

Anna lasis tion.

Ŝi estis penetrata de komenciĝanta, agrabla varmo: la amo.

Ŝi sciis, ke ŝi estas brakumata. En sia vilaĝo la fraŭloj ne unufoje brakumis ŝin, palpis ŝiajn mamojn pro ŝerco.

Sed poste ŝi laŭte kaj sane eksplodis en ridon:

– Se oni vidus.

– Kiu? – ektimis Johaĉjo, forkaptinte la brakon de sur la brusto de

Anna kaj orelumis eksteren al la ŝtuparejo, kie oni frapfermis pordon. – Ĉu la geonkloj?

– Ne la altmoŝtaj gesinjoroj.

– Kiuj do?

– La fraŭlinoj – ridis Anna el la koro, petole kaj ironie. – La moŝtaj fraŭlinoj.

– AĤ – diris Johaĉjo, kiun flatis ĉi tiu supozo. – Kial ili interesus min – kaj li deklaris tion tiel supereme, kvazaŭ per unu sia movo li kondamnus mil kaj mil por amo sopirantajn kastelfraŭlinojn al morto. – Mi ne bezonas ilin. Nek ilin, nek moŝtajn sinjorinojn. Ĉar mi havis ankaŭ damajn amatinojn – li tradukis tion en servistinan lingvon – sinjorinajn moŝtojn, altmoŝtajn sinjorinojn. Mi bezonas nur vin. Vi estas tiel bela.

– Kial la sinjorido ne diris tion jam matene?

– Ĉu vi do rimarkis? Kiam mi revenis de la stacidomo, ĉu? Aŭ ĉe la tagmanĝo? Jam matene, ĉu?

– Se tiam vi bonvolus diri, mi estus bela dum la tuta tago.

– Ne – petis Johaĉjo, al kiu ĉi tiu aĉa spritaĵo frapis la koron. – Vidu: ne, ne! Vi estas bela, kiel vi estas – kaj raŭke pro la sopiro –, mi ĵuras.

– Tio estas peko, sinjorido – ŝi instruis lin.

– Kial tio estus peko?

– Ĵuri pro ĉiu ruĝa cepo…

Johaĉjo decidis, jam fini ĉion ĉi. La petola kamparana ŝercemo, la gajo ŝajnis moki lian delikatan kaj malsanan moŝtan sopiron, tiu deziris silenton, por iĝi kompleta kaj maturiĝi kvazaŭ en forcejo.

Li ree etendis siajn brakojn al ŝia brusto.

Anna evitis lin per movo.

– Silentu, karega! – li petegis kaj vortgalopis, por ne aŭdi ŝian ridon, kiun li trovis vulgaraĉa, ofenda. – Ne ridu, ne parolu! Eĉ vorton ne diru! Nur silentu, karega! Mi ne volas malbonon al vi. Mi ĵuras. Vi estas tiel bela. Mi amas vin. Nur vin. Cin – li flustris sekreteme en ŝian orelon –, cin – kaj la mallonga persona pronomo, kiu du homojn tute ebriigas, ekbruligis tian ekstazon en li, ke febroveziko sur lia palato krevis.

– Cin, cin. Diru: cin! Diru ankaŭ ci: cin! Diru al mi ci, ci…

Ŝi ne diris, ŝi meditis pri tiu nemezurebla distanco, kiun ĉi tiu vort-

eto trapontas.

La okuloj de Johaĉjo kutimiĝis al la mallumo, li povis distingi la konturojn de la objektoj, vidis Anna. Ŝiaj du mamoj lumetis, prilumis ĉirkaŭ si la nokton.

Li konfesigis ŝin, ĉu ŝi jam havis amatinon, kaj kiun, kion ŝi scias kaj kion ne. Anna donis mallongajn, ambiguajn respondojn, poste ne plu respondis. Eble nun ŝi ofendiĝis pro tio, ke tiu admonis lin pli frue al silento.

El tio Johaĉjo komprenis, ke ŝi jam donis sin al ĉiuj, kaj ŝi estas la lasta de la lastaj. Des pli bone, li pensis. Kaj li komencis sieĝi ŝin konfuze: jen li flatis, jen perfortis.

Anna facile rebatis liajn mallertajn atakojn. Kaj kiam li volis brakumi ŝian talion, ŝi tiel forte forpuŝis lin, ke la lito ekknaris.

– Ne – ŝi diris malmole.

– Sed kial?

– Ĉar. Ne permesite.

– Atentu min…

– Bonvolu lasi min! Iru al la moŝtaj fraŭlinoj! Restu en paco!

Jen, ŝi eĉ ne diris sinjorido. Ŝajnis tiel, ke ŝi tute dominis en la lito.

Johaĉjo boris sian kapon en la buntan kusenon, ronĝis ĝian tegaĵon, lia vizaĝo ŝmiriĝis de salivo kaj larmoj. Aŭdeblis lia amara anhelado. Li kuŝiĝis surventre.

Sed tiam neatendite brako kroĉiĝis al lia kolo, premis lin al si, tiel forte, ke tio preskaŭ doloris. Li apenaŭ ricevis spiron. Malrapide li mergiĝis en la plezuron, li lasis sin enpremiĝi en ĉi tiun tepidan, langvorigan fluaĵon, por droni malsupre, sur ĝia fundo kiel en kuvo da sukerita lakto.

Terure forta estis ĉi tiu eta kamparana knabino, kaj eĉ pli maldika ol li pensis. Dum li brakumis ŝin, li sentis neniom da karno sur ŝia korpo, nur tendenojn kaj muskolojn, ostojn, la delikatan konturon de la skeleto kaj la pelvoston: la fandvazon, la misteran krateron de la kreado.

Plurfoje ili mortis en ĉi tiuj brakumoj kaj ree kaj denove ili reviviĝis.

Apenaŭ ili diris ion.

Post noktomezo aŭtomobilo haltis antaŭ la domo. Iu sonorigis, kaj la dompedelo malŝlosis la dompordon.

Ili flustre traktis, kiu devas esti la malfrua vizitanto.

La ulo preterpasis ilian pordon, supreniris en la duan etaĝon kaj tie li frapis. Ili aŭdis la voĉon de d-ro Moviszter. Post kelkaj minutoj ili du jam malsupris kune, la doktoro sidiĝis en la aŭtomobilo, kaj ĝi brue forrapidis.

Ĉirkaŭ krepusko Johaĉjo rimarkis la flameton sur la supro de la fajromuro kaj demandis Anna, kiu loĝas tie. Poste sur la vojo, sur kiu li venis, li ŝteliris reen en sian liton.

Ankoraŭ ne mateniĝis.

Kun triumfanta feliĉo li ĵetis sin sur la ripozliton, ke la afero fine okazis. Estis naŭze kaj belege. Li estis konvinkita, ke lia kazo estas escepta, ekde la kreo de la mondo neniu faris tian pekon. Tamen ĝi plaĉis al li kaj li akceptis ĝin.

Ilonka Tatár nun certe dormis. Ŝia patro havas barbon. Fine de tekunvenoj li ĉiufoje envenas al la gejunuloj, afable babilas kun ili, manĝas el la restintaj tortoj. La patrino observas per bone direktataj, malpermesaj, aprobaj rigardoj, kiom ili progresas.

Johaĉjo ekridaĉis. Nun li komprenis, kial la knabinoj fremdigis lin, kaj kial li estis feliĉa, kiam post la kavaliraj servoj li restis sola kaj povis fajfante hejmenkuri.

Sed neniujn de ĉi tiu knabino li konis. Ŝi estis tiel fremda kiel sovaĝa birdo.

En la akra lumo de maldormo kaj dormo li ankoraŭ miris pri io. Pri tio nome, ke la afero estas nur tiom, kaj ke la plej grava afero de la homa ekzistado, kiun plenkreskuloj tiel zorge sekretas antaŭ siaj infanoj, estas tiom infaneca, tiom ludema kaj fola.

Li kapbalancis, kaj sur lia buŝo ŝajnis aperi, kvazaŭ kopio de liaj pensoj, brila kaj aĉa rideto.

Amo

Johaĉjo sidis sub la ternivelo en la sekurĉambrego. Sur la bankon sinkis la senhumora mateno de oficejoj.

La prokuristo transdonis al li folion. Sur ĝi altiĝis ciferkolono tiel alta kiel nuboskrapulo en Nov-Jorko. Ilin li devus adicii.

Per sia skribilo li grimpis de unu etaĝo al alia de la kolumnoj, sed li eraris, ofte li devis reveni pli malsupren. Fine li tediĝis, flankenĵetis ĝin kaj gapis tra la fenestro.

Tiam enkapiĝis al li la buŝo de Anna.

Li ankoraŭ ne kisis ŝian buŝon.

Nokte, kiam iliaj ardantaj vizaĝoj interproksimiĝis, Johaĉjo forturnis la kapon, lin fremdigis tuŝi buŝon, kiu apartenas al servistino.

Nun ŝajnis al li pli ekscita plezuro, ol posedi ŝian tutan korpon, la humiligo kisi ŝiajn palajn, fendetitajn lipojn, disŝovi ilin per siaj lipoj, kaj ne liberlasi ilin, ĝis en lia spiro ili disfendiĝas, fandiĝas, dispolviĝas kiel bongustaj orientaj fruktoj.

Li prenis sian ĉapelon kaj forŝteliris.

Li trovis la knabinon en la malluma banoĉambro.

– Restu – li anhelis kaj kisis ŝin.

La kiso estis malvarma kaj stranga. Li ne povis satiĝi per ĝi.

Ree kaj denove li avide penetris en ĉi tiun buŝon, sovaĝe enrompis tra la ostopordo de la dentoj kaj trovis la langon, kiu rezervis por li ekzotikan spicon, ebriigan guston.

– Ankoraŭ – li kriis –, ankoraŭ, ankoraŭ – kiel nesatigebla infano, kiu kuleras fragan kremaĵon, kaj apenaŭ li elkuleras ĝin, jam deziras novan.

Anna, kiun unuafoje li vidis depost tio, ruĝigita de honto, duonsvena de feliĉo, alpremiĝis al la ladvando de la bankuvo, por ke li faru kun ŝi, kion li volas. Ŝi kuiris la kakaon je la oka, kiel kutime, almetis ĝin en la orbordera taso sur la seĝo, la sinjorido trinkis ĝin kaj foriris. Ŝi opinius natura, se post la nokta renkontiĝo Johaĉjo neniam plu konus ŝin, kaj neniam parolus pri la okazintaĵo. Ĉi tio nun multe pli surprizis ŝin ol tio, ke nokte li elvenis al ŝi.

– Kial ci ne rekisas min? Kial ci ne parolas? Ci ne amas min. Ho, ci, mi, ci – li balbutis la fatalajn ŝanĝvortojn de la amo.

Foje, kiam satigita li falis de ŝia buŝo kaj prenis spiron, Anna elglitis el la banoĉambro.

– Atendu! – li postkuris kaj kisis ŝin ankaŭ en la antaŭĉambro.

De tie en la kuirejon. Ankaŭ tie la kiso havis novan guston.

– Antaŭ la fenestron – komandis Johaĉjo. – Ĉi tien, en la angulon. Apud la ŝrankon. En la lumon. Mi volas rigardi cin. Ankaŭ ci rigardu min!

Kaj li observis ŝin kun eksterordinara atento.

La okulparo estas la plej distanca formaĵo de la cerbo, sur la elstara bastionsupro de la kranio ankaŭ ĝi mem estas unu vidanta, nekovrita cerbo, kiu en la febro de la ekkono, iam en la kosma revolucio de la estado rompis al si du truojn sur la ostovando de la kranio, kaj tra ĉi tiuj embrazuroj ĝi spionas la eksteran mondon por ekscii, kio estas la celo de la kreita mondo.

Sed ĉi tiuj kvar okuloj nur fiksiĝis unuj sur aliaj, ĉe la aliaj ili serĉis, esploris ion, ili volis reciproke iluminiĝi kaj saviĝi.

– Kaj nun – diris Johaĉjo – ne tuŝu min! Mi same vin. Jen tiel.

Li dorsmetis siajn brakojn. Inter la du korpoj nur la buŝo estis la sola intertuŝa punkto.

Anna obeis al li, kvazaŭ li petus de ŝi broson aŭ ŝutirilon.

Sekvatage li ne iris en la bankon. Li telefonis, ke li malsanas, havas gorĝinflamon.

Li bele vestis sin, surmetis sian delikatŝtofan pantalonon, sian plaĉan ledzonon kaj sen jako, en sia zefirĉemizo li pasumis. La tuta tago estis ilia. Kelkfoje oni sonorigis, alportis fakturon, kiun Anna pagis aŭ leteron, cetere neniu ĝenis ilin.

Anna venis kun rubaĵŝovelilo. Ŝi kovris sian kapon per ruĝa tuko. Ŝi aspektis tre plaĉe; similis al operetaj primadonoj, subretoj, kiuj imitas la praan virinon, la „ĉambrokatinon”.

Johaĉjo ekdeziris la manon de Anna, nur ŝian manon.

– Donu ĝin al mi! – li petis.

– Kial?

– Nur.

– Malpura – kaj ŝi komencis purviŝi ĝin per sia antaŭtuko.

La sinjorido jam kaptis ĝin. Tenere li prenis ĝin kiel papilion, karesis la manon, kiu pro sia ofico tuŝis ĉiajn naŭzaĵojn, fermis ĝin en sian delikatan, flegatan manon, premadis ĝin. En la raspa skrapado de la vezikhava mano estis io neesprimeble dolĉa kaj miela. Poste li prenis po unu ŝiajn fingrojn kaj kisadis, algapis ilin en sia ama embaraso de homo, kiu ne scias, kion fari al tiu, kiun li amas.

Neatendite li metis ŝian manon en sian buŝon.

– Kion vi faras? – kriis la knabino indigninte. – Ĉu vi ne hontas? Lasu min! – kaj ŝi elŝiris siajn fingrojn el la buŝo de la junulo.

Sangoruĝa, ŝi elkuris en la kuirejon, sian ŝirmkastelon kaj tie ŝi paŭtis.

Anna tion jam ne komprenis.

Nokte, kiam sub la nudpiedaj paŝoj la planko ekkraketis, ŝi ĝojis, ke li venas, ŝi eĉ ne kaŝis tion al li, antaŭfaris lokon por li. Nur tage ŝi ne eltenis ĉi tiujn multajn ceremoniojn.

Ŝi ne komprenis, kial la sinjorido nun sobgrimpas sur la eskalo de la amo, kaj post kiam unufoje li jam ricevis ŝin, nun proksimiĝas al ŝi alivoje, ĉiutage li paŝas unu ŝtupeton malsupren el la ĉielo sur la teron.

Multajn aferojn ŝi ne komprenis.

Post la kisoj kaj manpremadoj sekvis la momento, kiam la sinjorido komencis viumi ŝin. Li petis ŝin, ke de nun ankaŭ ŝi ne nomu lin sinjorido, sed diru simple „vi”. Mallaŭte li ripetadis ŝian nomon, la plej belan virinan nomon, en kiu kaŝiĝas eterna promeso, en koketa kondiĉa modo. Li povis esti apud ŝi dum horoj, sen diri ion alian. Antaŭ ol kisi ŝin, li humile demandis, ĉu estas permesite.

Kaj elpensis ĉiaspecajn folaĵojn. Ŝi devis senĉese transvesti sin. Li elsendis ŝin, por ke ŝi surmetu sian kvadratitan robon kaj nudpiede revenu, poste li deziris la katunan kaj la laĉajn ŝuojn. Oni ne povis orientiĝi pri li. Foje li volis ankaŭ, ke ŝi surmetu la balan robon de la altmoŝta sinjorino sur sian nudan korpon. Sed tion ŝi jam ne faris.

Pli malfrue li parolis tiel multe, ke ŝia kapo zumis proe. Li genuiĝis antaŭ ŝi, kuŝiĝis sur la planko kaj rakontis pri tio, ke ĉe noktomezo, kiam la tuta domo dormos, ili elglitos en la ĝardenon, inter siringoj kaj

fraksenoj pasumos ĝis frumateno, kaj ke nokte li prenos fiakron, kaj ili elveturos trans la doganejon, vespermanĝos en antaŭurba gastejo, kaj la bufedisto kredos, ke ŝi estas lia fianĉino, kaj pli malfrue li kunprenos ŝin ankaŭ al Ameriko, aĉetos al ŝi altkalkanumajn lakŝuojn, longajn supergenuajn silkoŝtrumpojn, glimantan tulan jupon, kian aktorinoj havas, kaj ili flugos interbrakume en aŭtomobilo sur la avenuoj de Nov-Jorko. Anna nur levadis la ŝultrojn, priridis lin.

Tagmeze de vendredo la sinjorido igis primeti la tablon por du. Kiam ŝi enportis la unua pladon, li postulis, ke ŝi tagmanĝu kun li, almenaŭ ŝi dividu gluton kun li, sidiĝu kontraŭ li. Pro nenio en la mondo Anna estus sidiĝinta en la loĝejo.

Ankaŭ al tio li povis persvadi ŝin nur post longa petado-petegado, ke unufoje ankaŭ tage ŝi envenu al li sur la ripozliton, la lastan tagon, sabate posttagmeze.

Johaĉjo fermis la latŝutrojn, kvazaŭ estus nokto, lumigis ĉiujn lustrojn.

Unue en la banoĉambro li aspergis la korpon de Anna per parfumŝprucilo. La knabino serioze staris en la alkoholnubo, nur tiam ŝi ekŝrikis, kiam ĝi tiklis ŝiajn mamojn kaj ekfluis malsupren sur ŝia ventro.

De tie ili iris en la salonon. Ĉiun ĝian plej etan areon ili konsekris per siaj kisoj. Ilia pilgrimo finiĝis ĉe la ripozlito.

Ĉirkaŭ la sepa Johaĉjo ekbruligis cigaredon. Li deziris ion novan.

– Anna – li diris oscedante –, donu al mi la telefonon.

La knabino alportis la aparaton kun la dek-sesmetra ŝnuro, kiu pendis de ŝi kiel mortinta boao.

– Dankon – diris Johaĉjo kaj jam delevis la aŭdilon. – Nun vi povas eliri.

Li vokis Joĉjon Elekes.

– Ĉu estas vi?... Nu, estas ja bele deflanke de vi... vi eĉ la nazon ne ŝovis al mi. Jam la trian tagon mi ne iras en la bankon, kaj vi... Ne, amiko, ne... Io alia... pli granda afero, amiko... Mi rakontos... Tiel ne eblas... Tiam tuj venu... En ordo... Mi atendas vin... Ha lo, halo... Kio?... Mi ne komprenas... Vi la mian... Ŝtipkapa...

Li reĵetis la aŭdilon, ridetis pro la aŭdaca deziro, kiun li tiel lerte re-

puŝis. Li reordigis sin, sidiĝis al la piano. Li klavadis tiun solan danc-pecon, kiun li scipovis, modan *one step*. Li zumkantis la tekston.

Vi igis min ami vin,
Mi ne volis fari ĝin,
Vi igis min deziri vin
Kaj tuttempe vi sciis ĝin...

Elekes jam frapis ĉe la pordo, sed li muĝe kantis plu, frapadis la klavojn:

Vi feliĉigis min,
Foje vi ĝojigis min,
Sed estis fojoj, *kara*,
Kun vivo terura.

– Nu – demandis la amiko –, ĉu vi do ne estis malsana?

– Ne – diris Johaĉjo.

– Kvankam vi aspektas terure malbone.

– Ĉu? – kaj li stariĝis antaŭ la spegulo.

Liaj okuloj estis sangaj, lia vizaĝo mortpala. Li ĝojis pri tio.

– Povas esti – li jesis. – La kapo vere doloras min.

– Ĉu via malplena kapo? – daŭrigis Elekes, kiu eĉ unu okazon ne lasis pretergliti esti sprita. – Kio doloras en ĝi.

– Ne spritaĉu, Elekes. Temas pri serioza afero.

– Ĉu vi estas enamiĝinta?

Anstataŭ respondi, Johaĉjo sidiĝis sur la alttonaj klavoj de la piano, kiuj maldece kaj aĉe ekŝrikis.

– Ĉu knabino? – interesiĝis Elekes. – Ĉu edzino? Kie vi pinĉis ŝin?

– En la sukeraĵejo Gerbeaud.

– Ĉu privata?

– Aktorino.

– Aĥ! Kie ŝi ludas.

– En diversaj lokoj. Ŝi dancas.

– Aŭ tia. Kiam vi logpinĉis ŝin?

– Merkrede vespere. Mi alparolis ŝin en la malgranda salono. Amiko, amiko mia! Kia katineto, kia demono. Ŝi tuj venis kun mi. En sia aŭtomobilo. Ŝi havas aŭtomobilon. Ŝi iĝis mia amatino.

Kaj kie vi renkontiĝas?

– Ĉi tie.

– Hm – enpensiĝis Elekes kaj ridetis pro envio. – Vi, mizerulo, do ŝi venadas ĉi tien?

– Ĉiutage, post kiam la gemaljunuloj forveturis. Ĉiunokte. Kaj ankaŭ tage. Ŝi ĵus foriris. Antaŭe, kiam mi telefonis, ŝi ankoraŭ estis ĉi tie. Ĉi tie – kaj li montris al la ripozlito.

Elekes ekflaris, sentis la odoron de la orkidea parfumo, vidis la iluminitajn ĉambrojn. La afero ja ne ŝajnis tiel neverŝajna.

– Ĉu diketa?

– Maldika.

– Ĉu blonda?

– Kaŝtaneca.

– Kiel ŝi nomiĝas?

– Donu vian honorvorton – diris Johaĉjo kaj dum li akceptis la amikan manon, li volis mensogi ion pompan, sed ne sukcesis. – Marianne. *Dear* Marianne – li suspiris.

– Nu jes – agnoskis Elekes. – Ŝi devas esti bona dameto. Tamen atentu! – li avertis sian amikon. – Ne kaptiĝu! Tiaj estas pli ofte histeriulinoj.

– Mi scias, sed ho, kia histeriulino! Imagu, ŝi strabas, kiam mi kisas ŝin. Deliras. Krome, Elekes, atentu... He, vi, Elekes... Ĉu vi atentas?...

Elekes atentis, la amika reciprokeco devigis lin, ĉar en simila okazo ankaŭ Johaĉjo disponigis sin.

Sed la buŝo de Johaĉjo restis malfermita: li mutiĝis.

Dum li parolis, Anna paŝis en la salonon kaj anoncis, ke la kolaziono estas preta.

Li ĵetis rigardon al la knabino, poste al Elekes, kiu returnis sin, same rigardante la servistinon.

Li atendis, ke el Elekes elŝprucos ridego, montros al la knabino, en kiu laŭ lia preciza priskribo li tuj rekonos la aktorinon kaj senvualigos lin.

Sed okazis ne tio.

Elekes estingis sian cigaredon sur la cindrujo kaj ekiris kun ĝi al la kolaziona tablo.

Tio iom mishumorigis Joĉjon.

Tiu senkolora, senforma malgajo deprimis lin, kiel dum tempoj, kiam li restis sola.

Kaj ĉar li ne povis elteni eĉ por minuto ĉagrenon, kaj ekscitite li protestis kontraŭ tio, ke li komprenu ties kaŭzon, aŭ ke li transdonu sin al ĝi kaj „elĝuu" ĝin, li aplikis nenaturajn rimedojn, kiel morfino, kiu ĉesigas la dolorojn per injekto. Rapide li plenigadis el la ĉerizbrando, intertintigis la glason kun sia amiko kaj trinkis, fajfetadis. Post la kolaziono li elportis sian ŝatatan libron, voĉlegis el ĝi kaj amuziĝis pri tio, ke de li ne konataj poetoj trenas sin kun breĉita kranio, elartikigitaj membroj post siaj kotmakulitaj, gloraj sonĝoj. Ili provis ankaŭ telefonan trompon. Sed ĝi sukcesis nur duone. Ili vokis telefone unu el siaj komunaj amikoj. Tiu ne estis hejme, tial ili povis sciigi nur al lia vidva patrino, ke lia filo anoncu sin morgaŭ matene je la oka horo, pro sia intereso, ĉe la politika detektiva sekcio.

Elekes rigardis sian horloĝon, li ankaŭ foriris, kiom ajn Johaĉjo retenis lin. Ankaŭ li havis rendevuon. Evidente kun alia aktorino.

Restinte sola, Johaĉjo sola brandumis. Sed per mallerta movo li depuŝis la botelon, kaj la ĉerizbrando verŝiĝis sur la blankan persan tapiŝon.

Anna purigis la tapiŝon, forbalais la cigaredan cindron, reordigadis, ĉar la du pokalherooj sufiĉe renversis la loĝejon.

La sinjorido tenis sin rekte. La alkoholo ne kapturnis lin. Li estis speco de „seka" ebriulo, rigida kaj malserena.

Tamen li devis diri ion al ĉi tiu knabino.

Li stariĝis de la tablo, sen ŝanceliĝo ekiris al ŝi.

– Rigardu min! – li diris kaj metis sur la nazon ruĝajn okulvitrojn, kaj tra la papermembrano li strabis al ŝi, por ridigi ŝin.

La knabino ne ridis.

– Ha, kiel malbela vi estas – ŝi gapmiris. – Kiom vi aĉigis vin!

Johaĉjo elprenis el sia poŝo la revolveron, direktis ĝin al la knabino, celis kaj malŝargis ĝin. La revolvero miaŭis.

– Ĉu vi teruriĝis? – li ridegis kaj postiris la knabinon, kiu ankoraŭ retroiris kun levitaj manoj. – Nu, ne timu! Tio estas nur ŝerco. Venu al mi! Mi ankoraŭ montros ion.

El sia monpaperujo li elprenis nigraflankan bankbileton.

– Ĉu vi jam vidis ion tian? Amerika mono. Dolaro. Ĉu vi scias, kiom ĝi valoras? Amasegon da mono. Kaj ĉi tiu estas franca kaj ĉi tiu nederlanda. Valutoj.

Kiam li reŝovis la bankbiletojn en sian papermonujon, li disstreĉis sin. Li sentis, kvazaŭ lia kapo estus pumpita malplena, kaj lia spino konsistus el vitro.

– Preparu la liton! – li diris. – Hodiaŭ mi frue enlitiĝos. Matene venos la altmoŝtaj gesinjoroj. Aĥ jes, ne diru eĉ vorton pri tio, ke mi ne vizitis la oficejon. Nek pri s-ro Elekes. Mi aranĝos tion.

Anna plenumis dum la kvar tagoj ĉiujn siajn laborojn, kiujn oni konfidis al ŝi. Multajn ŝtrumpojn ŝi riparis, multajn ĉemizojn ŝi flikis. Ŝi pakis ilin en du tukojn. Ankaŭ la ŝtuparejon ŝi purlavis. La altmoŝta sinjorino jam povis veni.

En ĉi tiu nokto ŝi vane atendis la sinjoridon en la kuirejo, li ne venis al ŝi. Kvankam ŝi nun tre timis sola. Ŝi vidis daŭre tiun ruĝokulvitran, blankvizaĝan figuron, kiu alcelis ŝin per revolvero kaj ludis ŝercon.

Je la dua la kuireja fenestro frapiĝetis. Ŝi ellitiĝis kaj fermis ĝin.

Ekstere ekestis malvarma vento. La arboj muĝis.

Poste ŝi aŭdis, ke pluvas.

Io tre amara

Matene ĉiam plu pluvis.

Insista, obstina pluvo ĝi estis. Malrapide ĝi ploretis, plaŭdetis en la kota korto.

La gargojloj vomis sian ŝaŭmakvon.

Elrigardante Anna vidis, ke ronde-ĉirkaŭe la ĉielo nubiĝis. Eĉ manplato da blua makulo ne restis. Ŝi pensis pri tio, kiel bone estus etendi supren longegan balailstangon, forpurigi la nubojn kiel araneaĵon el ĉambroangulo.

Ŝi rapide desupris kaj sub kaduka ombrelo atendis siajn gemastrojn. Ŝiaj manoj tremetis. Ili ne eksciu, nur ne ekvidu tion je ŝi, ĉar tiun honton ŝi ne transvivus. Ŝi sobtiris profunde sian kaptukon.

Ges-roj Vizy, alvenintaj per la nokta pasaĝertrajno, veturigis sin per fiakro antaŭ sian domon. Unue ŝi ekvidis la altmoŝtan sinjorinon. Tiu jam de malproksime kriis al ŝi, ĉu la domo estas en ordo. Anna kapjesis, ke ĉio estas en ordo.

Ĉu ne estis multe da problemoj pro la sinjorido? Ne, pro la sinjorido ne estis multe da problemoj, ŝi diris kun mallonga pripenso, poste atendis, kvazaŭ ŝi ankoraŭ volus diri ion.

Unue la sinjoro elsaltis el la fiakro en sia vojaĝĉapo kun ledbotelo, pendanta de kolrimeno. Anna transprenis la valizojn, klopodis alsupri.

Dio scias, ŝi eble iom ĝojis, ke ili alvenis, kaj ĉio resaltos en la malnovan sulkon. Ankaŭ s-ino Vizy ĝojis. Ŝi retrovis la knabinon, la malnovan knabinon. Anna bakis freŝan bovlokukon por surprizo kaj transdonis la loĝejon en ekzemplaj ordo kaj puro. Sed la mastrino jam alkutimiĝis al tio. Krome restadante en ĉi tiuj tagoj en aliaj cirkonstancoj kaj kontaktante multajn fremdulojn, ŝi kolektis novajn spertojn kaj nun ŝi prijuĝis sian hejmon, la proprajn aferojn per pli freŝaj okuloj, pli sendepende. Ŝi tuj ankaŭ rakontis, ke la servistinoj en Eger vekiĝas ĉiutage je la kvara, helpas eĉ en la bieno kaj apenaŭ ricevas iom da salajro.

Ili malpakis, trinkis teon, ĉar dumvoje ili tramalvarmiĝis. Johaĉjo ankoraŭ dormis. Kun malfermita buŝo, kun duone fermitaj palpebroj li estis etendiĝinta sur la ripozlito, blanka kiel mortinto.

La pluvo torentis dum la tuta dimanĉo, tri tagojn ĝi ne ĉesis. Subite, tro frue, alvenis la aŭtuno.

La domo, la malgranda domo en la strato Attila iĝis eĉ pli malgranda, pli fermita kaj eĉ pli malluma. La aero malvarmiĝis. Sekvis malvarmaj matenoj. S-ino Druma, kies edzo perlaboris ĉiam pli multe, aĉetis galoŝojn kaj novan aŭtunan surtuton. Druma iradis-venadis en travidebla, angla pluvmantelo sur la ŝtuparo. S-ino Moviszter veturadis per fiakro al la amatora rondo por provoj, hejme ŝi deklamis poemojn meze de sia salono en profunde dekoltita negliĝo kliniĝante, kun emfazaj mangestoj.

Stefi kaj Etel ne plu klaĉbabiladis antaŭ la pordoj. La servistinoj sentis malvarmon. Ili varmigis sin ĉe la kuirfornoj, vespere skribis leterojn. Nur por momentoj ili elŝovis la kapon, por svingi en la libera aero la gladilojn, desegnante fajrajn rondojn en la nokto. La familio Ficsor vivis en sia subtera truo kiel talpoj. La edzino kuiris por matenmanĝo fritfarunan supon. Ficsor aperadis sombre en trahumidiĝinta poŝtista mantelo en la nebulaj koridoroj kiel fantomo kaj sakris, ke iu denove lasis malfermita la subtegmentan pordon. Pipo brulis en lia buŝo, kaj li tusadis. Liaj flavaj ŝuoj, kiujn li igis asigni al si, jam eluziĝis. La mallonga somero finiĝis. La malriĉuloj iom post iom malvestis sin, la riĉuloj vestis sin.

Johaĉjo vizitadis la bankon.

Liberigite el sia kvartaga, memvola enfermiteco, li kvazaŭ senpeziĝis, kiam li paŝis sur la straton. Hejme li ne plu trovis sian lokon. Liaj rememoroj plenigis lin per honto kaj tiom nervozigis lin, ke ofte li deviĝis paroli laŭte al si. La knabino estis jam neeltenebla. Post kiam Elekes vizitis lin tiun vesperon, li ne komprenis la tutan aferon. Kaj post kiam liaj geonkloj revenis hejmen, kaj la malnova ordo restariĝis, li eĉ rigardi ne povis al ŝi, korpe li suferis, se ŝi enpaŝis. Portempe li metis sin sub la ŝirmon de siaj parencoj. Li fuĝis de ŝi.

Pliparte li pasumis surstrate, rigardadis la virinojn. Kiel iu, kiu gardas sekreton, li returnis sin post ĉiu virino, senvestigis ĉiun virinon per sia rigardo. Dum la tekunvenoj de ges-roj Tatár li oscedadis kaj nerimarkite li forleporis. Li pinĉis al si sukeraĵistinon. Ŝi ne plaĉis al li, sed

kunprenis ŝin en silentan, burĝan hotelon en Buda, kie oni donas volonte tranoktejon por traveturantaj gastoj. Post la sukeraĵistino venis manekeno, pli malfrue onidira aktorlernejanino. Kun ili li rendevuis en fiakroj.

Por vespermanĝo li malofte revenis hejmen. Kun Elekes li faris al si neston en *Club des Parisiens*, kie li ricevis ĉiamgastan tablon.

Ĉi tiu nove fondita dancdrinkejo estis lukse instalita laŭ la tiamaj cirkonstancoj per ĉiuspecaj speguloj, lustroj, oritaj gipskolonoj. Ĵazbando senĉese muĝadis ĉi tie. Ĵazbandoj havas la nepran avantaĝon, ke ĉe ili oni ne nur pensi, sed ankaŭ senti ne povas. Tiu eminenta publiko, kiu vizitis ĉi tiun klubon, bezonis ĝuste tion. Eksterlandaj ĉenkomercistoj vizitadis ĝin krom riĉiĝintaj militaj liverantoj, Ententoficiroj kaj pli bonkvalitaj noktulinoj, gajaj militaj vidvinoj, iamaj vivkunulinoj de herooj, kiuj kun rigardo al la ekonomiaj cirkonstancoj ĉi tie serĉis la dankon de la postepoko. Ĉiuj ĉi tiuj kun ĝojo aŭskultis la negran orkestron, kiu imitante la muĝadon de sovaĝbestoj, vomojn de militaj trosatiĝoj, superbruis ĉion, ankaŭ la agitiĝantan malesperon kaj naŭzon. Oni iom obtuziĝis de ĝi, poste dancadis.

La dancejo estis mem vera vidindaĵo. Vitroplato kovris ĝin, de sube rozkoloraj elektraj lampoj lumigis ĝin, kiujn ĉirkaŭis florplektaĵoj, tiel do ĝi aspektis kiel varma, feina sketejo. Johaĉjo ĉi tie pasigis ĉiun sian vesperon ĝis la fermohoro. La virinoj konis lin, petis de li cigaredojn, repage-neniutage, ankaŭ ŝatis lin. Li dancis *one step* kun certa rigida eleganteco. Ofte li videblis en la tabakfuma kirliĝo, kiam li premis al si tian virinon, kaj klininte sian palan kapon, plezuriĝis pri siaj lakŝuoj, glitantaj sur la vitroplato.

Krepuskis frumatene, kiam li venis hejmen.

Lia ŝlosilo turniĝis malrapide en la serurtruo. En la antaŭĉambro li detiris la ŝuojn, en ŝtrumpetoj li ŝteliris al la ripozlito, por ne veki gesrojn Vizy.

Anna ĉiufoje aŭdis tion. Ŝi ne povis dormiĝi, dum la paŝoj de la sinjorido ne aŭdiĝis en la salono. Ĉiun nokton ŝi atendis lin. Kaj ankaŭ tage ŝi daŭre atendis lin. Ŝi atendis lin kaj atendis ion. Eble ke foje li diros al ŝi afablan vorton aŭ ridetos al ŝi, aŭ almenaŭ petos de ŝi ion aŭ

alion. Johaĉjo diris nenion. Li estis malserena kaj rapidis. Evidente li koleris ŝin.

Kvankam por kontentigi lin, ŝi jam pli zorgis pri sia eksteraĵo. Ĉiutage plurfoje ŝi kombis sin, rigardadis en la spegulon, eĉ hejme, dumlabore ŝi surhavis sian plej belan robon. La unusolan kvadratitan.

En novembro la noktoj fariĝis pli longaj. De Délivasút aŭdiĝis la fajfoj de trajnoj. Fojfoje erarinta lokomotivo plorŝuŝis en la malhelo, kortuŝe kaj plende kvazaŭ infano.

Dimanĉe s-ino Vizy iris en preĝejon. Vizy jam foriris elhejme. La sinjorido vekiĝis malfrue. Li aranĝadis siajn pantalonojn antaŭ la ŝranko.

Anna malfermis la fenestrojn por purigi. Kiam ŝi preteriris la ŝrankon, ŝi prenis kuraĝon kaj alparolis lin:

– Sinjorido, mi petas vin…

– Kion vi volas?

– Bonvolu pardoni min…

La knabino ekploris. Ŝi ploris senvoĉe, sed tiel forte, ke ŝia tuta korpo skuiĝis.

Johaĉjo gapis al ŝi. Dum tempo li eĉ ne trovis vortojn.

Ĉu ĉi tiun li amis, ĉu eblas, ke ĉi tiun li iam amis?

Per la manoj ŝi viŝadis siajn larmojn, plorsnufis per la nazo, kiu ruĝiĝis kiel tiu de drinkemaj kamparaninoj. Ŝia talio estis ĉirkaŭita per berlina tuko. Per la tuko ŝi enportis la humidan odoron de la aŭtuno, kiel hundoj, venantaj de ekstere.

Tra la malfermita fenestro susuris trablovo. Anna nur ploris, ploris kiel paspluvo. Kaj balbutis ion, el kio nur unu vorton eblis kompreni: „honto… la honto…”

– Tio estas neebla – diris Johaĉjo. – Tute neebla. Estas ekskludita.

– Jes ja…

– Ne ploru! Ne ploru, mi petas vin – li petegis kaj ŝtopis la orelojn, por ne aŭdi la ploradon kiel iam ŝian ridadon. – Nur ne ploru!

– Ve, sinjorido…

– Silentu! Tiel ne eblas interparoli. Ĉu vi jam silentiĝos? Nu jes. Unue: la afero ankoraŭ ne estas tiel certa. Entute ne certa. Nepras atendi.

Li ektremis pro la naŭzo, ke tiel li traktas kun „ĉi tiu”, en tiel aĉa komuneco.

– Ĉiuokaze nepras atendi – li aldonis kaj levis la ŝultrojn. Li kredis kaj ankaŭ ne kredis tion. Povas esti, ke ŝi volas ĉantaĝi lin. Tamen li interesiĝis ĉe ŝi ĉiutage.

Anna skuis la kapon.

Johaĉjo menciis en *Club des Parisiens* al Elekes tiun certan aktorinon.

– Amiko – li diris, dorsklininte sin en la fotelo –, amiko, kompaĉjo. Estas tubero. La plej granda tubero.

– Ĉu nur tiom? – diris Elekes kaj flustris ion en lian orelon.

– Ĉu certa?

– Plejeble certa. Ankaŭ ni uzas ĉiam tion.

Nokte li stariĝis al la lito de Anna:

– Varmegan piedlavon. Faru tre varmegan piedlavon. Kian vi eltenas.

Ŝi tiom boligis la akvon, ke ŝi povus senplumigi en ĝi kokinon. Ŝi mergis en ĝin la piedojn. Ŝi siblis de la varmego.

– Nu? – demandis Johaĉjo post kelkaj tagoj.

Anna denove skuis la kapon.

– Nekredeble – li murmuris. – Tio estas jam vere nekredebla – kaj klakigis la fingrojn.

Li sidis en peĉo, ĝiskole. En amaso da embaraso. Kiel aĉa afero, kia skandalo iĝos el ĝi printempe!

Elekes proponis ginekologon, kiu estas entuziasma amiko de la artoj kaj kondutas aparte galante al aktorinoj. Johaĉjo trovis komplika, kunpreni tien kaj prezenti sian aktorinon. Je tio lia kompano konatigis lin kun simpatia kosmetikaĵvendisto, kiu nun vivas el tio, ke kontrabandas silkon el Vieno kaj hungarajn altkvalitajn cigarojn al Ĉeĥoslovakio. De tiu li ricevis ion.

Li profitis la momenton, kiam lia onklino eliris por io en la koridoron.

– Jen ĝi – li flustris rapide al Anna.

– Kio?

– Medikamento – kaj ŝovis en ŝian manon kvar unugramajn pulvor-

ojn. – Kaŝu ilin – li atentigis ŝin, kiu scivole turnadis la paperajn ujetojn. – Poste enprenu ĝin!

– Ĉu mi glutu la tutan?

– Vi ne komprenas. La pulvoro enestas en la ujeto. Vi malvolvos ĝin, solvos la pulvoron en akvo kaj trinkos ĝin.

– Ĉu nun?

– Kiam vi enlitiĝos. Ĝis mateno ĝi helpos. Sed oni ne rimarku tion. Ĉar ĝi estas malpermesita. Se oni ekscios, vi povus esti enkarcerigita.

– Ĉu do tiam mi ne enprenu ĝin, sinjorido?

– Jes ja! Malgraŭ tio enprenu ĝin! Sed rakontu tion al neniu! Atentu!

Anna agis, kiel li ordonis.

Kiam la domo silentiĝis, ŝi malvolvis la paperan ujeton.

En ĝi estis blanka pulvoro kiel subtila faruno. Ŝi ankaŭ flaris ĝin. Ĝi havis nenian odoron.

La enhavon de ĉiuj kvar ujetoj ŝi ŝutis en glason da akvo.

Sed en la kuirejo ŝi tamen ne kuraĝis trinki ĝin. Ŝi eliris en la latrinon. Ferminte la okulojn, ŝi eltrinkis ĝin unutire.

Dio mizerikorda, kiel amara ĝi estis, Sankta Maria, Beata Virgulino, ho, kiom amara ĝi estis! Ion tiel amaran ŝi ankoraŭ neniam trinkis en la vivo.

Kaj nur poste ĝi fariĝis vere amara, kiam ŝi jam revenis kaj kuŝiĝis en la lito. Tiu malbenita amaraĵo mordis ŝian palaton, bruligis ŝian gorĝon. Nur veneno povas esti tiel amara.

Ŝi gluis sian manoplaton al la buŝo, ŝovis la manon al la lango, por kapti tiun amaraĵon; ŝi miris, ke ekzistas io tiel amara en la mondo. Eĉ ŝiaj haroj amariĝis de ĝi.

Ŝi dormis horon aŭ tri, kiam ŝi rondigis la okulojn kaj rigardis fikse al la fenestro. La lumo sur la fajromuro ekbriladis en oranĝkolora lumo, tiel ĝi saltadis, ke ŝi plezuriĝis pri ĝi.

Ĉu oni sonorigis ie? De malproksime aŭdiĝis sonorado, sonoriloj sonis kun obtuza, profunda muĝado, ĉiam pli laŭte. Ŝi ekiris rigardi, kie oni sonorigas tiel malfrue.

Tiam envenis homo, tre, treege granda homo, tiel granda, kian ŝi ankoraŭ ne vidis. Kiel li envenis, kiam la pordo estas ŝlosita? Li staris

ĉe ŝia lito, giganta kiel ĉevalo.

„Nuu, kion vi faras, hee? Restu trankvila! Patro, kara mia patro, rigardu ŝin, ŝia kapo estas el ŝinko. Neniam tuŝu ŝin! Ankaŭ tiu nur ŝajnigas tiel. Kiel la balailo, kiu sidiĝis sur la seĝo, pro foleco. Ĝi forlasos ĝin."

„Ankaŭ por mi estus jam pli bone balai, ĉar mi dronos en malpuraĵo. Mi eltiros ankaŭ tiun tirkeston kaj kion mi vidas? Ĝi plenplenas de mileo."

„Altmoŝta sinjorino, ho ve, kiom vi bonvolis timigi min. Mi kredis, ke vi falegis de tiu muro."

„Kaj ĉi tiu, kion li volas? Iru en la inferon, vi bruto! Mia farunaĵo misbruliĝos, troboliĝas mia lavakvo. Lasu min!"

– Kio trafis vin? – demandis s-ino Vizy, kiu klinis sin super ŝin. – Ĉu vi estas malsana?

Anna dormis tiel profunde, ke eĉ ŝia spirado ne aŭdeblis.

– Anna – ŝi skuis ŝin –, Anna! Ĉu vi ne komprenas?

La knabino turnis sin al la alia flanko.

– Malsana – ŝi pensis.

Ŝi tuŝis ŝian frunton. Ĝi estis tute malvarma. Ankaŭ ŝiaj manoj kaj piedoj, kiel glacio.

– Se ĉi tiu mortos ĉe mi – ŝi pensis.

Ŝi kuris por la doktoro. Moviszter estis elirinta al siaj malsanuloj en Kispest, oni atendis lian revenon nur por la konsultaj horoj.

Portempe ŝi regalis ŝin per rumteo, instigis ŝin trinki ĝin, ĝi travarmigos ŝin.

La knabino moviĝadis, montradis ion. Ŝi petis fari lumon.

– Kial? – miris s-ino Vizy. – Estas jam mateno. La oka kaj duono – ŝi diris terurite.

Anna skrapadis kun terura timo ĉirkaŭ si, poste premis la manojn sur la okulojn. Ŝi vidis nenion. Ĉirkaŭe la mondo estis nigra: ŝi blindiĝis.

Ŝi falis denove en profundan dormon kaj eĉ ne vekiĝis, ĝis la sinjoroj venis hejmen kaj komencis tagmanĝi.

S-ino Vizy parolis ĝuste pri tio, ke ĉi tiu knabino malsaniĝis ŝarĝe al ŝi. Tiam ŝi aperis en la manĝejo kun pleto.

– Ĉu vi fartas pli bone? – scivolis s-ino Vizy.

Anna jam vidis ĉion, sed ne aŭdis, kion ili parolas. Nur la buŝoj moviĝis ĉirkaŭ ŝi.

– Ŝi malvarmumis – diris Vizy.

– Certe – konsentis Johaĉjo. – Iom da malvarmumo.

– Tamen mi vokos malsupren la kuraciston – cerbumis s-ino Vizy.

– Kiel vi pensas – rimarkis Vizy. – Sed vi scias, kiaj estas ĉi tiuj kamparanaj knabinoj.

– Jes – diris Johaĉjo. – Kaj cetere, ŝi jam pli bone fartas.

Ĝis vespero ŝi vere tute bonfartiĝis, ŝi mem petis ne ĝeni la doktoron.

Ankoraŭ tra tagoj ŝiaj okuloj blindumis, zumis en la oreloj. Foje ŝi ne vidis la glacišrankon, alifoje lasis fali arĝentan kuleron kaj ne aŭdis tion. Kaj ŝia koro tiom premiĝis, kiel tiunokte, kaj ŝi estis tiel malgranda, kaj ĉirkaŭ ŝi ĉio tiel granda.

– Eble vi havas misdigeston – konfesigis ŝin s-ino Vizy. – Rememoru! Kion vi manĝis? Certe vi tro multe manĝis el io, kion vi ŝatas.

En taŭga momento Johaĉjo saltis al ŝi:

– Ĉu vi estas en ordo?

– Jes.

– Nu vidu! Mi ja diris.

– Nur ĝi estis tre amara – diris Anna kun pala, konvaleska rideto. – Tiel multe amara ĝi estis.

– Ĉu amara? – ripetis la sinjorido – Ĉiu medikamento estas amara. Gravas, ke ni estas trans tio. Nu, Dio benu vin!

Sed al li jam trosufiĉis la tuta afero kaj ankaŭ ges-roj Vizy, kiuj daŭre disciplinis lin pro la malfruaj hejmenvenoj. Li mem prenis la aferon de sia loĝejo en la manon. Kun la vizitkarto de la ministro li iris en la loĝejasignan oficejon, por povi enloĝiĝi en sian ĉambron en la strato Márvány, kiun oni jam antaŭ du semajnoj promesis al li. Li sukcesis aranĝi tion en kvardek ok horoj.

Ĝi estis tria-etaĝa ĉambro, ne granda, sed alstrata, kaj kio gravas, kun aparta eniro. Jam samtage li prenis siajn sakon kaj pakon, kisis onklinon Angéla, onklon Kornél kaj vespere li jam ne revenis al ili.

Johaĉjo sidis en sia nova ĉambro en sia opusum-pelta surturo. Li babilis kun Elekes.

Oni sonorigis ĉe la pordo. Anna alportis kelkajn aĵojn. Ŝi demetis ilin.

– Dankon, Anna! – diris la sinjorido kaj premis centkronon en ŝian manon.

Li ankaŭ akompanis ŝin ĝis la pordo. Tie li diris:

– Atendu momenton!

Ion li elprenis el la poŝo de sia vintra surtuto kaj donis al ŝi.

– Ankaŭ ĝi estas la via.

Anna rigardis surstrate, kio ĝi estas.

En papersaketo estis maronoj, malgrandaj, iom karbigitaj hungaraj maronoj, sed ankoraŭ varmetaj. Nun ŝi vidis, ke la sinjorido tute ne koleras ŝin.

Vintro

En novembro la rumanoj komencis prepari sin.

La avangardoj de la nacia armeo atingis la 14an de novembro 1919, vendrede ja la oka horo matene la linion de Danubo. En Peŝto ankoraŭ ordotenaj taĉmentoj gardis la publikan ordon, kiam en la strato de Buda jam agloplumoj flirtadis kaj ŝtalkaskoj de soldatoj ekbriletadis en la sunlumo.

Ĉiuj tumultis al la fenestroj, svingadis tukojn al la masivaj grandebenaĵaj knaboj, kiuj streĉrigide marŝis. Transe, sur la peŝta flanko la homoj kuris sur la balkonojn, per lornoj observis la unuajn soldatojn. Tio estis silenta, emociiga revido. La kaŝvaguloj, kiel tiomfoje en la hungara historio, revenis hejmen.

La ekipaĵĉaregoj de la enmarŝanta armeo klakadis tra tagoj sur la bulvardoj. Ree la malnovaj klarionsignaloj aŭdiĝis, vespere je la naŭa en la kazerno Ferdinánd oni blovis noktan ripozon, kiu revokis la soldatojn, la „ĉifonajn soldatojn". Kaj la dek-okan – estis nebula, morna antaŭtagmezo, la ruĝa suntelero ŝvebis malalte sur la arktikeca ĉielo – ĉe sonorilmuĝo kaj episkopa celebrado enrajdis la Ĉefkomandanto sur la vojo Fehérvári. En ministeria delegacio ankaŭ Kornél Vizy staris akcepte en cilindra ĉapelo. S-ino Vizy en la dama komisiono de la parlamento transdonis florojn, nacikolorajn rubandojn kun funebra vualo.

Anna laboris sola. La domo estis malplena kaj silenta. Ankaŭ fajfetado ne aŭdiĝis. Ŝi kubutis sur la balkona balustrado, skuis la polvotukon, eniris iun ĉambron, kvazaŭ serĉante ion kaj revenis. Ĉe la aerumado la aerblovo ankoraŭ longe ŝvebigis la multajn bonodorojn el la banoĉambro, kiu sorbiĝis en la meblojn.

– Ĉu vi aŭdas? – diris s-ino Vizy, kiam ŝi sidis en la salono kun sia edzo. – Ŝi kantas.

Anna zumkantis ian gajan melodion.

Vendrede, vespere, sabaton vespere,
Mi revidos amatinon ekstere.

– Estas strange – ŝi diris. – Ĝis nun ŝi neniam kantis.

– Nu kaj? Ŝi havas bonan humoron. Ĉu vi volus, ke ŝi ploru?

Iun antaŭtagmezon ŝi purigadis viandon sur hakbreto. Foje ŝi eksiblis.

– Kio okazis? – teruriĝis s-ino Vizy, kiu sidis sur la knedujseĝo.

– Mi tranĉis min.

Sango inundis ŝian manon. La tranĉilo, la granda kuirtranĉilo penetris en ŝian dikfingron, preskaŭ fortranĉis la fingroston. Aĉa, faŭkanta vundo estiĝis.

– Kial vi ne atentas?

– Bonvolu lasi ĝin!

Li purlavis ĝin ĉe la krano, funde prisutis ĝin per kuireja salo, envolvis ĝin per ĉifonpeco. Sed la ĉifono baldaŭ traruĝiĝis.

Oni sendis ŝin al la doktoro. Tiu ŝmiris ĝin per io pika, bele bandaĝis ĝin, karesis ŝian vizaĝon kaj diris, ke ĝi resaniĝos, ĝis ŝi iĝos fianĉino. La doktoro estis tre afabla, delikata homo.

Rigora vintro alvenis. Forte frostis, tiel densa nebulo sinkis sur la urbon, ke eĉ du paŝojn antaŭen oni ne povis vidi. Frugilegoj giradis en la alto.

Poste falis la unua neĝo, ĝi kovris la vojojn, tramoj blokiĝis, sur la Ĉen-ponto la omnibuso same ne trafikis. Daŭre neĝis. La policano, la dika policano jam frumatene sonorigis ĉe la dompedelo, ke la trotuaro devas esti purbalaita, alie li denuncos lin. Matene je la kvina, kiam ankoraŭ ĉiuj dormis, Anna elvenis en sia kvadratita robo, kiun ŝi ne plu demetis, ĉirkaŭrigardis en la blue violkolora neĝado. Profunda silento ĉirkaŭis ŝin. Paseroj saltadis sur la nudaj branĉetoj. Per toporo ŝi rompis la glacion, balais la neĝon.

Homoj ankoraŭ ne pasis sur la stratoj. Ĉirkaŭ la oka oficistoj iradis al la Kastel-monto kun cigaro en la buŝo. Ankaŭ Moviszter amblis malsupren. Li jam surhavis vintran ĉapon, per orelŝirmiloj li gardis siajn sentemajn orelojn. Kelkfoje li haltis en la dompordo. Li demandis ŝin, kio nova, prenis en sian manon ŝian vundan fingron, sur kiu la bandaĝo jam malpuriĝis, murmuris, ke endas meti novan.

La vundo dum la vintraj laboroj ree kaj denove malfermiĝis, ŝia mano doloris, frostiĝis, aspriĝis, la fendetojn kovris karbopulvoro. Ĉiu virino iom malbeliĝas en frostotempo. Sed la servistinoj tiom malbel-

iĝas, ke inter iliaj ĉifonoj apenaŭ rekonas ilin tiu, kiu somere, en sunvarmo vidis ilin. Ankaŭ Anna malbeliĝis. Ŝiaj haroj faladis: ĉiam pli da hartufoj restis en la ferkombilo. Ŝi ne ŝatis montriĝi antaŭ homoj.

Nun ŝi sentis unuafoje laciĝon, specon de tia ebria elĉerpiĝo tiagrade, ke vespere, kiam ŝi finis, ŝi ne povis tuj enlitiĝi; iradis tien-reen, svingadis la brakojn, frapante siajn ŝultrojn ŝi iradis en la koridoron kaj reen, enpaŝis en la ĉambron, en la salonon. Foje s-ino Vizy demandis ŝin el la lito respondecige, kion ŝi faras.

Anna ektremis. Ŝi ne sciis, kion ŝi faras, ŝi ne sciis eĉ tion, kio okazas al ŝi.

La sinjorido ne plu manĝis kun ili, kvankam oni petis lin veni, kiam li volas, ĉiun dimanĉon kaj festotagon li estis invitita por tagmanĝo. Unufoje li venis. Anna ankoraŭfoje vidis lin tra polurita fenestro en la kafejo, kun ia longa stango en la mano li klinis sin super verda tablo. Poste ŝi ne plu vidis lin.

Dum la tagoj pasis, ŝi iĝis apatia, io paraliziĝis en ŝi. Ŝi preskaŭ ĉion forgesis, kio okazis al ŝi. Malgraŭ tio ŝi suferis. Ĉar eĉ se ŝi ne pensis pri la okazintaĵoj, ŝi sentis, ke tio, kio okazis, jam ne estas, simile al besto, kiu vivas ekster pasinteco kaj estonteco en la eterna nuno, kiel hundo, kiu ne ricevas por manĝi kaj ne scias, kio premas ĝin, kaj malgraŭ tio ĝi ree altrenas sin al la malplena manĝujo, ĉirkaŭflaras ĝin, kaj post kiam ĝi vidas, ke nenion ĝi trovas, deprimite ĝi tiras sin reen al sia nesto, kelkfoje reokulumante.

Foje, ĉirkaŭ vespero tiel ŝi staradis antaŭ la pordo de la tegmenta ŝtuparejo, obtuzmense, kun malplenaj manoj.

– Envenu, kara – alparolis ŝin Stefi –, mi montros ion.

Ŝi montris al ŝi rozkoloran robon, belegan rozkoloran pecon, kiun ŝi kudris al si. Poste ruĝigita de ekscito, ŝi eldiris la sekreton, ke baldaŭ estos balo, solenaĵo, antaŭ la grandaj sinjoroj cent paroj dancos la hungaran rondodancon, nuraj moŝtaj fraŭlinoj, filinoj de advokatoj, kuracistoj, kaj ankaŭ ŝin oni elektis inter la dancistinojn, kaj nun ŝi devas ĉiutage viziti danclernejon, rigora dancmajstro instruas ilin. Kaj ĉi tiun bonŝancon ŝi ŝuldas al krongardisto[20], kiu amindumas ŝin, unu el

[20] Krongardisto: uniformita gardistaro, respondaca por la sekureco de la kronjuveloj.

tiuj altaj, sveltaj knaboj, kiujn en Krisztinaváros oni nomas „rektuloj”, nu, tiu rekomendis ŝin kaj tiu estos ŝia dancpartnero.

Anna aŭskultis ŝin, kaj ŝi estis feliĉa, ke troviĝas, kiu aŭskultas ŝin. Poste plurfoje ŝi vokis ŝin al si. Ŝi logis ŝin en kinejon, ŝi nur venu, ŝi pagos por ŝi. Anna ekskuzis sin, ke ŝi ne havas konvenan veston, sed fine ŝi kuniris. Tiam ŝi vidis unuafoje kinejon. Sur la ekrano zigzagis aŭtomobiloj, iu falis en lagon, grafo interkisis kun grafedzino en ĝardeno. Stefi parolis pri la krongardisto. Tiu longe sopiris al ŝi, sed ŝi ne multe atentis lin. „Li nur suferu, tio ne malutilas al viroj, tiuj estas senescepte kruelaj.” Dume ŝi klarigis la bildojn. Iun maldikan kinoartiston ŝi aparte ŝatis, ĉiufoje, kiam li aperis, ŝi tuŝis la brakon de Anna. „Vidu, ĉi tiu estas laŭ mia stilo. Alta kaj pala. Kaj la via?”

Ŝi ne scipovis, kion respondi, ĉar ŝi ne komprenis, kion signifas „laŭ mia stilo”, krome ĝenis ŝin la multaj bildoj, la publiko, sidanta ĉirkaŭe. Ŝi dankis Stefi, sed alifoje ŝi ne kuniris. Ŝi ne havis tempon.

Preskaŭ la tutan tagon ŝi hejtis. Ĉe ili la plej multaj problemoj estiĝis ĉe la hejtado. Ĉiuj fornoj de ges-roj Vizy malbone funkciis.

Jam matene, post la neĝbalaado ĝi komenciĝis. Kun kandelo ŝi stumbladis en la kelon. La kelo estis profunda, ĝiaj muroj gute humidis, mucida varmo frapiĝis al ŝia vizaĝo. Ŝi plenigis per karbo la du sitelojn, sen kuraĝi ĉirkaŭrigardi. Ratoj venadis el la strato, ili boris subterajn tunelojn, pepadis ĉirkaŭ la lignoamasoj. Tiujn ŝi timis. Antaŭ matenmanĝo devis esti varme en la manĝejo. Ŝi metis lignon en la fornon, blovis, aerumis ĝin per sia antaŭtuko, sed la fajro nur flagretis, disvastigis sufokan fumon, la loĝejo pleniĝis de ĝi.

Ĉiufoje, ĉiun tagon tio okazis same, jen en ĉi tiu, jen en la alia ĉambro.

S-ino Vizy multe ĉagreniĝis:

– Kial vi ne vokas la kamenpurigiston?

– Ankaŭ hieraŭ li estis ĉi tie.

– Ĉu s-ro Báthory?

– Tiu.

– Do kulpas vi. Certe vi ne metas sufiĉe da brulligno.

S-ro Báthory, Árpád Báthory, nobelo kun tri antaŭnomoj loĝis kontraŭ ili, li purigis la kamentubojn en Krisztinaváros. Plurfoje li venis en

ilian domon, „kuglumis”, brulpurigis la kamentubojn. Sekvatage la fornoj denove fumis.

Foje Anna, kiam ŝia mastrino forestis, ekhavis ideon kaj vokis lin.

Li tuj venis.

– Kia tubero denove, Anjo?

– Ĝi ne brulas.

– Nu, ni riparos ĝin.

Li apogis sian eskalon al la muro, forpuŝis siajn ŝuojn de la piedoj, nudpiede li iris al la malsana forno.

– Tiel multe mi klopodaĉas – lamentis Anna.

– Ej nu – li skuis la kapon –, ej nu! – kaj li ekkompatis ŝin, kiel unu laboristo la alian.

Sed ŝi ne interesis lin, nur la forno. Li skuadis la fajrokradon, palpadis la argilŝtopaĵojn, preskaŭ tute li enŝovis sian kapon, tiom li serĉis la kaŭzon.

– La aero ĉiufoje refrapiĝas – klarigis Anna.

– Atendu momenton! – ekparolis subite la kamenpurigisto. – Kie estas la ŝlosilo de la tegmento?

S-ro Báthory post nelonge jam grimpis ekstere sur la neĝkovrita tegmento, muskolforte, lerte, kiel kato, al la patno, stariĝis apud la kamentubo kun la balailo – nigro en blanko – kiel nigra virkato. Iom li umadis ĉirkaŭ la ventoŝirmilo.

Anna rigardis lin el la korto.

– Tuj ni vidos – sobkriis Báthory en la dampa neĝo – ĉu jam sufiĉas la aerblovo.

Li jam venis malsupren sur la tegmenta ŝtuparo.

Anna demandis lin:

– Ĉu vi ne timis supre?

– Kion mi timus?

Kune ili iris en la loĝejon. Anna volis fari fajron.

– Lasu – forgestis la kamenpurigisto.

Li etendis sian grandegan manon en la ankoraŭ varmegan cindron, elprenis ĝin, li mem faris fajron per flamanta gazetpapero.

Kaŭre ili rigardis, kiam la flamoj ĉirkaŭlekis la fornointernon, la

brulligno kraketis, ŝutante fajrerojn.

– Ĝi nun devas bruli – diris s-ro Báthory kaj stariĝis.

Starante unu apud la alia, ili atendis, ĝis la lignostaketo traruĝiĝas. La kamentubisto enŝovelis ankaŭ sufiĉe da karbo, li kompetentis pri tio, li ne mortigis la fajron.

Post kelkaj minutoj ili aŭdis, ke la karbo krakas, ĝi cedis al la fajro. Ili almetis siajn manojn. Varmeta aero bloviĝis el la forno. La ferpordeto komencis ardiĝi.

– Nu – ridis s-ro Báthory, kaj el lia fulgoŝmirita vizaĝo ekbrilis liaj dentoj –, ĉu mi antaŭdiris?

– Dankon!

– Volonte, f-ino Anjo, ankaŭ alifoje. Nur transvenu al mi!

Ĉiuj tri kamentuboj de ges-roj Vizy gaje ellasadis la fumon al la sulfurflava ĉielo. De tempo al tempo s-ro Báthory interesiĝis:

– Ĉu ĝi brulas?

– Brulas.

– Nu jes. Ĝi devas bruli.

Merkrede aĉa tempesto tragalopis la urbon, la vento muĝis, skuis la domojn. Ekstere en Vérmező ĝi tiel furiozis kiel la lago Balatono vintre, kiam ne videblas ĝia bordo.

S-ino Vizy iris al la spiritistoj.

Anna varmigis sin antaŭ la forno, aŭskultis la tempeston. La oraj ardaĵoj spiris malrapide, ili kunfalis kun diamantaj flagretoj. La ferpordeto de la forno gapis al ŝi per siaj kvin ruĝaj okuloj.

Nun iu mallaŭte ekfrapetis la klinkon de la pordo.

Kiam ŝi malfermis ĝin, li vidis antaŭ si la kamenpurigiston.

– Ve – ŝi flustris –, kiom mi ektimis.

– Ĉu eble min?

– Jes.

– Kial?

– Vi estas tiel nigra.

La kamenpurigisto staris en la koridoro en sia rimena, nigra kostumo, kun la nigra kulero, nigra ŝnuro sur la ŝultro.

– Kiel vi povas esti tiel nigra – diris Anna inter ektimo kaj rideto –,

kiel la diablo.

– Nu – ŝercis s-ro Báthory –, ni ne estas tiel malbonaj.

Li enpaŝis. Lia ĉeno klakis en la duonlumo.

– Ĉu neniu hejme? – li demandis.

Li iom avancis en la lumrondon de la kuireja lampo. Li havis grandajn, bluajn okulojn, tute neverŝajne grandajn kiel de aktoroj, kiam ili farbas ilin.

– Kion vi faras?

– Mi volas baki kukon. Kaj vi?

– Mi pensis, mi envenos por momento. – Li restis staranta sur la sojlo de la kuirejo.

Anna metis en bovlon fermentaĵon, buteron, sukeron, salon. Surverŝis ĝin per varma lakto. Surŝutis farunon, kirladis ĝin.

La kamenpurigisto rigardis ŝian laboradon, longe li rigardis, ĝis li ekparolis:

– Nu, mi jam iras.

– Kien vi rapidas?

– Hejmen. Mi rigardos, ĉu tiu knabino estas jam hejme. Ŝi ofte pasumas.

– Kiam via edzino mortis?

– Baldaŭ antaŭ du jaroj. Aŭtune.

– Kian malsanon ŝi havis.

– Ftizon.

Anna demetis la lignokuleron, iom meditis kiel iu, kiu legas ion enhavoriĉan, plenan de vivo.

– Mi bezonus iun apud ŝi – diris la kamenpurigisto. – Mi ne kapablas eduki ŝin. Edzino necesus.

– Vi certe ricevos iun. Kiomjara vi estas?

– Tridek kvin.

– Ne maljuna. Kaj vi ankaŭ bone perlaboras.

– Oni ja proponadas. Ankaŭ nun. Vidvinon. En Erzsébetváros. Ŝi havas dometon.

– Nu, vidu!

– Sed mi ne bezonas ŝin. Se oni proponus vin…

– Ne ŝercu! – ŝi interrompis liajn vortojn mishumore, sen ĉia koketemo, ĉar nun ne plaĉis al ŝi, ke ŝi estas laŭdata; nun ŝi sciis, ke nun ŝi ne estas bela.

La kamenpurigiston altiris io, povas esti, ke ŝiaj suferoj, ŝia freŝa doloro, kiujn viroj tuj elflaras; humilo kaj senpoveco, kiuj ofte pli plaĉas al ili ol beleco. Li apogis sin al la pordofosto. Li ĝisatendis, ke Anna enĝustigas la kukon en la bakpleton. Tiam li ekparolis:

– Nun mi jam iras.

– Nun jam vere iru, s-ro Báthory. Tuj la gemastroj alvenos.

S-ro Báthory ne multe rezonis. Unu fojon ŝi ankoraŭ renkontis lin hazarde sur la strato, ree li menciis, nur ĝenerale, ke li bezonus edzinon, ke volonte li edzinigus Anna, se ŝi inklinus.

La edzino de la dompedelo plenumis laŭeble plej fervore sian komision. Ŝi persvadis Anna, kia bonŝanco tio estus, ne lasu pretergliti ĝin pro ĉio en la mondo. Ŝi laŭdis la kamenpurigiston, kiu estas sobra, diligenta homo, tre bone traktis sian unuan edzinon. Anna ne diris ne, nur petis tempon por pripenso. S-ro Báthory igis peti ŝin, viziti lin foje, pririgardi lian dommastrumon.

En iu tago de ŝia forpermeso li venis renkonte al ŝi en Vérmező, kondukis ŝin en sian loĝejon en la kvara etaĝo, en alkortan ĉambron.

Malvarma, vintra lunlumo tremetis sur la frostoflora fenestro kaj stane-mortule prilumis iliajn figurojn, kiam ili paŝis en la malluman ĉambron. Ili staris malproksime unu de la alia. Anna tuj rapidis al la fenestro kaj rigardis malsupren. Ŝi malkovris ilian domon, rekonis arbon, de ĝi sian fenestron kaj miris, kiel malgranda ĝi estas de tia alto.

La kamenpurigisto ekbruligis kerosenan lampon, pendigis ĝin sur la muron apud la fenestro.

Multaj aĵoj troviĝis en la ĉambro. Du grandaj ŝrankoj, du litoj kun litaĵoj, ĉio, kio necesas, unu divano, unu vazoŝranko, unu tablo. S-ro Báthory malfermis la ŝrankojn. Li montris la tolaĵojn de sia edzino, kiuj lavitaj, netuŝitaj staris tie: ses bluzoj, tri subjupoj, tri dormoĉemizoj, unu ruĝa lanŝtofa tuko. Li parolis kun ŝi kun grandaj respekto, estimo. Anna enpensiĝis, kaj ia velka ĝojeto trafulmis ŝin.

Pli malfrue la filino alvenis hejme, malafabla, dek-kvarjara flavbek-

ulino, humide, en dekoltitaj ŝuoj. Lia patro atentigis ŝin saluti, je kio ŝi salutis kaj sidiĝis en angulo sur seĝo. Anna kuiris vespermanĝon, paprikan termpomaĵon. Ili tri senvorte manĝis ĝin.

La kamenpurigisto akompanis Anna malsupren. Li konfesigis ŝin:

– Kiel vi opinias?

– Mi ankoraŭ ne decidis.

S-ro Báthory emfazis, ke por li la edziĝo estas „urĝa”. Anna respondis:

– Nun lasu min! Baldaŭ, post la festoj.

Ili konsentis pri tio.

Antaŭ la festoj, kiam ŝi havis plej multe da farendoj kaj preparis la kutimajn papavajn kaj juglandajn rulkukojn, vizitis ŝin lia frato, kiun ŝi jam de kvin jaroj ne vidis, ĉar li estis falinta en francan militkaptitecon. Li tute vireciĝis, kreskigis lipharojn. Li tenis vipon en la mano, venis per ĉaro el la kamparbieno, portis ion donacan por la gesinjoroj. Li sidadis tempeton en la kuirejo; Anna interesiĝis pri sia patro. Li demandis, kiel ŝi fartas kaj reveturis al la bieno.

En la domo oni aranĝis brilan kristnaskan feston.

Unue la anĝelo flugis al ges-roj Druma, tien ĝi portis plej multe, ĉefe al la beboj. Stefi ricevis oran pojnohorloĝon, Etel rulon da tolo.

Ĉe ili la kandeletoj sur la kristarbo estis laste ekbruligitaj en la ĉeesto de ges-roj Moviszter kaj Druma. La altmoŝtaj gesinjoroj kisis unu la alian. S-ino Vizy surprizis sian edzon per cigarujo, kaj li – kiel ĉiujare – aĉetis dudek kvar poŝtukojn al sia edzino. La donacon por Anna transdonis la altmoŝta sinjorino. Ĝi estis volvita en silkopapero.

Ŝi ricevis lanveŝton, brunan, solidan trikitan veŝton, por ke ŝi ne malvarmumu ĉe la neĝbalaado.

Dum ŝi malvolvis ĝin ĉe la lumo de la vaksokandeloj, s-ino Druma puŝis per kubuto s-inon Moviszter.

Ŝi konis ĉi tiun veŝton. Katanjo ricevis, ankaŭ portis ĝin, kaj kiam ŝi foriris, ŝi reĵetis ĝin.

Materio, spirito, animo

En la tago de la Tri Magoj ges-roj Vizy venis de granda politika kolaziono ĉe ges-roj Tatár, en kiu ankaŭ du ministroj partoprenis.

La sinjorino, preterirante la pordon de la kuirejo, subite haltis.

En la kuirejo estis fremda viro, viro, kiun ŝi ne konis. Li sidis ĉe la tablo, kaj apude, sufiĉe for de li, Anna.

Ekvidinte ŝin, la nekonata viro dece stariĝis kaj salutis:

– Bonan vesperon!

Nun li pli bone videblis, ĉar la lampo prilumis lian palan vizaĝon kaj lian blondan, silkecan hararon. Li surhavis helgrizan kompleton, longan koltukon.

S-ino Vizy nur okulmezuris lin ĉiam pli malfideme, cerbumante en si.

– Ĉu vi ne bonvolas rekoni min? – demandis la viro per ne malagrabla baritona voĉo kaj ridetis. – La kamenpurigisto…

– Aĥ, ja vi? Vidu, mi ne rekonis vin. Tiel mi ankoraŭ ne vidis vin. Bonan vesperon, s-ro Báthory, bonan vesperon!

La neinvitita gasto ne longe ĝenis, atendis, ĝis la dommastrino eliras; li iom prokrastis, por ne havi la ŝajnon, ke li fuĝas, poste silente foriris.

De la okuloj de s-ino Vizy nun defalis la vualo. Enpensiĝe ŝi skuadis la kapon. Pri tio ŝi ne pensis. Al ŝi ne venis en la kapon, ke Anna havas ion komunan ankaŭ kun aliulo, ke ŝia Anna povas havi ion komunan kun eksterulo, kaj ajnulo povas sidiĝi ĉe ŝi. La tuta afero estis tiel malagrabla kaj sentakta; vera, aperta juruzurpo, io tia, kvazaŭ ŝi trovus en la dormoĉambro la kamenpurigiston, fumantan gajhumore sian pipon sur ŝia blanka divano. La insolentaĵo indignigis ŝin, sed ŝi diris nenion. Iom post iom ŝi surtabligis la temon:

– Diru Anna, ĉu do tiu vizitadas vin?

– Kelkfoje li envenas por minutoj.

– Kion signifas „kelkfoje”? Ĉu eble eĉ ne la unuan fojon? Ĉu ankaŭ alifoje li jam estis ĉi tie?

– Ankaŭ alifoje.

– Kiomfoje?

– Fojfoje.

– Mi ne ŝatas tion. Vi tre bone scias. Fremda viro en mia domo. Nenie en la mondo io tia estas kutimo.

– Li venas. Mi ne povas elpeli lin.

– Sed la afero statas ja ne tiel!

– Depende de mi li povas resti ankaŭ hejme.

– Do kial vi ne diras tion al li? Sciigu tion al li!

– Mi ne kapablas, altmoŝta sinjorino.

– Nu, se tiel, mi memorigos lin mi mem. Vi havas aliajn farendojn.

– Bonvolu atentigi lin! Al mi estas vere egale.

S-ino Vizy parolis kun la kamenpurigisto, kaj li ne plu montris sin, sed la afero tute ne estis aranĝita per tio. Dum ili kuiris, ŝi daŭre sturmis la orelojn de la knabino:

– Ĉu li amindumis vin?

– Li konversaciis.

– Li plenŝtopis per paroloj vian kapon. Li volas amfrenezigi vin.

– Kie estas butero, altmoŝta sinjorino?

– Tie, en la fenestro. Atentu, Anna, tre atentu! Li nur konfuzos vian kapon. Kaj pri kio li parolis?

– Foje li diris... – ŝi komencis, sed dume ŝi iris al la krano, lasis akvon en trinkpoteton, tiel do s-ino Vizy ne povis kompreni, kion ŝi diras.

– Do, kion li diris? – ŝi konfesigis ŝin, post kiam Anna metis la poteton super la fajron.

– Li diris, ke li havas neniun.

– Ĉu nenion alian?

– Kaj ke li bezonus edzinon.

– Interese. Kaj kion vi respondis?

– Nenion.

– Vi agis saĝe. Estas ridinde. Li ne konvenas al vi. – Anna pravigis ŝin kaj aperte, kaj ene, en sia animo, sed kiam ŝi ne aŭdis ŝiajn argumentojn, ŝi ekŝanceliĝis.

La novaĵo, ke troviĝis por Anna speco de svatiĝanto, ne restis sekreto, la tuta domo eksciis ĝin, kaj ĝi ŝiris la loĝantojn en du par-

tiojn. S-ro Báthory zorgis pri tio, ke en sia foresto li kreu ariergardon por si kaj prilaboris la publikan opinion. Antaŭ ĉio li apogis sin sur la servistinoj. S-ino Ficsor, al kiu li promesis ion, se ŝi akiros Anna por li, estis lia senkondiĉa fidelulo. Ŝi gajnis Stefi por la afero, kiu instigadis Anna, ke ŝi havu prudenton, ne elektaĉu, alie okazos al ŝi, kiel al ŝi, kiu en aĝo de tridek du jaroj devas servi. Etel, la maljuna Etel de ges-roj Moviszter ne tute persvadiĝis. Ŝi rekonis, ke tio estus bela afero, sed ridis, kial servistino bezonus edziniĝi, ŝi ja estas tiel longe feliĉa, dum ŝi estas knabino. Ges-roj Druma prenis starpunkton decide kontraŭ la edziniĝo. S-ino Moviszter antaŭvidis la okazontaĵojn kun neŭtrala bonvolo.

Ĉi tiuj ĉiutage instrukciaĉis ŝin. Unu avertis ŝin, ke ŝi rapidu, la alia, ke pro la mondo ŝi ne trohastu, ŝi ankoraŭ havas tempon. Anna ricevis tiom da konsiloj, ke ŝi kapturniĝis, kaj kiam ŝi faris konton kun si mem, kiel ŝi rilatas al la afero, ŝi plej bone ŝatus, se oni lasus ŝin en paco, aŭ ili mem decidus iel ajn. Ŝi malŝatis la tuton. Ŝi prenis ĉiufoje ties starpunkton, kun kiu ŝi laste parolis.

Ne eblis scii, kio trafis ŝin, kun kiu ŝi parolis lastafoje, kun kiu ne, kies vortojn ŝi obeis en la konfuzo de la interkontraŭdiraj konsiloj, iun tagon tamen tio okazis.

Dum senŝeligo de terpomoj Anna trankvile kaj simple sciigis al sia mastrino, ke ŝi serĉu alian servistinon, ŝi edziniĝos laŭeble plej baldaŭ, tuj post kiam la nova servistino eklaboros, se eblas, jam nun, la dekkvinan ŝi volus, se ne eblas, ŝi povas atendi maksimume ĝis la unua.

La maldungo ne estis malafabla sed oficiala.

S-ino Vizy nun eĉ per vorto ne provis malpersvadi ŝin, ŝi akceptis la eksiĝon same oficiale. Ŝi okulmezuris ŝin kiel fremdulon, kaj levinte fiere la kapon ŝi forlasis la kuirejon.

Ĉi tiu bato ne venis neatendite, ĝi jam de semajnoj ja ŝvebis super ŝia kapo, sed eble ĝi estis des pli pli terura.

Anna servis ĉe ŝi la sesan monaton, tiel longe kiel ĝis tiam neniu el ŝiaj servistinoj. Ŝi tiom kutimiĝis al ŝi, ke ŝi eĉ imagi ne povis alian anstataŭ ŝi, nek pli bonan, nek pli malbonan. Ŝi ankaŭ ne serĉis novan knabinon. Post la unua ekscito ŝi cedis al ia fatala malagemo, ia senob-

jekta fido, kiun la spiritistoj nur konfirmis. Tie ŝi demandis en vualita formo sian spiriton, sian benitan patronan spiriton, kion ŝi faru. Ŝi ricevis la respondon, ke „tio, kion ŝi timas okazi, neniel okazos, sed nun ŝi devas montri sin tre malmola". Pri tio ŝi ankaŭ trankviliĝis.

Sed dume ŝi malsaniĝis.

Ŝia edzo trovis ŝin iun tagmezon en la lito, ŝi kuŝis en la mallumigita dormoĉambro, kun glacia kompreso sur la kapo, el medikamenta fiolo ŝi flaradis kren-alkoholon. Ŝia malsano, reaperanta post pli-malpli longa tempo, aperis kutime en formo de atako: subite, sen ĉia kialo ŝin kaptis histeria ploro, ŝia kapo ekdoloris, nemildigebla kapdoloro turmentis ŝin tra horoj, ĝis per nervoza vomo ŝi plifaciligis sin, kaj tiam ankaŭ la kapdoloro iom post iom ĉesis. Tion la kuracistoj nomis histerio, sed ili povis fari nenion kontraŭ ĝi.

Vizy eĉ ne salutis ŝin, ĵetis al ŝi malaproban rigardon kaj turnis al ŝi la dorson. La malsano de ŝia edzino plie kolerigis ol ektimigis lin. Li konsideris persona ofendo, ke ŝi aŭdacas esti malsana.

Posttagmeze la stato de la malsanulino plimalboniĝis, ŝi ĝemis, veis, frapadis per la manoj, poste, post tre longe ŝi komencis vomi. Anna venis, iris kun la lavujo.

La doktoro alvenis nur post la konsultaj horoj. Tedite li pendigis sian vintran surtuton kaj eniris la malsanulan ĉambron, jam surmetinte sian afablan, societan vizaĝon. Li ŝaltis la etan elektran lampon sur la noktoŝranko, reage la malsanulino plendis, ke ŝi ne eltenas la lumon kaj premis unu el la ĉirkaŭ ŝi kuŝantaj multaj poŝtukoj sur la okulojn.

Moviszter konsilis antaŭ ĉio, malfermi la fenestron je fendo, ĉar la aero estas tre sufoka. Vizy staris ĉe la litokapo, preta por disponoj. Li nomis „Anĝelo" sian edzinon per ŝia knabinaĝa nomo, kiel ĉiufoje, kiam fremdulo ĉeestis, kaj interesiĝis pri ŝia farto. La kuracisto skoldetis sian malsanulinon. Li prenis ŝian manon, longe tenis ĝin sen diri vorton. Li mezuris la pulson, ankaŭ ŝian temperaturon. Li kapjesis, ke ne estas febro, ĉio estas en ordo.

Poste por fari ion, li transiris al la ĝenerala ekzameno. Li malkovris ŝian korpon kaj rigardis ĝin. Li konis ĉi tiun korpon kiel agordisto la pi-

anon, ofte agordatan, ĉiun ĝian martelon kaj klavon, sed li sciis, ke la meĥanismo ne estas ĉio, por tio, ke el la interagado de la marteloj kaj klavoj io vera estiĝu, ia vivo kaj muziko, bezonatas ankaŭ io alia, ĉar ĉi tiu palpebla, en si fermita io ne staras tute izolita en la ĉirkaŭa granda ĉio, kiel ĝi ŝajnas, ĝi ne ekzistas tute sola kaj fremde, sed estas kunligita en la ĉielo kaj sur la tero kun ĉio, kio vivas. Seniluziigite li komencis plenumi la formalaĵojn, kiujn li jam tiel mulfoje faris vane en sia vivo. Li premadis la stomakon, la intestojn, sidigis la pacienton, bele petante ŝin suspiri, aŭskultis ŝiajn pulmojn, korbatadon kaj ĝentile dankis por ĉio.

Dum ĉi tiu ekzameno la edzo retenis sian spiron, por, liakrede, helpi tiel la laboron de la kuracisto. Vizy apartenis al tiuj dudek-jarcentaj kleraj homoj, kiuj blinde kredis, kiel fidelulo je sia konfesio, je la medicino, instruata en universitatoj kaj ĝenerale je ĉiuj sciencoj, pri kiuj oni liveras oficialan diplomon. Li konsideris ĉiun kuraciston tia estaĵo, kiu iom pli multe scias pri ni, kaj tial li vidis ilin en mistera lumo. La movojn de Moviszter same tiel li observis. Kiam tiu nulskuis la febrometron, kaj dume la ĉemizbutono de lia manumo ekklaketis, li sentis tiel, ke ĉi tiu termometro nun „medicine” ekklakis. La pulmoaŭskulta kaŭĉuka tubo kaj la stetoskopo vekis en li similan tremeton. Kaj li daŭre atendis, ke la kuracisto, kliniĝanta super ŝia edzino, subite ekkrias, ke en ĉi tiu momento li fine trovis la veran difekton.

Male, Moviszter jene parolis:

– Mi trovas nenion.

– Ĉu ne ŝia stomako?

– Tie estas nenio malnormala.

– Ĉu ŝiaj pulmoj?

– Tute puraj.

– Kaj ŝia koro?

– Ŝi havas pompan koron.

– Kion ŝi manĝu?

– Kio gustas al ŝi.

– Ĉu iom da malpeza supo? – helpis Vizy.

– Ankaŭ tiun.

– Ĉu vi ne preskribas ion?

– Mi povas preskribi – diris Moviszter distrite.

Li efektive preskribis ion. Vizy klopodis:

– Tuj mi sendigos por ĝi.

– Ne tiom urĝe.

Moviszter donis la recepton al la malsanulino.

– El ĝi bonvolu preni dek gutojn kun unu sukerkubo. Vi povas gluti ankaŭ dek kvin, se vi estas maltrankvila, sed nur tiam. Prefere multe ripozi, distriĝi. Ĉu via kapo ankoraŭ doloras? Nu, ĝi jam ĉesis dolori. Mi diris, vi havas nenion gravan.

Li etendis la manon por adiaŭi.

– Ŝin malsanigas – ekparolis Vizy kaj ĵetis rigardon al sia edzino –, Anĝelo, ĉu mi povas denunci vin? Vidu, ŝia problemo estas, ke ŝi ĉiam nervozas. Ŝia servistino maldungis sin, ŝi edziniĝos…

– Do tiel – diris Moviszter.

– Per tio ŝi nervozigas sin, jam de semajno. Ŝi ne dormas.

– Nu, ĉu vi ne prenas tion serioze? – demandis la kuracisto.

– Certe, tio ne estas agrabla – diris s-ino Vizy raŭke. – Mi instruis, edukis ŝin, kaj nun ŝi subite forlasas min.

– Nu, tio kutimas okazi.

– Ĉar ili estas sendankaj, ĉar ili ne havas komprenemon. Duonjaron mi klopodis, penis pri ŝi. Ĉu indis peni?

– Rigardu, altmoŝta sinjorino, mi havas pacienton, sepdek-sesjara, kaj nun li komencas lerni la anglan. Kiam li ellernos ĝin, li eble jam mortos. Aŭ ni diru, li ne mortos baldaŭ, kaj pli malfrue, en sia aĝo de preskaŭ cent jaroj tiel li mortos, ke li ne scipovos la anglan. Ĉu indis lerni? Aŭ ĉu indas komenci ion ajn en nia aĝo de dudek jaroj. Jes ja, indas: iel oni ja devas pasigi la tempon.

– Kvankam ŝi estis tiel bona knabino. Sed ŝi freneziĝis - flustris s-ino Vizy –, ŝi tute freneziĝis, s-ro doktoro.

– Eĉ iom ŝi ne freneziĝis. Nur ŝi edziniĝos. Bonvolu lasi ŝin, ŝi foriru. Vi ricevos alian.

– Ĉu tian, kiel ĉi tiu? Neniam!

– Do ne tian. Ni diru, ne tiel bonan, sed iom pli malbonan.

– Kiu priŝtelos min.

– Do ŝi ŝtelos. Kredu min: propre ne estas ja tiel bone havi tre bonan servistinon. Ŝi estu tia kiel la aliaj: kaj bona kaj ankaŭ malbona.

– Ĉu kiel via Etel? Pardonu al mi, s-ro doktoro, sed mi tian ne tolerus en mia domo. Mi ĉiam miris pri vi…

– Nu, ankaŭ mi ne estas ravita de ŝi. Ŝi kondutas krude eĉ al miaj pacientoj. Pasintfoje ŝi aĉe skoldis malsanulon, ĉar li ne purviŝis siajn ŝuojn. Sed kion mi povus fari: ĉiu havas mankojn. Tio estas natura. Ni devas paciĝi kun tio. Ankaŭ ilia situacio ne estas rozkolora. Tiel multe ili klopodas, penas, kaj ilia laboro estas tia, ke ili eĉ ĝojon ne trovas en ĝi, ĉar apenaŭ ili faras ion preta, tio tuj pasas, aliaj tuj voras tion, ni malpurigas kaj malbonigas tion, ni, bonvolu kredi, ni! Do ili havu almenaŭ la rekompencon, ke ili povas esti ankaŭ iom malbonaj. Oni devas tion kompreni.

– Mi ja komprenas – kapjesis s-ino Vizy, kaj sur ŝiaj larmaj palpebroharoj ŝajnis eklumi eta radio post la paspluvo. – Nur unu aferon mi ne komprenas. Diru al mi, kara s-ro doktoro, kial ili estas tiel porkonaturaj?

Moviszter vidis, ke ili parolas kiel surdulo kun mutulo, li do ne daŭrigis, nur murmuretis:

– Kompreneble, kompreneble. Do, kion mi diris: dek ĝis dek kvin gutoj…

S-ino Vizy postrigardis lin, elorbitiginte la okulojn. Ŝi decidis, ke neniam en sia vivo ŝi igos voki ĉi tiun maljunan azenon.

Sed ŝia edzo elakompanis Moviszter kaj reveninte li diris:

– La s-ro doktoro absolute pravas. Vi havas nenian malsanon. Kial vi tenas ĉiam plu vian manon sur via hararo?

– Ĉu tio ĝenas vin?

– Tre. La tutan tagon mia kapo bolas en la oficejo, kaj kiam mi venas hejmen, vi traktas min per tia sceno. Pitanimeco. Vi serĉos alian kaj punkto.

– Sed komprenu, mi nepre bezonas ŝin.

– Troigo. Vi ĉiam troigas. Brava knabino, mi agnoskas, sed finfine neniu estas trudebla. Vi devas lasi ŝin foriri.

– Sed en neniaj cirkonstancoj mi lasas ŝin foriri.

– Kion vi faros? Ĉu tio plaĉas al vi, ĉu ne, ŝi egale foriros. Vi nur nervozigas min nun, kiam mi havas plej multe da farendoj. Krome mi satiĝis ĝisgorĝe de ĉi tiu servistina afero, lasu ĝin unu- kaj ĉiufoje for, diablo prenu ŝin, ŝi iru en la plej profundan fundon de la infero!

– Ne bleku!

– Vi ne bleku! Komedio. Aŭ ĉu vi kredas, ke kion ĉi tiu faras, alia ne povas fari?

– Ne! – ŝi kriis kaj genuiĝis en la lito, blanka, gestante en sia dormoĉemizo. – Ne, kion ĉi tiu faras, alia ne kapablas fari.

– Vi ne estas normala – alkriis ŝin Vizy, kaj mirante rigardis sian edzinon, kiu ektiminte, rekuŝiĝis –, vi ne estas normala.

– Kaj vi estas needukita, kruda kiel raspilo, kruda kaj malica. Vian tutan vivon vi estis tia al mi, tiel kruda... tiel malica...

La sinjorino viŝadis siajn malrapide likantajn larmojn per la multaj poŝtukoj, tie kuŝantaj, jen per unu, jen per alia. Vizy sidiĝis kaj gratis sian nazon. Li aŭskultis, kiel ŝi skoldas lin, pacience, kun rezignacio kiel edzoj, kiuj kokras siajn edzinojn, kaj fojfoje volas pentofari pro tio. Subite eksonis la telefono, li rapidis al la skribotablo, formante sian manon ĉirkaŭ la mikrofono li parolis kun iu, per jesoj kaj neoj, sed tre mallaŭte; kaj li prenis sian surtuton kaj foriris elhejme.

S-ino Vizy restis sola en la granda loĝejo. Ŝi iom ankoraŭ ploretis, kaj laciĝinte ŝi gapis senmove antaŭ si.

Neatendite Anna staris antaŭ la lito.

– Mi venis nur pro tio – ŝi balbutis –, ĉu vi bonvolas ion ordoni?

La sinjorino ne respondis. Post kiam la maldungo okazis, eĉ unu vorton ŝi ne diris al ŝi, ŝi tiom malamis ŝin, ke eĉ vidi ŝin ŝi ne eltenis.

Anna atendis hezite en la atmosfero de malamo, kiu froste ĉirkaŭis ŝin. Ŝi kompatis la altmoŝtan sinjorinon, ke ŝi estas malsana, ke tiel multe ŝi suferas, kaj ke eble ŝi kaŭzis tion.

S-ino Vizy eligis suspiron. Ŝi sentis, ke la morna etoso iom mildiĝis, la knabino ankoraŭ tie staras, ne volas foriri. Ŝi reĝustigis sian kusenĉon kaj per skolda sed paciĝema voĉo ŝi diris:

– Nu, ĉu vi rehavas la prudenton?

Anstataŭ respondi la knabino klinis sian kapon.

S-ino Vizy parolis kun longaj paŭzoj:

– Ĉar mi bezonas scii... Al mi tio sufiĉis unufoje, plu mi ne volas tian scenon... Mi ne retenas vin... Vi rajtas... vi povas foriri... vi povas forlasi min, meze de la vintro lasi min sola... Neniun eblas trudi... Se ĉi tie ne plaĉas al vi, ni bele disiĝos... Kaj se vi restos, tiam vi restos... Cetere mi ne komprenas vin... Kion malbonan vi havis ĉi tie?... Ĉu vi estis mistraktata?... Ĉu vi ne ricevis sufiĉe por manĝi.. Ĉu vi bezonas monon?... Via mono kuŝas en la ŝparkaso... akumuliĝas, ... kial vi ne diris?... Vi povas elpreni ĝin, kiam vi deziras... vi aĉetos ion por ĝi... ion valoran... Aŭ ĉu mi altigu vian salajron? Ankaŭ pri tio ni povas paroli... Kion vi volas?

Anna iom antaŭenpaŝis. S-ino Vizy vidis la momenton alveninta, por definitive rompi ŝin, nun ŝi aŭdis la voĉon de la spirito, ke „nur malmole, malmole”:

– Vi mem ne scias, kion vi volas... Ja tiu malfeliĉa, kies prudenton vi forprenis... Mi konas ĉi tiun specon... Li promesas orajn montojn, poste lasas vin en peĉo... Li ne perlaboras eĉ tiom, ke li povus vivteni vin... Per kio vi vivus?... Kie vi loĝus?... Ĉu vi enloĝiĝus en tiu malpura truaĉo, por ŝimi?... Tiuj volas nur servistinon, senpagan servistinon, kiu lavas por ili... eĉ salajron ili ne pagas... ili volas simplamensan malsaĝulinon... ne edzinon... Krome se tiu kamenpurigisto estus juna... Sed jam eĉ ne juna... Krome vidvo... Li havas tiel grandan filinon kiel vi... Mi konas tiun diablidon... Tiu elskrapos viajn okulojn... Ĉu vi volas iĝi vicpatrino?... Ho, mi jam vidis tion... multaj el miaj servistinoj edziniĝis... poste ili revenis, ke ilia edzo batas ilin, ke li estas ebriema kaj ne havas laboron, ke ve, altmoŝta sinjorino, mi kisas vian manon, se mi ankoraŭfoje povus reveni ĉi tien... Ili petegis... Sed kiu foje elmetas de ĉi tie sian piedon, tiun mi ne bezonas... Kio vi fariĝos?... Kien vi iros?... Ĉu hejmen?... Vi povas iri al la judoj..., judaj lokoj, kie... Kio?...

La knabino flustris ion, ridetante. S-ino Vizy ankoraŭ faris unu atakon:

– Ne detruu vian vivon, ne detruu vian junecon... tiun belan junecon vian... ĉar vi pentos amare... Aŭskultu tiun, kiu estas pli saĝa... pli

sperta… Mi ne diras, ke se iu inda troviĝus… Sed ĉi tiu?!… Iam troviĝos tia… pli malfrue… tiam ni edzinigos vin… Mi ne trudas vin… Pripensu ankoraŭfoje la aferon, sed nun lastafoje… Morgaŭ donu respondon… Unue bone pripensu ĝin…

Anna glatigis sian hararon.

– Mi jam decidis.

– Do vi restos, ĉu?

– Mi restos.

Post la granda batalo s-ino Vizy refalis sur la kusenon.

– Ĉu vi bonvolas ion vespermanĝi?

– Nenion – ŝi diris. – Aŭ donu iom da konfitaĵo. Jam de du tagoj mi eĉ gluton ne manĝis.

Anna priservis ŝin tiel vigle kaj feliĉe kiel ankoraŭ neniam.

Ŝi alportis hispanajn griotojn. Sur la etikedo s-ino Vizy rekonis la longajn literojn de Katanjo kaj diris:

– Ĝi estas ankoraŭ pasintjara, Katanjo faris ĝin.

Kaj tiam, post longa tempo ŝi rememoris ŝin. Dum ŝi kuleris la malhelruĝan sukon kaj elsputis la kernojn sur telereton, ŝia iama servistino turniĝis en ŝia kapo, kvazaŭ ŝi estus droniginta en ĉi tiu konfitaĵa bokalo kiel en energiujo la strecforton de sia laboro, kaj tiu nun eksplodus el ĝi. La hispanaj ĉerizoj daŭris ankoraŭ plurajn tagojn, sed kiam la papera etikedo venis en rubaĵon kaj la bokalo estis purlavita, ŝi ne plu revenis en ŝian menson.

Cetere la paco restariĝis. Anna mem transiris al la kamenpurigisto kaj tiel decide ŝi rifuzis al li, ke tiu ofendiĝis, kaj apenaŭ du semajnojn poste li edzinigis la vidvinon el Erzsébetváros, kiu havis ankaŭ dometon. Tio ne tro interesis ŝin. Se oni konfesigis ŝin, ĉu tiel estas pli bone, ŝi diris, eble jes, pli bone.

La nervozeco malaperis en la domo.

Stefi jam ne defendis sian starpunkton. Deprimite ŝi iradis, ankaŭ ŝin trafis malagrablaĵo. Kiam ŝi jam ellernis la hungaran rondodancon kaj ankaŭ aĉetis la lakŝuojn por la balo, kie ŝi estus danconta kun moŝtaj fraŭlinoj, ŝi ricevis leteron de la aranĝa komisiono, ke „je nia granda bedaŭro ni devas rezigni vian alte taksatan kunlaboron”.

Anna de tago al tago perdis iom el sia intereseco. Ŝi tiom adaptiĝis al la ordo de la domo, ke ŝi malaperis, oni eĉ ne rimarkis ŝin, nek parolis pri ŝi ie ajn. Kiel la plej multaj servistinoj, ankaŭ ŝi komencis imiti sian mastrinon. Jam tute tiel ŝi glatigis sian hararon kiel s-ino Vizy, kaj la konatoj, kiam ili telefonis, ofte ne sciis, ĉu ili aŭdas ŝian voĉon aŭ tiun de ŝia mastrino.

Karnavalo

La bankpedelo suprenportis al József Elekes en la sekcion de valutoj lian tagan korespondaĵon, kiu konsistis nur el unu funebra anoncbileto.

Li malfermis ĝin kaj tiom li konsterniĝis, ke li preskaŭ lasis fali ĝin.

Meze de funebra kadro li ekvidis la nomon, skribitan per dikaj literoj, de sia plej bona kompano János Patikárius.

Pri Johaĉjo li jam de monatoj aŭdis nenion. Iun tagon li formalaperis el la banko sen ĉiaj anonco kaj maldungo, estis forstrekita el la etato de la oficistaro, en lia fraŭlloĝejo de Buda oni sciis pri li nur tiom, ke li ien forveturis. Laŭ ges-roj Vizy li restadis en Vieno. Sed li skribis nek al li, nek al aliuloj.

La funebra anonco tekstis jene:

Ferenc Patikárius kaj lia edzino, naskita Terézia Jámbor anoncas kun rompita koro en sia nomo kaj tiu de siaj parencoj, ke ilia unusola filo

JÁNOS PATIKÁRIUS

mortis la 16an de februaro 1920 por ĉiu serioza vivo,
kaj de nun li vivos nur por gajeco.
Pro kies kaŭzo la gaja mortinto invitas
en ĉi tiu nekutima maniero siajn amikojn
en la supra tago vespere, precize je la 24a horo
al gajhumora ĉampana amuziĝo en Club des Parisiens,
por kune sepulti solene ĉiujn zorgojn.
La bona humoro estas deviga. For ĉiujn zorgojn!
Paco al lia cindro.

Frapite Elekes staris apogita al monŝranko; turnadante la funebran anoncon, li trovis la ŝercon troigita. Lian konsterniĝon trafulmis pala rikano. Ankoraŭfoje li tralegis ĝin, nun jam plezuriĝante per la ĉiam pli

aŭdacaj, spritaj stildelikataĵoj de la teksto. Nu, ĉi-foje la bubo vere trompis lin.

Johaĉjo samtage alvenis per la viena rapidtrajno. De la stacidomo Nyugati li rekte veturigis sin al la hotelo Dunaparti, kie en la unua etaĝo li igis malfermi al si ĉambron. Li banis sin, sobiris en la restoracion de la hotelo por tagmanĝi. Tie, ĉe tablo la loĝejagento jam atendis lin, kiun telegrafe li petis al si. Dum kelkaj minutoj ili konkludis la negocon. Johaĉjo subskribis deklaron, laŭ kiu li cedas por ĉiam sian loĝejon, kune kun ĉiuj moveblaĵoj, en la strato Márvány, kontraŭ kio la ulo denombris sur la tablon amason da dolaroj, kiujn Johaĉjo leĝere ŝovis en sian veŝtopoŝon. Tio okazis kun amerika rapideco. Ili skuis reciproke la manojn.

Post la granda kaj brila Vieno ĉi tiu malgranda kaj malriĉeca Peŝto ŝajnis tiel intima, ke li preskaŭ emociiĝis. Estis reviga posttagmezo, freŝa kaj idilia, tia vintra posttagmezo, kiam lia vivoĝojo preskaŭ fajreris. Krakanta neĝo kovris la urbon. Ankaŭ sur la ŝtonleonoj de la Ĉen-ponto kuŝis neĝo, kvazaŭ iliaj kapoj estus kovritaj per blankaj tukoj. Sketiloj tintetis en la manoj de virinoj, rapidantaj al la sketejo, sledoj sonoradis. La frosto, malmola, saniga frosto ruĝpikis la vizaĝojn. En la sukeraĵejo Gerbeaud lumis la vitraj lustroj, kaj en la stratoj Váci kaj Koronaherceg, en la antikvaj, pasintjarcentaj internurbaj stratoj unu post aliaj ekbruladis la lumoj post la glataj vitroj de la montrofenestroj, en kiuj nun ĉio ŝajnis pli dezirinda, pli sorĉa ol cetere; ankaŭ la ŝuoj, libroj, la mineralakvaj boteloj sur muskaj rokoj apud reklama fontaneto, krome la cidonia ĵeleo, montetoj el aveloj kaj juglandoj, piramidoj el bongustaj, ankoraŭ humidaj berberaj daktiloj, kvazaŭ memoraĵoj el la malproksima infanaĝo, donacoj de Vintroavo. En ĉi tiu sceneja lumludo partoprenis de minuto al minuto la ĉielo. Jen ĝi vibris pomverde, jen ĝi ruĝiĝis rozkolora ĉe la reĝa palaco sur la Kastel-monto, nun ĝi cindriĝis palgriza, kaj tiam rapide aperis etaj, forte palpebrumantaj, vintraj steloj.

Ĉirkaŭ vespero damo venis vizite al ges-roj Vizy.

La servistino kondukis ŝin en la salonon, kie ŝi okupis sidlokon, ĝis s-ino Vizy surmetis alian kostumon, por dece akcepti ŝin.

Kuntirinte frostotreme sian lutropelton, ŝi atendis la mastrinon de

la domo. Ĉe ŝia enpaŝo ŝi prezentis sin per maldika birdovoĉo, tuj ŝi alparolis s-inon Vizy per ŝia baptonomo kiel meznobelaj virinoj kutimas, ŝi parolis pri Vizy, kiun ŝi konas el la ministerio, pri la familio Patikárius, kiujn ŝi renkontis en Eger, ĝenerale ŝi daŭre klukadis kaj tra sia tigokulvitro ŝi forte gapis al ŝi.

S-ino Vizy kondutis deteniĝeme. Komence ŝi ne povis elguŝigi el ŝiaj vortoj, kion ŝi celas. Ŝi kredis, ke ŝi estas membro de tiuj komisionoj, kiuj tiutempe ĉie varbis volontulojn, kolektis monon por sociaj organiziĝoj, por diversaj popol-bonfartaj celoj. Ŝi ree-denove menciis ian grafedzinon. Galope sed mallaŭte ŝi muelis per sia lango kun tiu ĉion preterglitanta kaj forŝvebanta supraĵeco, kiel tiaj ĉarlatanaj virinoj. Ŝi estis vestita per vesperamuza kostumo. El ŝia peltmantelo elvidiĝis ŝiaj verdaj ŝuoj, silkaj ŝtrumpoj. Pli malfrue ŝi demetis sian tulan boaon, malfermis sian peltmantelon, kaj tiam aperis ŝia maldika, pudrita brusto kaj ŝia balrobo, senriproĉa silkorobo, abunde brodita per orperloj.

Jam suspektante, s-ino Vizy estis respondonta ion, ŝi volis peti ŝin, prezenti ian sinidentigan dokumenton, sed ŝi alipensis. Ankoraŭfoje ŝi ĵetis al ŝi rigardon, alpaŝis ŝin kaj senvorte deprenis la ĉapelon de la kapo de la virino. Ŝian kapon kovris abunda peruko de simila koloro, kiel ŝia hararo, sukcenflava.

– Vi malfeliĉa – diris s-ino Vizy –, kion vi faraĉas ĉi tie?

– Mi iras al maskobalo, onklino Angéla. Mi kisas vian manon.

– De kie vi venas?

– El Vieno. Diru – ŝi demandis sian onklinon, dum ŝi trapromenis la ĉambron, iom levinte sian peltmantelon –, ĉu mi estus plaĉa virino?

– Pompa figuro vi estas, ja nedubeble. Via kompatinda patro eĉ ne scias, kio okazas al vi. Pri kio vi okupiĝas tie?

– Pri negocoj.

– Ĉu ĉenkomerco?

– Mi laboras en la karbofako. Ĉu vi bezonas karbon? Kiom da vagonoj mi sendu?

– Freneza. Kaj ĝis kiam vi restos ĉi tie?

– Mi venis nur por unu tago. Morgaŭ matene mi jam reveturos.

Cetere, kiel vi fartas ĉiuj? Onklo Kornél?

– Ĉu vi ne aŭdis. Li iĝos ŝtatsekretario.

– Mi gratulas. Aĥ, ĉu ne eblus fari ian negocon kun la ŝtato? Se onklo Kornél venos al Vieno, li nepre vizitu min. Mi havas belan loĝejon, Rothenturm-Strasse n-ro 1. Nu, saluton, onklino Angéla, miaj amikoj atendas min. Elekes kaj la tuta bandaĉo, ankoraŭfoje adiaŭ, mi kisas vin, mi kisas vian *kisztihand*[21].

– Ĉu vi volas eliri tia en la straton?

– Aŭtomobilo atendas min malsupre.

– Gardu vin bone, Johaĉjo mia – avertis ŝin s-ino Vizy – kaj skribu al via kompatinda patro!

Tra flankopordo li eniris *Club des Parisiens*. Li surpriziĝis, kiel dezertaj estas ĉi tiuj malantaŭaj ejoj. Kelkaj promenbastonoj, surtutoj pendis sur la hokoj, la kelneroj kombis sin ankoraŭ en ĉemizoj. La posedanto mem akceptis lin. Li jam sciis, ke li rilatas al viena karboliveranto. Dum profundaj riverencoj li kondukis lin en kurtenitan kromĉambron, kie laŭ lia mendo la tablo estis primetita por dek personoj. La intertraktado okazis en la germana. Johaĉjo igis meti bukedojn apud ĉiu manĝilaro, li kondiĉis, ke aparta kelnero priservu ilin, li trarigardis la manĝokarton. Li trovis ĉion en ordo. Li nur donis la instrukcion, ke oni direktu ĉi tien la sinjorojn kaj lian restadon ĉi tie oni malkaŝu al neniu.

Li surmetis sian nigran silkomaskon kaj paŝis en la dancejon. La lokalo ardis. La ĵazo laboris, sed portempe nur kelkaj paroj dancis. Nun la personaro ellasis tridek grandegajn balonetojn, kiuj hezite ŝanceliĝis en la opala lumo kaj ekripozis apud la arkolampoj, envolvitaj en paperrubandoj, proksime al la plafono, kvazaŭ mirante, kiel ili trafis tien el la printempa blua ĉielo. Iom post iom alvenis la maskitoj. Pierrot kun sia Pierrette, cigana knabino sola, kamparana fraŭlo en botoj kun ŝtala hakilbastono kaj stipa ĉapelornamo, verdahara frenezulo kaj ankaŭ unu ruĝhara, la kutimaj ruĝaj nazoj, ĉinaj lipharoj kaj blankaj barboj, tintilĉapoj kaj paperaj kapornamoj. La plej grandan sensacion vekis ĝenerale konata, barelventra borsa agento, kiu aperis en sangoruĝa ek-

[21] Kisztihand: el la germana „ich kisse Ihre Hand” (mi kisas vian manon), aludo ŝerca al la mano.

zekutista kostumo kun sangoruĝa kapuĉo, sangoruĝa masko kaj potence granda punglavo.

Johaĉjo observis el angulo, el post sia ventumilo la ĉiam pliiĝantan kirliĝon de la hommikso. Li serĉis siajn kompanojn, la naŭ invititojn. Portempe li malkaŝis nur Elekes en frako, sen kostumo kun nekonata blonda katino. La danco tiam jam estis malhelpata. Oni estis tiel dense, ke la paroj povis moviĝi nur en vertikala direkto, strikte kunpremitaj. Ankaŭ li drivis inter ilin. Nekonata viro petis lin danci. Tiu perdis sian partnerinon en la konfuzo, ie proksime al la orkestro. Elekes ĝuste tie staris senfare, li brakumis Johaĉjon kaj kondukis lin plu, forte premante lin al si, li rigardis liajn okulojn, ekbrilantajn tra la du truoj de la masko; li plurfoje trabaraktis kun Johaĉjo la ĉambregon kaj per siaj varmetaj, agrable humidaj manoj premadis liajn manojn. Ĉio estis tiel kurioza, ke Johaĉjo poste ankaŭ mem dancpetis plurajn; li dancis alterne kun viroj kaj virinoj.

Sed li jam malpacience atendis la vespermanĝon, por povi fandiĝi en sia amika rondo, kies mankon li tiel longe sentis. Ĉe noktomezo, kiam la maskoj falis, li disrigardis. El post la maskoj aperis fremdaj kapoj. Ankaŭ li deprenis sian maskon, perukon, kaj malbutonuminte sian veston, li direktis sin al la kromĉambro.

La sinjoroj, kiujn la kelneroj jam lokis tie, svingante la funebran anoncon, akceptis kun granda entuziasmo la festaton, kiu serioze, preskaŭ severe okulfiksis ilin en sia kurioza kostumo. Elekes superŝutis lin per kisoj, la aliaj levadis lian jupon, palpadis liajn mamojn. Alvenis nur kvar. Krom Elekes: Dani Töttösi kaj Pista Indali, al kiuj ligis lin speco de supraĵa tekunvena kamaradeco, kaj Gallovich kun grandega virbova kapo en la mano, ia lia malcerta konato, kiun li komence ne volis inviti. Tiuj, kun kiuj li nepre kalkulis, la bankaj kolegoj ne alvenis. Tio deprimis lin. Haste li transvestis sin, kiel dommastro li ekfunkciis, igis telefoni por siaj kvin amikoj, sed li ricevis la respondon, ke la sinjoroj ne restadas hejme.

Longe ili atendis ilin, poste ili tamen devis komenci la vespermanĝon. Estis festenaj manĝado kaj trinkado, buljono en taso, balatona sandraĵo, fritita meleagro kun kaliforniaj prunoj, vinoj el Badacsony kaj

Rejnlando. La ĉefkelnero alportis la sitelojn, en kiuj malvarmiĝis francaj ĉampanboteloj, sukeritaj per freŝa neĝo.

Johaĉjo sidis ĉe la tablokapo, apude maldekstre, flanke de lia koro Elekes kun sia zorge dividita hararo, kreola haŭto, okulo kun monoklo; Johaĉjo rakontis al li, klinante sian kapon preskaŭ al lia brusto. Kiel iu, longe neparolinta sian gepatran lingvon, li iĝis aparte babilema. Kion li dum monatoj tenadis en si, per unu fojo li verŝis antaŭ ilin. Li havis amason da mono, ne nur la dolarojn, kiujn li enspezis el la loĝejvendo, sed krome ducent dolarojn, aŭstrajn stampitajn kaj nestampitajn monbiletojn, ankaŭ hungarajn milkronojn. Li rakontis, ke li loĝas en kvinĉambra apartamento kun pola dancistino nomata Daisy, kiu estas lia amatino, kune kun ŝi li faras ankaŭ la negocojn. Pruve li elprenis la dediĉitan fotografaĵon de la varietea aktorino kaj ŝiajn germanlingvajn leterojn, adresitajn al li. Tiuj estis transdonataj de mano al mano. Ili devis kredi ĉion. Sed Gallovich, la neeltenebla Gallovich incitis lin:

– Ĉu vi vivtenas ŝin, Johaĉjo? Kio? Kiel samariano?

Johaĉjo dum tempo toleris, poste kun malŝata rigardo li murmuris al li:

– Min amuzas, se pulo tusas – kaj li forturnis sian kapon. Ĉi tiu vespermanĝo ne tiel okazis, kiel li imagis. Ili ankoraŭ ne ĝismanĝis la pufbenjetojn, jam aperis fremduloj. Gallovich prezentis unu sian amikon, tiu alsidiĝis kaj trinkis kun ili. Ĉe la parfeo du virinoj envenis impertinente, ĵetis konfetojn sur Johaĉjon. De tio lia buŝo ekhavis guston de segpulvoro.

Ĉe la finiĝo de la vespermanĝo, kiam la ĉefkelnero ĉirkaŭportis cigaredojn kaj cigarojn kun flamanta kandelo por ekbruligo, Elekes flankentiris Johaĉjon, kiu, kompreneble, staris je lia dispono ĝis la sumo de kvindek dolaroj. Ankaŭ Töttösi kaj Indali ricevis iom. Post tio ili foriris danci. Ankaŭ por Elekes enŝovis la kapon lia blonda katino, eta ŝimfloro, tra kies flava, pudrita vizaĝo travideblis lentugoj. Gallovich verŝis ĉampanon en la virinojn kaj amuzis ilin per tio, ke de tempo al tempo li metis la virbovan kapon sur sian kapon.

Ĉirkaŭ frumateno ĉi tiu fia figuro transportis sian glason al alia tablo, tie li trinkis kun siaj virinoj. Johaĉjo restis sola. Li ne havis emon

danci. Nuraj novaj vizaĝoj pasumis tie, kiujn li ne konis, ĉar la publiko de ĉi tiu dancamuzejo ŝanĝiĝis ĉiusemajne.

Elekes revenis kun traŝvitita kolumo el la dancado. Johaĉjo kaptis lian manon kaj ne ellasis ĝin.

– Vane – li suspiris –, vane…

– Hundo sidas en la ovo – daŭrigis Elekes.

Johaĉjo silentis. Li ankaŭ ne sciis, kion diri. Li jam fanfaronis pri ĉio: la dolaroj, la kvinĉambra apartamento, Daisy; li sentis ian nesatigitecon. Krome ĉi tiujn figurojn eblas surprizi per nenio.

Per siaj sekaj manoj li frotis sian frunton.

– He vi, Elekes – li ekparolis subite –, mi krome havis iun. Sed vi ne sciis pri ŝi. Tiutempe, kiam mi venis al Budapeŝto.

– Ĉu tiu aktorino?

– Ne. Tiutempe, sed ne tiu. Ĉu vi scias, kiu ŝi estis. Servistino.

– Hu ha!

– Aŭskultu, Elekes: servistino, iu tute ordinara servistino – kaj li stariĝis kaj kriis, ĉar la saksofono terure ŝrikis. – Ho, kia peco ŝi estis! Pompa ekzemplero. Ŝi estis virga.

– Ĉu vere?

– He, vi oldulo: putinaĉa servistino. Malpura kaj aĉaspekta. Sed bonega por rajdi ŝin, hu, kiel bonega!

Kubutante sur la tablo, Elekes ludis per sia arĝenta cigaredujo, tediĝis de sia amiko kaj ĝojis, kiam la blonda katino ree enŝovis la kapon tra la kurteno kaj vokis lin por danco.

– Elekes! – kriis Johaĉjo el la tuta gorĝo. – Elekes! – kaj etendis siajn brakojn post li.

Sed lia voĉo ne aŭdeblis. La tamburoj de la ĵazbando nun tiel sovaĝe ruliĝis kiel frumatene ĉe militjuraj ekzekutoj.

Dum tempeto li ankoraŭ staris kun malfermitaj brakoj, poste refalis sur la seĝon. Li estis tute sola, li estis tute malplena, nenio restis al li. Li naŭziĝis de ĉi tiu bandaĉo. Li pene stariĝis, iris en la necesejon, aspergis sian kapon, kaj revenante en la koridoro, li petis la fakturon de la ĉefkelnero. Tiu kalkulis fulmorapide. Tiel granda sumo estis kalkulita, ke Johaĉjo tuj resobriĝis. Li atentigis la ĉefkelneron, ke li ne

estas ebria. Ekestis disputo, kiom da ĉampanoj konsumiĝis. La posedanto alportigis ĉiujn malplenajn botelojn, klarigis, ke la sinjoroj amuziĝis ankaŭ ĉe kromtabloj kun la damoj. Ankaŭ ĉe la transkalkulo de la dolaro estiĝis kelka disopinio, sekve estis al li alfrontita la lasta zurika kurzo el la vespera numero de *Pester Lloyd*. Johaĉjo alĵetis la monon.

Je la kvina kaj kvarono li revenis en la hotelon. Post kiam ankaŭ ĉi tie li pagis, apenaŭ restis al li mono. Li petis la pordiston, sendi lian bagaĝon al la trajno, la viena de la oka horo.

Li jam ne enlitiĝis, sur la Danub-bordo li aerumis sian kapon. Li trapromenis la forlasitan straton Rákóczi. Eĉ unu animon li ne renkontis. Kiom pli malhela estis Budapeŝto ol Vieno. Ree enuiĝinte, li serĉis kafejon. Sed la kafejoj ankoraŭ ne malfermiĝis. Li turnis sin al la distrikto Józsefváros, en tiujn kurbajn, paralelajn stratojn, kiujn li ĉiam ŝatis rigardi. Ankaŭ ĉi tie jam mortadis la trafiko, ne sonis muziko, en la stratangulaj startrinkejoj oni balais, la stratulinoj, kiuj trafrostiĝis pro la nokta laboro, starante trinkis sian laktokafon. Ekstere pasumis nur la plej persistaj, la plej diligentaj.

Johaĉjo amblis malsupren sur tia strato, ĉiam pli malsupren kaj fajfetadis, turninte sian vizaĝon alĉiele, li fajfis en la ĉielon. La ĉielo, kiu posttagmeze ankoraŭ brilis en bele sorĉaj koloroj, malheliĝis, neĝonuboj kovris ĝin, prujno faladis malrapide sur la peltokolumon de lia vintra surtuto. Ie, ĉe la mezo de la strato, kontraŭ malplena parcelo, jam de jaroj ne surkonstruita, staradis antaŭ domaĉo virino, jam ne juna, trans la kvardeka, apogita al la pordofosto, kun ia besta enuo sur sia dika, lardeca vizaĝo. Ŝiaj manoj, iam acidigintaj kukumojn, pendis. Sed ĉi tiu virino, tute surprize, surhavis antaŭtukon kaj buntan kamparanan tukon sur la kapo. Ŝi estis unu el tiuj, kiuj per ĉi tiu popoleca vestmaniero volis ekbruligi la ne plenumiĝintajn sonĝojn pri trankvila hejmo, feliĉo kaj bona, brava dommastrineto en vilaĝ-devenaj laboristoj, rapidantaj en fabrikojn kaj en la fastinta imago de sabatvespere amuziĝantaj submajstroj. Ŝi ne kuraĝis alparoli la elegantan junan sinjoron, ŝia kutima klientaro ja konsistis ne el tiaj.

– Hu – pensis Johaĉjo, kiam kelkajn paŝojn li jam preterpasis ŝin –,

kiel strange estus – li pensis ankoraŭfoje –, kiom terure estus.

Li iris nek pli rapide, nek pli malrapide, sed la virino, kiu postenis ĉe la pordo, divenis, kia penso nun trafulmis lian cerbon, kaj jam tute kuraĝe ŝteliris malantaŭ lian dorson, kaj per ia neklarigebla voĉo ŝi diris:

– Bonvolu enveni, vi ne pentos.

Ŝi diris tion tiel terure, kun petolemo kaj repuŝa konfidenco en la tono, ke li haltis. Li ankoraŭ ne alrigardis, li staris dorse al ŝi, sed li aŭdis, ke la virino reglitis al la pordo de la domaĉo, kiu estis jam malfermita. Johaĉjo sekvis ŝin.

Ŝi loĝis plejfunde de la korto apud ia alkonstruaĵo aŭ hejtlignejo, la pordo de ŝia ĉambro malfermiĝis al la korto kaj grincis de la frosto. Lampo vigilis meze de la tablo sur vinruĝa kovrilo. Kiam la virino ekbruligis la lampon, Johaĉjo vidis unu divanon, unu viŝtukon, unu kusenon kaj sur la muro la portreton de imperiestro Vilhelmo kun ĉiuj liaj distingoj.

Pli malfrue, kiam krepuskiĝis kaj tra la fenestro enŝteliĝis la griza februara mateno, li iradis tien-reen, ekfumis cigaredon kaj ĵetis ankaŭ al la virino unu aŭstran *dritte Sorte*[22]. Tiu postkliniĝis por ĝi, ĉar ĝi falis sur la plankon, viŝis ĝin per sia ĉemizo kaj flankenmetis ĝin. Ŝi neniam fumis.

Johaĉjo esploris en ŝiaj aĵoj, fosserĉis scivole ie kaj tie. Sur la tablo li malkaŝis trivitan, verdvelure binditan libron kun latuna garnaĵo, kies paĝoj, apenaŭ li malfermis ilin, disfalis. Ĝi estis la memorlibro de la virino. Li legadis ĝin. Ĝi jam estis plenskribita per bondeziroj, vaste konataj vivkonsiloj, ĉerpitaj el klasikuloj, per sentencoj, kiuj pliparte citas komparojn aŭ simbolojn, la aŭroron de la vivo kaj la ankron de la espero.

Li traspikumis preskaŭ la tutan memorlibron. Tiun mallongan tempon ĝis la ekveturo de la trajno ĉi tie li volis iel traenui.

– Kiu skribis ĉi tion? – li montris al paĝo.

– Amikino.

– Kiam?

– Jam antaŭ longe.

[22] Dritte Sorte (germane): triaklasa kvalito.

– Kaj tiun?

– Konato el Gyöngyös. Sed ankaŭ gastoj foje enskribas. Ankaŭ vi enskribu ion!

– Kion?

– Elpensu ion!

Ŝi portis inkon en boteleto, plumon kun rusta pinto. Johaĉjo flankenpuŝis ĝin, kaj malŝraŭbis sian novan *Waterman*[23].

– Kiel vi nomiĝas?

– S-ino Piskeli – respondis la virino kiel dum polica pridemandado al detektivo.

– Ĉu vi estas vidvino?

– Ne – ŝi protestis –, s-ino Piskeli, edzino de Józsi Piskeli.

– Ĉu do via edzo ankoraŭ vivas.

– En Transilvanio, li estas remburisto. Li ne volas divorci.

– Estas egale. Ne tion mi demandis. Kio estas via baptonomo?

– Ilona.

Johaĉjo forte sulkis la frunton, li ankoraŭ cerbumis kun la levita orpinta plumo, preta por skribi, poste li desegnis per rondaj, kaligrafiaj literoj tiel zorge kiel en ekzerca kajero:

En verda arbaro mi iris,
Violeton mi primiris,
Diris violeto bona,
Estu feliĉa, Ilona!

Ankaŭ sian nomon li subskribis, sian plenan nomon, kaj ne scieblas, kial, kun krisigno, kiel la versaĵeton, kaj substrekante:

<u>János Patikárius!</u>

Li sekigis la humidan skribaĵon super la vitrocilindro de la lampo, transetendis la memorlibron al la virino, kiu dankis lin.

– Kiel belege vi skribas – ŝi diris. – Vi devas esti ia oficisto aŭ juristo.

Johaĉjo lastminute atingis sian trajnon.

[23] Waterman: bonkvalita fontoplumo.

La teruro

Pri la ŝtatsekretarieco de Kornél Vizy oni parolis ĉiam pli decide. La kandidato havis la plenan fidon de la registaro. Ofte jam ŝajnis tiel, ke la nomumo sekvatage okazos, sed la afero stopiĝis, dormiĝis ie. Tiam oni komencis pikadi ĝin, kaj ĝi ree ekflamis. Unuavice Gábor Tatár kaj liaj amikoj fervoris. El la parlamentaj koridoroj, partiaj rondoj ili ricevis la respondon, ke ĉio estas en ordo.

Dume printempiĝis. Sur la kaŝtanujoj de Krisztinaváros reaperis la blankaj florkandeloj, la ovala, bidermajra krado de la tunelo montris verdajn frondojn en la orpolvo de aprilo, kaj la botistoj ree stariĝis antaŭ siaj laborejoj en siaj malnovecaj, gildecaj led-antaŭtukoj.

Posttagmeze de Sankta Sabato s-ino Vizy iris por partopreni la procesion de resurekto. El la strato Attila li rigardis la praan preĝejon, en kiu iam István Széchenyi[24] ĵuris eternan fidelecon al Crescentia Seilern. La standardoj jam malrapide ekiris, promenante super la amaso, kvazaŭ de si mem irante, kiam paŝis al ŝi Gábor Tatár kaj gratulis ŝin kiel edzinon de ŝtatsekretario.

Sekvatage la ĵurnaloj publikigis la nomumon.

La plej granda sonĝo de Vizy plenumiĝis: li fariĝis ŝtatsekretario, ne vera ŝtatsekretario, kiel li esperis, nur vic-ŝtatsekretario, sed kun tiel vasta agosfero, ke lia ambicio kontentiĝis.

Dum la paskaj festoj la gratulantoj ne lasis ripozi la klinkon. La gemastroj povis inde akcepti ilin. Dum la longaj monatoj de atendado ili pliplaĉigis sian loĝejon. Kristala lustro pendis de la plafono, kaj la konzoloj, kies lampogloboj estis kovritaj per ruĝaj silkoĉapetoj, difuzis scenejan lumon sur la novan murtapeton. Vizy jam sagis en ŝtata aŭtomobilo antaŭ sian domon.

Nun ili ne plu povis prokrasti doni ankaŭ vesperon. Ili devis inviti siajn amikojn, al kiuj ili estis tiel multe devontigitaj. Post la milito ili eĉ unu pli grandan vesperon ne donis. Kiam ili notis la liston pri tiuj, kiuj estis nepre invitotaj, evidentiĝis, ke ili povas kalkuli almenaŭ kun du-

[24] Széchenyi, István (1791-1860): politikisto, ministro, verkisto, la plej grava kreinto de la moderna Hungario, „la plej granda hungaro”.

dek kvin ĝis tridek gastoj. Vizy „atribuis gravecon” al tio, ke la vespero estu inda al la okazo.

La mastrino pensis ankaŭ pri tio, ke ŝi dungos plian servistinon apud la malnova. Sed portempe ŝi ne havis servistinan ĉambron, kaj en la kuirejo du ne povis dormi.

Fine de majo, en tepida, serena tago ili okazigis la vesperon.

La tuta domo transformiĝis en gastejon kaj sukeraĵejon. Etel entreprenis la sekajn kukojn, Stefi la tortojn.

Posttagmeze finiĝis la tra tagoj daŭranta sinpelado, komenciĝis alispeca klopodado. La lokadon de la gastoj ili solvis tiel, ke la labor-ĉambron, manĝejon kaj la salonon ili preskaŭ tute malplenigis, en ĉi tiuj tri ejoj estis la tabloj primetitaj. Ges-roj Moviszter kaj Druma pruntedonis siajn arĝentajn manĝilojn kaj siajn seĝojn.

La domo de Kornél Vizy brilis.

Kiam vespere Ficsor en sia festa uniformo malfermis la dompordon kaj enlasis la gastojn, videbliĝis la ŝtuparejo, kiu per sia tegmenta lumigo transsorĉis la domon en fermitan palaceton. Sur la ŝtupoj kuris ruĝa radikotapiŝo ĝis la unua etaĝo. Ĉi tie, sur la plej alta ŝtupo staris la dommastro en redingoto, tre aminde, mansvingante al la alvenantoj, preskaŭ plijuniĝinte, plibeliĝinte de la memfiero, ke li atingis ĉion, kion li povis atingi en sia vivo.

Alvenis liaj ministeriaj amikoj, konatoj, al kiuj li ligiĝis per negocaj aferoj, kelkaj oficiroj kaj pastroj, ges-roj Tatár kun siaj du filinoj. Johaĉjo alvenis en frako, li alportis grandan florkorbon al onklino Angéla. Precize je la naŭa la ministro kaj lia fakministro kun sia edzino pasis supren sur la ŝtuparo. Je kelkaj ŝtupoj Vizy rapidis renkonte al ili, mankisis la ekscelencan sinjorinon, diris ion al la ministro, pri kio ili ambaŭ laŭte ekridis, poste li enakompanis ilin. La ceterajn gastojn jam akceptis nur Druma estiel vicdommastro.

Etel kaj Stefi priservis, vestitaj kiel sinjordomaj ĉambristinoj en blanka antaŭtuko kun ornamtufo sur la kapo. Anna restis en la kuirejo. Ŝi fritis la panerumitajn kokinojn, aspergadis per graso la junanserojn, por ke ili bele ruĝiĝu.

Ĉi tiuj knabinoj, kiam ili envenis kun pletoj, de tempo al tempo sci-

igis, kio okazas ene. La altmoŝta sinjorino sidas apud la ministro en sia violkolora velurrobo kun grandaj, perlogarnitaj orringoj en la oreloj, la altmoŝta sinjoro amindumas al la ministroedzino, Johaĉjo al la edzino de la doktoro. Nun la ministro oratoras, post li la altmoŝta sinjoro Tatár, poste Druma, fine Vizy. La aplaŭdoj, vivuado renoviĝadis.

Post kiam Etel enportis ankaŭ la majan vinon kaj elportis la pladojn, ŝi novaĵumis al Stefi:

– La altmoŝtaj gesinjoroj jam eniris la salonon.

– Kion ili faras?

– Ili konversacias.

– Pri kio?

– Nu, pri kio? Pri la servistinoj.

– Ili scipovas paroli pri nenio alia – rimarkis Stefi paŭtante.

– Ni manĝu – proponis Etel.

Ŝi prenis fritaĵpladon en la sinon, manprenis ansergropon kaj komencis mordi ĝin. Stefi manĝis per tranĉilo kaj forko, delikate.

– Kial vi ne manĝas? – Etel demandis Anna.

– Mi manĝos.

– Kial vi ŝparas al ili? – instigis ŝin Etel. – Ne bedaŭru ilin!

– Nun havas ion ankaŭ ni – konsentis ankaŭ Stefi.

– Jes – kapjesis Etel. – Ankaŭ ĉe vi multe furoras pavado. Pri malpli ili ne kontentiĝas. Baldaŭ ili tenos ĉambriston kaj kuiriston.

– Ĉambelanon – aldonis Stefi ironie ridetante –, kiel estis ĉe ni, ĉe la grafa familio.

Etel langoklakis pro la ĝuo.

Stefi gapis al la fajro.

– Ĉe ni la ĉambristo vintre devis varmigi eĉ la ĵurnalojn.

– Kial?

– Ĉar oni portis ilin de ekstere, kaj ili estis malvarmaj. La maljuna grafo foje resendis la ĵurnalon per la ĉambristo, por ke li varmigu ĝin. Poste ĉiufoje li devis varmigi ĝin. Kaj ĉu vi scias, Etel, per kio la kuiristo hejtis dum la milito, kiam ŝi bezonis grandan flamon? Per graso. Po ĉerpkuleroj li ĵetis ĝin en la fajron. Jes ja, tiel.

– Kial tio doloras vin? – demandis ŝin Etel kun plena buŝo.

Ŝi ronĝis kolojn de kokinoj, rompis iliajn kraniojn, elsorbadis la medolon. Panmolaĵon ŝi mergis en la sukon.

– Ili bone faris – ŝi aprobis. – Se ili povis fari. Almenaŭ ankaŭ al vi haviĝis iom. Gravas, ke estu manĝaĵo. Ni ja havas nenion alian ol kion ni povas manĝi.

Etel ĉiam plu ne finis sian vespermanĝon. El la teleroj ŝi elprenis ankaŭ kelkajn ostojn, prisuĉadis ilin. Ŝi ne naŭziĝis de la buŝo de la sinjoroj. Ŝi kunverŝadis por si iom da vino el diversaj glasoj kaj trinkis.

Ene eksonis la piano.

Etel malfermis la kuirejan pordon, por pli bone aŭdi ĝin. Li balancis la kapon laŭ la takto de la muziko per sia blanka ornamtufo kiel dika, maljuna anĝelo.

Oni jam dancis. Etel kaj Stefi flankentiris la tablojn. Ne ĉiuj paroj havis lokon, kelkaj deviĝis eliri en la antaŭĉambron. Ankaŭ Johaĉjo elŝvebis kun s-ino Moviszter. Pro nura ŝerco li transdancis tra la dormoĉambro en la loĝejon, ronde-ĉirkaŭe.

Foje, kiam ili venis en la banoĉambron, la sinjorido premis al si sian partnerinon kaj kisis ŝian kolon. La bela doktoredzino rukule ekridis.

Anna, kiu staradis en la antaŭĉambro kun oreloj, ruĝaj de la fornoflamoj, aŭdis tion. Li ĵetis tien rigardon. Ŝi volis rekuri en la kuirejon, sed batiĝis kontraŭ la muron. La lampoj ekflamis kun ia straba lumo.

Cetere la amuziĝo daŭris longe. Nur Moviszter eskapis tuj post la vespermanĝo, la aliaj restis. Eĉ la ministro ne movis sin. Li pompe sentis sin. Ĉiuj pompe sentis sin. Eble pro tio, ke la ministro pompe sentis sin.

Serena, leĝera rumoro zumadis. Oni ne diskutis, nur fandiĝis, disetendiĝis en la triumfa bonfarto. Klaĉetoj susuris, kiu divorcis, kiu mortis, kiu dikiĝis kaj kiu maldikiĝis, kaj la homoj, kiuj konfuzis kelkajn necertajn konatojn kun aliuloj, post kiam ili informiĝis, ke tiu, pri kiu ili pensis, estas ne tiu, sed iu alia, kaj kiu divorcis, jam duafoje edziĝis, kaj tiu, kiun oni imagis vivanta, jam delonge mortis, kaj la maldika estas efektive dika, kaj la dika efektive maldika, lokinte la koncernatojn en la konvenajn fakojn de sia cerbo, trankviliĝis.

S-inon Vizy ĉiam pli ekscitis la gajeco de siaj gastoj. Nervozajn

oscedojn ŝi glutis en la gorĝon. Ŝi elĉerpiĝis de la plurtagaj dommastrinaj farendoj, sed aparte de la malplenaj gratuloj, al kiuj ŝi devis respondi per samtiel malplenaj vortoj. Ŝi observis sian edzon tra la fumo, kiu fervoris malproksime de ŝi en la tria ĉambro ĉirkaŭ la ministro, kaj komplementis al la damoj kun tiu mensoga afablo, da kiu des pli restas, ju pli oni malŝparas ĝin.

En iu fenestroniĉo ŝi trafis plaĉan, blondan vienaninon, kun kiu hodiaŭ vespere ŝi ankoraŭ ne parolis. Ŝi estis edzino de granda entreprenisto. Ĉar ŝi ne parolis la hungaran, ŝi ne povis partopreni en la ĝenerala konversacio, kaj tial ŝi estis same izolita kiel s-ino Vizy. La dommastrino do sidiĝis apud ŝi. Tre detale ŝi rakontis al ŝi germane la morton de sia filineto. Sed ŝi rakontis ĝin jam tiomfoje, ke nun ŝi aŭdis nur siajn klakantajn, maŝinecajn vortojn, eĉ la konsolon de la doloro ŝi ne sentis. Ŝi rigardadis la pendolhorloĝon kaj malfacile atendis, ke oni foriru.

Je la tria la ministro leviĝis. Regis dika fumo. La bluaj fumokirloj tute kovris la lustron, ĝi ne lumis pli bone ol strata gaslanterno en nebulo de novembraj noktoj. Vizy somnoletis kun pendanta kapo ĉe la tablorando. Li aŭskultis, kiel ekgrincas la aŭtomobilo de la ministro, kiel ripoziĝas iom post iom la rumoro de la forirantoj. Ĉio iris bone, li pensis, ĉio estis bela, finfine ankaŭ tio plenumiĝis. Sed li jam komencis singulti; glutis sodan bikarbonaton kaj enlitiĝis.

La sinjorino restis ĉe la tablo. Ŝi observis ĉi tiujn ruinojn. Kapricaj, futurismaj kolormakuloj ŝajnis al ŝi la flava makulo de abrikota marmelado sur vitrotelereto kaj haktabulo, brasika vualkuko kaj fromaĝkloŝo, dentopikilo kaj majonezo, tabaksuko kaj maja vino kun odora galio. Ŝi volis ĉion reordigi aŭ forbalai ĉion per la mano. Ŝi estis tiel laca, ke ŝi demandis sin, kial la homoj entute manĝas.

Envenis la tri servistinoj, ŝi aerumigis per ili kaj sendis Stefi kaj Etel supren. Anna umadis ĉe la tablo antaŭ ŝia nazo. Ŝi levis kruĉon, poste remetis ĝin.

– Lasu ĉion! – lamentis s-ino Vizy, kovrante la okulojn per la mano. Ĉio tiel tedas min, eĉ vidi mi ne volas. Kompatu min, ne faru bruon! Fermu la fenestrojn kaj iru ankaŭ vi dormi! Morgaŭ vi ĉion rearanĝos.

Ne ĝenu min! Kaj matene ne veku min! Mi volas dormi longe.

Ŝia edzo ronkis ĉe brulanta lampo. Ŝi malkroĉis sian robon, ĵetis ĝin ien kaj preskaŭ salte enlitiĝis.

Apenaŭ kvin minutojn poste, ne, eĉ tiom da tempo ne pasis, la pordo de la manĝejo malfermiĝis kaj Anna enpaŝis. Sen fari lumon, ŝi ree umadis sur la tablo, eble ŝi tamen volis fari ordon, por ne havi matene tiom da farendoj. Post la multaj ridoj, babiloj regis profunda silento, la seganta ronkado de la sinjoro faris ĝin eĉ pli profunda.

Subite bruo ektondris tra la malordigitaj ĉambroj, kvazaŭ oni pafus per pistolo.

Anna, ne konanta la fremdajn meblojn, renversis kverkan seĝon, tiun de ges-roj Moviszter, ĝi tutlonge falegis sur la plankon. Ŝi atendis, kio okazos. Ŝiaj gemastroj sinkis en sian unuan profundan sonĝon, ne vekiĝis.

En la najbaraĵo, ne malproksime de ili, en la strato Tábor konata hundo tirbojis al la plena luno. Anna paŝadis tien-reen. Ŝi rekuris en la kuirejon, manĝis ion en la malhelo, rapide kaj avide, kio hazarde trafis en ŝiajn manojn, femuron de panerumita kokino kaj multajn, multajn kukojn.

Poste apogis la frunton al la pordo de la antaŭĉambro, kvazaŭ ŝi volus ien eliri. Sed ŝi alipensis, laŭte kuris en la banoĉambron, de tie tra la flava tapetita pordo en la dormoĉambron.

S-ino Vizy vekiĝis pro la sento, ke iu sidas rande de ŝia lito.

Iom ŝi leviĝis de la kuseno, malfermis siajn dormoebriajn, pezajn palpebrojn kaj gapis al la figuro. En la malcerta lumo de la luno ĝi estis kvazaŭ fantomo, ĉirkaŭita per arĝenta vaporo. Ŝi ne teruriĝis de ĝi. La figuro prenis per sia maldekstra mano ŝian manon.

Iliaj rondigitaj okuloj fiksiĝis tute proksime al tiuj de la alia.

– Kion vi volas? – flustris s-ino Vizy. – Ĉu Anna? Ĉu estas vi? Iru dormi!

La veninto ne respondis, nur sidis, nur tenis ŝian manon, ne ellasis ĝin. Ŝi moviĝis malrapide, kaj la sinjorino pro ĉi tiu stranga malrapideco ektremis, ĉar la figuro moviĝis tiel malrapide, tiel malrapide, ke oni ne povis ĝisatendi tion.

Per sia ankoraŭ libera brako s-ino Vizy kaptis al la kolo de la knabino, por forpuŝi ŝin, tamen tiel mallerte ŝi puŝis, ke ŝi pli strikte premis ŝin al si, jam preskaŭ brakumis ŝin.

– Kornél – ŝi subite ekŝrikis. – Kornél. Kiu estas ĉi tie? Kornél, helpu! Helpon, helpon!

Tiam ŝi jam sentis baton sur la brusto, fortegan baton, kian ŝi ankoraŭ ne sentis.

– Freneza – ŝi diris duonsvene kaj refalis sur la kusenon.

Vizy, kies kapo peziĝis de la vino kaj dormo, murmuretis ion, sed jam elsaltis el la lito kaj stariĝis ĉambromeze en sia longa, ĝisgenua dormoĉemizo.

– Kio okazis? – li muĝis. – Kiu estas tiu? Helpon! Murdisto, murdisto!

Li ekvidis la brilon de la tranĉilo, la klingon, la grandan kuirejan tranĉilon, per kiu la knabino gestadis. Sed eĉ imagon li ne havis pri tio, kiu estas tie, kion tiu faras, ĉu viro aŭ virino tiu estas. Li vidis nur, ke iu ŝteliras al la pordo de la salono, provas fuĝi. Li ĵetis sin kuri post la figuro kaj luktante retrenis ŝin. Estis malfacila korp-al-korpa batalo. Anna teruriĝis, ke li volas mistrakti ŝin, ŝi tiel same timis, kiel ŝia mastro. Per la maldekstra brako, muskola pro la fizika laboro, ŝi ĉirkaŭprenis lian talion, krurfalĉis kaj tiris lin malsupren. Ili luktis dum mallonga tempo. Ĉe la blanka divano Vizy perdis sian ekvilibron kaj falis sur la divanon, de tie sur la plankon. Kun sovaĝa furiozo la knabino genuiĝis sur lian bruston kaj pikis, puŝis la tranĉilon en lin, kie ŝi povis, en la bruston, ventron, gorĝon. Poste ŝi ĵetis la tranĉilon en la angulon. Nenio plu interesis ŝin. Ŝi transŝanceliĝis en la salonon.

Ŝi lavis la manojn ĉe la krano per sapo, revenis en la salonon. Io gutadis en la alia ĉambro, gut-frap, gut-frap. La sango fluetis. La sinjoro stertoris, moviĝetis, ĉiam pli mallaŭte murmuris. Anna lasis sin fali sur la ripozliton kaj endormiĝis.

Je la sesa matene la rubaĵisto sonorigis antaŭ la dompordo. Ŝi ekiris, por elporti la rubaĵon kaj poste purigi. Estis brila frumateno. Viŝante siajn okulojn ŝi rigardis la abundajn ruinojn de la festeno, ĉi tiun cirkan tohuvabohuon, ĉiam plu ne sciante, kie ŝi estas, kiel ŝi trafis ĉi

tien. Nun ŝi haltis kaj ne plu iris. La du pordoaloj de la dormoĉambro estis fermitaj, restis nur fingrolarĝa breĉo. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi fermetis ilin post si, kiam ŝi elŝanceliĝis de tie. Ŝi ne kuraĝis enrigardi. Ŝi orelesploris. Ŝi aŭdis nenion, nur silenton, profundan silenton.

Metinte siajn manojn sur la vangojn, ŝi ekhororis de si mem. Tiom ŝi timis, ke ŝia koro glacie rigidiĝis. Kapte-haste ŝi kolektis siajn ĉifonojn, ligis ilin en pakon. For de ĉi tie, fuĝi rapide, for de ĉi tie! Post la festeno la domo ankoraŭ dormis. Ŝi povus kuri ankaŭ en la subtegmenton, aŭ en la kelon, por kaŝi sin malantaŭ la gladrulilo. Sed ŝi timis, ke en la ŝtuparejo iu embuskas ŝin. Ŝi deĵetis la tukpakon.

Ŝi malfermis ĉiujn fenestrojn, rigardantajn al la strato Attila, por ne esti tiel sola. La merloj jam kantis, salutis per fajfoj ĉi tiun belegan someran matenon. Ankaŭ la tramoj sonoradis, ŝvabaj virinoj portis lakton en la najbarajn domojn.

Ĝis la dek-unua neniu ĝenis ŝin. Ŝi kaŭris sur la ripozlito, kubutante sur la genuoj. Post la dek-unua iu sonorigis ĉe la ekstera pordo, longe sonorigis, volis ĉiel enveni.

– Ili dormas – suprenkriis Ficsor al la sonoriganto. – Kial vi sonorigas tiel multe? Sobportu, mi transprenos ĝin.

Estis la spicista komizeto de Viatorisz, kiu tiatempe kutimis disporti la spicojn. La dompedelo ankoraŭ aldonis:

– Granda festenado okazis ĉi tie nokte.

S-ino Moviszter sidiĝis al la piano, kiel ŝi kutimis tiatempe kaj ludis, kantis super ŝia kapo. Eksonis la telefono, Anna levis la aŭdilon sed remetis ĝin. Poste la sonorilo de la telefono daŭre tintadis.

Ĉirkaŭ la dua posttagmeze oni frapis ĉe la pordo.

– Malfermu! Ĉu vi ne aŭdas? Jam malfermu! Ĉu vi ankoraŭ dormas? Tio ne eblas. Ni devas rigardi de la strato.

Nun oni suprenkriis el la strato Attila:

– He, iu! Kiu estas tie? Tie estas iu. Iu devas estas tie. Oni jam malfermis la fenestrojn.

Kaj ĉiam pli da voĉoj aŭdeblis, ie-tie kaj ĉie.

– Sed se mi diras, ke ili ne foriris, altmoŝta sinjoro. Tion ni devus vidi. Anna, Anna! Ĉu vi dormas? Oni devas veki ŝin. Nur batfrapu la

pordon, batfrapu pli laŭte! Enrompu la vitron! La pordon enrompu, la pordon! Strecĉmalfermu ĝin!

– Ne permesite – diris la voĉo de Druma. Kuru tuj por policano!

La policano alvenis. Li aŭdis, kiel pompa amuziĝo estis ĉi tie nokte. Unue ankaŭ li sonorigis, frapis la klinkon per ŝlosilo, sed trovinte la kazon suspekta, li sendis por seruristo. Tiu rompis la seruron.

Li petis du atestantojn apud sin, la altmoŝtan s-ron Druma kaj la seruristan majstron, kun ili kaj Ficsor li paŝis en la antaŭĉambron.

– Mi diris, ke iu estas ĉi tie – ripete konfirmis la dompedelo kaj ekvidis Anna, kiu jam staris apud la ripozlito. – Ĉu do vi estas ĉi tie? Kial vi ne malfermas la pordon? Ĉu vi estas surda?

La policano eĉ iom ne atentis ŝin, iris plu stamfante per siaj pezaj paŝoj al la dormoĉambro.

Li enpuŝis la du pordoalojn, kaj tie prezentiĝis al li ĉiuj teruroj de amuzparka hororkamero.

Konsternite li retrocedis. Nun unuafoje li malkovris tian murdon.

Kurpaŝe li rapidis al la knabino, kaptis ŝiajn ŝultrojn kaj ekster si li skuis ŝin tutforte.

– Ĉu estis ci?

Anna mallevis la okulojn kiel iu, kiu konfesas.

– Kial ci faris tion? – almuĝis lin la policano, malferminte vaste sian buŝon kun la silurlipharoj, liaj okuloj elorbitiĝis. – Oni pendumos vin! – li blekis, preskaŭ ekster si, eldirante la verdikton kiel unua forumo.

Anna sciis tion. Sed nun ŝian koron, frostintan nokte en la morta angoro, subite tamen plenigis ia varmo kiel printempa vento pro tio, ke ŝi estis ciumita, ĉi tiu kamparana policano, kiu estis tia, kiel la fraŭloj en ŝia vilaĝo, ciumis ŝin, kaj ŝi ne plu vidis en li la oficialan personon, kiu plenumas sian devon, nur iun, kiu estas ŝia sango, kiu estas ŝia kunfrato.

En la antaŭĉambro kunariĝis amaso da samdomanoj kaj fremduloj. Ili kaŝrigardis en la manĝejon. La policano energie forrifuzis ilin:

– Disiĝu! – li ordonis. – Okazis murdo! Ĉiu forlasu la loĝejon! En la nomo de la leĝo. S-ino dompedelo, ŝlosu la dompordon! Neniu povas forlasi la domon. Vi estas respondeca pri tio.

Oĉjo Antal, oĉjo Antal Szűcs, la ĉeangule postenanta policano, kiun ankaŭ Anna konis, faris disponojn. Ĉiuj rigardis tion trankviligitaj. Estis bone vidi ĉe la terura frenezo kaj nekomprenebleco de la vivo, en ĉi tiu ebrieco de sango ĉi tiun simplecon kaj sobrecon, la reprezentanton de la forto kaj povo, kiel li iras-venas kun memcerteco, kiel li klakadas per sia glavo, kiel elstariĝis en tiom da veoj kaj malsanoj ĉi tiu granda peco da sano kun siaj larĝaj ŝultroj, la policano, la masiva, dika policano, piliero de la socia ordo.

– Kie estas la telefono? – li demandis Anna

Ŝi kapgestis al la aparato.

– Ha lo! – ekparolis la policano. – Ĉu policestraro de la unua distrikto?... Ha lo... ha lo!... Antal Szűcs, polica serĝento n-ro 1327 raportas respekte al la s-ro aktisto... Okazis murdo... duobla murdo... Strato Attila 238, unua etaĝo... Vizy... Kio estas lia alia nomo?... Gornél... Jes ja... Kornél... Ambaŭ mortis... Mi kaptis la farinton... Mi tenas la lokon... Jes ja – li akceptis la disponojn de la aktisto –, jes... jes... jes... jes... jes... jes... jes...

Li akompanis la knabinon apud la fornon de la salono, starigis ŝin almure, por ke ŝi ne povu forsalti, kaj ekde tiam unu lia okulo ripozis sur la murdinto, la alia sur la pordo. Li deprenis sian kepon, viŝis la frunton, forte elblovis post la ekscitoj. Neniigita, rompita, Ficsor rigardis la plankon. Druma kaj la seruristo interflustradis.

Hupo de policaŭtomobilo ekŝrikis en la strato Attila. Du aŭtomobiloj alvenis. En la unua sidis konsilisto el la ĉefpolicestraro, enketa juĝisto kaj polica kuracisto en la akompano de la deĵoranta oficiro, la dua estis plena de detektivoj.

– Mi raportas respekte al la altmoŝta s-ro konsilisto – honorsalutis Antal Szűcs en atentopozo, kunfrapinte la maleolojn. – Mi, kiel postenanta policano... Hodiaŭ posttagmeze je la dua horo...

– Ĉu ĉi tiu estas la murdinto? – demandis la konsilisto, interrompante liajn vortojn?

– Jes – montris al ŝi la policano –, ilia servistino.

La sinjoroj mire rigardis ŝin.

Dum ilia longa praktiko ankoraŭ ne okazis, ke la murdinto ne fuĝis

de la krimejo, aŭ almenaŭ ne provus fuĝi. Estis strange.

Ili rapide ĉirkaŭstaris ŝin, kvazaŭ timante, ke ŝi fuĝos, kvazaŭ nun ili volus murdi ŝin.

– En ordo – diris la konsilisto.

Li proponis al la enketa juĝisto fari la surlokan esploron.

La daktiloskopiisto malkovris du nedifektitajn kaj uzeblajn fingrospurojn, li tuj kunprenis la peplomon, la kusentegon, por fiksi ilin. Ankaŭ la fotografistoj faris sian laboron.

Druma prezentis sin al la konsilisto, tiu lasis lin kaj la alian atestanton foriri.

En la salono, kie hieraŭ oni ankoraŭ frapis, antaŭ ol enpaŝi, la homoj de la polico senĝene laboris, kvankam la iamaj mastroj de la domo ankoraŭ kuŝis transe, en la alia ĉambro.

La polica kuracisto eniris kun la konsilisto, la enketa juĝisto kaj la aktisto en la dormoĉambron.

S-ino Vizy kuŝis dorse en la lito, sen unusola sangmakulo. Ŝajnis, ke ŝi dormas. Ŝia buŝo estis fermita, ĉirkaŭ ĝi ŝvebis eta, malvarma rideto. La tranĉilo penetris rekte en la mezon de ŝia koro, ŝi havis nur unu grandan vundon, evidente ŝi tuj mortis pro interna sangado, sen suferoj. Ŝia vizaĝo radiis inspiritan trankvilon.

Vizy kuŝis antaŭ la divano sur la planko, en jam koagulinta, nigra sangoflako kun naŭ vundoj. Sur lia kolo estis spuro de ungo, sub lia okulo longa skrapo. Videblis, ke li luktis ĝis sia lasta spiro. Malfacile li mortis, kaj – kiel la kuracisto konstatis – multe pli malfrue ol lia edzino, post longa agoniado. Siajn makzelojn li tramordadis, lia aglonazo leviĝis rigore, kolere el lia vaksopala vizaĝo, ambaŭ liaj manoj estis pugnitaj. Li estis preskaŭ heroa en sia transmorta forto: io bela kaj malnoveca estis en tio, kio ne plu ekzistas.

Sur la viktimoj jam montriĝis la kadavraj lividaĵoj.

La membroj de la kriminala komisiono, kiuj vidis jam tiel multe da teruraĵoj en sia vivo, mem konsterniĝis, ke la murdinto finis kun ili kun tiel bestia krueleco. Kiam unu aŭ alia el ili transiris en la salonon, sur sia vizaĝo li kunprenis la reflekton de la teruro kiel en spegulo. Sur ĉiu vizaĝo regis konsterno, ĉar ili ne komprenis, kial la murdo okazis, kaj ili

klopodis kompreni ĝin. Nur sur la vizaĝo de Anna ne estis teruro. Ŝi mem ne komprenis, kial ŝi faris tion, sed ŝi ja faris, kion ŝi faris, kaj ĉar ŝi jam faris tion, tie interne profunde, tre profunde certe sidis io, pro kio ŝi devis nepre, laŭnecese fari tion. Kaj kiu vidas interne, tiu alimaniere vidas, ol kiu nur de ekstere vidas.

En la angulo ili trovis la tranĉilon, flankenmetis ĝin kiel pruvobjekton. Ili faris inventaron pri la mebloj, mezuris per mezurbendo la ĉambron laŭlarĝe kaj laŭlonge, skizis ĝian planon, endesegnis la du kadavrojn. La kuracisto diktis la protokolon.

Tiam elvenis la konsilisto, donis instrukcion al la detektivoj:

– Traserĉu la ĉambrojn!

Nur tion ili atendis. Kiel spurhundoj, kiuj je fajfosigno elkuregas sur la ĉasareon, ili enkuris en la diversajn ejojn, flaradis, frapfermadis la pordojn. Unu tuj deŝiris la kovrilon de sur la ripozlito, ŝovis sin sub ĝin, kvazaŭ li serĉus iun. Ili malfermis la kovrilon de la piano. Eĉ inter la pladoj de la gastotablo ili fosserĉadis, en la ŝaŭmtorto per vitrokulero. Ili serĉis evidente rabitan monon, juvelojn. Sed nenie ili trovis ion similan.

En la servistina ĉambro ili dismetis la kampadan liton de Anna. Sur unu seĝo ili trovis ŝian ligitan tukpakon. La detektivo enportis kaj malligis ĝin. En ĝi estis ĉio, kun kio iam ŝi transpaŝis la sojlon de ĉi tiu domo, tiu paro da ĉifonaj poŝtukoj, kelkaj kaptukoj, la manspegulo, la ferkombilo, la ludtrumpeto kaj ankaŭ papersaketo da karbiĝintaj maronoj, nur la blua katunrobo kaj la viraj laĉoŝuoj mankis, tiujn ŝi jam antaŭ longe eluzis.

La detektivo raportis al la konsilisto:

– Ŝia lito ne estis pormetita.

– Tio gravas – diris la konsilisto. – Necesas noti en la protokolon. Ŝi ne volis kuŝiĝi. Ŝi preparis sin por sia ago.

Nun li kondukigis ŝin de apud la forno antaŭ sin, starigis ŝin kontraŭ la lumo, la granda, maja lumo, inundanta tra la fenestroj kaj demandis ŝin:

– Ĉu vi faris tion?

– Mi…

– Kial?

– Mi… mi…

– Kion signifas „mi”? – grumblis la konsilisto incitite. – Tion ni jam aŭdis. Mi demandis, kial vi faris tion? Kial?

– Mi…

– Ĉu vi koleris ilin? Ĉu vi volis venĝi vin kontraŭ ili?

Anna sulkis sian junan, sed fru-faltan kamparanan frunton. Ŝi rompadis la manojn, suspiradis.

– Ve! – ŝi diris. – Ve! – kaj glatigis siajn harojn per tiu nenatura, freneza movo, kiun ŝi lernis de sia mastrino.

La polica kuracisto traktis pri io kun la konsilisto.

La kuracisto starigis Anna pli proksimen al la fenestro. Li tenis sian fermitan manoplaton antaŭ la okulojn de la knabino, rapide forkaptis ĝin, plurfoje sinsekve, kvazaŭ ludante. Li etendis la manojn malantaŭ ŝiajn orelkonkojn, forte premadis tie. Li demandis pri io kaj alio. Li sidigis ŝin sur seĝo, frapadis ŝiajn genuojn.

Tiam la konsilisto rimarkis, ke sur la ĉemizo de la knabino ankoraŭ ruĝas du sangmakuloj, grandaj kiel papavetoj.

– Ŝi havas monataĵon – klarigis la kuracisto.

Ĉe tio la multaj viroj ĉeestantaj rigardis al Anna, poste flanken kun vireca pudoro.

– Cetere apenaŭ sangmakulita – diris la konsilisto, dum li plu ekzamenis ŝin kaj levadis ŝiajn brakojn.

– Nur ĉi tie. Kaj ĉi tie, vidu! Ĉu vi lavis vin? – li demandis ŝin. – Kie vi lavis vin? Ene oni ankaŭ sen tio malvestos ŝin – li diris al la aliuloj.

La sinjoroj denove intertraktis, la sinjoroj denove notis. Ili daŭre intertraktis, daŭre notis.

– Kie vi estis dum la soveta tempo? – konfesigis ŝin la konsilisto. – Kie vi servis? Ĉe kiu? Kio estas lia profesio? Ĉu vi ne havis ian komunistan amanton, iun teroriston, kiu donis al vi tiajn skribaĵojn, tiajn ruĝulajn skribaĵojn?

Oni devis supozi tamen rabmurdon, kvankam ankaŭ tio ne verŝajnis, ĉar la monon, ĉiujn valorobjektojn oni trovis netuŝitaj.

– Kion vi kunprenis? – konfesigis ŝin la konsilisto. – Nu, malkaŝu

bele! Kien vi kaŝis tion? Vi faros pli bone, kara, se vi konfesos. Ni malgraŭe malkaŝos ĉion.

Li ordonis:

– Serĉpalpu ŝin!

– Levu la manojn – komandis la policano.

Anna mallerte etendis supren la brakojn, ĉe la kubutoj iom fleksitajn.

– Rekte – instrukciis la policano.

Nun ŝi jam pli rekte tenis la brakojn, kaj la murdinta knabino, ŝarĝita per la plej terura kulpo, revokis por minutoj ian malnovan, plumpan stiliton en ilian memoron, kiu staras kun brakoj, etenditaj alĉiele.

La detektivoj komencis la palpserĉadon. Ili serĉis ĉe ŝi tranĉilon, pafilojn. Ili trapalpis ŝiajn mamojn, jupon. Antaŭe, malantaŭe.

– Nenio – ili konstatis –, nenio.

Oni jam finis la surlokan esploradon. Povis veni la kadavristoj. La policaro kuracisto kaj la konsilisto subskribis la dokumentojn sur la tablo.

Nun la konsilisto turnis sin al la du detektivoj:

– Akompanu ŝin al la policejo!

Anna ankoraŭ tenis supren la brakojn, jam tute sencele, ĉar dume oni malatentis ŝin. La detektivoj gestis, ke ŝi jam povas mallevi ilin.

Kaj ili vokis ŝin:

– Ni iru!

La knabino ne movis sin.

Ili ĉirkaŭprenis ŝin, unu detektivo tuŝis ŝian brakon. Ŝi tamen tute facile forŝovis lin de si.

La konsilisto, kiu promenis tien-reen en la salono, haltis. Li diris al la detektivoj:

– Katenu ŝin!

La detektivo krucis la polmojn de la knabino, ĉirkaŭvolvis ilin per ĉeno, kiu mallaŭte klakis.

Anna tion jam lasis fari. Scivole ŝi rigardis siajn ĉenitajn manojn.

La kateno estis tute nova, ankoraŭ brila; maldika, mizera ĉeno, tamen fortika, ne eblis rompi ĝin. Ŝi kredis ĝin pli dika kaj rusta kun peza globo ĉe ĝia fino. Tamen ŝajnis al ŝi koni ĝin de ie, de malnovaj tempoj,

eble el popolfabeloj, en kiuj apud la reĝa palaco staras ĉiufoje malliberejo. Ŝi jam ne miris pri ĝi. Indiferente ŝi observis ĝin kaj staris tie, kiel iu, delonge portanta ĝin, kaj jam delonge kutimiĝinta al ĝi.

La detektivo sumetis sian nigran bulĉapelon kaj ekirigis ŝin. Ekstere en la koridoro oni flustris ĉirkaŭ ŝi: „murdinto... jen la murdinto...” Stefi kaj Etel, palaj, elklinis sin tra la gardrelo de la dua-etaĝa koridoro, kunfrapis la manojn. La tuta domo tremis.

Pli malfrue sur la sama ŝtuparo oni suprenportis du nigrajn lignoĉerkojn, enlevis la viktimojn, transportis ilin en la frostkameron de la tribunala anatomia instituto.

Sed apenaŭ pasis unu surprizo, venis alia. La detektivoj post duonhoro revenis haste, kunprenis Ficsor kaj lian edzinon kun la suspekto de kunkulpeco, dum la esploroj nome ekestis la suspekto, ke ili estas en akordo kun la murdinto, la parencoj komplicis.

En la renversita domo Etel dompedelis, kaj Druma transprenis la komandon. Li sendigis per Stefi du respondendajn telegramojn al la poŝto: unu al la frato de la forpasinta virino en Eger, la alian al Johaĉjo, kiu jam reveturis al Vieno. Li tenis konstantan kontakton kun la polico, li akceptis ankaŭ la ĵurnalistojn, kiuj informitaj pri la murdo, anoncis sin unu post aliaj, petante intervjuojn de li, ankaŭ de la servistinoj, por skribotaj „koloraj” raportaĵoj.

Cetere ĉiuj perdis la kapon. Moviszter tenis nur maleme-ĝeme la konsultajn horojn, poste transiris al ges-roj Druma. Ne satdorminte pro la trosatiĝo de la hieraŭa festenado, la loĝantoj de la domo frostotremete interŝovis sin. S-ino Druma regalis per laktokafo kaj kukoj la vizitantojn, kiuj, kompreneble, cerbumis pri la teruraĵo.

– Mi ne komprenas – plendis s-ino Moviszter –, mi ne komprenas, kiom ajn mi streĉas la kapon, la afero ne klariĝas al mi. Tia knabino, tiel honesta knabino...

– Al mi ŝi jam delonge ne plaĉis – ekparolis s-ino Druma. – En ŝiaj okuloj estis io malica. Ŝi havis firuzan muzelon.

– Sed jam preskaŭ unu jaron ŝi servis ĉe ili. Kaj ni konis ŝin ĉiuj. Ŝi ŝajnis tiel fidinda.

– Ha – diris s-ino Druma, frapinte sur la frunton –, nun enkapiĝas al

mi, mi havis tondileton. Vi scias, tian iom kurban ungotondilon. Mi tre ŝatis ĝin. Ĉi tiu tondileto malaperis post Kristnasko. Ni serĉis ĝin tra semajnoj kun Stefi, mi eĉ menciis al vi, ke nenie ni trovas ĝin. Eĉ ideon ni ne havis, kiu ŝtelis ĝin. Ĉe ni ja neniu tia pasas. Stefi ne ŝtelas, nek via Etel. Nu, bonvolu kredi, ŝi forprenis ĝin.

– Ĉu vi opinias?

– Jes, kara. Mi estas konvinkita. Kiu murdas, tiu pretas por ĉia fiago. Ne pro ĉi tiu bagatelo mi asertas tion. Vi ja konas nin. Ĉe ni io tia, dank' al Dio, tute ne gravas. Sed mi vetas per mia kapo: ĉi tiu forprenis ĝin.

– Nekompreneble – murmuris s-ino Moviszter. – Oni komencas timi, oni ne scias, kun kiuj oni vivas. Terure.

Malserena, nervoza etoso ekregis en la ĉambro. S-ino Druma prenis sian fileton en la sinon, kisis lin, tremante ĉirkaŭrigardis en la brila, per burĝa komforto instalita manĝejo. Ŝia edzo stariĝis. Li ankoraŭ ne povis liberiĝi de la posttagmeza travivaĵo, de la terura bildo, kiun li vidis propraokule kaj jene li retorikis:

– Tiuj ruĝuloj venenis la animon de la sana hungara popolo. Tiuj banditoj, tiuj kanajloj. Antaŭe tio estus neimagebla. Tia hororaĵo. Jen la rezulto de la multaj komunistaj propagandoj, agitantolernejoj. Tio estas la lasta eksceso de bolŝevikismo.

– Kaj de la milito – aldonis Moviszter.

– Mi kredas – diris s-ino Moviszter –, ŝi estas tamen frenezulino. Ĉar kiu havas sendifektan menson, tiu ne faras ion tian. Finsume ŝi ja havis nenian kaŭzon por tio. Ŝi estas nejuĝokapabla.

– Ĉu ne juĝokapabla? – diskutis kun ŝi Druma –, ba, sinjorina moŝto. Tion oni povas plej facile aserti. Kaj la du homvivoj? Oni devas pendumi ŝin. Aŭ ĉu vi kredas, Miklós, ke ŝi estas vere nejuĝokapabla?

– Kiam ŝi plenumis la krimon, certe. Sed cetere…

– Ĉu vi aŭdas? Ankaŭ via edzo ne kredas tion, kvankam li estas kuracisto. Nu ja, ĉu ni lasu buĉi nin? Ŝnuron ĉirkaŭ ŝian kolon! Se malsana, ankaŭ tiam ŝi pereu! Oni devas ekstermi la pustulan furunkon. Ili kunlaboris ĉiuj: Ficsor, tiu ruĝula kanajlo, lia edzino, la tuta bando. Tion oni ne povas aranĝi per tia kuracista rezonado, ke ŝi estas aliena,

ke ŝi havas malfortan nervosistemon, por tio bezonatas jurista rekono. Ĉar kio okazos alie al la socio? Jes ja, oni devas forbruligi la serpentoneston, oni devas ekstermi ĉiujn. Kiu renversas la ordon de la socio, tiu pereu. Senindulge! Pendumi, pendumi…

La eta Druma en la sino de sia patrino, komencis ploreti. Ŝia patrino levis lin, portis lin lulante, mildigante. Ankaŭ Druma ekmaltrankvilis, kie Stefi forrestas tiel longe, ŝi ja kuris nur al la poŝtoficejo en la ĉefstrato.

Nun enŝteliĝis junulino en la duonhelan ŝtuparejon.

Senbrue ŝi glitis supren laŭ la muroj kiel ombro en la unua etaĝon, neniu rimarkis ŝin. Ŝi haltis antaŭ la police sigelita loĝejo de ges-roj Vizy, ŝi sonorigis, plurfoje sinsekve.

Dum minutoj ŝi atendis, kaj post kiam neniu venis, ŝi sidiĝis antaŭ la pordo kaj ekploris amare. Etel enkuris al ges-roj Druma:

– Bonvolu veni – ŝi novaĵumis senspire –, revenis Katanjo.

– Ĉu Katanjo? – ili demandis ektime, ĉar en ĉi tiu omena tago ĉio ŝajnis timiga, antaŭsigno de nova malfeliĉo. – Kiu estas tiu Katanjo?

– Kiu antaŭe servis ĉe ges-roj Vizy.

– Kion ŝi volas ĉi tie? – nervozis Druma. – Kial vi ne ŝlosis la dompordon? Kiu enlasis ŝin?

Ĉiuj elsvarmis en la koridoron. De tie ili rigardis tuŝite kaj mirfrapite: la servistino, la malnova servistino en siaj blanka jupo, rozkolora ĉemizbluzo, lakŝuoj sidis antaŭ la pordo de siaj mortintaj gemastroj, kiel vivanta statuo de fideleco, kiel hantanta fantomo. Laŭte ŝi oj-veis.

– Ŝi priploras ilin – flustris Etel kaj viŝis larmojn el la okuloj.

Ĉio estis vere tiel larmiga, tiel interesa kaj tre belega kiel la lasta ĉapitro de kelkgroŝa romano. Ankaŭ tiu kunariĝinta amaso primiris tion, kiu ensvarmis el la strato en la ŝtuparejon.

Druma sendis Etel malsupren, por forigi la fremdulojn, fermi la dompordon per ŝlosilo kaj suprenkonduki la knabinon al ili.

Estis neeble reanimi Katanjon. Ŝi nur lasis flui siajn varmegajn larmojn, neniel ŝi emis ĉesi. Etel frapadis ŝian dorson. Ŝi bezonis esti preskaŭ apogata, kiam ŝi kondukis ŝin supren sur la ŝtuparo en la kuirejon de ges-roj Druma.

Ĉi tie la domanoj sidigis ŝin. Sed apenaŭ ŝi malfermis la buŝon, ŝi denove plorekmuĝis. Eĉ tion ŝi povis malfacile elĝemi, kiel ŝi trafis ĉi tien.

Ŝi rakontis, ke ŝi ĵus legis la okazintaĵon en la vespera ĵurnalo; ŝi tuj vestis sin, rapidis, por vidi tiun benitan altmoŝtan sinjorinon kaj la altmoŝtan sinjoron, pli bonaj homoj ol tiuj ne ekzistis sur la tero.

– Mi sciis – ŝi sufokiĝis, kaptante por aero –, mi sentis, mi sonĝis tion.

– Kion vi sonĝis, Katanjo mia, karulinjo? – demandis Etel.

– Ŝi estis fianĉino – ŝi anhelis.

– Ĉu la altmoŝta sinjorino?

– Tiel bela, pala fianĉino. Kun blanka vualo. Kun florkrono sur la kapo.

– Tio antaŭdiras malbonon. Nuptofesto signifas ĉiam malbonon.

– Kaj ni kuiris, bakis, ni buĉis tiom da kortobirdoj, ke la graso abunde gutadis.

– Gastaro aparte malbonaŭguras.

– Mi ja volis veni, por averti. Ho ve, se mi estus veninta! Ve, se mi estus restinta dungita! Ĉar pli da tiaj lokoj ne ekzistis en Budapeŝto.

Katanjo senmukigis la nazon, ŝia poŝtuko estis jam tiel humida kaj malpura kiel lavtuko.

Por devii ŝin de la malĝojo, s-ino Druma demandis ŝin:

– Kie vi nun servas, Katanjo?

– Ĉi tie ĉe gasfabrika inĝeniero – ŝi denove plorekmuĝis.

– Nu bone, jam ne ploru! Vidu, ankaŭ Stefi estas ĉi tie!

En taso ŝi verŝis laktokafon, pliriĉigis ĝin per dika, grasa acidkremo, metis ĝin antaŭ ŝin.

– Trinku ĝin, Katanjo! Apude vi trovas ankaŭ du bongustajn, freŝajn kukojn. Stefi, kara, ankaŭ vi kafumu, hodiaŭ vi ankoraŭ ne kolazionis. Alportu iom da fruktoj el la vazoŝranko! Etel, ĉu vi volas tason da kafo? Manĝu! Kion ni povus fari kontraŭ tio? Bedaŭrinde, jam nenio fareblas.

Ili lasis solaj la servistinojn.

La tri knabinoj silentis kun plorrruĝaj okuloj kiel tri funebrantaj fa-

milianoj. Katanjo estis ebria de la doloro. Sur ŝia vizaĝo la malsekiĝinta rizpulvoro kazeeciĝis.

Sed kiam la du aliaj servistinoj kun certa vortabunda objektiveco rakontis la murdaferon, ĝi komencis interesi ŝin. Ankaŭ per sia mankhava imagopovo ŝi scipovis sekvi la okazintaĵojn, ŝi konis precize la scenejon. Ŝi postulis ĉiam pli novajn detalojn, ŝi ne povis satiĝi per ili. Kaj post kiam al la knabinoj jam ekmankis dirindo, ŝi mem ripetis la tuton, tiom travivante, ke ŝi ektremis, tiel plastike ŝi rakontis, kvazaŭ ŝi mem estus ĉeestinta. Ŝi bedaŭris nur, ke la kompatindaj gesinjoroj estas jam fortransportitaj. Ankoraŭ unufoje, la lastan fojon ŝi volus vidi ilin, almenaŭ la altmoŝtan sinjorinon, en ŝia koagulinta sango, en tiu lito, kiun ŝi tiomfoje preparis por ŝi.

Interne oni traktis pri Katanjo.

– Vidu – diris Druma –, ankaŭ tio pruvas, kiaj homoj ili estis. Kiujn tiel kompatas la eksaj servistinoj, tiuj certe ne estis malbonaj homoj. Cetere, kia knabino estis ĉi tiu Katanjo?

– Bonema knabino – respondis s-ino Druma –, diligenta, kaj kiel mi scias, bonmora. Ŝi estis ilia plej bona servistino. Mi ja ne komprenas, kial ili lasis ŝin foriri. Se ŝi estus restinta, tio certe ne okazus. Ĉu vi opinias tiel, s-ro doktoro?

– Povas esti – diris Moviszter, profunde meditante –, povas esti.

Kial?...

Ĉiu tia sensacio baldaŭ pasas.

Kelkajn tagojn ĝi flamas, homoj parolas pri ĝi, poste ĝi konsumiĝas en la de si ekbruligita fajro.

Ankaŭ ĉi tiu kazo estis tia. Komence oni febre diskutis ĝin en la ĉirkaŭaĵo sen veni pli proksimen al ĝia kerno. La vendejo de la spicisto Viatorisz fariĝis vera kazino. Sinjorinoj kaj servistinoj de Krisztinaváros ĉiutage pritraktis ĝin inter la bareloj de kaŭstika sodo kaj sakoj de fazeoloj. Ĉiu demandis al si kaj al aliuloj, kial ĝi okazis. Tamen neniu scipovis doni kontentigan respondon kaj al si kaj al aliuloj.

La viktimoj estis enterigitaj ĉe la granda kaj unuanima kunsento de la socio apud la tombo, kie ilia unu filineto Piroska ripozis.

Dum ĉi tiu multhoma enterigo la polico devis konservi la ordon. Stratbuboj kuris post la ĉerkoj, ili tretis unu la aliajn, por ŝiri florojn por memoro el la florkronoj. Ĉe la tombo aŭdiĝis oratoraĵoj de politika karaktero. Aperis pluraj publikvivaj eminentuloj, tiuj multaj gastoj, kiuj partoprenis en la vespero, la parencoj de la forpasintoj, la geedza paro Patikárius el Eger, nur Johaĉjo mankis, la telegramo – kiel ŝajnis – ne atingis lin. Ĉeestis tamen Etelka Vizy, la deklasiĝinta fratino de Kornél Vizy, kiu kutimis vendi falsitajn egiptajn cigaredojn, ŝi skuploris sub sia funebra vualo, laŭte priveante sian fraton, sian grandan kaj potencan fraton.

Post sia konfeso de kulpeco Anna Édes estis arestita. Oni prenis fingropremojn de ŝi, trifoje fotis ŝin, poste transeskortis al la prokurorejo en la arestejo de la strato Markó.

Kiam ŝi enpaŝis, ŝajnis al ŝi, ke la muroj falegos sur ŝin.

Ŝi vidis ĝisĉiele altan ferkonstruaĵon en la grizece krepuska lumo kun nuraj ferpordoj, ferŝtuparoj, kiuj tondradis kiel vapormuelejo, kie oni seninterrompe muelas. Ŝiaj provosoj kondukis ŝin en la trian etaĝon, fermis ŝin en ĉelo. Tie estis unu lito, unu seĝo, unu tablo kaj necesujo; ĝi estis sufiĉe pura, pli klara kaj iom pli granda ol ŝia kuirejo. Ŝi preskaŭ ne kredis, ke tia estas prizono. Ŝi kredis, ke en prizonoj la malliberuloj kuŝas sur pajlo, kaj okuloj de serpentoj kaj ranoj lumas al

ili en la mallumo. Ŝi sidiĝis sur la seĝo. Ŝi ne ploris, sed multe cerbumis. Vespere ŝi genuiĝis antaŭ sia lito kaj preĝis.

La enketa juĝisto, post kiam li funde trastudis la policajn protokolojn, vidis ne multe pli klare ol tiuj, kiuj ie-tie babilis pri ĝi surbaze de kelkaj onidiroj. La prokurora oficejo konsideris grava, klarigi en ĉiu detaloj ĉi tiun implikitan krimaferon, kiu povus havi disbranĉiĝantajn politikajn elementojn, precipe nun, post la falo de bolŝevikismo, kiam la socia ordo ankoraŭ ne tute restariĝis. La enketa juĝisto metis sin kun granda fervoro al la laboro. Tamen, ju pli li avancis, des pli montriĝis punktoj, kiujn li ne komprenis. Li trafis ree kaj denove en sakstraton.

Antaŭ ĉio li klopodis klarigi la rolon de la dompedela paro. La polico metis ilin „en provizoran areston”. Ili ĵuris je ĉiuj sanktuloj de la ĉielo, ke ili estas senkulpaj, kun tia ardo, ke en la sekvaj tagoj al ili ne plu restis ceteraj argumentoj. Ilia sindefendo elĉerpiĝis per tio, ke ili nigrigis Anna, kredigis ŝin kaŝfia, sekretema, ĉiopreta knabino. Cetere kontraŭ ili ne troviĝis pruvobjektoj. La komizeto de Viatorisz konfesis, ke Ficsor vere resendis lin, preskaŭ kolere li algrumblis lin, ke li ne sonorigu, ĉar tiuj ankoraŭ dormas. Post la granda vespera aranĝo ĉi tiu supozo de la dompedelo ne povis esti nepre misintenca. Post kelkaj tagoj la enketa juĝisto liberlasis lin kaj ankaŭ lian edzinon.

Li ĉiutage kondukigis antaŭ sin la akuziton.

Kiam la unuan fojon oni venis por ŝi, Anna faris krucosignon, oferis sian animon al Dio en la kredo, ke oni jam kondukas ŝin al la eŝafodo kaj senplie pendumos ŝin. Oni starigis ŝin antaŭ magran, kalvecan sinjoron, kiu havis sur sia konfekcia koltuko broĉon kaj oran geedzan ringon sur sia harriĉa mezfingro. Anna imagis ĉi tiun diligentan, modeste salajratan oficiston de la justico tre-tre riĉa sinjoro. Pli malfrue ŝi vidis, ke li ne estas malbona homo. Li parolis delikate, bonintence kun ŝi, ŝi kutimiĝis al li, ŝi jam tediĝis de tiom da konfesigoj. Li dirigis de ŝi, kion ŝi faris tiam kaj tiam, instigis ŝin rememori, kio progresis malfacile, ĉe tio la juĝista moŝto, kiu memoris ĉion pli bone, helpis ŝin. Jam de horo al horo, de minuto al minuto ili konstatis la okazintaĵojn de la lastaj tagoj.

Anna rigardis en liajn okulojn; ŝi ŝajnis nek rompita, nek konfuzita.

Nenion ŝi neis. Eĉ, kelkfoje ŝajnis tiel, ke ŝi rekte akuzas sin. La enketa juĝisto kompletigis la krimesplorajn datumojn, aparte rilate al ŝiaj eventualaj komplicoj, sed nun jam ŝajnis ekskludita, ke ŝi havus komplicojn, la indikoj akordis, la akuzito ankaŭ pli frue ne konfesis ion alian ol en la policejo. Ŝi ne scipovis respondi nur al la demando, kial ŝi perpetris sian agon.

Laŭvice oni asignis ĉiujn loĝantojn de la domo.

La atesto de Druma plej multe pezis.

Dum la nokto de la murdo, ĉirkaŭ la dua, li vidis, ke la knabino umadas ĉe la vazoŝranko, ĉe la tirkesto, el kiu – laŭ lia atesto – ŝi elprenis la tranĉilon, kaj li vidis ankaŭ, ke dum la adiaŭado de la gastoj ŝi jam ŝteliris en la banoĉambron.

En la abundvorta, malklara atesto de Etel troviĝis atentinda momento. Printempe, iun dimanĉan posttagmezon ŝi ekskursis kun Anna al la monto Gellért, al la citadelo. Anna kuŝiĝis en la herbo kaj dormiĝis. Alarmite post kelkaj minutoj, ŝi vekiĝis, komencis kuri malsupren, svingante siajn brakojn kaj ŝrikante kiel freneza, Etel ne sciis, kio trafis ŝin, ŝi nur tiam haltis, kiam Etel alkriis ŝin, kaj ankaŭ tiam ŝi ankoraŭ longe tremis.

Stefi renkontis ŝin ĉ. du semajnojn antaŭ la murdo en la strato Márvány, sola ŝi pasumis antaŭ la domo, kie iam sinjorido Johaĉjo loĝis. Anna rimarkis ŝin, sed ŝi enkuris la ŝtuparejon, kaj kiam pli malfrue Stefi demandis ŝin, kion farendan ŝi havis tie, ŝi nur balbutis. Ankaŭ nun ŝi ne scipovis doni pri tio pli precizajn informojn. La enketa juĝisto sendis asignon al la viena adreso de János Patikárius. El Vieno la polico respondis, ke la koncernato „foriris al nekonata loko”, li loĝis kun pola dancistino, sed tiu, malluinte sian kvinĉambran apartamenton, revetu-ris al Varsovio. Ĉio ne ŝajnis grava pro tio, ke János Patikárius jam pli ol de duonjaro ne loĝis en Budapeŝto.

Ankaŭ la gepatroj de la akuzito estis asignitaj.

La patro István Édes elvagoniĝis frumatene kun paketo en sia mano kaj kun du paroj da kokinoj. Post li iris plaĉa kamparanino multe pli juna ol li en ruĝaj ledpantofloj, kun rekta spino, malmole, lia dua edzino. Tiu portis nenion. Ĉar estis ankoraŭ frue, kaj ili ne scipovis orientiĝi

en ĉi tiu granda urbo, ĉe Vérmező ili demandis, kie troviĝas la domo de ges-roj Vizy, tie ili sidiĝis sur ŝtupo, atendis, ĝis ges-roj Druma vekiĝas. Ili transdonis al la advokata moŝto la du parojn da kokinoj, postlasis ankaŭ acidkremon, freŝan kazeon en la kuirejo, ĉar estas ja utile ŝovi ion al la sinjoroj, se io tuberas pri la leĝo. Druma klarigis al ili, kie ili devas anonci sin kun la oficiala papero.

La enketa juĝisto ankaŭ ilin pridemandis.

La patro de Anna Édes estis iom kurbiĝinta, magra bienservisto, jam trans sia kvindeka jaro, sed li ankoraŭ ne griziĝis. Nur iom maldensiĝis lia blondeca hararo, polvokovriĝis de la tempo, fariĝis tia, kiel rompitaj pajloj. Turnadante sian ĉapelon, li stariĝis antaŭ la enketa juĝisto, sed daŭre ĵetis rigardon al sia vivparulino per unu sia difektita okulo, en kiu speguliĝis humileco kaj ruzeco. Ŝajnis, ke li tute ne estas surprizita. Kamparanon nenio surprizas. Li konsideras la grandajn faktojn, ankaŭ murdon tiel same natura kiel naskiĝon aŭ morton. La maljuna bienservisto klopodis tion vuali. Li ŝanĝis sian voĉon tro plendema, li parolis lamente, ĝemante kiel tiu, kiu kantas rimaĵojn en funebra festeno. Li rakontis, ke li prenis al si la duan edzinon antaŭ kvar jaroj, kaj ke lia filino, lia malbona filino, lia malica filino estis ĉiam tia, malobeema kaj necedema, ankaŭ hejme ŝi faris multajn malagrablaĵojn, tial ili sendis ŝin servi en Budapeŝto. La vicpatrino – laborema, pura, bongusta junedzino – kapjesadis. Ŝi sciis pli multe. Terurite ŝi rakontis, klinante sin al la enketa juĝisto, ke Anna foje preskaŭ ĵetis la serpon kontraŭ ŝin, Anna eble ankaŭ ŝin mortigus, se ŝia patro ne intervenus. Ŝia lango vibris senlace, ŝi parolis, vortmuelis senlace en sia nerompita forto. Sed poste ŝi implikiĝis en kontraŭdiroj. La enketa juĝisto rekonis la situacion, sendis ilin hejmen.

Li igis esplori la mensan staton de la akuzito. La tribunala medicina fakulo kondukigis Anna en sian oficialan ejon, eldonis atestilon, laŭ kiu la akuzito estas anemia, cetere juĝokapabla. Ĉi tiun akton la enketa juĝisto aldonis al la aliaj, de sia flanko li finis la esploradon, la aktojn li prezentis al la prokurorejo, la prokuroro pretigis la akuzakton. Anna Édes estis metita sub akuzon pro duobla murdo kun antaŭdecidita intenco.

El ofico estis al ŝi asignita defendanto. La komencanta advokateto, kiu havis ĝis nun nur unu priheredaĵan traktadon kaj unu priloĝejan proceson, profundiĝis en la aferon, per ĝi li volis bazi sian kriminalistan karieron. Li ofte vizitis sian defendaton en la ĉelo. Li konsolis ŝin, por ke ŝi ne senesperiĝu, li aranĝos ŝian aferon. Anna parolis kun li kiel kun la polica oficiro kaj la enketa juĝisto. Pli malfrue vizitis ŝin ankaŭ misiaj fratinoj, de kies ĉapelo pendis blua vualo. Tiuj admonis ŝin al pento kaj enmemiĝo, lasis ĉe ŝi religiajn broŝurojn, en kiuj ŝi povis trovi la konsolon de la kredo.

Meze de novembro estis okazigita la ĉefa traktado, kun rigardo al la interesiĝo, en la granda salono de la tribunalo.

Estis malluma, malvarma vintra tago. En la granda salono la gasflamoj verde flagris, estis forte hejtate. Pedelo kriis la nomojn de la asignitoj. Dek unu atestantoj estis asignitaj: ses laŭ la peto de la akuzo, kvin laŭ tiu de la defendo.

La ŝtupare leviĝantajn benkovicojn densege plenigis la aŭskultantaro, plie amikoj, personaj konatoj de la viktimoj. Gábor Tatár kun sia edzino sidis malantaŭ la gazetara benko, li salutadis la atestantojn, kiuj okupis lokon malsupre. Videblis la tuta kversekco de la domo n-ro 238 de la strato Attila kun ĝiaj loĝantoj kaj servistinoj.

La tribunalo enmarŝis precize je la naŭa horo: la traktanta prezidanto kaj du juĝistoj.

La prezidanto sonorigis:

– Mi malfermas la ĉefan traktadon. Estos traktata la murdafero de Anna Édes. Kie estas la akuzito? Enkonduku ŝin! – li ordonis al unu el la pedeloj.

Anna Édes estis elkondukita jam je la oka horo el sia ĉelo tra la keletaĝo. Ŝi atendis pacience en ĉambro.

La pordo malfermiĝis, kaj ŝi aperis en ĝi en sia kvadratita robo, kiu jam tute ĉifoniĝis. Post ŝi du provosoj kun bajoneta fusilo.

Ŝi ne iris, ŝanceliĝis al la benko de akuzitoj, antaŭ la prezidanton. La provosoj, daŭre kalkane al ŝi, direktis ŝin, poste rigidiĝis en atentopozo.

Anna vidis multajn homojn supre, malsupre, lampojn, bildojn, ŝi sentis grandan varmon. La duonjara mallibereco kore ne konsumis ŝin.

Ŝia vizaĝo iom plidikiĝis, kiel de malliberuloj, ŝian vizaĝon jaspis ia terkolora paleco. Granda trankvilo emanis el ŝi.

– Kiel vi nomiĝas? – demandis la prezidanto kaj li tuj turnis sin al la raporta juĝisto. – Ĉu ni havas la eltiron el ŝia civilstata registro? – Poste li mem respondadis anstataŭ ŝi. – Dudek-jara, senedza, ne havas infanon, ne estis punita. Sidiĝu! – li diris sen rigardi al ŝi.

La akuzito sidiĝis, apude la du provosoj, metinte la fusilon inter la gambojn.

La akuza dokumento estis legata de ruĝa folio, kiu jene komenciĝis:

– Anna Édes, romkatolika, senproprieta, hungara…

Ĝi estis longa akto, ĝia voĉlegado postulis duonhoron.

La publiko dume observis la juĝistojn, kiuj sidis sen togo kaj kapvesto sur la podio en sia strata vesto kun koltuko kaj malmola kolumo, sed kun certa persona digno, preskaŭ mezepokece, preskaŭ antikvece, ĉar ĉi tiuj homoj havis ĉi tie, sur la tero la admirindan taskon, ekvidi la veron pli ol aliuloj, tion ili lernis, en tio ili vivis kaj iam en ilia funebra avizo, sur ilia tomboŝtono staros: juĝisto.

La prezidanto foliumis libron, la raporta juĝisto, homo kun lipharoj kaj longa nazo, kun surpinĉita nazumo, kunligis aktojn, la voĉdona juĝisto, la plej juna, masiva, larĝŝultra, ekkubutis sur la tablo, klinis sian grandan, pezan kapon en la dekstran manplaton. Maldekstre de la prezidanto moviĝetis hometo, la defendanto. Li salutis sian patron, sian patrinon, siajn parencojn, kiujn grandnombre li kunarigis al ĉi tiu traktado, por ke ili estu atestantoj de lia unua, granda rolo. La prokuroro profundiĝis en siajn pensojn.

Post kiam la voĉlegado de la akuzakto finiĝis, la prezidanto ekparolis:

– Stariĝu, Anna Édes! Ĉu vi komprenis la akuzon? – Li parolis al ŝi per laŭtigita voĉo, kiel al surduloj aŭ kiuj ne staras je lia intelekta nivelo.

– La s-ro prokuroro akuzas vin per tio, ke vi murdis viajn gemastrojn. Ĉu vi sentas vin kulpa?

– Mi sentas min kulpa – respondis Anna.

La aŭskultantaro flustradis, la raporta juĝisto rigardis al ŝi, kaj la

voĉdona juĝisto klinis sian kapon en la alian manplaton.

– Do tiam – daŭrigis la prezidanto jam per rakonta voĉo – rakontu al ni bele, kiel tio okazis. Sed detale. Mi atentigas vin, se vi ĉion konfesos, vi helpos vin, male, se vi neos – kaj nun ree li altigis sian voĉon –, vi nur malutilos al vi mem, ĉar ni havos eblon ĉion pruvi. Nu, komencu!

La advokato gestis al sia defendato, ke ŝi komencu. Sed el ties gorĝo eĉ unu voĉo ne emis elŝiriĝi. Tiam la prezidanto helpis al ŝi:

– Do, vi estis ilia servistino, ĉu ne, vi servis jam de dek monatoj ĉe ges-roj Vizy. Ni komencu eble tie, ke la 28an de majo 1920 okazis ĉe vi gastigo, granda regalado – li klopodis paroli popolece. – Tiun tagon vi laboris ĉirkaŭ vespero.

– Mi kuiris.

– Ĝuste – kapjesis la prezidanto, kvazaŭ laŭdante ŝin. – Vi plenumis viajn dommastrumajn farendojn. La gastoj alvenis, vi ne servis ĉe la tabloj, la gastoj jam delonge vespermanĝis, devis esti ĉirkaŭ la dua horo. Kie vi staris tiam?

– En la kuirejo.

– Jes, vi estis tie. Kaj jam tiam vi umadis ĉe la vazoŝranko, eltiradis la tirkestojn, serĉis la tranĉilon.

– Pri tio mi ne memoras – balbutis Anna al la defendanto, kiu kapjesis.

– Oni diros tion al vi en la vizaĝon. Poste kion vi faris?

– Poste mi eniris la dormoĉambron.

– Ni ne konfuzu la aferojn. Tiam vi ankoraŭ ne eniris la dormoĉambron. Tio okazis pli malfrue. Unue la gastoj komencis foriri. Tiam vi ŝteliris en la banoĉambron, embuskis, preparis vin por via faro. Ĉu vi ne memoras, ke ankaŭ la altmoŝta s-ro Druma enrigardis tien?

– Ne.

– Nu, ni baldaŭ konstatos ankaŭ tion. Ni havas atestanton por tio. Daŭrigu! Ni reiru tien, kiam vi aerumis, kaj via mastrino sendis vin dormi! Tiam anstataŭ enlitiĝi, vi atendis, ĝis ili dormiĝos.

– Poste mi eniris la dormoĉambron.

– Vi ankoraŭ ne eniris – diris la prezidanto, frapinte sur la tablon.

Anna stariĝis de unu piedo sur la alian, antaŭen-reen ŝi tretadis en

la pasinta tempo. Kapturniĝo kaptis ŝin pro la granda vojaĝo. Ŝi implikiĝis.

La defendanto stariĝis:

– Altmoŝta s-ro prezidanto, respektinda tribunalo, kun plena respekto mi iniciatas, bonvolu venigi bonfaman psikiatron por la konstato de la mensa stato de la akuzito, por ekzameni ŝin surloke. Ŝia konfeso estas tiom interrompata, tiom nekohera kaj patologia, ke laŭ mia konscienco de defenda advokato mi devas konsideri ŝin tute nejuĝokapabla.

La prezidanto mallaŭte intertraktis kun la juĝistoj kaj sciigis la decidon:

– La tribunalo rifuzas la iniciaton. Kiel ankaŭ la s-ro defendanto scias, fakspertuloj jam plurfoje ekzamenis ŝin kaj juĝis ŝin pensokapabla. Cetere, mi petas vin, bonvolu resumi fine viajn iniciatojn.

– Kun respekto, mi anoncas kasacian kaŭzon – respondis la defendanto.

La prezidanto ree retroekskursis en la tempo, palpante li avancis, serĉis la veron kune kun la akuzito, kondukis ŝin, kvankam li mem ne vidis en ĉi tiu obskuro, kaj fojfoje li atendis, ke la akuzito direktos lin al tiu punkto, kie subite ia lumo ekbrulos, kiu faros la tuton komprenebla. Kvazaŭ du interkroĉiĝintaj blinduloj marŝus en la nokto, unu gvidus la alian, blindulo gvidis nevidanton.

– Do – li komencis –, provu rememori! Kial vi prenis al vi la tranĉilon? Kion vi sentis tiam?

Anna silentis. La prezidanto interpretis ŝian senton, la neesprimeblan senton, kvazaŭ tradukante ĝin en kompreneblan, homan lingvon:

– Vi sentis, ke vi koleras ilin, vian cerbon subite inundis sango, vi ne povis regi vin, venis al vi eble en la menson, ke foje via mastrino skoldis vin, vi volis venĝi vin. Sed kial?

Ree li devis paroli:

– Ĉu via konscienco ne vekiĝis tiam, ĉu la animo ne ekparolis en vi, ĉu vi ne pripensis, kion vi faras, ke tio havos ankaŭ konsekvencojn, ke pro tio vi devos respondi antaŭ Dio kaj la homoj? Vi ja pli frue ne estis tia knabino.

La prezidanto konjektis, ke ĉi tie kaŝiĝas io, iu sekreto, kiun inter ili neniu scias, eble nek la akuzito mem. Sed li avancis plu. Li sciis, ke unu faro ne klarigeblas per unu kaŭzo, nek per pluraj, sed malantaŭ ĉiu faro staras la tuta homo kun sia tuta vivo, kiun la justico ne povas malplekti. Li, jam kutimiĝinta al tio, ke la homoj ne povas ekkoni unu la alian, faris sian devon.

– Parolu! – li instigis la akuziton. – Kiam vi enpaŝis la dormoĉambron, viaj gemastroj jam dormis. Kion vi faris tiam?

– Tiam mi…

– Nu, eldiru do! – diris la prezidanto tre severe. – Tiam vi paŝis al la lito de via mastrino, kaj dum ŝi dormis, vi puŝis la tranĉilon en ŝian koron. Jen ĉi tiun tranĉilon.

Li levis el inter la pruvobjektoj tiun grandegan kuirtranĉilon, svingis ĝin en la aero, tiel ke la aŭdantaro teruriĝis, poste tenis ĝin al la akuzito, kaj ĉiam plu turnante ĝin, li demandis ŝin:

– Ĉu ĉi tiu ĝi estis?

– Ĉi tiu – diris Anna kaj recedis, ĉar ŝi sentis, ke nun oni puŝas la tranĉilon en ŝian koron.

Fine ŝi elbalbutis, kio okazis. Ne tiom per siaj vortoj ol per tiuj, kiujn ŝi aŭdis de la polica oficisto kaj la enketa juĝisto, sufiĉe kontinue ŝi prezentis la procezon de la murdo.

– Vi murdis vian mastrinon – ripetis la prezidanto –, vi murdis vian pandonan mastrinon, kiu neniam ofendis vin. Ni iru plu. Kion vi faris poste?

– Mi elkuris en la salonon.

– Ne, vi ankoraŭ ne elkuris. Ni ne rapidu. Ni restu portempe en la dormoĉambro. Ankaŭ vian mastron vi mortpikis kiel kaŝmurdisto, naŭfoje vi puŝis en lin la tranĉilon? Ĉu okazis tiel?

– Tiel. Sed mi ne volis murdi la altmoŝtan sinjoron. Mi ektimis lin.

– Vi ektimis vian kulpon, vian malbonan konsciencon kaj ree vi murdis. – Kio poste okazis?

– Tiam oni jam venis por mi.

– Ankoraŭ oni ne venis. Vi nun kuŝiĝis sur tiu larĝa divano, kaj tie…

– Mi dormiĝis.

– Kaj ĉu vi povis dormi post tiel ĉielkria fifaro? Ĉu vi ne konsciiĝis tiam, kion vi misfaris, ke vi estas kulpulo? Vi ne anoncis vin, sed tie kaŝis vin, ĝis oni romp-malfermis la pordon. Ĉu vi almenaŭ pentis poste vian kulpon? Pardonon? Ĉu vi ree farus, kion vi fifaris?

– Ne – alarmiĝis Anna –, ne!

– Vi povas sidiĝi – diris la prezidanto.

La priaŭskulto de la akuzito finiĝis. Sekvis la akuzaj atestantoj.

La ĉefatestanto estis Szilárd Druma, la rugvanga advokato. Kiam li stariĝis kaj iris mezen de la salono, li altiĝis preskaŭ ĝis la lustro.

– Ĉu vi ne statas en kolero kun la akuzito – vortgalopis la prezidanto la formalaĵojn –, ĉu vi ne statas en parenceco kun ŝi?

La atestanto eĉ ne respondis, nur ekridetis pro la amuza supozo, ke li status en parenceco kun iu tiaspeca.

Precize li malkovris la faktojn, kiuj faris la *premeditatio*[25] senduba. Al la demandoj de la prokuroro li respondis per koncizaj, juraj terminoj. Li eksplikis, ke la ekscitita konduto de la knabino jam vespere frapis liajn okulojn, li komencis observi ŝin, je la dua nokte la akuzito devis serĉi nenion alian en la tirkesto ol la tranĉilon, ŝi evidente kaŝis ĝin tie, kaj antaŭ ol foriri, li ankoraŭfoje kaptis la akuziton ĉe la faro, kiam ŝi embuskis en la banoĉambro, li volis doni al ŝi eĉ trinkmonon, sed ŝi terurite resaltis en la dormoĉambron.

Ĉe la konfrontado Anna rompiĝis, konfesis, ke ĉio estis tiel.

Druma ankoraŭ ne finis.

– Estu al mi permesite – li diris –, prilumi ankaŭ la politikan fonon de la krimo, kaj per kelkaj vortoj etendiĝi – montrante al Ficsor kaj lia edzino, sidantaj en la vico de la atestantoj – al la rolo de la gedompedeloj. Ĉi tiuj homoj, altmoŝta s-ro prezidanto, faris ateston dum la komunismo pri tia ruĝula spirito, ke ili tenis tagnokte la loĝantojn de la domo en teruro. Mi, de mia flanko, vidas ekzisti ĉiujn kaŭzojn por tio, ke ili estas propre la movantoj kaj la spiritaj...

– Mi petas vin – interrompis lin la prezidanto –, la esploro ekiris ankaŭ en ĉi tiu direkto, sed havis negativan rezulton. Ankaŭ la prokurorejo ne faris akuzan iniciaton – li diris, rigardante al la prokuroro, kiu

[25] Premeditatio (latine): dolo, intenco.

skuis la kapon. – Tio ne apartenas al la afero.

Druma staris tie, pendante en la aero kun sia komencita kaj ne finita frazo.

Ekiris mallonga diskuto inter la prokuroro kaj la defendanto. La prokuroro petis la ĵurigon de la atestanto, sed la defendanto kontraŭis ĝin. Oni prenis ĵuron de Druma. Tial la defendanto anoncis denove kasacian kaŭzon.

Antal Szűcs, la angule postenanta policano, raportis pri gravaj momentoj, antaŭantaj la okazigon de la surloka esploro, pri la lokado de la pruvobjektoj kaj la indiferenta konduto de la akuzito.

S-ino Druma karakterizis la knabinon enfermiĝema, entemigis pretere ankaŭ la misteran malaperon de sia tondileto, laŭdis ges-rojn Vizy, aparte la edzon.

S-ino Moviszter aperis en sia flanke fendita jupo, por promenigi sian novan tualeton, tiel farbita, kvazaŭ por teatra premiero. En leĝera maniero ŝi konversaciis, petolante kun la prokuroro.

Laŭ ŝi la knabino ne estis enfermiĝema, prefere bonhumora, ŝi miris, ke ŝi iris ĝis tie, ĉar ŝia mastrino estis la anĝela boneco mem, kiu ankaŭ amis ŝin.

Ŝi ankoraŭ multe babilus, sed ŝia priaŭskulto bedaŭrinde finiĝis.

Al Ficsor la prezidanto menciis, ke kiel parenco de la akuzito li povas rifuzi la depozicion, sed li volis konfesi.

– Mi atentigas vin – diris la prezidanto –, ke vi konfesu nur la veron, ĉar vi eble devos ĵuri pri via konfeso, kaj la leĝo rigore punas falsan atestadon, eble per ĝis kvinjara punlaborejo.

La dompedelo, konsternita de la antaŭa depozicio de Druma, kaj aŭdinte la kvinjaran punlaborejon, eĉ pli volis savi sian haŭton. Li ripetis ĉion, kion li aŭdis somere, kaj kiam la eta advokato harfendis kun li, kaj emfazis la ŝanceliĝan karakteron de lia konfeso, li perdis ĉiun mezuron:

– Ŝi diris ne nur ĉi tion, sinjoroj, sed ankaŭ ion alian. Kiam foje la altmoŝta sinjorino skoldis ŝin, ĉar ŝi rompis spegulon, ŝi sobvenis al ni kaj diris, ke ŝi foriros de ĉi tie, sed antaŭ tio li faros ion tian, ke eĉ ŝi mem pentos, ŝi enflamigos la tutan domon.

– Kiam li diris tion? – demandis la prokuroro.

– Nelonge post tio, ke ŝi dungiĝis.

– Ĉu decide vi memoras tion?

– Decide.

– Pripensu bone! Ĉu vi pretas ĵuri pri tio?

– Pretas – respondis Ficsor kun serioza decidiĝo.

La atestanto faris ĵuron, poste klinis sin antaŭ la prezidanto tiel profunde, ke pli profunde riverenci estas home neeble.

S-ino Ficsor paŝis antaŭ la podion. La grasa virino tremis kiel gelateno.

Ŝi jam kompatis Anna, volus defendi ŝin, sed ŝi timis malpravigi la antaŭan depozicion.

– Kaj vi kion scias, s-ino Ficsor? – demandis la prezidanto. – Kia vi konis ĉi tiun knabinon?

– Sinjoro, ŝi estis ĉiam tiel suspektema.

– Kion signifas suspektema?

– Nu, tiel suspektinda.

– Ĉu al vi suspektinda?

– Al mi kaj al ĉiuj.

– El kio vi rimarkis tion?

– Ŝi ĉiam cerbumis.

– Ĉu vi tiel komprenas, ke ŝi kovis ion malbonan en sia kapo?

– Ne.

– Do kiel vi komprenas?

– Tiel, ke ŝi ĉiam malgajis.

– Sed vi konfesis antaŭ la enketa juĝisto ion alian. Vidu, legu, vi konfesis, ke ŝi jam volis iun murdi.

– Jes, kiam ŝi frapis tiun serpon en sian patrinon.

– Ĉu vi vidis tion?

– Mi ne vidis, nur aŭdis.

– De kiu?

– De ŝia patrino.

– Tiu estas ŝia vicpatrino. Ni lasu tion! – forgestis mishumorigite la prezidanto – Ni lasu tion!

– Cetere mi povas diri pri ŝi nenion malbonan. Antaŭe ŝi estis tre bona knabino, sed…

– Sed?

– Sed pli malfrue ŝi iĝis malbona.

– Tion ni scias – rimarkis la prezidanto dum ĝenerala ridado.

– Altmoŝta sinjoro – afektis ofenditon s-ino Ficsor kun certa stulta spito –, mi povas diri nur tion, kion mi scias – kaj kiam la aŭdantaro ree ekridis, ŝi plu murmuris ofendite al si –, mi, sinjoroj, ne povas diri ion alian, ol mi scias.

– Bone, bone, jam sufiĉe! – haltigis ŝin la prezidanto.

La konfesoj jam riproĉis nulvalorajn detalojn: ili deviis en babilaĉojn.

La prezidanto vokis la sekvan atestanton:

– Miklós Moviszter. D-ro Moviszter, kuracisto. Ĉu li ne estas ĉi tie? Ĉu oni enmanigis al li la asignilon? Li ne ekskuzis sin. Kie li estas?

Kie do vi estas, maljuna doktoro, vi, mortonto kun via nekuracebla malsano, okprocenta sukero? Ĉu vi mortis post tio, aŭ vi kuŝas senpove, suferante de tiu dormomalsano, kiu antaŭas la morton de tiaj malsanuloj? Ĉu ankaŭ vi perdiĝis, kaj jam neniu restis sur ĉi tiu tero? Se vi ankoraŭ vivas, se nur fajrero da animo flagretas en vi, tiam via loko estas ĉi tie, tiam vi devas veni.

Kaj li ankaŭ alvenis. Li sidis tie, tute malantaŭe, perdita en la seĝovicoj de la atestantoj, envolvita en sia peltmantelo en ĉi tiu novembra tago, jam preskaŭ malvarmiĝinta pro la proksimeco de la forpaso. Necesis tempo, ĝis li antaŭenpaŝetis, kurbiĝinta sur sia bastono, ŝrumpinta jam tiel malgranda, ke multaj stariĝis, por vidi, ĉu li ĉeestas.

– Jen mi – li diris, klininte sin al la prezidanto.

Vidante, en kia stato estas la atestanto, la prezidanto sciigis, ke li povas fari sian depozicion ankaŭ sidante. Li metigis seĝon per unu pedelo, sed li ne akceptis ĝin. Eĉ, li rektigis sin, kiom li povis.

– S-ro doktoro – demandis la prezidanto –, ĉu vi same persistas en via depozicio, farita antaŭ la enketa juĝisto?

– Jes – diris Moviszter, apenaŭ aŭdeble, tiel ke la prezidanto metis sian manplaton sonfunele al sia orelo.

– Motivu, sur kio vi bazas ĝin!

Moviszter enpensiĝis, kiel iu preparanta sin por longa parolado. Li instigis sin.

„Kial vi malfruas? Plenumu vian devon. Vi estas nur unu homo. Sed kio do estas pli multa ol unu homo? Nek du homoj, nek mil homoj estas pli ol unu. Faru unu paŝon antaŭen, jen tiel, kaj nun ankoraŭ unu. Venis via vico. Kapon supren, Moviszter, *sursum corda*, levu la koron, nur levu vian koron!”

– Mi ne komprenas vin – diris la prezidanto. – Iom pli laŭte.

„Kial pli laŭte? Ne iom pli laŭte, sed tre laŭte. Kriu – la animo baŭmis en li – kriu tiel, kiel viaj veraj parencoj, la heroaj pastroj de la prakristanoj, kiuj ribelis kontraŭ la paganeco kaj en tombejoj, de apud ĉerkoj kriadis en la ĉielon, disputante kun la Plej Alta Sinjoro, kun la justa sed tre severa Dio, postulante mizerikordon al la falemaj homoj. Vi ja ĉiutage diras en vi la primortan preĝon. Ĉu vi memoras, kio estas en ĝi vortumita? *Ne tradas bestiis animas confidentes tibi!* Ne ĵetu al bestioj la animojn, fidantajn al vi. *Et animas pauperum tuorum ne obliviscaris in finem*, kaj ne forgesu definitive la animojn de viaj malriĉuloj! Provu ankaŭ vi tiel krii en la areno, superkriante ankaŭ la leonojn, kuraĝa kateĥumeno!”

Lia voĉo fariĝis pli firma:

– En ĝia tuto mi persistas en mia depozicio. Mi povus nur ripeti, kion mi estis dirinta.

– Jes – diris la prezidanto, foliumante aktofaskon. – Vi konfesis tiel. Sed ni petas faktojn. Ĉu ŝi estis batata? Malsatigata? Trolaborigata? Ĉu ŝia salajro ne estis pagata? Mi vidas tiel – li diris rapide –, ke ĉe Kristnasko ŝi ricevis ankaŭ ian donacon, cetere sensignifan donacon: trikitan jakon. Bonvolu paroli!

– Ŝi estis traktata malvarme – eldiris Moviszter per pli forta voĉo. – Tio estis ĉiufoje mia sento. Sen amo ŝi estis traktata. Senkore.

– En kio tio manifestiĝis?

– Mi ne scipovus pli precize priskribi tion. Sed decide tio estis mia sento.

– Do tiam tio estas efektive nur sentoj, s-ro doktoro, konjektoj. Speco de delikataj nuancoj, kiujn la tribunalo ĉe tiel kruda kaj terura

krimo apenaŭ povas konsideri. Ĉar jen estas faktoj unuflanke: sangaj faktoj. Ankaŭ ni petas faktojn. Krome la ceteraj atestantoj konfesas ion diversan. Ĝuste la malon. Ke ŝi estis amata kaj taksata laŭmerite. La akuzito mem ne plendis, nek en la policejo, nek ĉe la enketa juĝisto. Stariĝu! – li alvokis la akuziton. – Ĉu vi estis mistraktata?

– Ne.

– Vi povas sidiĝi. Tio estas cetere ankaŭ neverŝajna.

„Rigardu nun Moviszter ĉi tiun knabinon, kiel sensense ŝi lasas sin malsupren inter siaj provosoj; ne agrabla vidaĵo, sed rigardu ŝin bone kaj rigardu ankaŭ la prezidanton, kiu reĝustigas la malmultekostajn okulvitrojn sur siaj maljunaj, bluaj okuloj, kaj komencas grati la orelon, por ke vi eĉ ne konjektu, kio turniĝas en lia kapo, kio okazas en lia koro. Li estas la reprezentanto nur de la tera justico. Sed li klopodas vidi senpartie la veron, rigardi dekstren kaj maldekstren, kiom eblas en ĉi tiu mondo. Ĉu vi ne sentas – li instigis sin –, ke li proksimiĝas al la dia justico, kaj jamas ĉe via flanko? Lasu, ke li ankoraŭ iom diskutu, finsume ja tio estas lia devo, poste denove parolu, ne timu lin, timu neniun, ĉar Dio estas kun vi.”

– Kaj se ŝi havis malbonan sorton – argumentis la prezidanto –, laŭ sia rajto, donita de la leĝo, ŝi povus kiam ajn meti plendon kontraŭ siaj gemastroj, ŝi povus maldungi sin kaj en dek kvin tagoj foriri.

– Oni devigis ŝin resti.

– Per kio oni devigis ŝin? Neniun oni rajtas reteni per ŝnuro.

– Ĉu tiel malfeliĉan estaĵon sen memkonscio?

– Pro tio ŝi ne bezonus fari ĉi tiun teruran krimon – meditis la prezidanto, poste malmole aldonis. – Por ĝi ne ekzistas senkulpigo.

– Tiam kial do ŝi faris ĝin? – demandis Moviszter de si mem. – Tio estas mia sento – li ripetis obstine –, tio estas mia sento, ke oni ne traktis ŝin laŭhome. Oni traktis ŝin ne kiel homon sed kiel maŝinon. Oni faris el ŝi maŝinon – kaj nun li eksplodis, preskaŭ kriis. – Oni traktis ŝin nehome! Kruele oni traktis ŝin!

– Pro ĉi tiu via esprimo mi admonas vin.

La aŭskultantaro ekmovis sin kaj aprobis la intervenon de la prezidanto, indigninte murmuris.

– Mi petas silenton! – diris la prezidanto kaj unufoje facile skuis la sonorilon.

Kies mortosonorilo estis ĉi tiu mallonga sonorado? Diru!

– Ĉu ion ceteran vi ne bonvolas scii? – demandis la raporta juĝisto la atestanton.

– Ceteron ne.

La publiko havis la impreson, ke ĉi tiu kaduka doktoro, staranta rande de la tombo, estas homo de limigitaj mensaj kapabloj. Moviszter estis ja tio. Li estis limigita. Li havis limon, sen kiu lia homa grandeco neniiĝus, perdiĝus en la senfrukta senlimeco de la libereco.

La eta sulfura advokato saltleviĝis de sia seĝo kaj petis kun respekto la altan tribunalon, ke ĝi ĵurigu la atestanton. La prokuroro kontraŭis tion kun rigardo al tio, ke la depozicio havas ĝeneralan karakteron kaj ne estas signifa.

La prezidanto rapide decidis:

– La tribunalo ordonas la ĵurigon de la atestanto.

La aŭskultantaro de la salono ekscitite, piedbrue stariĝis kun ia tragike sceneja rapido.

Eĉ la prezidanto stariĝis.

Li diris al la atestanto, kiu atendis, metinte sian dekstran manon sur la koron kaj levinte alĉiele tri fingrojn de sia maldekstra mano:

– Diru post mi!

Kaj li diktis la ĵurteksto n:

– Mi… ĵuras… per la ĉioscia… kaj ĉiovida… vivanta Dio… ke mi konfesis… la veron… nur la veron… El ĝi nenion mi prisilentis… Al ĝi nenion mi aldonis… Dio min tiel helpu…

Moviszter diris ankaŭ tion laŭte:

– Dio min tiel helpu!

Li pene reiris al la seĝoj de la atestantoj. Tiuj strange rigardis al li, kaj kiam li reokupis sian lokon, ili fortiriĝis de li. Tio ne interesis lin, Moviszter ja efektive ne apartenis al ili. Li apartenis nek al ili, nek al aliuloj, ĉar li estis nek burĝo, nek komunisto, nek membro de ajna partio, sed membro de tiu homa komunumo, kiu entenas en si la tutan mondon, ĉiujn animojn, kiuj vivas kaj vivis iam ajn, vivantojn kaj

mortintojn.

Li tuj ankaŭ foriris, li iris por siaj farendoj, la cetero jam ne interesis lin.

Estis aŭskultataj ankoraŭ kelkaj senkulpigaj atestantoj. Etel pimpekuiristinece vestita kaj Stefi en ĉapelo, kiel decas al estinta grafa servistino. Dum la konigo de siaj donitaĵoj, Stefánia Kulhanek nomis sin „personarano" kaj ruĝiĝis. Ambaŭ konfesis la veron, nur la veron, kiel ankaŭ la aliaj, kiuj ĉiuj konfesis la veron, bonakrede, tiel, kiel ili vidis ĝin. Ili laŭdis Anna, sed same laŭdis la kompatindajn altmoŝtajn gesinjorojn.

Anna, kiu jam delonge apatie sidis sur la benko de akuzitoj, nun ekatentis. Ŝi ekvidis s-inon Wild, la edzinon de la magazinisto, sian unuan mastrinon, ĉe kiu ŝi dungiĝis kiel infanistino, kiam ŝi venis al Budapeŝto en sia aĝo de dek ses jaroj. Ŝia koro freneze batadis.

Kaj ankaŭ s-ino Cifka jam parolis antaŭ la prezidanto, la onklino de Bandika, de Bandika, kiu jam devas esti granda, eble jam vizitas la lernejon. Kaj tiam ĉio komencis marteli en ŝi. Samtempe ĉio memoriĝis al ŝi.

La traktado tro longiĝis: la prezidanto plirapidigis ĝian iron, kaj post kiam la prokuroro faris siajn proponojn, kaj la defendanto anoncis sian dudek-sepan kasacian plendon, li deklaris la proceson de pruvado finita. Li ordonis paŭzon.

Je la dua posttagmeze okazis la procesaj paroladoj.

La prokuroro rapide finis. Li persistis pri la enhavo de la akuza akto pro tio, ke ĝi dum la traktado de la afero eĉ pli pruviĝis, kaj referencante certajn paragrafojn, alineojn li petis ekzemplodonan punon.

La defendo estis des pli longa.

Ĉi tiu eta advokato sensignifulo prezentis pompe vortumitan, literaturan pledon. Li faris superhomajn fortostreĉojn, por vidigi sian defendaton senkulpa kaj por malligi po nodoj la ŝnuron, kiun la akuzito kaj la kulpigaj atestantoj plektis ĉirkaŭ lia kolo. Lia trofervoro ŝajnis ridinda. Li volis fari kredebla per raciaj kaŭzoj, ke la akuzito faris sian krimon en nekonscia stato, kaj pro memdefendo murdis siajn gemastrojn. Kun detaleco, superanta la fantazion de romanisto li malkovris ŝian pli fruan vivon, ŝiajn infanjarojn. Li insistis pri tio, ke prefere

saviĝu cent kulpuloj, ol unu senkulpa puniĝu.

Oni kredis plurfoje, ke li finos, sed nur tiam li komencis.

– Kaj nun – li diris, post kiam li trinkis akvon – ni rigardu, respektinda tribunalo la psikologiajn kaŭzojn, ni rigardu la psikologion, respektinda tribunalo, la psikologiajn faktojn. Bonvolu bone rigardi ĉi tiun vilaĝan knabinon, la simplan infanon de la popolo kaj antaŭ ol vi eldiros la verdikton, demandu vian propran konsciencon, ĉu tiu, kiu sidas ĉi tie sur la benko de akuzitoj, estas efektive tiu *homo deliquente*, tiu krimema tipo, pri kiu Lombroso parolas!

Tion jam neniu atentis. La pordo daŭre frapiĝis. La aŭskultantaro, elĉerpita de la longa traktado, la neeltenebla varmo, eskapadis, restis nur la ĵurnalistoj por subridaĉi, kaj la familianoj pro parenca devo.

En la malluma koridoro Druma pesadis al fumanta grupo la motivojn de la akuzo kaj ne dubis, ke la verdikto povos esti nur morto per ŝnuro.

Kiam la aŭskultantoj revenadis en la salonon, la defendanto ankoraŭ parolis. Li legis longajn citaĵojn el la psikiatriaj libroj de Pierre Janet. La prezidanto rigardis sian horloĝon, la raporta juĝisto jam skizis la tekston de la verdikto sur peco da papero.

Fine la oratoro decidiĝis kaj eldiris la lastajn, plej efikajn frazojn kaj kun tia poeta inspiro, kiu elvokis ĉe la malpaciencaj inciton, ĉe la kompetentaj sinceran malŝaton, finis sian paroladon per citaĵoj el la majstroverko de Madách *La tragedio de l' homo*.

La tribunalo retiriĝis por vortumo de la verdikto.

Dume komencis neĝopluvi. Multaj, kiuj venis sen pluvombrelo, ekzorgis, kiel hejmeniri.

Post tri horkvaronoj la prezidanto kaj la juĝisto preskaŭ kure paŝis sur la podion. La akuzito ankoraŭ ne ĉeestis.

– Alkonduku ŝin! – disponis la prezidanto kaj rigardis alplafone kun la verdikto en la mano.

Fusiloj klaketis. Anna Édes estis alkondukita, starigita. Nun ŝi estis mortpala. Ŝi tre timis. Ŝi timis la morton, la ŝnuron kaj ŝi glutis, daŭre glutis, ŝia gorĝo moviĝis.

– Mi proklamas la verdikton de la tribunalo. En la nomo de la hun-

gara ŝtato…

La benkoj denove bruadis. Aŭdeblis nur vortoĉifonoj el la verdikto:

– …deklaris ŝin kulpa… kaj tial kiel akumulita puno al dek kvin jaroj da punlaborejo… al perdo de ŝiaj politikaj rajtoj…

– Dek kvin… – oni pludiris surprizitaj – …dek kvin! – kaj la plimulto sentis naturan emociiĝon, ĉar oni konsideris la verdikton justa.

Kelkaj virinoj ankaŭ larmis.

La advokato ĵetis triumfan rigardon al siaj parencoj. Li estis konvinkita, ke en tio li, kaj ankaŭ Pierre Janet, havas kelkan meriton.

En la motivado estis dirite, ke la tribunalo konsideris pligraviga kaŭzo la kruelecon, per kiu la akuzito perpetris la murdon, sed konsiderendis kiel malgraviga cirkonstanco la senpuna antaŭvivo de la akuzito, ŝia pentema konfeso kaj ŝia senklereco, limanta al simplamenseco.

– Ĉu vi komprenis ĝin? – demandis la prezidanto per sia malnova, forta voĉo. – La tribunalo kondamnis vin al dek kvin jaroj da punlaboro. Vi rajtas apelacii.

Interrompante la vortojn de la alia, la advokato kaj la prokuroro apelaciis. Sed tiam la aŭdantaro jam forlasis la salonon. Anna Édes restis praktike sola kun siaj juĝistoj.

– Forkonduku ŝin! – diris mallaŭte la prezidanto al la provosoj.

Post kelkaj tagoj ŝi estis transportita en la arestan prizonon. Ĉi tie ŝi atendis la verdikton de la Reĝa Apelacia Kortumo, proklamitan printempe, kaj la verdikton de la Plej Supera Kortumo, anoncitan post unu jaro, ĉirkaŭ Kristnasko. Ambaŭ apelaciaj forumoj aprobis la verdikton de la tribunalo.

La ĵurnaloj ne publikigis ilin, tiom ili jam ne interesis la homojn.

En iu malafabla januara tago du provosoj metis Anna Édes en trajnon, eskortis ŝin al Mária-Nosztra. La pordo de la punlaborejo frapfermiĝis post ŝi. Ĉi tie ŝi estis registrita, tondita, banigita, ŝi ricevis numeron, kruddrapan robon: ŝi komencis sian punlaborejan vivon.

En Krisztinaváros fojfoje oni ankoraŭ parolis pri ŝi, ĉiam pli malofte.

Foje virino haltis antaŭ la domo en la strato Attila kaj parolis jene al sia edzo:

– Ĉi tie ŝi loĝis. Ĉu vi ne memoras ŝin? Ŝi estis alta knabino, fortika

kun nigraj okuloj kaj grandaj manoj.

– Ŝi estis malbela – diris la viro.

– Ŝi estis sufiĉe bela – replikis la virino. – Ŝi estis bela. Kiam la rumanoj ĉi tie tendumis, rumana soldato estis ŝia amanto.

Tiel malheliĝis la memoro pri ŝi. Nun jam neniu sciis, kiu ŝi estis. Oni tute forgesis ŝin.

Kaj se ŝi ankoraŭ ne vivus en la virina punlaborejo de Mária-Nosztra, sed ripozus ie en Transdanubio, sub la robinioj de la tombejo de Balatonfőkajár, egale ŝi ne povus pli bone neniiĝi.

Dialogo antaŭ domo kun verda barilo

Nun denove aŭtunas. En drinkejoj oni vendas moston, infanoj ludas kun falantaj, polituraj kaŝtanoj. Folioj faladas.

Sed ankaŭ la krono ĉiam pli falas. Ĝia kurzo estas 0,22. La homoj senesperiĝas, kiel oni povas manĝi, vesti sin, hejti ĉe tiel malalta kurzo kaj tremante rigardas al la proksimiĝanta vintro.

Tagmeze la borso ektumultis, estas inflacio, proprietaĵoj estas perdataj kaj gajnataj. La stumpigita Hungario estas membrigita en Ligo de Nacioj. Denove pasis jaro. Datiĝas 1922. Kio okazis de tiam?

Ĉiudimanĉe milita orkestro ludas en la promenejo Bástyasétány, kaj je ĝia kupra sonoro la preterpasantoj nevole paŝadas laŭtakte.

Ges-roj Tatár promenis sen sia pli juna filino, kiuj jam edziniĝis. Al Ilonka amindumas ministeria aktisto. Pri Johaĉjo s-ro Tatár aŭdis foje, ke li vivas en Pollando kaj laboras kiel pargetdancisto.

La domo de la forpasinta Kornél Vizy restis kiel pli frue, nur la dompedelo estas nova: la alia forloĝiĝis en okupaciitan teritorion[26].

S-ino Moviszter ankaŭ hodiaŭ pianas kaj deklamas poemojn de Ady. Ŝi renkontiĝas kun ĉiam pli junaj homoj. Ŝi farbas siajn harojn kanariflavaj, forte dikiĝas. Kaj ŝia edzo ankoraŭ vivas. Li jam ne devus vivi, sed li, kiun tiel multaj vorte jam enterigis, vivas ĉiam plu, refutante unue ĉiujn objektivajn, klinikajn konstatojn de la oficiala scienco, kuracistoj profesoroj kaj de siaj kolegoj, due la amikajn antaŭdirojn de siaj konatoj kaj estimantoj – inter ili ankaŭ de la forpasinta Kornél Vizy, mistere kaj neklarigeble, kaj oni ne scias, kial. Evidente pro tio, ke io vivigas lin.

Li estas cetere ĉi tie la plej etsignifa punkto. Li eltenas la humiligojn pro sia edzino kaj la kreskantajn kapricojn de Etel. La ĉirkaŭaĵo kompateme ridetas pri li.

Szilárd Druma estas la domintendanto. Ferenc Patikárius heredis la domon post la funebra okazintaĵo kaj konfidis ĝin al lia advokata zorgado. Ĉe la loĝejasigna oficejo li atingis per sia interveno, ke kun ri-

[26] La pactraktato de Trianon post la unua mondmilito fortrançis signifajn partojn el la historia Hungario.

gardo al lia granda praktiko li povu ricevi ankaŭ la loĝejon de la iamaj dommastroj kaj li retapetigis ĝin, kaj nun li loĝas tie kun sia familio. Dume naskiĝis al li belega filineto, poste ankaŭ fileto. Germana fraŭlino superrigardas la tri Druma-fruktetojn, kiuj bele evoluas. Stefi ankoraŭ servas ĉe ili, sed portas okulvitrojn, ĉar ŝiaj okuloj malfortiĝas. Apud ŝi servas eta infanistino kun larĝaj, mongolaj zigomoj, ŝuvakse nigraj harplektoj, simile al ĉino. La oficejo instaliĝis en la dua etaĝo, en la malnova, pli modesta loĝejo. Depost tiam ĝi enorme progresas. Du skribmaŝinoj frapadas tie, kaj la vizitontoj devas plenigi anoncan folion, por kiu afero ili volas renkonti la s-ron advokato. Li ludas ĉiam pli gravan rolon en la publika vivo. Baldaŭ li elpaŝos kiel parlamenta deputito en la postelektoj en distrikto, kie ne estas kontraŭkandidato.

Iun posttagmezon, kiam la stratlanternoj estis ekbruligataj, sed la aŭtuna ĉielo ankoraŭ afable brilis, Szilárd Druma venis malsupren el la Kastel-monto kun du siaj voĉvarbistoj sur la Zerge-ŝtuparo. Ili malrapide paŝadis hejmen sur la milde deklivanta strato Tábor.

Pli malsupre, antaŭ domo kun verda barilo ili enrigardis tra la ferkrada dompordo. En la ĝardeno ili vidis vitritan verandon kun tablo, kovrita por kolaziono.

Ĉi tiu vitrokaĝo kun ĝiaj silenta fermiteco, iluminitaj fenestroj vekis ilian interesiĝon. Ili ĉiuj tri haltis. Kun kaŝita scivolo sed sincera envio ili observis ĝin, pensante en si, kiel ĉiu, kiu de ekstere rigardas ajnan hejmon, ke tie loĝas feliĉo kaj kontento.

Blonda knabeto sidis ĉe la tablo en sia konfekcia vesto, jam post la kolaziono, kaj estis okupata per tio, ke li starigis stansoldatojn en militan disaranĝon sur la manĝerplena tablotuko kaj dume kantetis militan marŝon, batante la takton per la mano. Apude kudris lia patrino, klininte sian seriozan, saĝan kapon super laboraĵon. Sur ŝian meditantan vizaĝon, ĉirkaŭitan per abunda, krone plektita hararo, ĵetiĝis ombro. De tempo al tempo ŝi diris ion al la infaneto. Tiu petis konsilojn, kiel povus venkbati, la hungaroj zigzagantaj inter la laktokruĉo kaj tasoj, la superfortajn francojn, operacantajn per asfiksia gaso kaj tankoj.

De interne, el la loĝejo paŝis sur la verandon alta, taŭzhara viro en laborkitelo, fumante cigaredon. Li plenigis nigran kafon en akvoglason.

Dum li levis ĝin al la buŝo, lia rigardo renkontis tiujn de la tri fremduloj.

Ekhontinte la kaŝobservadon, ili ekmarŝis plu preter la barilo.

– Kosztolányi – diris Druma post tempeto. – Dezső Kosztolányi.

– Ĉu la ĵurnalisto? – demandis la unua voĉvarbisto.

– Tiu.

– Ankaŭ ĉi tiu iam verkis ion – ekparolis la dua voĉvarbisto. – Ian versaĵon. Pri la morto de malsana infano. Aŭ pri orfa knabeto. Mi ne scias. Mia filino menciis tion.

Druma respondis:

– Li estis granda komunisto.

– Ĉu ĉi tiu? – miris la unua voĉvarbisto. – Nun li estas ja plej fidela kristano.

– Jes – atutis la dua voĉvarbisto. – En viena ĵurnalo mi legis, ke li estas blankula teroristo.

– Li estis granda ruĝulo – ripetis Druma. – Li laboris kun la komisaro Pogány. Li estas ankaŭ fotografita kun li en Vérmező.

– Kaj kion li faris tie kun li? – scivolis la unua voĉvarbisto.

– Li rigardis lin – respondis Druma mistere.

– Mi ne komprenas – skuis la kapon la unua varbisto. – Kion do li volas? Kun kiuj li tenas sin?

– Estas simple – decidis Druma la diskuton. – Kun ĉiuj kaj neniuj. Kiel la vento blovas. Pli frue li estis pagata de judoj, li flankis ĉe ili, kaj nun kristanoj pagas lin. Saĝa homo li estas – li okulumis. – Li scias, kion li faras.

La tri amikoj konsentis pri tio. Ili ree haltis fine de la barilo. Videblis tamen, ke ili ankaŭ nun ne komprenas tute la aferon. Sur iliaj vizaĝoj videblis, ke ili havis ĉiam nur unu penson, sed videblis ankaŭ, ke du ili jam ne scipovus havi.

Ili levis la ŝultrojn, ekiris malsupren. Druma ankoraŭ diris ion, pri kio ili ambaŭ bonguste ridegis.

Sed kion li diris, jam ne aŭdeblis.

Pro ilia parolado alarmiĝis Cigno, la kuvaso, kiu gardas la pacon de ĉi tiu domo, ĝi kuris ĝis la angulo de la ĝardeno kaj komencis kolere boji, tiel iliaj vortoj tute perdiĝis en la hundobojado.

Dezső Kosztolányi (1885-1936): hungara verkisto, poeto, tradukisto, kritikisto, ĵurnalisto kaj ne laste ankaŭ esperantisto. Apartenis al la unua generacio de la grava, burĝa literatura revuo *Nyugat* (Okcidento), celanta renovigi la hungaran literaturon. Unu el la plej elstara figuro de la hungaraj beletro kaj liriko. En liaj poemoj li multe strebis al forma perfekteco, belsono. Lia prozo estas simpla, senpera, natura. Lia interesiĝo estis tre multflanka: li pianis, verkis pri belartoj, interesis lin la teatro, li multe tradukis. En Esperanto aperis lia poemoj, interalie en la traduko de K. Kalocsay en Hungara Antologio, Lia romano *Nero, la sanga poeto* en la traduko de J. Horvath.
En sia romano *Anna Édes* li priskirbas provincan junulinon, dungitan kiel servistino ĉe mezklasa burĝa familio. La simplamensa, fervora knabino estas ŝatata de siaj gemastroj, tamen ŝi ne ricevas, kion ŝi plej bezonus: homan traktadon, amon. Ŝia vojo kondukas fatale al tragedio.

* * *

„Kial vi malfruas? Plenumu vian devon. Vi estas nur unu homo. Sed kio do estas pli multa ol unu homo? Nek du homoj, nek mil homoj estas pli ol unu. Faru unu paŝon antaŭen, jen tiel, kaj nun ankoraŭ unu. Venis via vico. Kapon supren, Moviszter, sursum corda, *levu la koron, nur levu vian koron!"*
– Mi ne komprenas vin – diris la prezidanto. – Iom pli laŭte.
„Kial pli laŭte? Ne iom pli laŭte, sed tre laŭte. Kriu – la animo baŭmis en li – kriu tiel, kiel viaj veraj parencoj, la heroaj pastroj de la prakristanoj, kiuj ribelis kontraŭ la paganeco kaj en tombejoj, de apud ĉerkoj kriadis en la ĉielon, disputante kun la Plej Alta Sinjoro, kun la justa sed tre severa Dio, postulante mizerikordon al la falemaj homoj. Vi ja ĉiutage diras en vi la primortan preĝon. Ĉu vi memoras, kio estas en ĝi vortumita? Ne tradas bestiis animas confidentes tibi! *Ne ĵetu al bestioj la animojn, fidantajn al v!* Et animas pauperum tuorum ne obliviscaris in finem, *kaj ne forgesu definitive la animojn de viaj malriĉuloj! Provu ankaŭ vi tiel krii en la areno, superkriante ankaŭ la leonojn, kuraĝa kateĥumeno!"*
– Ŝi estis traktata malvarme – eldiris Moviszter per pli forta voĉo. – Tio estis ĉiufoje mia sento. Sen amo ŝi estis traktata. Senkore.